

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfí Dalmau, Isidre Torrents

L'IDEAL

Quan estem massa cansats de la vida moderna, de la corbata i l'americana, i la lletra que venç demà i l'arribada del vapor demà passat, i el dividend, i el cupó, ens adonem que hi ha en el fons de nosaltres unes quantes idees simples i eternes: que al món tots som germans, que convindria que no hi haguessin guerres, que hi ha justícia i injustícia, i que el nostre deure és fomentar la primera i evitar la segona en ço que estigui a la nostra mà.

Per sentir aquestes idees tan simples, cal que adoptem una actitud d'esperit simple, i ens oblidem del xec, i del cupó, i del dividend, i del vapor. Muntar idees tan simples damunt d'elements tan complicats, és més aviat extravagant.

Es bella una columna dòrica damunt dels tres amples graons. Però ho serà igualment, a dalt de tot de la xemeneia d'una fàbrica? Aquesta és la qüestió. — JOAN CREXELLS, a «La Publicitat»

Les Discussions Gramaticals

No són molts gramàtics definidors ço que ens cal desitjar, sinó molts i forts escriptors assessorats per una única autoritat gramatical. No hi ha res més inútil ni més pertorbador que les discussions sobre els problemes pràctics de la Gramàtica en nom de la pura raó car potser la solució lògicament millor serà la que no triomfarà en l'esdevenidor de la llengua. — M. DE MONTOLIU, a «La Veu de Catalunya»

709.014-B.Esp

Pagho por Lernantoj



Regiono. Parto de lando, korpo, surfaco, karakterizata de io speciala : polusa regiono, regiono de la koro.

Nacio. Aro de homoj, loĝantaj la saman teritorion kaj havantaj komunan devenon kaj lingvon. **Nacia.** De nacio, kiu koncernas nacion: nacia karaktero, nacia lingvo. **Nacieco.** Eco, ecoj karakterizantaj nacion.

Lingvo. Tutaĵo de la vortoj kaj esprimoj, uzataj de unu nacio por kompreniĝo: la angla lingvo.

Dialekto. Variaĵo de lingvo: Esperanto ne havas dialektojn, ĉar de la komenco de sia ekzistado ĝi havas literaturon, kiu fiksas la lingvon.

(El la oficiala Vortaro de Esperanto)

Homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiaro, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj naci-religiaj principoj kaj komunikadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. (Zamenhof)



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KA
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas guto*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

XIII.^a Kongreso de K. E. F.

XII.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Santa Coloma de Farnés 23-25 Majo 1926.^a

La pretigo por la nuna jaro de niaj jam tradiciaj solenaĵoj, antaŭvidigas novan sukceson de nia movado en la katalunlingva teritorio.

La kvanto de premioj atingita, kaj la kvanto de verkoj ricevitaj el multaj landoj, estas kontentigaj.

La centreco de Santa Coloma de Farnés en la teritorio de nia Federacio, kaj la privilegieco pro beleco kaj riĉeco de Naturo en Santa Coloma kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kie troviĝas la fama banloko Orion, estas allogde decidiga.

La esperantisteco de tieaj influaj aŭtoritataj loĝantoj; la diligenteo de nia amiko Josep Turon, sekretario de la Loka Organiza Komitato, kaj multaj aliaj favoraj cirkonstancoj certigas pri sukceso de nia Kongreso okazonta la 23-25 de la proksima Majo.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

Antaŭnoto

Regularo de la Lingva Komitato komencas jene: «La Esperantista Lingva Komitato estas komisiita por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evolucion».

Por konscie plenumi sian devon la Lingva-Komitatanoj do bezonas koni la principojn, kiuj estas ne nur la reguloj kaj elementoj de la «Fundamento de Esperanto» kun la oficialaj Aldonoj, sed ankaŭ la bazoj kaj tendencoj de la nuna Esperanto ĉiutage uzata kaj senĉese kreskanta.

La samajn principojn bezonas ankaŭ ĉiuj verkantoj de lerniloj kaj terminaroj, por sin orienti en multaj dubaj punktoj, kies solvojn urĝe postulas la praktiko de nia lingvo.

Ankoraŭ pli bezonas havi antaŭ la okuloj la principojn tiuj aŭtoroj, kiuj aktive partoprenas en la unuecigo kaj pliriĉigo de Esperanto per siaj literaturaj kaj teoriaj verkoj.

Malgraŭ tiom granda graveco de la principoj, malgraŭ tio ke ili influas nian lingvon en ĝia viveco, ili tamen restas malmulte konataj, diversmaniere komprenataj, eĉ ignorataj. Unu el kaŭzoj de tiu stato estas manko de verkoj, en kiuj oni povus trovi resuman traktadon pri la lingvoprincipoj.

Zamenhof, la aŭtoro de nia lingvo, ne volis esti leĝdonanto post tiu momento, kiam la sorto de Esperanto troviĝis en manoj de la Esperantistaro. Li do estis donanta nur konsilajn respondojn pri tiu aŭ alia izola demando; kaj liaj lingvaj respondoj ne pretendis formi ian koordinitan tutaron.

Post kaj apud Zamenhof, pluraj aŭtoroj multe serĉis, kaj ankoraŭ nun penas formuli, la principojn, sen kiuj nia lingvo ne povis unuforme kaj regule disvolviĝi. Inter tiuj aŭtoroj pleje elstariĝis Boirac, Ĉefeĉ, Fauvart, Kolovrat, kaj sinjoroj De Saussure, Panel, Aymonier, Wüster. Tamen, el ĉi-nomitaŭ aŭtoroj kaj el la ceteraj nenomitaŭ, neniuj publikigis kompletan studon pri la principoj de Esperanto. Iliaj partaj studoj ja dissemiĝis en apartaj broŝuroj, gazetaŭ artikoloj, privataŭ leteroj. La Lingva Komitato, siaflanke, ĝis nun ne povis entrepreni ian sisteman esploron pri la principoj de Esperanto, ĉar ĝi estis uzanta siajn fortojn al la revizio kaj kompletigo de la Universala Vortaro, al la esploro de kelkaj Zamenhofaj verkoj, kaj al la gardado de la fundamenta netuŝebleco. Ĉi verketo celas resumi kaj kun-

ordigi la principojn de Esperanto, kiujn la verkinto ĉerpis ĉie: en Zamenhosa verkaro, en la Fundamento, en la teoria verkaro de la esperantistoj kaj ne-esperantistoj, kaj precipe en la praktika uzado de nia lingvo — buŝa, skriba, presa.

En ĉi verketo estas montrataj dudek principoj de Esperanto. Tiu nombro 20 ne pretendas esti definitiva: iu alia povos ĝin pliigi aŭ malpliigi, jen eltrovinte pluajn principojn, jen reduktinte ilin al la malpli granda nombro. La maniero, en kiu la verkinto ilin traktis, ankaŭ ne pretendas esti objektiva kaj ĝusta. Tute kontraŭe, oni povas certe antaŭdiri ke ĉi verketo, kiel unua provo resumi la lingvoprincipojn, estos baldaŭ superirita de aliaj, pli maturaj, provoj, verkoj, eĉ ĉefverkoj.

Ĉio, kion vere aspiras la verkinto, estas nur deziro konvinki la kleran parton de Esperantistaro pri la urĝa neceso unuiĝi en la interna flanko de Esperantismo, same kiel ni unuiĝas en la ekstera flanko. Se por la lasta necesas firma organizo kun la aktiva centro, por la unua necesas klaraj principoj kun la unueciga karaktero. Se la lasta celas plifirmigi korpon de l' Esperantistaro, la unua celas plifortigi animon de la lingvo Esperanto.

Kun plena konscio pri la graveco de sia tasko, kaj kun sincera konfeso pri la nesufiĉo de siaj fortoj, la verkinto homaĝe dediĉas ĉi libreton al la samideanoj, kiuj sin oferis kaj nun sin oferas por fari nian Esperanton inda je l' alta rolo: la lingvo tutmonda.

Ĉiuj elementoj, reguloj kaj tendencoj de Esperanto povas esti konsiderataj kiel sekvoj de ĝiaj principoj, kies nomaro estas jena:

1. Principo de origino — kultureŭropa.
2. Principo de disvastiĝo — tutmonda.
3. Principo de bazo — fundamenta.
4. Principo de ekzisto — aŭtonoma.
5. Principo de ekonomio — minimuma.
6. Principo de elparolo — fonetika.
7. Principo de akcentado — toneca.
8. Principo de skribo — ortografia.
9. Principo de propranomo — nacia.
10. Principo de radikelekto — internacia.
11. Principo de terminaro — scienca.
12. Principo de nevarieco — aglutina.
13. Principo de vortofarado — morfologia.
14. Principo de regulformeco — simetria.
15. Principo de unusignado — semantika.
16. Principo de esprimo — klara.
17. Principo de frazofarado — sintaksa.
18. Principo de versofarado — metrika.
19. Principo de konservo — tradicia.
20. Principo de kreskado — evolucia.

* * *

§ 1. Materialo, el kiu estis kreita Esperanto, apartenas al la kultura Eŭropo. Tio estas, laŭ historia ordo, la materialo de lingvoj: helena, latina, franca, itala, germana, slava kaj angla. Pro familia parenceco la sama materialo ekzistas ankaŭ en ceteraj lingvoj de la kultura Eŭropo kaj de la kolonioj. Utilas distingi en tiu materialo tri tavolojn: a) klasika vortaro de la helena kaj de la latina. b) naturscienca terminaro moderne artefarita el la helena, latina, araba, k. a. c) radikaro komuna por vivaj eŭropaj lingvoj (plus radikaro de la hindeŭropa praa lingvo).

§ 2. Kontraŭe je ĉiu nacia lingvo, kiu havas sian limitan teritorion, la lingvo tutmonda apartenas egale al ĉiuj terpartoj, kaj pro sia neŭtraleco ĝi povas esti uzata libere de ĉiuj diversgentanoj, kiuj tiel evitas tuŝi reciprokajn nacian sentemon.

§ 3. Lingvoj naciaj ekzistis dum longa tempo antaŭ ol ili estis skribataj, kaj pasis ankaŭ longa tempo inter apero de la unua literaturo kaj apero de la unuaj gramatikoj. Ĉiu lingvo natura ja estas naskita kaj vivas sendepende de la skribaĵoj, kiuj mem sur ĝi sin apogas. Alie estas artefarita lingvo kiu aperis ĝermita sub formo de la gramatiko kaj radikaro, fiksita en la unua libreto. El tiu libreto kreskis literaturo, gazetaro, internacia korespondado kaj buŝa uzado, kiuj kune formas tutmondan movadon, nomatan la Esperantismo. La libro, kiu estas nun sankciita bazo por ĉiuj Esperantuzantoj, portas titolon «Fundamento de Esperanto».

§ 4. Por esti neŭtrala, la tutmonda lingvo devas ekzisti sendepende de ĉiu aparta nacia lingvo aŭ lingvogrupo. Por esti facila ĝi devas posedi internan harmonion, t. e. havi siajn proprajn leĝojn. Tiel aperas principo de aŭtonoma ekzistado de Esperanto.

§ 5. Elspezi minimuman forton celas ĉiu, kiu volas agi por utila rezultato. Tendenco malpleje elspezi, por atingi sufiĉan interkomprenon, penetras ankaŭ ĉiun vivantan lingvon. Se Zamenhof ne imitis la eŭropajn lingvojn en ilia komplika konjugaro, en ilia seksa genro, k. c., li tion faris por krei relative facilan lingvon. Kaj la evoluo de nia lingvo, en ĉefaj trajtoj, sekvas vojon de ĉiam pli kaj pli granda elasteco kaj facileco.

§ 6. Kun la skriba materialo, komuna por kulturaj eŭropaj lingvoj, Zamenhof akceptis ankaŭ la sonojn, parte komunajn por Meza Eŭropo, parte ne tro malfacilajn por plimulto da l' kulturuloj. Se la sonsistemo de Esperanto ne estas facila por anglo, aŭ por japano, ĝi tamen por ili estas pli facila ol sonsistemo de la franca, rusa, germana, araba, ĉina, kc. Pro la granda diverseco de sonsistemoj, uzataj en la tutmondo, estas neeble trovi en ili komunajn sonojn; tial, ĉiu pretendo atingi tutmondan neŭtralan sonaron, por la internacia lingvo, estus vana. Meznombro, Esperanta sonaro estas malpli riĉa ol la nacia.

§ 7. Formale, la akcento havas nur mekanikan rolon: altigi antaŭlastan silabon. Esence, ĝi havas organikan sencon, ĉar pro la akcenta regulo, neniam estas akcentataj la finaĵoj: o, on, oj, ojn, a, an, aj, ajn, e, en, i, as, is, os, u, us, al, am, el, es, om, u, uj, aŭ, er. Krom la vorta, ekzistas ankaŭ la fraza akcento. Krom la akcentoj, ekzistas ankaŭ tonoj, kiuj povas havigi al frazo (aŭ al vorto) la nuancon: demandan, miran, ordonan, duban, deziran, bedaŭran, koleran, petan, k. m. a.

§ 8. Ortografio en Esperanto bazas sur teoria postulo: por unu sono — unu litero. Tial do en nia lingvo ne ekzistas sensonaj kaj plursonaj literoj, nek simplaj sonoj skribataj per duoblaj, trioblaj aŭ kvaroblaj literoj. Laŭ dua postulo de la ortografio oni skribas aparte ĉiun frazeron, eĉ kiam ĝi fonetike ligiĝis kun la najbara: (*labela sonĝo del homaro*).

§ 9. Aĵoj komunaj, kiel tero, arbo, pomo, birdo, havas diversajn nomojn ĉe diversaj popoloj. Aĵoj unikaj, kiel London, Bern, Ebro, Neva, Lev Tolstoj, Hektor Hodler, havas ĉiu sian solan nomon, kiun diversaj popoloj povas ripeti kun pli aŭ malpli granda kripligo, per tiu aŭ alia aboco. En antikva tempo, pro malproksimo kaj malzorgo, oni multe kripligis la proprajn nomojn, kaj tiu malbona nomado iomgrande daŭras eĉ nun, kiam la distancoj mallongiĝis kaj la zorgoj pliiĝis. Nuntempe, por ekz. nomi aŭstrian ĉefurbon, ni ne bezonas kolekti kaj kompari ĝiajn kriplitajn nomojn: Vienne, Vienna, Vjena, Videjn, Beĉ, ktp.; sufiĉas nin turni al tiu urbo mem, kaj preni ĝian realan nomon, por poste ĝin transskribi per Esperantaj literoj. Ne gravas, se ĝia nuna nomo (Wien) estas ankaŭ kriplajo de iu praa vorto, kiun la romanoj siatempo kripligis en «Vindobona»; sufiĉas ke nunaj vianoj ĝin nomas tiel. Per sama maniero ni povas ekz. skribi Ĵan, Ĝon, Johan, Jan, Jon, Jovan, Ĝovani, Jvan, lasante al ĉiu nacio ĝian propran koloron, anstataŭ senkolorigi ilin ĉiujn per pseŭdo-internacia nomo «Johano». Unu el universalaj geografiaj kongresoj rekomendis uzi sur la sciencaj kartoj nur lokajn, originajn, nomojn, skribante ilin per unuforma alfabeto. En Esperanto ni povas nur plenumi tiun rekomendon.

P. STOJAN, L. K.

(daŭrigota)



Pro... kaj Por...

Nia bona samideano kaj bona profesoro de «Radio Barcelona», Artur Domènech, feliĉe resaniĝis kaj reprenis sian kurson tre elokvente. La kompilinto de «Kataluna Antologio», Jaume Grau Casas, tre lerte paroladis ankaŭ ĉe «Radio Barcelona» pri la nova granda verko en Esperanto.

XII^{aj} Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

LISTO DE PREMIOJ

(fino)

XXXII. — Premio de S-ro. Joaquim Trias de Santa Coloma de Farnés: skatolo da frandaĵoj, specialaĵo de la firmo. Temo: Laŭvola.

XXXIII. — Premio de S-ro. Francesc Trias de Santa Coloma de Farnés: skatolo da frandaĵoj, specialaĵo de la firmo. Temo: Laŭvola.

XXXIV. — Premio de S-ro. Esteve Monegal de Barcelona: 50 pesetoj Temo: Loŭvola.

LISTO DE VERKOJ RICEVITAJ

(Daŭrigo)

14. Pax Tibi, Marce, Evangelista meus. — 15. Mallorko. — 16. Esperantujo. — 17. Vojaĝanto. — 18. Merlin. — 19. Trokadero. — 20. Brilu mia stel'. — 21. Amiko de la Floraj Ludoj. — 22. Amu vian patrujon. — 23. Tragedio. — 24. Mieux vaut tard que jamais. — 25. Lumo, amo, vivo. — 26. Mia recepto. — 27. Poemo sen rimoj. — 28. Modesta konsilanto. — 29. Modesta batalanto por rajto kaj honoro. — 30. Kismeto. — 31. Amo miraklojn okazigas. — 32. Ankro. — 33. Mi diris, penu, hom', kaj firme fidu! — 34. Ni proponas, vi disponas. — 35. Mia somero sonoras. — 36. On y soit qui mal y pense. — 37. Lingvo estas fosilia historio. — 38. Procède et semper - Italia - semper! — 39. Cyrano. — 40. Mitologio. — 41. Blankaj birdetoj. — 42. Havu sunon en koro. — 43. Ondetoj. — 44. Kiu amas sian kunhomon amas Dion. — 45. Ereto. — 46. Tagiĝas en la mondo. — 47. Mi riskis ĝin. — 48. Serĉante ni lernos. — 49. Junularo. — 50. La vivo ne estas plej valora posedaĵo... — 51. Vian mizeron fabeligu! — 52. Ni semas kaj semas. — 53. Printempa dezir', aŭtuna sopir', esperinspir'.

Peto. — La aŭtoro de la verko devizita «Mieux vaut tard que jamais» estas petata tuj sendi fermitan koverton entenantan liajn nomon kaj adreson laŭ indikas la Regularo de la Floraj Ludoj. — Ankaŭ oni petas la aŭtoron de la 3 verkoj ricevitaĵ: «Kio en la koro sidas, la vizaĝo perfidas». «Plej granda potenco kuŝas en la komenco» kaj «Bone tiu sidas, al kiu la sorto ridas», sendi plej rapide la originalojn al la Sekretario, ĉar nur oni rivevis la fermitan koverton kun la nomo kaj adreso. — Lasthore ĉiuj alvenis.

DANKON

Ni deziras esprimi al ĉiuj esperantaj gazetoj represintaj la liston de premioj kaj temoj por la XIIaj Floraj Ludoj. Per tiu represo ili certe atentigas siajn legantojn, kaj decidigas kelkajn partopreni la konkursojn por atingi premiojn kaj gloron. Ni speciale ŝatas la bildon pri Floraj Ludoj en la XV jarcento publikitan de «Espero Katolika», kaj tre dezirus ĝentilon de tiu gazeto permesi al la nia ankaŭ publiki ĝin per sendo al ni de la koncerna klišo, kiun ni poste danke resendus.

El Objektivaj Recenzoj pri la «Kataluna Antologio»

(El «*Esperanto*» de U. E. A.)

«Ofte ni plendis pri malgraveco kaj maldikeco de esperantaj presaĵoj. Kataluna Antologio feliĉe surprizas per la malaj kvalitoj. Ĉiel laŭdinda ĝi estas. Belega libro, riĉa enhavo, neta preso sur luksa nurlina papero, vera libramanta eldonaĵo, bibliotek-ornamo, ties fiero kies posedaĵo. Ne nur la eksteraĵo estas plaĉa; ne malpli valora la teksto mem. Serioze scienca en la historiaj, lingvaj literaturaj studoj, kaj ankaŭ ĉarma legaĵo en la antologia parto, aro da poezioj, skizoj, humoraĵoj, noveletoj. La kompilinto kaj verkinto de la plej multaj tradukoj versaj kaj prozaj, S-ro. Jaume Grau Casas, konfesas, ke li oferis multjaran laboron por realigi sian celon. Li sinceran gratulon meritas de la esperantistaro, kiel ankaŭ liaj samnaciaj kunhelpintoj. Amo al patrujo kaj deziro diskonigi ĉien ĝian spiriton kaj literaturan trezoron, fervoro al Esperanto, ilo de internacia reciproka kompreno kaj ŝato, jen ambaŭ sentoj, kiuj instigis, kuraĝigis la ĉeflaborinton. Lia moto estis: «Ni volas honori la lingvon de niaj prapatroj per la lingvo de niaj prapnepoj».

G. S.»

(El «*Heroldo de Esperanto*»)

«Kio? Literatura verko, volumo pli ol 400-paĝa? Ĉu vere? Ĉu vi zurprizite ne diris tion, fidela «Heroldano», leginte la titolon? — Efektive, ĝi ekzistas, ĵus naskiĝis, verko inda je nia plej serioza atento kaj je nia senlima admiro. — Antologio! Nur antaŭ nelonge mi parolis ĉiloke pri antologioj (bulgara kaj pola antologioj) kaj opinias ripeton superflua. Sed mi certigas vin, ke la K. A. estas kaj estos senrivala laŭ ĉiuj vidpunktoj. — El du fontoj fluegas abunde la nektaro de arto kaj poezio en nia Esperanto-literaturo: Budapeŝto kaj Barcelona.

... Grau Casas kaj aliaj katalunaj samideanoj faris la tradukojn senescepte bonegaj, artismaj. Menciinda estas nepre la unuakvalita papero kaj la senriproĉe klara preso, kiu ne lacigas la okulon. — La librego ne estas multekosta rilate al ridinde etaj broŝuroj, kiuj svarmas en nia literaturo kaj kies elveno ofte estas duberaĵta. La prezo absolute ne egalvaloras la gigantan laboron de la kompilinto kaj de la fervoraj kunhelpantoj: tre modesta ĝi fakte estas. — Ni elkore danku niajn katalunajn fratojn por ilia faro kaj aĉetu la verkon. La servo, kiun ili faris al sia patrolando kaj al nia Esperantujo, trovos brilan rekompenco.

M. BUTIN, L. K.»

Pro... kaj Por...

«Paco kaj Amo» translokiĝis al carrer Planeta angulo Plaça del Sol, en Gràcia. La nova sidejo estas granda kaj tre deca por efika agado per kursoj kaj kunvenoj. Nian sinceran gratulon al la ebligintoj de la progressa ŝanĝo. Nian fervoran deziron por prospero de novsideja agado de la longtempe vigla «Paco kaj Amo».

Nia malamika iu klopodis malpermesigi la okazigon de nia Kongreso 1925 en Majorko, sed nia brava pioniro Narciso Bofill venkis nian malamikan iun, kaj nia XII^a okazis plej brile. Nia malamika iu insultis nin en la Kongreso en Kordovo, kaj lasttempe nia malamika iu punigis nin al pago de 500 ptoj. pro enhavo en nia oktobra numero de K. E. — Ni petas niajn amikojn sendi al ni plej baldaŭ monhelpon por repago al samideano antaŭpaginta tiun sumon, kaj ni kompatas nian malamikan iun por la malsamideana sukceso kontraŭ nia gazeto.

Homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiaro, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj naci-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. (Zamenhof).

Pri Emilio Gastón Ugarte. — Zaragoza, 6 jan. 1926. — Sro. Direktoro de «Kataluna Esperantisto». — Barcelona. — Estimata Sinjoro. Du vortojn nur por esprimi al Gazeto miajn dankojn pro la nekrologa artikolo pri S-ro. Emilio Gastón Ugarte, nia neforgesebla profesoro, mia amata amiko dum niaj tutaj vivoj. La K. E. F. perdis sian honoran membron kaj plej bonan amikon. La A. E. F. perdis sian animon; mi perdis fraton. — Via, Manuel Maynar Barnolas».

ESPERANTISMO

«Ne strange ke akompananta la eltrovon de la kuriozemo estu la vigleco de la emo pligrandigata de la konvinkigo pri la profito signifanta por ĉiuj popoloj posedi interkomprenilon, kiu, kune kun la lingvo kaj literaturo naciaj, metus ilin je tujarilato kun tuta la Homaro.

DRO. KORTEZO»

«A este descubrimiento de la curiosidad, no es mucho que acompañara la viveza de la afición, reforzada para ello por el convencimiento del provecho que significaría para todos los pueblos el poseer un instrumento de comunicación que, agregado a su lengua y literatura maternas, les pondría en inmediata relación con la humanidad entera.

DR. CORTEZO»

El «La Suno Hispana» — Nro. 104, jusaperinta.

Pri la Kataluna Lingvo. — «... pri via hejmlingvo mi komunikas du citojn, eble nekonatajn por vi. — En nov-aperinta lingva studo de konata romanlingvisto W. Meyer-Lübke «Das Katalanische». Seine Stellung zum Spanischem & Provenzalischen sprachwissenschaftlich & historisch dargestellt. Heidelberg. 1925. Winter. XII + 191 pp. la aŭtoro klarigas per historio la fakton ke evoluo de l' kataluna estis pli proksima al la provenca ol al la iberia. En nuna kataluna teraro la antikvroma koloniigo estis densa & la kamparo mem romaniĝis, dum en Iberio nur la urboj romaniĝis sed la kamparo evoluis sendepende, do alie ol la kataluna popolo. En granda verko «Les Langues du Monde» par un groupe de linguistes sous la direction de A. Meillet & M. Cohen. Paris. 1924 XVI + 811 pp. + 18 cartes. En tiu «lasta vorto» de l' lingvistiko mi trovas: «On peut ramener les différents parlers romans aux groupes suivants: a) groupe *italien*, b) gr. *provençal*, c) gr. *espagnol*... anciens textes sont de 1145 (charte d'Oviedo) & 1155 (Fuero de Avilés), d) gr. *catalan*, qui outre la Catalogne comprend la Valence & les Baléares. Le plus ancien texte est de 1171 (du monastère Roda). e) gr. *portugais*... una charte de 1192. g) h) i) groupes: *rhéto-roman* ou latin, *dalmate*, *roumain*, *français*». Do, inter la 9 grupoj nov-latinaj la kataluna okupas memstaran lokon. Mi notis: keltdevenaj: *blat*: franca *blé*: slava *biljé*; *fang*: fr. *fange*: sl. *bagno*: Tiajn keltdevenaĵojn oni nomas «bas-latin» sed ili ne estas latinaj...» — P. STOJAN.

Lastan vintron la esperantistoj de la ĝemelurboj Minneapolis kaj St. Paul, Minnesota, Usono, dissendis sian unuan programon en Esperanto pere de la potenca radio stacio WCCO. La rezultato estis tiel bonega ke la estraro de WCCO volonte konsentis ke ni dissendu alian programon. Ĝi okazos la 12an de Februaro, je la datreveno de la mondfama Usona eksprezidanto Abraham Lincoln, kaj estos do Lincoln'a programo. La programo komencos je la 11:30 horo nokte. Oni elektis malfruan horon por ke la aero estu pli libera kaj por ke oni estu pli certe aŭdata ne nur en tuta Usono sed ankaŭ en Eŭropo. WCCO, Ora Medalo Stacio, estas propraĵo de Washburn Crosby Kompanio, muelistoj de la fama Gold Medal Flour (Ora Medalo Faruno). La funkciadon de la stacio kontrolas 500 subskribantoj de Minneapolis kaj St. Paul. WCCO, kun potenco da 5,000 uatoj, estas unu el la 14 plej potencaj stacioj en Usono. La ondlongeco estas 416.4 metroj. Ni urĝe petas ĉiun leganton ke li nepre skribu al WCCO, Gold Medal Station, Minneapolis, Minnesota, U. S. A., pri lia sukceso aŭ malsukceso en la aŭdado de la programo. La esperantista movado tie ĉi estas nova sed tre vigla. Vi montru la vivecon de la movado ĉe vi per nepra letero aŭ karto.

Al la Redakcioj, Organizaĵoj kaj Unuopuloj-Esperantistaj de tutmondo! — Estimataj Samideanoj! La ĝisnuna aranĝado de multnombraj etaj lokaj Ekspozicioj Esper. estas ĉies fortojn tro absorbanta kaj kaŭze de ilia lokeco ne tro efika. Por tion eviti, la «Komitato de Esperanta Ekspozicio» en Lublin, Polio, Eŭropo, post interkonsento kun plejmulto de pollandaj Esp.

Organizaĵoj konstituiĝis kiel *Tutlanda migranta Ekspozicio Esperantista* okazonta en Januaro ĝis Marto 1926 — kaj petas je alsendo de ĉiulandaj gazetoj, broŝuroj, libroj, presaĵoj, poŝtkartoj ktp., sed precipe de ĉiuj dokumentoj de adaptado de Esperanto en praktika vivo: scienco, pedagogio, komerco, arto, sporto, sociaj kaj religiaj movadoj ktp. en postmilita periodo. Ĉiujn sendaĵojn, por kiuj ni plej kore dankas, ni petas sendi al la adreso: Seweryn Przybyszewski. Vic-del. de UEA., Lublin, Graniczna 3. Polio, Eŭropo. Ĉiu sendinto ricevos koncernan kvanton da belaj, ilustritaj poŝtkartoj kun popoltipoj kaj vidindaĵoj de Polio.

Al niaj Grupoj, abonantoj kaj izolaj membroj, ni esprimas la peton ke ĉiuj pagu kaj pagigu la kotizojn al K. E. F. plej akurate. Grupaj kotizoj estas po dek ĉiumonataj centimoj po grupano. Individuaj kotizoj estas po ptoj 3'50 jare. Jarabonoj al «Kataluna Esperantisto», 6 ptoj por enlandanoj, kaj 6 sv. fr. aŭ egalvaloro efektivebla en Barcelono, por eksterlandanoj. Se por faciligi la sendon de pago vi aldonos helpmonon, vi estos dankinda kaj ni povos agadi pli multe por nia kara afero. Bonvolu adresi ĉiujn pagojn al Sro. Kasisto de K. E. F., C. València 245. — Barcelona. La membro-abonantoj de K. E. F. kaj precipe la Grupoj estas petataj utili la helpon de nia Federacio por propagando kaj lernado de Esperanto. Tiucelajn petojn bonvolu sendi al la dirita adreso al la nomo de Sro. Sekretario de K. E. F. — Ĉiuj Grupoj kaj individuaj K. E. F.-anoj ankaŭ estas petataj sendi interesajn notojn Pro... kaj Por... al la direktanto de «Kataluna Esperantisto», C. València, 245. — Barcelona.

Tre prave nia samideano en Bilbao Sro. Victor O. Allende diras en «La Suno Hispana»: «En diversaj okazoj mi vizitis esperantistajn grupojn en Francujo, Germanujo, Anglujo kaj Hispanujo. Ordinare en la grupejo oni parolas nacian lingvon. La grupanoj profitus sendube pli bone la tempon se ili parolus Esperanton; sed, bedaŭrinde, tion oni ne faras. Same okazas kiam kunpromenas du esperantistoj. Ili parolas, ĝenerale, nacian lingvon.» La Barcelonaj loĝantoj estas petataj ĉeesti ĉiudimanĉe la interparoladan kafkunvenon en Restaurant Moritz, Plaça Sepúlveda, de la sesa ĝis la oka vespere por praktikado de Esperanto. Niaj plej lertaj samideanoj ordinare konsistigas tiun dimanĉan kunvenon tre praktikan por alkitimiĝo al interparolado en Esperanto.

Multaj Grupoj en nia teritorio havas fiksajn datojn por okazigo de festoj. «Lumon» en Terrassa famiĝis pro sia kristnasktaga festo. En la lastpasinta Decembro tiu festo okazis tre sukcese dank' al elokventaj paroladoj de niaj konataj oratoroj Solà, Oliart kaj Girona en tiu urbo.

Bonegan impreson faris en la rondoj de katalunaj verkistoj la granda esperanta libro «Kataluna Antologio». — Profite de tiu fakto, laŭ iniciato de K. E. F. kaj efika kunlaboro de la Barcelona Esperanto-Societo ĵus fondita, estas organizitaj ekspozicio de libroj kaj gazetoj esperantaj kaj kurso de nia kara lingvo en la Barcelona Ateneo.

En Lirto sukcese okazis «Tria Regiona Kongreso de la Federación Esperantista Levantina» dank' al klopodado de Sroj, Piñó, Serra, Marzal kaj Albiol, la pasintan novembron. — Raporte diras «La Suno Hispana», decembra numero: «Malferminte la kunvenon, per aklamado estis elektitaj Prezidanto tiu de la loka komitato Sro. Johano Francisko Serra Ferrando, agante kiel Sekretario tiu de la Federacio Sro. Piñó kaj helpantoj Sroj. Caplliure kaj Soler Valls. — Post legado, de la antaŭa akto, okazinta en Cheste, okaze de la Dua Regiona Kongreso, estis aprobatu unuanime. — Tuj poste Sro. Piñó diris sendetalan raporton pri la faktoj okazintaj post la kongreso de Bilbao, pri la eksigo prezentita de la prezidanto de Iberia Esperantista Konfederacio Sro. Benigno de Luna, pri verko de regularo de Madrida Grupo por projektata Hispana Esperanta Asocio, pri disigo de Konfederacio kaj pri konkludoj balotitaj en la nacia kongreso de Kordovo, en lastepasinta Majo, okaze de legado de regularo de nova societo, kiun klarigis al la ĉeestantoj rilate al la artikoloj pli esencaj kaj studindaj. — Sro. Prezidanto envojigis la diskutadon proponante ke, tial ke en la Kordova Kongreso oni ne alvenis en konkretan konkludon kaj en la kongreso kunvenonta en Madrido dum Majo 1926, Federación Esperantista Levantina rajtas difini du reprezentantojn siajn por interveni en la fondo de H. E. A. oni nomu de nun tiajn du reprezentantojn, donante al ili plenan rajton por baloti tie la plej konvenan al propagandaj esperantistaj interesoj en Hispanujo kaj de la bona funkciado de nia Federacio. — La prezidanto demandis ĉu la Kongreso preferis malfermi diskutadon pri tuta projekto de regularo de H. E. A. aŭ po artikoloj fariĝinte tuj viva diskutado pri la motivoj devenigintaj la verkon de dirita regularo kaj fondon de nova asocio, kiun partoprenis Sroj. Pérez Requena kaj Mániez, kiuj montris sian malĝojon pro la faktoj okazintaj, bedaŭrante ke ne konsultinte la volon de federacioj oni kreis novan organizaĵon malestimante alian, kiu tiom da penadoj kaŭzis por sia kreado». — Okazis ankaŭ belaj festoj, paroladoj, akcepto ĉe aŭtoritatuloj, k. t. p. Por Esperanto ĝi estis efika, kaj tial ni gratulas la organizintojn kaj ceterajn partoprenintojn.

En Sevilla ankaŭ revigliĝas la movado por Esperanto. — La katalunaj esperantistoj profunde deziras la disvastiĝon de Esperanto en la tuta Hispanujo.

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado. — Sidejo: 12 Bd. du Théâtre, Genève. — Adreso por korespondaĵoj. — Ni petas, afable atenti pri tio, ke ĉiu oficiala korespondado de nia komitato estas farata de nia sekretario. Ĉiuj korespondaĵoj do devas porti la supre indikitan adreson. Ni tre petas ne adresi al personoj (krom privatletero), sed simple al nia komitato. — Oni ankaŭ ne sendu al ni sendaĵojn, destinitajn por UEA, ĉar nia laboro estas tute apartigita.

Naciaj Societoj en KR kaj Fakorganizoj. — Konforme al § 7 de la Organiza Statutaro nia komitato prenis sur sin ĉiujn eksterajn laborojn de KR.

Ni do petas, ke la anoj de KR kaj la fakorganizoj interrilatu kun *nia komitato* pri ĉiuj propagandaferoj ktp.

Cirkuleroj. — Fine de decembro ni dissendis 2 cirkulerojn al ĉiuj naciaj societoj, anoj de KR kaj ĉiuj fakorganizoj. Tiuj, kiuj pro iu kaŭzo ne ricevis la cirkulerojn, bonvolu tuj sciigi nin. Ni ankaŭ petas pri afabla rapida sciigo de eventualaj adresŝanĝoj.

Korespondantoj. — Ni estos tre dankemaj pri sciigo de adresoj de samideanoj, kiuj per jara pago de 100 sv. fr. povus deziri fariĝi korespondanto de I. C. K. — Ĝis 31 decembro la sekvantaj samideanoj fariĝis korespondantoj: (laŭ aliĝdato). 1. S-ro. D. Buchanan, Rothesay. 2. S-ro. Koogecu Nišimura, Ajabe. 3. S-ro. Teizo Eisaki, Fukuoka. 4. S-ro. J. Borel, Vau-marcus. 5. F-ino. G. Wickham, St, Basile. 6. F-ino. Offerhaus, s'Gravenhage. 7. S-ro. J. Mangada-Rosenörn, Madrid. 8. S-ino. R. Weinberg, Kraków. 9. F-ino. E. M. Milner, Leek. 10. S-ro. D-ro. Crowley, Welwyn-Garden-City. 11. S-ro. D-ro. H. Arnhold, Dresden. 12. S-ro. D-ro. E. Loth, Pabjanice. 13. Delfi Dalmau, Barcelona. 14. D-ro. Vogt, Stuttgart. 15. S-ro. v. Frenckell, Dresden-A. 16. J. Merchant, Sgeffield. 17. S-ino. A. Morris, New-York. 18. S-ro. E. Legrand, Montevideo. 19. S-ro. D-ro. Fulda, Berlin. 20. S-ro. Ed. Stettler, Bern. 21. S-ro. B. Kötz, Leipzig. 22. S-ro. Chas. H. Edmonds, Welwyn-Garden-City. 23. S-ro. J. J. Boutwood, Hastings. 24. S-ro. A. J. Adams, Hastings. 25. Chas. M. Cather, Port-Said. — NARCISO BOFILL, Palma de Mallorca.

Akademio. — Estraro de la Akademio por la jaroj 1926-1927-1928 (laŭ la lastaj elektoj). — Prezidanto: Prof. Th. Cart. — Vicprezidantoj: S-ro Warden kaj D-ro Dietterle. — Direktoroj de la tri Sekcioj: Prof. Grosjean-Maupin. D-ro Lippmann, D-ro Privat.

En la lasta ĝenerala kunsido okazinta ĉe «Esperantista Klubo Palma» oni elektis la jenan direktan komitaton: Prez. S-ro B. Font; Sekr. S-ro. A. Nadal; Vicskr. S-ro. J. Barceló; Kasisto S-ro. N. Terrasa; Bibliot. S-ro. F. Molinos; Voĉdonantoj 1^a S-ro. J. Matas, 2^a M. Barrios, 3^a S-ro. G. Cortada. — La klasoj de Esperanto gvidataj de la honora prezidanto S-ro. Narciso Bofill sukcese daŭras ĉe la nomita Grupo, kies anaro multe pli multiĝis de la lasta kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio» okazinta en tiu ĉi urbo. Ankaŭ nia movado disvastiĝis tra la tuta insularo Majorko; en kelkaj el ĝiaj vilaĝoj oni fondis Grupon esperantistan. — La Sekretario, A. Nadal.

«Zaragoza 21^a-1-26^a» — Kataluna Esperantisto — Barcelona. — Estimataj samideanoj: La 10^an de la nuna monato okazis ĝenerala kunsido de la esperanta Societo «Frateco» prezidita de S-ro. V. Loren, kiu esprimis antaŭ la ĉeestantoj sian sinceran ĉagrenon pro la morto de S-ro. E. Gaston neanŝtataŭebla prezidinto de nia Societo, kaj fervora esperanta pioniro. — Sama malĝoja sento regas ĉiujn kunvenintojn. — Oni decidis danki al la gazeto «Kataluna Esperantisto» pro la esprimo de ĝia kondolenco okaze de

tiu malfeliĉaĵo. — Poste estis elektita nova komitato kies membroj estas: Prez. S-ro. J. Martínez; Vicprez. Pastro V. Loren; Sekr. S-ro. J. Orós; Vicsekretario, S-ro. E. Artigas; Kasisto S-ro. T. Rubio; Vickas. S-ro. R. Gaston; Voĉdonantoj: S-roj. M. Maynar, J. Larruga, J. Ma^a Julve. — La nova komitato sendas al vi sian respektplenan saluton restante sincere kaj samideane via. — La Sekretario, J. Orós».

Nia malnova amiko, kataluna samideano Santiago Gomis, en Ameriko, Urugvajo, Montevideo, estas pioniro de forta nove vigla movado en Sudameriko. Ni fervore deziras sukceson al la amiko kaj al la samideano por antaŭenigo de nia afero en tiuj simpatie memorataj landoj, kie de antaŭ multaj jaroj katalunoj semis kaj semas por Esperanto.

La Barcelona-Radio estas baldaŭ inaŭguronta multe pli potenca stacion, tre gravan reorganizon. Nia amikino F-ino Castellví kaj nia amiko D-ro. Bartomeu jam parolis al la nova Direktoro por la programoj de la Barcelona-Radio, la eminenta kataluna muzikisto Comelles-Ribó, kiu bonvole akceptis Esperanton. Grava Festo por kaj pri nia kara afero estas okazigota ĉe la nova stacio de la Barcelona-Radio post ĝia inaŭguro. En nia proksima numero eble detaloj certaj estos publikitaj.

Ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco, en Santa Coloma de Farnés. — Dum nia proksima Kongreso en Majo, ni okazigos ekzamenojn por premio per atesto al la esperantistoj kiuj pruvos tra ekzameno ke ili konas profundete, profunde aŭ profundege la gramatikon kaj la internacian lingvon. Ni, do atentigas ĉiujn kursanojn kaj jam lertajn gesamideanojn, ke ili pretiĝu por atingo de atesto. — Por pruvo de «lernado» de gramatiko kaj Esperanto sufiĉas freŝa kaj konscia lerninteco de la «Gramática» (curs mitjà) de Pompeu Fabra, kaj de la Zamenhofa Fundamento. Por pruvo de *kapablo* estas ankaŭ necesa la kono de «Esperanta Sintakso» de Paul Fructier. Kaj por pruvo de *profesoreco* estas plie necesa la kono de «Lingvaj Respondoj» de Zamenhof kaj «Converses Filològiques» de Pompeu Fabra. — Bona helpa libro estas la «Gramática Raonada d'Esperanto», de F. Pujulà i Vallès, kaj «Curs Pràctic d'Esperanto» de la sama aŭtoro. Ĉiuj tiuj libroj estas nun aĉeteblaj en multaj niaj Grupoj kaj en la librejo Nacional i Estrangera, Rambla Catalunya, 72.

«*Al la Sekretario* de Internaciaj Floraj Ludoj, Creu, 75. — Terrassa — Tre estimata Samideano! — Kiel iama membro de la juĝantaro kaj ankaŭ ĉiama interesiganto de la Floraj Ludoj mi permesas al mi atentigi vin pri unu eble pripensinda novarango. — Estus certe tre ĝojige, se la Florajn Ludojn ĉiufoje vizitus tiu poeto, al kiu estas aljuĝita la Ĉefa Premio kun la rajto elekti la Flor-Reĝinon. Sed nur malofte la premiito havas la monon por pagi la vojaĝon. Se oni povus ĉiufoje doni al la premiito la necesan vojaĝmonon aŭ almenaŭ subvencion kaj se oni povus lin dum lia restado ĉe la Festo honore gastigi ĉe iu samideano en la Festurbo, la Festo por la Ĉe-

to de la premiito sendube havus multe pli gravan noton kaj pli grandan efikon. Ekzemple, en unu jaro venus hungara samidean(in)o, en alia jaro brita, en tria jaro germana ktp. — La monon por la subvencio oni povus ricevi per depreno de por 10-20 % de ĉiuj premioj aŭ per kreado de speciala Subvencia Fondo. Se en unu jaro la premiito (eble kataluno mem) rezignus la subvencion ĝi povus esti pligrandigata en alia jaro, kiam la premiito eble estus malproksimeloganto, ekz. polo aŭ finno. Kompreneble, la subvencio ne estus premio, kaj ĝi estus pagota nur, se la premiito efektive partoprenus la Feston. — Mi mem, se mi gajnus la ĉefan premion, volontege persone vojaĝus al via bela Festo kaj al ĉarma Katalunujo; sed nunjare, ekzemple, mi certe ne povus entrepreni tian vojaĝon sen subvencio, ĉar la financa situacio de miaj negocaj entreprenoj nun estas tre malbona». — J.

Metodo de propagando en la scienca & teknika gazetaro. — En antaŭa noto pri tiu temo (vid. HEROLDO n-ro 92- 1925), ni proponis metodon por utiligi resumojn de artikoloj redaktitajn en Esperanto. — Per tiu metodo la direktoroj de la Revuoj interŝanĝas tiujn resumojn; tiamaniere ĉiu el ili ricevas la resumojn de ĉiuj samfakaj Revuoj. — *Sed se ekzistas en iu fako Centra internacia organismo: federacio, asocio, oficejo, k. t. p., pli taŭga solvo estas ke ĝi publikigu mem aŭ per kontrakto kun eldonisto la senmankan aron de tiuj Esperanto-resumoj, senditaj al ĝi de ĉiuj samfakaj Revuoj.* — Post kiam la interŝanĝado, pri kiu ni antaŭe parolis, estas organizita kaj montrata profiton, oni devos klopodi por atingi tiun alcentrigitan publikigadon; ĉar ĝi estos certe realigata en la estonteco, kiam Esperanto estos universale uzata. — Efektive ĝi alportos al ĉiu fakisto eblecon koni, dank' al tiu bibliografio, la verkojn faritajn aŭ komencitajn en ĉiuj landoj rilate al la demandoj, pri kiuj li laboradas; kaj pli ĝenerale li povos konstati la temojn nune plej interesindajn kaj la faritajn progresojn en la tuta mondo. Pro tio, tiu kompleta bibliografia verkaĵo havos multnombrajn legantojn kaj abonantojn, (fakajn bibliotekojn, lernejojn kaj Institutojn); sekve oni trovos facile eldoniston, se la faka centra organismo ne povas eldoni mem tiun gravan verkon. — ROLLET DE L' ISLE. — Ĝenerala Sekretario.

Jen plua Maĵorka urbeto: Benisalem, kie nia kara Bofill ankaŭ efike semis por Esperanto, per sukcesa parolado, kaj gvidaj alparoloj dum la pasinta monato.

Barcelona Esperanto-Societo. Por la 27 de Februaro tiu ĉi nova Societo anoncas eksterordinaran literaturan vesperfeston kiel inaŭguracion de sia agado. Ŝajnas ke la solena kunveno, pri kiu oni disdonos programon ĝustatempe, honoros la altan meriton de Kataluna Antologio per deklamado de ĝiaj plej reliefaj paĝoj. — Al la nova batalanto, al la nova organizaĵo aliĝinta al nia Federacio, ni deziras sukcesan vivon en nia kataluna esperantista movado.

«*Madrid*, la 26an de Januaro de 1926, al S-ro. Jaume Herp, Kasisto de K. E. F. — Tre respektinda samideano: Mi ricevis vian estimatan poŝtkar-

ton kune kun la «Gvidlibro de Mallorca». Ne sole pro tio mi estas devigata montri al vi mian dankemon, sed ankaŭ ĉar kiam mi petis de vi, ke oni sendu al mi la lastan numeron de K. E. (Novembro-Decembro), vi sendis ĝin tuj al mi, kaj ankaŭ mi ricevis kelkajn aliajn numerojn de la gazeto pri-traktantajn la Kongreson de K. E. F. en Palma de Mallorca, kaj la Gvidlibron pri tiu insulo. Tiu-ĉi libro rememoros al mi la vidiindaĵojn de mia lando, kaj montras al miaj amikoj la gravecon de K. E. F., kies sukcesoj kaj tiuj de viaj internaciaj Floraj Ludoj, unikaj en la tuta mondo, estas ĉie konataj. — La legado de K. E. multe interesas min; tial tuj kiam finiĝos la jaro de mia abono, mi repagos tuj mian kotizon por ricevi rajte «Kataluna Esperantisto». — Kun samideana saluto mi restas via tre danke. — A. GIMÉNEZ.»

Ĝefianĉiĝo. — Nia kataluna Esperanto-najtingalo F-ino. Palmira Castellví el Barcelona, kun S-ro. Xaver Haider, muzikisto, U. E. A-ano en Mühldorf-Baijern, Germ.



Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

KATALUNA ANTOLOGIO. — Kompilita de Jaume Grau Casas. Barcelona 1925. 416 paĝoj, 22 × 16. Havebla de Komitato por Kataluna Antologio, S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona. Prezo: 12 pesetoj. Aŭfrankite por ĉiuj landoj: 15 pesetoj, 11 sv. fr., 2 dolaroj, 9 ŝilingoj.

Kiom da jaroj la katalunaj esperantistoj bataladis por efektiviĝi la sopiratan revon! Longan tempon kuŝas jam en la eterna ripozo fervoraj samideanoj, kiuj la unuaj bataladis por publikigi nian Antologion. Kiom sopiris al ĝi la karmemora pastro Coll. Kiel ofte li predikis al ni, lernantoj de Esperanto en la Barcelona Universitato, kiom mirigos la mondon la diskoniĝo de la lingvo de niaj prapatroj, hodiaŭ pli ol iam disvolviganta kaj amata. Sed la forto mankis al ĉiu entreprenanto kaj la afero restis en silento ĝis kiam aperis la energia mano, la necedema volo kaj nesuperebla patrujamo de nia kara Jaume. Kun kia fervoro kaj entuziasmo li komencis la kolektadon de la unuaj semoj! Kun kia amo kaj atento li kompletigis la verkon! La plej granda monumento iam farita de la katalunaj esperantistoj al sia gepatra lingvo rapide kreskis, mirinde ellaboriĝis kaj ni ricevis senkomparan juvelon.

Sed kia juvelo, amikoj. El perloj, topazoj, safiroj, rubenoj kaj diamantoj ĝi tuta estas. De la unua ĝis la lasta paĝo oni spiras la spiriton de nia

kataluna lingvo, oni gustumas en ĝi la plej delikatajn pagojn de niaj verkistoj. La tuta gamo de niaj poetoj sonas en viaj areloj dolĉe, kortuŝe. De la unuaj trobadoroj ĝis la hodiaŭaj famaj Sagarra kaj Russinyol, la plimulto de niaj stilistoj havas lokon en Kataluna Antologio.

La verko enhavas 94 versaĵojn kun 3576 versoj. La kompilinto tradukis 61 versaĵojn kun 1787 versoj; Josep Grau 29 kun 1682; Rosselló 1 kun 46; J. Inglada 1 kun 29; E. Pellicer 1 kun 16 kaj J. Ventura 1 kun 16. Ses tradukintoj entute. La prozo okupas 251 pagojn, kies tradukon ni ŝuldas; al la kompilinto 159 pagojn, Ventura 22, Pujulà 17, Pellicer 10, Grau (Josep) 10, Solà 8, Alberich (S) 5, Torrents 5, Torné 4, Capdevila 3, Dalmau (D.) 2, Bremón 2, Guardiet 2, Gili 1, Dalmau (J. M.) 1. Entute 15 tradukintoj.

Stilo, preso, bindo, papero kaj aspekto estas laŭdinda ĉiuflanke. Nepre la verko atingos lokon en la unua vico de niaj plej famaj ĉefverkoj.

Ni, kiel katalunoj kaj esperantistoj, estas fieraj ke ni sukcesis diskoniĝi tra la tuta mondo la riĉecon de nia lingvo. Al la kompilinto, nia amiko Grau, ni neniel povos pagi la servon faritan al Katalunujo.

Dankon, plej koran dankon Grau. — SALJO

VIKTIMOJ. — Romano el la vivo de siberiaj militkaptitoj originale verkita de Julio Baghy. Eldono de Hungara Esperanto-Instituto. 16×12, 162 paĝoj, Budapest, 1925. Prezo: 25000 hungaraj kronoj.

Ne nur kiel poeto sed ankaŭ kiel prozisto la verkinto de tiu ĉi romano havas specialan kapablon. Lia plumo facile kaj bele disvolvas scenojn el la vivo de militkaptitoj en Siberio. Amo, doloro, altaj pensoj estas ĉarme enkarnigitaj en la diversaj figuroj, kiujn la fantazio kaj propraj travivaĵoj de nia konata Baghy metas sur la scenejo de lia verko. De la komenco ĝis la fino la leganto kun avido kunvivis la tragedie disvolviĝantan romanon.

Se al la diritaj kvalitoj oni aldonas, ke el lingva vidpunkto estas la verko vera juvelo, neniu ja forgesos tuj mendi la libron. — SALJO.

Nekrologo

Nia amiko Pruna sciigis nin pri la morto de la patro de nia ĝentila samideanino Rosa Cortés. Ni esprimas al nia simpatia samcelanino kaj al ŝia familio nian sinceran kondolencon, ankaŭ al nia kara samideano Tomàs Barberà kies patron la morto forprenis.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

"Kataluna Esperantisto"

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektiviĝebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anon-
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi
tekston publikigotan.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO
per poŝtmarkoj, ni sendas sor-
timenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA

KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE

JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Prezo: 12 pesetoj. Aŭfrankite: 2 dolaroj, 11 svisaj frankoj aŭ 9 ŝi-
lingoj. En la Iberia duoninsulo 13 pesetoj aŭfrank.

Por mendoj oni turnu sin al S-ro. Eduard Capdevila, str. Car-
ders, 29. Barcelona.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la KATALUNA ANTOLO-
GIO estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperantujo.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

18-a Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Somera Universitato

EDINBURGO — 31 Julio ĝis 7 Aŭgusto 1926 — EDINBURGO

Loka Kongresa Komitato: Hon. Prezidanto: John Merchant. — Prezidanto. W. M. Page, S.S.C. — Vic-Prezidantoj: William Rae, S-ino G. Senior. — Sekretarioj: J. M. Warden, F.F.A., L.K., William Harvey, I.S.O. L.K. — Kasisto: David R. Tullo, S.S.C. — Komitatanoj: F-ino. Jan Baird, George Dickinson, David Kennedy, M. A. Robert Stevenson.

Adresoj por leteroj: Sekretarioj, 18-a Kongreso de Esperanto, EDINBURGO, Skotlando.

Aliĝiloj: Disdonotaj pere de la ĉefaj Gazetoj kaj de la Naciaj Asocioj. Kiu ne ricevis ekzempleron, tiu bonvolu peti ĝin rekte de la L.K.K.

Kotizo: Por ĉiu kongresano senescepte: 20 ŝilingoj Britaj = proksimume 20 Ger, or-markoj, 25 Sys. fr., 12 Nederl. guld., 5 Uson dol, Oportuna maniero sendi la kotizon, estas per Brita ŝtatbileto por L 1 («currency note, one pound»), havebla ĉe bankoj en multaj urboj, kaj sendota per registrita (rekomendita) letero.

Garantia Kapitalo: La L.K.K. zorge penos eviti ian financon deficiton sed, por certigi la financojn, ĉi tiu Kapitalo estas fondita.

Donacoj: La L.K.K. volonte ricevos donacojn por helpi al plena sukceso de la Kongreso.

Blindula Kaso: La L.K.K. akceptas pere de la aliĝiloj, aŭ alimaniere, mondonacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu en la Kongreso.

Loĝado: Sub-Komitato: jam vigle laboras por fari plej moder-prezajn, sed tute kontentigajn, aranĝojn pri loĝado. Detaloj aperos en estonta Bulteno.

Fakaj Kunvenoj: Organizantoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

Somera Universitato: La L.K.K. daŭrigas la Someran Universitaton, kaj jam aranĝis fakultatojn pri Folkloro, Lingvistiko, Medecino, kaj Scienco.

Akcepto de Kongresanoj ĉe Britaj havenoj: En posta Bulteno aperos adresoj de U.E.A.-Delegitoj, k.t.p. kiuj jam konsentis akcepti ĉe Britaj havenoj kongresanojn el aliaj landoj. Koncernataj anoj skribu rekte al tiuj adresoj ĝustatempe antaŭ alveno.

Proponoj: La L.K.K. danke ricevos kaj zorge konsideros fruajn proponojn deklami, kanti, ludi, k.t.p. ĉe Kongresaj Koncertoj.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA · ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 ŬSONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN · BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Isidre Torrents

TRES MOMENTS DEL LLENGUATGE

Dos són els factors essencials i d'actuació constant que intervenen en la formació de la llengua literària: els escriptors i el poble. En aquells resideix el poder de la creació del llenguatge; són la força individualitzadora de la seva vida. En aquest jau la funció, la facultat de conservació i d'evolució del llenguatge; és la força socialitzadora de la seva vida. Per emprar els termes de Vossler direm que l'escriptor i el poble representen els dos únics moments essencials en la vida d'una llengua. En el moment de néixer, de produir-se la llengua és quelcom actiu i individual; és el moment del progrés absolut. En el moment d'acceptar i propagar la massa del poble les creacions individuals, la llengua és una activitat col·lectiva, basada, però, en una passivitat individual; és el moment del progrés relatiu. En el primer moment la llengua és creació, és Estètica; en el segon, és evolució, és Història. Entre el primer i el segon moment pot haver-hi un altre: el de l'acceptació totalment passiva de les creacions individuals per la massa. Aquest moment, però, és precisament el punt mort, un moment que només existeix teòricament, car en la vida de la llengua només pot donar-se una passivitat parcial, no mai, però, una pura passivitat.

Doncs, bé: l'intent teòric de donar realitat a aquest tercer moment, l'esforç per afermar aquest punt mort, que de vegades vé a interposar-se entre els dos moments essencials de la vida de la llengua, és precisament la tasca de la preceptiva gramatical, la qual tendeix per naturalesa a fixar, a prolongar, si més no, el moment de passivitat, el punt mort, en la vida de la llengua. El treball del preceptista lluita, doncs, amb evident desavantatge contra la doble pressió de la força de la creació individual i la força de l'evolució col·lectiva, constants en tota llengua viva.— M. DE MONTOLIU (De «La Ven de Catalunya»).

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al

femeni

heroino, reĝino
katino, leonino

O

*terminació
substantiu*

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

*terminació
adjectiu*

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

*terminació verb
(infinitiu)*

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

*terminació
adverbial*

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

*mode condi-
cional*

U

*mode impera-
tiu o subjun-
tiu*

Mi skribas
Jo escri

skribis
escrivi

skribos
escriuré

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escriu la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

XIII.^a Kongreso de K. E. F.

XII.aj Internaciaj Floraj Ludoj

Santa Coloma de Farnés 23-25 Majo 1926.^a

La nombro de verkoj ricevitaj, la merito de multaj el ili, la diverseco de landoj el kiuj ili venis, signifas promeson de sukceso por niaj proksimaj Floraj Ludoj. La bela landa scenejo kie okazos la koncerna solenaĵo, kaj la famo atingita de niaj Konkursoj ĉie en Esperantujo, certe venigos kelkajn eminentajn samideanojn el pluraj landoj. — Kiu estas la poeto gajnonta la Naturan Floron? Kiu estos la Reĝino? Kiuj verkoj, kiuj aŭtoroj estas premiataj? Jen nunaj demandoj en multaj esperantistaj animoj en ĉiuj landoj. Internaciaj Floraj Ludoj por Esperanto kaj Esperanto por Internaciaj Floraj Ludoj, por eterno edziĝis en la V^a Universala Kongreso en Barcelona, kaj floras kaj fruktas por gloro de ambaŭ: de la lingvo de Zamenhof kaj de la Esperantista verkistaro.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

Oriento-Okcidento

«La Orienta Lumo», de Koreujo, alsopire en sia novembra numero, alude al la nuna bela florado de esperanta verkado de Oriento al Okcidento kaj ĉefe al la publikado de la granda revuo «Oriento» el Harbin; diras: «Gazeto "Okcidento" ankoraŭ ne aperis».

Karaj koreanoj, — Nia gazeto «Kataluna Esperantisto» pro sia avido al kunfratiĝo kaj lernado pri via mondo, estas via «Okcidento». Pro sia kunsentado de homaranismo estas la «Okcidento» de vi petata. Pro sia penado diskonigi la katalunlingvan popolon samkiel vi penas pri la korea nacio, estas «Okcidento».

La diskonigo de ĉiu nacio montras al la aliaj ke ĉiuj estas profunde samsentaj, sampensaj kaj, do, fratecaj. Estas nur suprajaj, aspektaj, formaj, kulturaj diferencoj, multe pli grandaj inter individuoj ol inter nacioj; — pli imagaj ol realaj. La aforismoj «Kiu semas venton, rikoltos fulmotondron», «kia ago, tia pago», «Rido matene — ploro vespere», «Kio mia, tio bona», «Virino scias — tuta mondo scias», kiujn ni represas el via gazeto, k. t. a., estas komunaj al vi kaj al ni kaj al ĉiuj nacioj. Tiu fakto bone montras ke ni ĉiuj estas anime, spirite, kore, certe samecaj, unuecaj. Tial la konstato de niaj naciaj diferencoj povas esti nur plaĉo por niaj sentoj, kaj ne baroj kontraŭ paco interpopola. Kaj konscio pri tio povas efektivigi homaranismon, pacon kaj amon. Tion ni laŭte volas esprimi al la lando de mil lagoj: Finnlando, Nordo; al la lando de mil montoj: via bela Koreujo, de sereno matenfrua, Oriento; kaj al Sudo, — al ĉiuj homareroj en la mondo.

La popoloj neniam interbatalis pro malsamecoj, sed pro malkomprenoj kaj maljustecoj, pro ambicioj kaj egoismoj. Ke vi estas orientanoj kaj ni okcidentanoj tute ne estas kaŭzo kontraŭ paco kaj amo inter Oriento kaj Okcidento. Kaŭzo malbeninda komencas nur tiam kiam okcidentanoj volas okcidentigi, asimili, venki orientanojn, aŭ, male. La Historio montregas ke similaj kaj samlingvaj, similaj kaj samkulturaj kaj samreligiaj popoloj intermilitis; eĉ samfamiliaj, samdinastiaj nacioj interbatalis kruele, ŝakale. Tial la Majstro, apud la komuna lingvo, baze por certa paco, alsopiris homaranismon, justecon!

Akceptu, karaj orientanoj nian profundan ĝojon pri la progreso de Esperanto kaj ĝia interna ideo ĉe vi.

DELFI DALMAU

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

La Dimanĉo de la Rozoj

(Menciita en la XIaj Floraj Ludoj)

Mi volas fari al vi rememoron, rememoron el mia lando, kiun mi ne povas fortiri el la memoro dum tiuj ĉi tagoj de Printempo kaj de blindiga lumo.

Vizio de amo estas la fruktejo de Valencio.

Supreniru la *Mikalet'* on (1), la turo de niaj sopiroj kaj de niaj nostalgioj. ; supreniru tien, kaj viaj okuloj malfermiĝos plej malfermite, ĉar vi neniam havos sufiĉe vidante la belbrilegan mirindaĵon.

Ha, kiel ĝi estas bela! Senmezura ebenaĵo de verdeco kiu ĉirkaŭiras la urbon kaj aperas bruligita de blankaj punktoj kiuj kvazaŭblindigas la okulojn: ili estas la barakoj, kiuj ŝajnas sidantaj kolombinoj havantaj ĝojon kaj konsolon por la vidsento.

Tie travivas la *plugistoj*, la anaro el la fruktejo. La virinoj, blankaj kiel la paleco de la rizo; kaj la viroj, kun maŭra sango ĉe la vejnoj; ĉiam kurbigitaj sur la tero, kiu neniam ripozas, malsaĝaj kaj senkonfidaj, havante ankoraŭ, la inklinton al la pulvo kiun ili heredis el la maŭroj, kaj la algluiĝon al la kamparo kiu donas al ili la vivtenon.

Sed meze de tiu ilia krudeco, ŝajnas ke la ridoj de la suno penetras ilin ĝis la plej profundo el la animo, eligante el ili traĵtojn de naŭva poezio, de dolĉega sento, kiel la ĉielkoloro ĉe la apero de la ektagiĝo.

Kaj unu el tiuj momentoj dum kiuj la popola animo foriĝas el la humila ĉiutaga vulgareco, estas la festo de la rozoj, la festo de la unua dimanĉo de Majo.

La fraŭloj kaj la fraŭlinoj atendas la alvenon de tiu tago kun la deziro de la junaĝo. Kaj la fruktejo sin vestas belorname por alhelpi al tiu festo de la koro.

Kiam apenaŭ tagiĝas kaj ankoraŭ ĉio ripozas en silento, la junulino kiu dormas en sia barako ekaŭdas gajridan muzikon kiu ŝin dolĉe vekas. Ĝi estas la *frumatenkantoj* kiujn kantas la fraŭloj tie ekstere.

Mi ne scias ĉu ĝi estas ĥimero mia; sed mi ne kredas ke ekzistas regalajo pli delikate amriĉa nek pli intima ol tiu kunkanti kantaĵojn al la amatino, kiu estas dormanta, por alvenigi ĝis ŝi la tonojn el la koro en la dolĉeco de la duonlumo, en la malprecizeco de la fermita fenestro, sen la kruda forto de la kanto plenvoĉa kaj proksime de tiu ĝin aŭskultanta.

Kaj la knabinoj ekvekiĝas iom post iom inter sonoj kiuj dorlotas la orelojn kaj versaĵoj kiuj ne havas ĝustecon pri la mezuro nek aliaj retorikaj

(1) *Mikalet'*, Ĝi estas la nomo kiun oni donas en Valencio al la sonorilejo de la Katedralo.

kanonoj, sed kiuj estas versentaj kaj plenaj de koloro, kun la bela malegaleco mem kaj kun la parfumo mem de la orangoj.

Eĉ ne estas bezone diri ke la voĉoj estas fortaj kaj malagordaj. Sed la pordo de la fenestreto jam prizorgas formeti el ili la akrecon kaj konduki ĝis la oreloj de la fianĉino la puran akcenton de la simpla pasio, kiu kantas kantaĵojn kiel jenan:

Sub la oranĝarbo mia
Vi konfesis al mi amon;
kaj de tiam l' arb', pli dolĉaj
fruktofaras la orangojn.

Poste la muziko malproksimiĝas; la kantstrofoj alvenas pli malfortaj kaj pli malprecizaj...

La fraŭlino fortiras sin el la lito, kaj, malferminte la fenestron de la dormoĉambro, ŝi ekvidas la unuajn sunradiojn kiuj plenigas per amo kaj ĝojo la tutan fruktejon. La kampaj ventoj ŝajnas pli kontentaj ol iam; la malvarmeta aero forpasas postlasante malvarmojn de ĝojo, tre malproksime aŭdiĝas la urbaj sonoriloj, kaj penetranta aromo de vivo kaj de konsolo supreniĝas el la tero kaj disflugas tra la enaero.

La knabinoj elrigardante ĉe la pordo de la barako, ekvidas la pavimon ornamita per rozfolioj, tapiŝo el harmoniaj koloroj, kiu postlasas krudan aromon, esperodoron: en ĉiu barako kie estas junulino, vidiĝas la sama sopirporta florornamaĵo.

La tuta fruktejo aperas balzamigita de la rozoj disfoliigitaj, kaj ĉe ĉiuj flankoj vin ĉirkaŭas supreniĝante al la kapo, en naŭzoj de bedaŭro, la voluptaodoro, kiu ŝajnas himno de amo; delikata konfeso de la popola spirito, kiu ne scius eldiri per vortoj la tutan dolĉecon de sia ĝuo, ne forprenante al ĝi tiun instinkton de poezio kiun komunikas la kamparo kaj la suno de la lando.

Katalunlingve verkis
EDUARD L. CHAVARRI
Tradukis, kun permeso de la aŭtoro
JOSEP VENTURA

Pro... kaj Por...

Sukceso en Sudameriko estis la Esperantista Kongreso organizita de nia kataluna samideano, Ing. Santiago Gomis, en Montevideo. La plej gravaj ĵurnaloj en tiu granda urbo detale raportis la Kongreson, kiun aliĝis multaj societoj kaj grupoj el Argentino, Brazilo, Ĉilo, Urugvajo, k. a. Ni sincere gratulas nian amikon, kiu efike pioniras nian Movadon en tiuj vastaj landoj.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

§ 10. Zamenhof ĉerpis la radikojn, elektante ilin el la kulturlingvoj, en laŭeble pura kaj simpla formo. La saman metodon ni sekvas ĉiujfoje, kiam mankas al ni iu vorto, kies ideo ne povas esti oportune dirita per la kunmetaĵo.

Sed ekzistas apud la internaciaj radikoj la internaciaj tipoj de kunmetaĵoj, kiujn oni ne povas diveni, se oni restas en mallarĝa sfero de unu nacia lingvo. Ekzemple:

f. *étoile de mer* = stelo de maro, r. *morskaja zvezda* = mara stelo,
i. *stella di mare* = stelo de maro, g. *Seestern* = marstelo,

tiuj kvar esprimoj egale signifas konatan maran animalon kvinpintan. Ankaŭ:

f. *La Voe Lactée* = vojo lakta, r. *Mleĉnyj Putj* = lakta vojo,
i. *Via Lattea* = vojo lakta, g. *Milchstrasse* = laktvojo.

Estus do kontraŭ la internacia principo la akcepto de tiaj vortoj, kiaj estas «asterio» kaj «galaksio», proponitaj de la sciencemuloj. Etimologie, la asterio = astrajo, la galaksio = laktajo, la ambaŭ el la helena lingvo.

§ 11. Ĉion, kio jam estas internacie uzata en scienco kaj tekniko, la lingvo tutmonda povas nur akcepti sensaŝe, sin klinante antaŭ la fakuloj, kiuj dum jarcentoj kaj jardekoj estis oferantaj por tio grandan penon. Tiel Zamenhof akceptis la hindarabajn kaj romajn ciferojn, la kalendaron, la latinidan abocon. Tiel Esperantistaro devas akcepti la ĥemian signaron, la natursciencan terminaron, la muzikan sistemon, ktp.

Sed por la fakoj, kie tia internacia terminaro ne ekzistas, ekz. por la juro, politiko, geografio, geologio, astronomio, mekaniko, konstruaro, teknologio, maŝinado, komerco, bankado,... tie la terminaro en Esperanto estos ellaborita pofake, sur la scienca bazo, per kolektiva laboro de la spertuloj.

§ 12. Aglutinaj lingvoj (finna, tatara, japana, turka, baska, kc.) diferencas de la hindeŭropaj, semidaj kaj ceteraj fleksiaj lingvoj, per tio, ke en

ili la konstruaj elementoj ne ŝanĝas, kiam ili kombiniĝas (algluiĝas). Laŭ tiu diferenco ankaŭ Esperanto estas aglutina lingvo. Dank' al la aglutineco kaj al tio, ke niaj vortaroj entenas ĉiujn elementojn, estas eble decifiri Esperantan tekston eĉ por tiu, kiu ne posedas la lingvon. Tial Zamenhof havis ideon presigi la radikaron sur unu folio, oportune sendebla en la koverto kun Esperanta letero, destinita al persono, kiu ne scias nian lingvon.

H. F. Höveler perfektigis tiun ideon de Zamenhof, eldoninte t. n. ĉefeĉojn. Nun ekzistas la ĉefeĉoj en 19 lingvoj.

§ 13. Frazo konsistas en vortoj. Vorto do estas ĉiu frazero. Estas du ĉefaj grupoj da vortoj: rilataj kaj esencaj. Rilataj vortoj ne bezonas finaĵon por esti uzataj en frazo, tamen ili akceptas finaĵon por formi esencajn vortojn, kaj ankaŭ povas servi kiel prefiksoj. Esencaj vortoj estas minime dulementaj: ili konsistas en temo plus finaĵo.

La temo povas esti simpla radiko (unu elemento) aŭ obla radiko (pluraj elementoj). Ekz. en vorto *laktumo* estas tri elementoj, el kiuj la du unuaj formas temon (*laktum*) kaj la tria servas kiel finaĵo (*o*). Farado de la temoj estas regata de la regulo: difinanto antaŭ difinato. Ekz.

poŝhorloĝ = poŝa horloĝo

disromp = dise rompi

jarlibr = jara libro

trograndig = troe grandigi

Ĉar je fino de esenca vorto, kiu ĉefas en frazo, staras finaĵo-o, tial neeviteble sekvis la regulo: la senceĉefa radiko staras je la fino. Efektive, oni nature analizas:

vaporŝipo = vapor-ŝipo = vapora ŝipo.

virhundo = vir-hundo = vira hundo.

Finaĵo-o fakte apartenas al tuta temo, sed ĉe la analizo ĝi ŝajne apartenas al lasta radiko.

Ĝenerala postulo de Esperanta temfarado konsistas en tio ke la senco de la kunmetita (plurelementa) temo ne estas nura sumo de la elementaj sencoj, sed ia nova speciala senco.

Ekzemple, la *pafilego* ne estas «granda pafilo», sed la kanono; la *rideto* ne estas «eta rido», sed la ridmieno; la *molanaso* ne estas «mola anaso», sed la ejdero; la *vortaro* ne estas nura «aro da vortoj», sed la leksikono.

Sufiksoj en temfarado rolas alie ol radikoj. Kelkaj el ili (an, ar, ec, ej, em, id, il, ing, ist, uj, ul) obeas la regulon: difinanto antaŭ difinato. Aliaj ĝin ne tute obeas. Ceteraj ĝin tute ne obeas (aĉ, eg, et, in, ĉj, nj), ĉar por ili estas aplikebla mala regulo: difinanto post difinato; ekzemple ni analizas:

domaĉo = aĉa domo.

altega = ege alta.

buleto = eta bulo.

birdino = ina birdo.

§ 14. Regulformeco de Esperanto kuŝas ĉefe en ĝia gramatiko: unuforma vortofarado per o, a, e, i, simpla verbosistemo kun simetriaj finaĵoj, temfarado per afiksaro, tabelo de korelativaj vortoj, pronomoj, nombroj.

Lastatempe oni atentis la regulecon ankaŭ de la radikaro; ekzemple, oni volas kompletigi jenajn seriojn:

geologo	geologio	(fiziologo)	fiziologio
fotografo	fotografio	(geografo)	geografio
astronomo	astronomio	(ekonomo)	ekonomio
delegi	delegacio	(konjugi)	konjugacio
varii	variacio	(situi)	situacio
deklari	deklaracio	(apeli)	apelacio
lingvisto	lingvistiko	(beletristo)	beletristiko
(skolasto)	skolastiko	(gimnasto)	gimnastiko
(botanisto)	botaniko	(mekanisto)	mekaniko
vitro	vitralo	piedo	(piedalo)
notario	sekretario	vikario	(komisario)

NB. — Enkrampaj vortoj ĝis nun ne estas sankciitaj, malgraŭ ilia reguleco.

§ 15. Unu vorto - unu ideo, tia estas ideala principo en semantiko de Esperanto. Kontraŭ tiu principo ŝajne ekzistas t. n. ludvortoj: *romano* (libro kaj loĝanto), *surdiga*, *aĉeta*, *ekskursano*, *kataro*, *koketa*, *teisto*, kma. Sed ili en sia kunteksto, aŭ per sia divideco (rom-ano, roman-o, sur-dig-a,...), ambaŭokaze povas esti tute klaraj. Ankaŭ ne kontraŭ la semantika principo la plursencaj vortoj ekzistas, ekz. *kovrilo*, *ulo*, *kapo*, *nesto*, *ĉeno*, *dento*. Fakte ili estas unusignifaj larĝaj vortoj, kiuj kapablas esprimi plurajn sencojn: *Kovrilo de libro*, *lifkovrilo*, *kovrilo de kesto*, *mamulo*, *sanktulo*, *trimastulo*, *terkapo*, *najla kapo*, *geedza nesto*, *aksa nesto*, *montoĉeno*, *kolĉeno*, *ĉeno de amo*, *montodento*, *rada dento*, *dento de segilo*, ktp.

§ 16. Por plenumi sian rolon de intergenta komprenilo, Esperanto devas posedi la espriman klarecon en pli alta grado, ol ĉiu nacia lingvo, kiu estas favorata de la nacia medio kaj senĉesa uzado. La lingvo internacia, uzata malpliofte per homoj de malsamaj lingvokutimoj kaj psikoj, bazas sur principo de pleja klareco-sona, forma kaj ideo. Francaj vortoj «au-dessus» kaj «au-dessous» ne ĉiam estas klare diferenceblaj, precipe por fremduloj; samsencaj Esperantaj vortoj «super» kaj «sub» estas tiurilate pli klaraj.

§ 17. Frazo estas sola reala ero de la parolo, ĉar vortoj, silaboj, literoj, sonoj estas analize senvivitaj elementoj, objektoj de intelekta laboro. Frazo, en larĝa senco, estas unueca komplekso, kiu havas finitan sencon.

Laŭ sia formo la frazo povas esti unuvorta, aŭ plurvorta. Unuvorta frazo estas aŭ interjekcio, aŭ interjekcie azata solvorto, ekz. ordona verbo, montra adverbo, ks. Plurvorta frazo grupiĝas ĉirkaŭ verbo, kiu servas kvaŝaŭ la akso. Por konsistigi la frazon la temoj devas surmeti finaĵojn: ĉefrolan *o*, ĝian difinant^{on} *a*, verban finaĵon, ĝian difinant^{on} *e*. Ekzemple:

Lingvo internacia kreskas malrapide. Forte lumas somera suno.

La finaĵoj o, a, e rolas nur sintakse, ne influante la sencon de la temoj; la finaĵo verba povas havigi al la temo la sencon agan aŭ statan, se la temo ĝin antaŭe ne havis. Ekzemple:

<i>Kuiristo tro salis la saŭcon.</i>	<i>Krimulo ponardis sian viktimon.</i>
<i>Se plaĉas, vi sukeru la kafon.</i>	<i>La foriro estis tamburata.</i>
<i>Juvelisto volas arĝenti medalon.</i>	<i>La virtuoza violonis tri pecojn.</i>
<i>Nikelita kupro ne oksidiĝas.</i>	<i>Forĝisto martelas la feron.</i>
<i>Dragonaro sabras la malamikon.</i>	<i>La patro ebria bastonas fileton.</i>

La ses verbaj sufiksoj povas, per finaĵo a, formi aŭ difinanton de ovorto: (*vivanta lingvo*), aŭ temanton de helpa verbo: (*estis farita*); per finaĵo o ili formas, plej ofte, la personvortojn: *amanto, mortinto, savonto, amato, delegito, balototo*,...; per finaĵo e ili formas ne adverbojn, sed apartajn tempoformojn, oportunajn por ligi du frazojn:

Paŝante sur la vojeto, li ekvidis en malproksimo la domon... t. e. kiam li paŝadis sur...

Adiaŭinte miajn gepatrojn, mi foriris el la hejmo... t. e. post kiam mi adiaŭis miajn...

Parolonte pri nia movado, vi ne tuŝu la klasbatalon... t. e. dumvi parolos pri...

§ 18. Versofarado en Esperanto bazas sur alternado de la silaboj, kies nombro kaj akcento prezentas regulan kaj precizan difinitecon, propran por ĉiu versospeco: jambo, trokeo, daktilo, amfibrakto, anapesto. La ritmo estas esenca principo de la versado.

Malplifacilaj por la poeto, sed pli befaj, estas la versoj kun rimoj. Senartaj rimoj («malkaraj» aŭ «adasistaj») ripetas sufiksojn, ilin evitas la bona gusto.

§ 19. Celo de ĉiu lingvo estas oportuna interkompreno. La interkompreno postulas egalan uzadon de la lingvo; ĉiu lingvo do emas konserviĝi sensanĝe, ĉar la tradicia inerteco, kiu fidele ripetas la malnovaĵojn, garantias daŭran interkomprenon. La novaĵoj ja aperas ne ĉie samtempe, sed nur en unu aŭ en alia loko, klaso, grupo, por poste vastiĝi en la lingva sfero. Tial ĉiu novaĵo unuatempe rompas la egalecon de la lingvo.

§ 20. Kreskado de ĉiu vivuzata lingvo konsistas ĉefe en du procesoj: unue ĝi pliriĉigas la vortaron, due ĝi plibonigas la formaron. Per la unua ĝi nur pligrandigas la vortamason, per la dua ĝi ŝanĝas elementojn, forjetante la malnovajn, kreante la novajn.

Dum la unua periodo de nia movado (1887-1904) oni ĝenerale kredis, ke Esperanto povas nur aldone kreski, sed neniam aliĝi en sia jam akirita formaro. Tion kredis la unua generacio da esperantistoj, kiuj ne estis kapablaj plene transversi sian kredon en la duan generacion, ĉar ĉiu generacio volas esti mastro de sia tempo. La nuna generacio havas iom alian

ideon pri la kreskado de Esperanto, ideon ankoraŭ sufiĉe konservativan. La sekvonta generacio certe havos siajn ideojn, aliajn ol la antaŭaj. Sed ĉiu vivpova lingvo senĉese adaptiĝas al la ĉiam variaj kondiĉoj de la vivo. Nia vivo ĉiam ŝanĝas, do nia lingvo ankaŭ senĉese ŝanĝas, eĉ kontraŭ nia volo.

Interdependa adaptiĝo de Esperanto al la internacia vivo (senĉese varia) estas la evolua principo, kiu pli kaj pli libere funkcias en nia lingvo.

(daŭrigota)

P. STOJAN, L. K.

Listo de verkoj ricevitaj por la XII Floraj Ludoj

(daŭrigo)

54. Ĉien flugu, esperantistaro, kiel flugas ĉie papiliaro. — 55. Returnen-
Antaŭen. — 56. H. W. S. 323. — 57. Por la bono ne ekzistas nacia limo. —
58. Amb la lum del teu mirar, has omplert la meva vida. — 59. Laboru sen-
ĉese, ne zorgu pri fin' ! la tombo atendas ne verkon, sed vin. — 60. Nur es-
tas la spirito, kiu vivigas la mondon. — 61. Zuiderzee. — 62. Kompreno
estas vojduono. — 63. Mi faris mian aferon kaj atendoj ceteron. — 64. Ne
venas honoro sen laboro. — 65. Malsaĝulo. — 66. Per Esperanto al Dio. —
67. Ne faru frazojn pri la vivo, sed peni ekkoni ĝin. — 68. Infano — jen la
plej bela elpensajo. — 69. Kaj tamen... nia fina celo estas ja — la Morto. —
70. Kio en la koro sidas, la vizaĝo perfidas. — 71. Plej granda potenco, ku-
ŝas en la komenco. — 72. Bone tiu sidas al kiu la sorto ridas. — 73. Ho Eme-
su! — 74. La okuloj perfidas la animon, sed ne ĉiu scias en ili legi. — 75.
Bele estus! — 76. Papilia Ludo. — 77. Virino kiu neniam perfidos. — 78.
Radio per Esperanto. — 79. Memorare novissima tua... — 80. Aglo blanka.
— 81. Kiu deziras efikon, tiu uzu rimedon. — 82. Seniĝi estas ĝui. — 83. Pol-
vo kaj ombro ni estas. — 84. Museto. — 85. Printempo venku. — 86. Ĉiam
antaŭe kaj antaŭen. — 87. Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas, hodiaŭ ni preĝas.
— 88. Ĝis. — 89. Kio estas la plej dolĉa? La Dormo. — 90. + + + — 91.
Nenio estas tiom stranga, ke ĝi ne povu fariĝi — vero. — 92. Belaĵo estas
ĝojo por ĉiu. — 93. Tradukoj estas kiel virinoj. — 94. Por la XX^a. — 95.
Ĉiam antaŭen — Saaz. — 96. Multaj idiomoj: milito! Unu lingvo: paco!! —
97. Hacibalo kaj Scipiono. — 98. La sinjorino kun la skarлата masko. — 99.
En la infero de l' milito. — 100. En la sankta nokto. — 101. Kabe. — 102. Ba-
bilado. — 103. La boremo. — 104. Kredo. — 105. Ruzo. — 106. Miraklo. — 107.
Historio. — 108. Rapido. — 109. Tales of the Crusaders. — 110. Per flugiloj
de subtila etero. — 111. En la mondon venis nova sento. — 112. Mi ne povas
esti profet, en malgrandigita patrujet', Ne, neniam. — 113. Homo devas pen-
si ne nur pri siaj rajtoj, sed ankaŭ pri siaj devoj. — 114. Ĉu la muziko efek-
tive malkaŝas nian animon? — 115. Ĉu amo devigas? — 116. Honny soit qui
mal y pense. — 117. The moon. — 118. Ho mia file! tiom belblondula... —
119. Dies irae dies illa... — 120. Ni hi són tots els que ho són, ni ho són tots
els que hi són. — 121. Paŝo post paŝo. — 122. La bonuloj estas ĉiam la ga-
juloj krom pro malbonŝanco. — 123. Lunhela nokto. — 124. Atakema. —
125. Erri guzietan tokionak badira; bañan biotzak dio: zoaz Euzkalerrira. —
126. La sezonoj. — 127. La morto de patrino. — 128. Dofoto. — 129. Nomina
sunt odiosa. — 130. El floroj la abel', alportas ion al la ĉiel'. — 131. Popo-
loj devas fariĝi al centro celantaj eroj de unu homaro por nia lingvo Espe-
ranto. — 132. Sub la sankta signo. — 133. Vintra suno. — 134. Moraleco
ĉiam moraleco. — 135. Junulo.

Kristnasko sub la neĝo

«Ĉu avo, ankoraŭ tre longa la voj' ?
 Lacego min venkas, tro premas malĝoj' .
 Nenie kompreno, nenie kompat' ,
 Kaj ĉiam pli akre turmentas malsat' .
 Pro kio hodiaŭ nur ĉie rifuz'
 por nia muziko kaj kanta amuz' ?
 Ja portis monerojn antaŭe la lud' .
 Hodiaŭ nur grumblo pri ĝena altrud' ».

Ekkaptas la avon profunda dolor' .
 Pri l' plendo infana premiĝas la kor' .
 «Indulgu ni ilin, forestu koler' ,
 Ja estas venonta kristnaska vesper' .
 Kaj tial la homoj pro multa farad'
 Ne aŭdas la gurdon ludanta sur strat' .
 Pro l' fest' okupiĝas ja ĉiu doman' . —
 Ja venos ĉinokte kristnaska infan' ».

«Kristnasko! Ho, preskaŭ pro troa korve'
 Forgesis mi tion, sed venos — ĉu ne? —
 La Sankta Infano ja ankaŭ al mi,
 Ja bona mi estis kaj preĝis al Li.
 Kun pupo Li venos kaj ludoilar' ,
 Ĵus kiel lastjare, post longa prepar' ,
 Gepatroj min vekis; kun ĝoja ekkri'
 Brilantan arbeton admiris nun mi».

Malĝoje la viro rigardas al ter' .
 Pli sangas la koro pro troa sufer' .
 «Gurdistojn, mi timas, migrantajn sen cel' ,
 Ne trovos, ho ve, la kristnaska anĝel' .»
 «Ho, tamen! Patrinjo ja estos gvidant'
 Kaj montros la vojon al mi en fremdland' ,
 Ŝi jen de l' ĉielo ja zorgas pri mi,
 Mortante ŝi tion promesis al mi.»

Sin streĉas la avo malforta al rid' ,
 Rigardas ĉielon kun firma konfid' .
 «Do preĝe leviĝu refoje la man' :
 Ne volu forgesi nin, Dia Infan' .»
 «Sed nun, kara avo, ne povus mi plu,
 Malgranda ripozo jam estus ekĝu' .»
 «Do faru! Ja estas sur tiu vojrand'
 Sufiĉe da loko por laca migrant' .»

Ripozas jam ili sur neĝa vojbord' ,
 Kaj ilin forlasas nun lasta la fort' .
 Fermiĝas okuloj en dolĉa dormad' .
 Neĝeroj surŝvebas kun milda kompat' .
 Du knaboj alkuras post mira ekvid' .
 «Ja dormas gurdisto kaj dormas la id' ,
 La gurdon ludigi, hej, ĝuo por ni.»
 Eksonas jam dolĉa kristnaskmelodi' .

La viro maljuna kun mira avid'
 Muzikon ekaŭdas, feliĉa kun rid'
 Ĉiele sin vidas, forŝvebas la ter' ,
 Jam ne plu turmentas malhavo, sufer' .
 L' infano sin vidas en dolĉa kviet'
 Ĉe patro, patrino sub festa arbet' ,
 Anĝeloj alŝvebas de l' alta ĉiel'
 Ĝojkante. Ho, kia brilego kaj hel' .

Forkuris la knaboj pro jama enu' .
 Dormantojn atentis neniuj nun plu.
 Kaj nur kamparanoj dum frua preĝir'
 Ekvidas la paron sub neĝo kun mir' ,
 dormantan ankoraŭ en dolĉa kviet' .
 Ne helpas vekigi eĉ multa rimed' .
 Forprenis jam ilin kristnaska anĝel'
 Por festi kristnaskon en bela ĉiel' .

CHR. THOMA

Premiita en la XIaj. Internaciaj Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

Internacia Medicina Revuo depost januaro 1926 estas eldonita sur tute novaj bazoj. Ĉefredaktoro: Profesoro Vanverts el Lille. Kunlaborantaro el ĉiuj landoj. Enhavo: originalaj artikoloj; aŭtoferatoj; reforatoj; komunikaĵoj de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Diversaĵoj. — Abono: 1 Doloro, aŭ samvaloro. — Pri sciigoj, sendo de dokumentoj, k. t. p., sin turni al Redakcio kaj Administracio: D-ro. Briquet, rue de la Bassée 31, Lille (Franclando).

Avaĵo

La avo manlaboras.

Ĉu vi eble malŝatos la avon pro tio, kara legonto? Estas ja kleruloj, kiuj juĝas la manlaboradon malhonoriga. Ĉu vi do mokridos pri la avo manlaboranta? Li ankaŭ ridetus pri vi, kaj estus prava, bedaŭrante vin, kiu ne konas la ĝojon, estigi per la manoj utilan aŭ belan aĵon, vidi kaj palpigi, vidigi kaj palpigi al la konatuloj, kion sukcesis ellabori, kune kun la pensema kapo, la ĝustevida okulo kaj la lerta mano.

Malfeliĉa la homo, kiu ne konas tiun ĝojon!

Sed kion faras la avo?

Unuvorte direbla tio ne estas. Se do la tempo mankas al vi, mi salutos vin adiaŭante. Se vi male bonvolas indulgi babilemon, aŭskultu!

Baldaŭ Kristnaskos.

Vi eble ne konas la tutan signifon de tiuj du vortetoj. Mi ja skribas Esperante. Por esti nepre komprenota, mi devus verki tion germanlingve aŭ uzi alian nordan lingvon.

Kristnasko! tute komprenata tiu vorto nur estas en la malvarmaj landoj.

Kie la vintro neĝkovras la teron kaj la tero spite la senfoliigan froston kreskigas piceon kaj abion, la nordajn vintroverdaĵojn.

Kie, antaŭ ilia kristaniĝo, la praavoj festis la plej mallongan tagon, la ĝojigan tagon de 1^a lunreveno.

Kie nuntempe, la kristanaj pranepoj de la iamaj Diaradorintoj, eĉ la plej malriĉaj havigas al si je tiu festo, pli malpli grandan abion (aŭ piceon). la Kristnaskarbon, ornamas ĝin per ruĝvangaĵoj pomoj kaj nuksoj orumitaj, per ĉiuspecaj brilajetoj kaj koloraĵoj, sed precipe per aro da vakskandeletoj, ekbruligotaj, kiam la dudek kvara de decembro mallumiĝos.

Jen eklumas la lumigiloj, unu post la alia, vidigante en la malgranda ĉambro pecon de stelĉielo, flarigante, kune kun la rezinaj folioj kaj eble ekbrulanta branĉeto, parfumon samtempe maldolĉan kaj dolĉan, la Kristnaskan parfumon, kiu, pli ol ĉio, memorigas la nordlandanon pri la belaj infanĵaroj.

Nun la patrino, ekbruliginte la lastan kandeleton, sonigas argentesonnan tintileton; la pordo malfermiĝas kaj silentege, kvazaŭ la ĉambreto estus preĝejo, eniras la infanaro kun okuloj pro ĝojo pli lumaj ol la arbo festornamita, mirante la brilegon kaj kaŝeserĉante la donacaron sub la verdaj branĉoj.

Hol! infanokuloj spegulantaj la Kristnaskabian lumon! plej bela brilo. Kiel en liaj manoj, ankaŭ en liaj okuloj vidiĝas Kristarbornamo.

Jam li antaŭvidas la genepan kaj postvidas la gefilan ĝojon pro la belajetoj memelpensitaj kaj memellaboritaj, ĉe neniu alia Kristarbo vidataj.

Sed kial do li deziras apartan ornamon? ĉu, kiel la poeto Horacio, li «malamas la profanularon?».

Hol ne, li nur malŝatas la malbelon kaj — atentul!

Ĉar la gusto de la infanoj estas infaneca, nepensemaj plenkreskuloj

juĝas ĉion sufiĉe bona kaj bela por ili, malatentas sian devon, ĉiurilate eduki la etulojn. Tial la Kristnaskabio estas ofte malbonguste ornamata.

La avo grumbladis, kiam li vidis tian plendindan arbeton ŝarĝitan je strangaj objektoj, ofte malbelegaj, ĉiam nepre malarbaj, kiel li diri kutimis. Jen, ĉiaj hejmaĵoj kaj eksterhejmaĵoj, lampoj kaj horloĝoj, bildoj, eĉenkadrigitaj, bicikloj iam, nun aŭtomobiloj, vaporsipoj kaj flugmaŝinoj, tutaj tutaj vagonaroj, blankaj neĝhomoj kaj nigraj kamenskrapistoj kvazaŭ ekzekutite pendantaj je branĉo-ĉu do la Kristarbo estas, kiel bildlibro, vidingonta ĉiun formeblan aĵon?

Ne la bruegan urban vivadon ĝi devas reestigi en la vintra nokto, sed la vidon de printempa aŭ somera arbaro. Ĝin do ornamu, krom la lumsteloj, floroj kaj fruktoj—eble eĉ neabiaj, ĉar okazas la Kristnaska mirnokto—vivigu ĝin bestetoj, kiajn oni vidas en la arbaro, petolema sciuro aŭ grand-okula grilo, sed precipe birdaro, kiun la infanoj ŝatas, ĉar ilia animo, kiel la avo diras, estas pli birda ol homa.

Ankaŭ lia fileto, antaŭ kelkaj jardekoj, amis la birdojn. Ĝojkriante li montris ilin en sia bildlibro kaj en la patraj scienclibroj, promenante li vidis kaj aŭdis antaŭ ĉio la flugeman kantistaron. Pro tio la patro decidis birdornami la Kristnaskabion.

Sed kiel? pentri la estaĵojn sur papero kaj eltranĉi—arbon ĉiufanke rigardotan malbele ornamus tiaj plataj paperpecoj. Korpaj estu liaj birdoj aŭ ne estu! Ĉu li do paŝos kaj pajloŝtopos fringon kaj kardelon, paruon kaj buditon, la karajn heroldojn de l' Reĝo Printempo? ho ne! El ligno skulpti ilin estus malfacile, tempuzige, kaj, tro multepezaj, la aĵoj malbele klinigus la branĉojn de l' abio.

Longe la ornamemulo pripensadis la problemon kaj provadis kaj malsukcesis, refoje provis kaj obstine penadis, kaj fine sidis sur la malhela arbo kaj flugŝvebis tra la verdaĵo birdetoj, korpaj birdetoj, vidindaj de ĉiuj flankoj, kolorriĉaj, plume senpezaj, ne fleksante la plej maldikan branĉon.

Ho! la surprizo de la infanoj pro la «pipipoj!» la gaja ĝojpepiado ĉirkaŭ la vivigita arbo! kaj la fiera kontenteco de l' artisto!

Ĉiujare je la lumo kandeletara reaperis la mirajetoj ofte plimultigitaj kaj plibeligitaj.

Ĉiujare—ĝis kiam, bruligonte la urbojn kaj mortigonte milionojn da homoj, la Mondmilito trapaŝis la pacan valon; ĝi tamen nur piedfrapegis la ĝardenon, disĵetis la posedaĵojn, militigis la filojn, malliberigis la patron.

La havaĵo estas perdita, la groŝoj ŝparitaj senvalorigis, la vivrimedoj ne plu sufiĉas. Sed okazis revido de ĉiuj familianoj, dum multe da konatuloj funebras. Do supren la kapon ne plendu!

Pri la perdo de l' komforto la avo konsoliĝis; sed kiam la nenjo komencis promeni kun li kaj miri la belan naturon kaj ĝoji pro la fringoj kaj hirundoj, li bedaŭris la forigon de l' Kristarbornamo. Li provis reestigi ĝin, sed, kiel antaŭ tridek jaroj, la unua provo nepre malsukcesis; la fingroj estis rigidigintaj.

Sed nun li scias almenaŭ, ke lia ideo estas efektivebla, li spertis la kielon. Li do aĉetas, por kelkaj spesdekoj, diverskoloran maldikan paperon, metalfadenon kaj gumon; el kruda brulŝtupo, per poŝtrancilo, li faras ilojn, kaj pacience li nun formas eron post ero. Jam birda torso, delikata beko kaj kapo, maldikaj flugiloj kaj «fere» fortaj kruretoj, koketa vosto kaj gaja karbonigra okulparo. Pli malpli laŭnature, sed neniam malnature, li kunigas la partojn; jam vidiĝas nova birdspeco, blua kaj flava aŭ blanka kaj rozkolora, kun ruĝa koro aŭ verda stelo sur la brusto, kun vosto hirunda aŭ budita, kun longaj pintaj aŭ larĝaj mallongaj flugiloj, kun beko pirole dika aŭ silvie delikata; nemoveblaj la bestetoj, ne tamen rigidaj ili ne forflugas, sed ŝajnas forflugontaj, kanton nek aŭdas nek aŭdigas, sed levo kaj turno de la kapeto ŝajnigas ilin ĉu ekkantontaj ĉu aŭskultantaj la rigardanton.

Ĉiam novaj formoj, aliaj sintenadoj, diversaj koloraroj; la avo estas nelacigebla kaj la kreskantano aron li karesas per la okuloj, pli per la genepaj ol per la propraj.

Ĉiutage, matene kaj posttagmeze, vespere ĝis post la mezo de la longa vintronokto, li tranĉas paperon, kungluas kaj glatigas, formas kaj ŝanĝas, forgesas ĉion, krom la vizitoj al la nenjo. Sed kiam li laŭkute promenis la etulon, neniu fringo preterflugas, neniu merlo saltetas sub la arbeto, ne montrite de la gvidanto al la gvidata birdadmirono.

Kaj li mem pli atente ol iam antaŭe rigardas la vivulon, pristudas la konturon de la fluganta, la movadon de la saltanta petolemulo kaj, hejmen reveninte, li malfermas la grandan skatolon, la birdejon (bonvolu ne nomi ĝin birdujo!), refoje aliigas ion kaj formadas, strange kunlaborigas zorgeman naturobservon kaj senbridan fantazion.

Jen, la paro fariĝas dekduo kaj la dekduo trideko; lin ĝojigas ankoraŭ pligrandigi tiun nombron. Eĉ kvindeko, duona cento, ne estus sufiĉa: li aliĝas almenaŭ unu, ĉar tri arbojn li estas senpartie ornamonta.

Kion diris la etuloj?

La pli juna diris nenion; sesmonata, ŝi ne jam parolas, sed ŝi ĝojegis pro la lumoj tra la arbo. La dujara, ĝuste dujara Krinjo malsanetis, sed la kuracisto dankinde permesis, ke ŝi ĉestu la festeton sur la brakoj de plenkreskulo; tial la avo sentis ŝian ĝojtremon, kiam ŝi ekvidis la unuan «pepi-pon» kaj duan kaj ankoraŭ kaj ankoraŭ... ŝi kaj la pliaĝa frateto baldaŭ estis trovintaj ĉiun birdeton, ĉu nevidebla fadeno ĝin flugŝvebigis, ĉu feraj piedetoj ĝin fiksis al iu branĉeto. La plej aĝa el la kvaroj, la jam lerneja knabineto festis malproksime, festis la unuan fojon sen la avo; sed la patrino rakontis al la avo, ke Analizeto (Ano Elizabeto) pleje ĝojis pro la sciigo, ke sur la arboj de la gekuzoj troviĝas similaj birdoj.

Sekve pri la sukceso de sia manlaborado la avo estas nepre kontenta; sed kial de post la Kristnaska festo, kiam la tagoj ekplilongiĝas, li daŭrigas la birdestigon?

Kial do, je bela tago, li elektas el la avo la plej beletan trion, zorge ĉir-

kaŭvolvas ĝin per papero, metas en skatolon, aligas skribaĵon kaj forportas la paketon al la poŝtoŝeĵo? Al kiu la sendo?

Malproksime, trans la Blua Maro, en la Ora Insulo, Florludoj estas okazontaj. Nek la reĝino de tiu bela festo nek la juĝontaro de la gaja batalo estas konata de l' avo; neniam, bedaŭrinde neniam, li vizitis la Katalunan Landon de Suno kaj Floroj. Sed li scias, ke la festontoj estas samideanoj; el la malproksima provinco de Esperantujo li jam ricevis leterojn kaj kaploke estis skribite: karega amiko.

Florludan premion li jam atingis; kial do li ne estus refoje premiata?

La naturan floran li certe ŝatus, li ĝojegus oferi ĝin al la plej ĉarma el la ĉarmegaj, pro beleco ĝloreĝaj Majorkaninoj; sed tiun triumfon la blankbarbulo lasos al juna poeto, kiu fervore prikantos la Amon aŭ majstre esperantigos la proponitan katalunan tekston.

Reĝinon elekti la maljunulo ne rajtos; sed vi bonvolu senkulpiĝi la malmolestajon! — ĉu premiata, ĉu ne, li rajtigas sin mem, oferi al la reĝino malgrandaĵon malpli belan sed pli daŭran ol natura floro, paperan birdeton, kiel saluton al la lando de luma suno kaj brilaj floroj el la lando de neĝo kaj malhelaj abioj, al la reĝino de multnacia kongreso, samideanan saluton el hejmo malvasta, sed gaja pro birdoj kaj infanoj.

ED. JUNG

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj



Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitaĵn)

RESPONDOJ AL KONTRAŬRELIGIAJ PAROLOJ de Msgro de Ségur. Laŭ la germana traduko de P. Henriko Müller esperantigis D-ro. Adolfo Halbedl. 211 paĝoj, 19 × 12. Graz 1925. Presita kaj eldonita ĉe «Styria» Unuversitata Presejo kaj Eldonejo. Prezo: ne montrita.

Kun entuziasmo mi salutas la aperon de la konata verko de Msgro de Ségur, kiu nepre postulis esperantigon por ke la katolikoj esperantistaj povu ĉerpi el ĝi multajn argumentojn por pravigi la bonecon de kristanismo.

Fakajn verkojn bezonas nia literaturo por ke en ĝi oni trovu filozofion, teknikon, sciencon, kiujn ĝis nun ni devis serĉi en la nacilingvaj eldonoj.

Grandan dankon ni ŝuldas al la tradukinto kaj eldonintoj, ke ili liveris al ni laŭdindan libron.

«Respondoj al Kontraŭreligiaj Paroloj» enhavas 53 kontraŭparolojn, kiuj elvidigas la specialan ruzon de la verkinto kaj la ne malpli citindan malrespektemon de la tradukinto, kiu kiel la aŭtoro, diversefoje argumentas ridinde kaj senĝene.

Kristanismo, t. e. la katolika religio estas doktrino, kiu nepre devas forjeti la jenajn mallongigitajn argumentojn, se ĝi ne volas forpeli de sia flanko seriozajn homojn:

«Ĉu vi scias, amiko, kion signifas en bona Esperanto la maleleganta diro: «Ne ekzistas Dio». Mi volas doni al vi precizan interpreton; ĝi tekstas: «Mi estas fiulo kaj deziras, ke Dio ne ekzistu, ĉar mi timegas lin!»

«Dio ne ekzistas. Ĉu vi konas bonan patron familian, fidelan edzon, ĉastan edzinon, kiu parolas tiel?»

Protestantismo kaj ĉiuj ceteraj multnombraj religioj estas fuŝaĵoj. La katolika religio, konkludas la aŭtoro, estas la sola vera religio.

El lingva vidpunkto la tradukaĵo estas bona. Krom kelkaj eraroj lasta-paĝe ordigitaj, oni trovas nur malmultajn malperfektaĵojn.

Ni esperas kaj deziras, ke la libro trovu multajn aĉetantojn kaj ke similaj verkoj, religiaj aŭ kontraŭreligiaj, blankaj aŭ ruĝaj, rapide multobliĝu en nia kampo, sed bonedukiteco konsilas respekti ĉiun opinion kaj juĝi objekte, ne kun tia pasio kaj atakemo de D-ro. Halbedl.

ESPERANTA LEGAĴO. — Elektita por komencantoj kaj kursoj. Rakontoj kaj poemoj kun germana interlinia traduko kiel ankaŭ lingvaj kaj literaturaj klarigoj. Esperanto-Germana Biblioteko. Vieno, 1926. 31 paĝoj, 18 × 13. Mendebila de la eldonejo, Paul Knpler. l., Lichtensteg 1. Prezo: 0'50 sv. fr.

Tre taŭga legaĵo por germanlingvaj lernantoj. Tre saĝe elektita enhavo. La stilo de la enhavataj verkaĵoj estas io eksterordinara: ĝi superas ĉiujn postulojn de perfekteco, beleco, eleganteco, k. t. p.

LA EVANGELIO LAŬ SANKTA JOHANO. — Tradukita el la originala greka teksto de Prof. J. Gristead, Dro. S. Lowell kaj Ptro. P. Anderson. Havebla ĉe Esperanta Kolportista Asocio, 64 St. Thomas Road, Finsbury Park. London N. 4. 64 paĝoj, 11 1/2 × 7 1/2. Prezo: ne montrita.

Bele presita broŝureto kun kelkaj gravuraĵoj. Kiel klarigas la titolo mem ĝi rakontas la evangelion laŭ St. Johano.

La lingvaĵo ne estas sufiĉe ĉasta kaj eraroj estas tre oftaj.

DEKLARACIO PRI LA VERO. — Deklaracio fidela pri la Vero elmontrata laŭ la Sankta Biblio (La neerareblaj Skriboj), kaj ne sama kiel la kredo populara, kiu multe konsistas el fabloj, kiujn venontajn la apostolo Paŭlo antaŭdiris. (Ĉerpaĵo el la broŝuro). 51 paĝoj, 18 × 12 Senpage havebla ĉe G. R. Martin, 43, Calmont Road, Bromley, Kent, Anglujo.

Laŭ la eldonintoj, la celo de la broŝuro estas: el la Sanktaj Skriboj elmontri ke vane la «kristanoj» adoras Dion, kaj ke la instruadoj de la «kristanaj» eklezioj estas malestimegataj de Dio.

Kiel modelo de malbela stilo la broŝuro povas stari en la unuaj vicoj de fuŝaĵoj. Eraroj ĉiuspecaj abundas en ĉiu paĝo. Se ĉiu eraro estus peko, la eldonintoj certe ne alvenus la Regnon de Dio, eĉ se ili lernigus la Biblion al la loĝantoj de Marso. — SALJO.

Intershangho — Gazetoj ricevataj

Germana Esperantisto, Monata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto, Berlin, S. W. 61 Wilhesstr. 5.

Pola Esperantisto, Monata gazeto de polaj esperantistoj. Widok, 19, Warszawa.

Bulgara Esperantisto, Monata Organo de la Bulgara Esperantista Societo. — Sofio, Bulgarujo, Car Boris, 69.

Kristana Espero, Tampere Satamak, 1. Finlando.

Litova Stelo, Eldono de Litova Esperanta Asocio. Rotuses, Aikštė, n.º 6. Kaunas, Litovujo.

La Suno Hispana, Organo de la hispanaj esperantistoj, Mar, n.º 23. Valencio.

Sennacieca Revuo, Monata Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda. R. Lerchner, Colmstrasse, 1, Leipzig — Stötteriz (Germ).

La Nova Tago, Internacia — Baha'i — Esperanto gazeto. Kvaronjare eldonata de la Esperanto-Komitato de la Baha'i-movado en Hamburgo. — Adreso: F. Gerstner, Wandsbek. — Hamburg. (Germ.) Olmichlembur, 66.

La Fervojisto, Oficiala Organo de Internacia Asocio de la Esperantistoj. Fervojistoj Jezuitska ulica, 1. Zagreb — Jugoslavio.

Informservoj de la Internacia Laboroficejo, Tri Komunikaĵoj (cirkuleroj) n.º 94 A. B. kaj C. de la 14^a — 7 — 1925.

Butletí — Rexista, Portaveu del Grup Humanitari Espirita — Pau, Amor i Progrés, Santa Eulàlia, 11, torreta, 5^a — Barcelona (Gràcia).

Revista del Ateneo, Jerez de la Frontera, Duque Almodóvar, 8. Sevilla.

La Taquigrafia, Organo Oficial de la Academia de Taquigrafia de Barcelona. — Palau, 4.

Boletín de la Cámara Oficial de la Propiedad Urbana de Barcelona, Magdalenes, 12, pral.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Prezo: 12 pesetoj. Aŭfrankite: 2 dolaroj, 11 svisaj frankoj aŭ 9 ŝilingoj. En la Iberia duoninsulo 13 pesetoj aŭfrank.

Por mendoj oni turnu sin al S-ro. Eduard Capdevila, str. Carders, 29. Barcelona.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la KATALUNA ANTOLOGIO estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperantujo.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

"Kataluna Esperantisto."

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkajoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoncon, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO
per poŝtmarkoj, ni sendas sortimenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA

KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Jaume Herp

ESPERANTO I RADIOFONIA

La nova emissor de "Ràdio Barcelona"

Atentament invitada la «Kataluna Esperantista Federacio» a assistir el dia 25 de febrer a la inauguració oficial de la nova i potent emissor que «Ràdio Barcelona» ha instal·lat al cim del Tibidabo, hi fou representada pel nostre amic Angel Valdepeñas, soci de la «Asociació Nacional de Ràdiodifusió» i membre de la «Penya Ràdioesperantista».

Felicitem coralment «Ràdio Barcelona» (que tantes amistats compta entre els federats de la K. E. F.) perquè amb el nou esforç realitzat, demostra com és veritat el generós ideal de cultura que anima els seus dirigents, que ja s'evidencià en la antiga emissor en establir-hi conferències i cursos d'Esperanto com es fa en les més importants estacions europees i americanes. (Madrid, París, Roma, Berlin, Leipzig etc. etc.).

L'esperantisme mundial, que té ràdioistes tan eminents com Mr. Mesny, Mr. E. Belin, el Dr. Privat i altres, celebra aquest nou progrés en el moviment radiofònic, i espera amb anhel el festival esperantista que el dia 7 d'abril serà radiat des de la alta antena de «Ràdio Barcelona».

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (ĉ), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

*sufix per al
femeni*

heroino, reĝino
katino, leonino

O

*terminació
substantiu*

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

*terminació
adjectiu*

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

*terminació verb
(infinitiu)*

kompreni
labori
komer-ci
(comerciar)

E

*terminació
adverbial*

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

*mode condi-
cional*

U

*mode impera-
tiu o subjun-
tiu*

Mi skribas
Jo escrib

skribis
escrivi

skribos
escriurĉ

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escrib la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

Fervoro - Ofero

Nia movado hodiaŭ postulas oferon. Eĉ Movadoj por amuzaj celoj postulas oferon de siaj adeptoj. Ĉu niaj kamaradoj por paco kaj amo, por justeco kaj kompreno ne estos sindonaj? Kelkaj jam plurfoje pravis sian fervoron. Kelkaj el niaj kunfederacianoj tre inde kaj noble respondis la petojn de K. E. F. Ni tamen devas organizi la regimenton de niaj fervoruloj.

Ni devas multe labori kaj, do, bezonas laborulojn: ĉu por informado al ni, ĉu por informado pri nia movado al ĉiuj rondoj en nia teritorio, ĉu por propagando kaj instruado de nia lingvo, ni bezonas kunlaborantojn: venu al ni, proponu vin al ni, oferu laŭ viaj cirkonstancoj, povo kaj kapablo, por antaŭenigi nian karan aferon.

Ni devas pagi por la Konstanta Reprezentantaro, kiu estas necesa kolumno, apud U. E. A., por la subteno al la grava funkciado de la Internacia Centra Komitato. Ni devas pagi por eldonado de nia gazeto, necesa organo nia, necesa organo de la Internaciaj Floraj Ludoj, kaj por lernolibroj, kaj por propagandiloj, kaj por monpunoj: ni bezonas monon, tiun materian necesan perilon, kiu estas malinda se ĝi ne estas iel utiligata por noblaj aferoj, kiu estus malbeninda se ĝi nur taŭgus por satigo de egoismaj pasioj. Sendu al ni monon por idealo, por utilo homarama, por esperanto, por homaranismo, por kulturo, por nia sankta afero.

Fervoro estas vera kiam ofero pravas ĝin. Karaj gesamideanoj: estas mil manieroj oferi. Nia movado bezonas ĉies kaj ĉian oferon.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

Konvertiĝo

Ah, mia preĝ' — nur ĝemo, vojon netrovanta:
 nur nana ve' pro memfendita vund' .
 Mi trene tiras jugon de la Tero vanta
 kaj man' de Baal min premas ĝis marĉfund' .
 Jam mankas voj' el nokta blind' al taga lumo.
 Ne hardis koron virtofajra ard' .
 Malfruis la semant' . Senfruktas kora humo.
 Ne greno kreskis, sed sarkinda kard' .

Vespero... Vibro de lanternaj lumoj tremas.
 Ŝancele vagas mi sur strata voj' ...
 Sencelo tedas... Pensoj mute rekviemas
 ĉe rubaltaro pri l' entomba ĝoj' ...
 Fantomoj venas: jen knabino el bordelo
 min logas al volupta danca fest' ,
 jen bruas brandhaladza kant' el gastejkelo
 vokanta min al sia ranca nest' .

«For! For! Rifuĝu el ŝlimbuŝo vin glutonta!»
 sed vane krias mi, ĉar mankas vol' .
 Eĉ pento ne vekigas pro l' pasinto honta;
 blasfemsemaĵo putras sub tavolo' .
 Do kien turni min? Ĉu venos kiu savas?
 Ĉu ŝprucas fonto por la soifant' ?
 Kompato homa estas «manon mano lavas»
 maskita egoismo, pruda kant' .

La strata bril' pupilojn tegas per retino
 kaj kun si rulas vin la lumlavang' .
 Venenas la groŝkosta am' de stratknabino;
 perfidon kaŝas la ŝminkita vang' .
 Atendas tamen mi... Pri kio?... Jen enigmo.
 Ne vokas hejm' , ĝi kuŝas en ruin' .
 Ne gardas la memfid' , pereis jam la digno.
 Frakasís ilin — strato kaj knabin' .

Nun pian psalmon portas la noktmeza, vento:
 «La veston ĵetu for! Ĝin kovras pek' ...»
 La ventflugilo zumas: «Vi, multpekinta gento,
 Kristsango fluas por la kora sek' ...»
 La psalmo ploras kiel la signala tinto,
 vokanta ŝipon el ondtomb' al rod' .
 Al mi parolas voke ĝi, al vojperdinto:
 «Vin savos la korfunda pentklopod' ...»

Hezite mi ekiras kaj ŝancele paŝas.
 Postsekvas min la Pek' sur kotĉeval'
 Pasint' torturas, nuno korvipante draŝas
 kaj mokas duba rid' de dio Baal.
 Jen domo... Min haltigas lumo, orgenmuĝo...
 Tra l' pordo sonas la kantanta ĥor' .
 Invitas voĉ' virina al ĉiela juĝo:
 «Al pentobenk' vin vokas la Sinjor' !»

«Ah, mia preĝ — nur ĝemo, vojon netrovanta;
 nur nana ve' pro memfendita vund' .
 Mi trene tiras jugon de Tero vanta
 kaj man' de Baal min prenas ĝis marĉfund' ,»
 Sed diras ŝi: «Al pentobenko venu, frato!
 Konsolon trovas la pentanta kor'
 kaj levos ĝin eterna grac' de l' Dikompato.
 Ne preteriru! Ne rapidu for!»

«Jam mankas voj' el nokta blind' al taga lumo.
 Vesperto vidas nur en noktmalhel' .
 Malfruis la semant' . Senfrukte kuŝas humo.
 Perdigi inter kardoj ĉiu bel' .»
 Sed diras ŝi: «La pentobenko vin atendas.
 Nun vokas Di' , sed morgaŭ — eble ne...
 La konvertiton la hieraŭ ne turmentas».
 Mi spitas plu: «Ĉu kredi? Ne! Ne! Ne!»

Nur pluen! La migrant' survoje finas lukton
 kaj falas kiel vermmordita fag' .
 Sunbrila varm' ne dotas la malfruan frukton,
 forskuas vento ĝin dum vintra tag' .
 Moral' jungita estas monstro egoista.
 Kun kotĉevalo vanas la batal' ...
 Do pluen!., Sed haltigas min vizaĝo Krista
 kun sangaj vundoj kaj postmorta pal' .

«Do kien, filo? Nur ventanimeco en vi spitas.
 Sofistaj pensoj flegas sen kurac' .
 Do lasu for! La voj' de l' Ter' al senvojeco gvidas.
 Despoto nutras sklavojn per minac' .
 Do kien? Kredi timas nur la M a l k u r a ĝ o .
 Eĉ dubi timas ĝi pri sia just' .
 Vi sekvu min kaj brave en agad' kaj saĝo
 reflektu pura lum' de koma brust' .

Foriĝis la aper', sed mi la voĉon konas.
 El infanaĝo plendis unu kord'.
 Al dubfrapita vir' miraklojn sort' ne donas;
 infanan fidon fermas krypta pord'.
 Mi tamen turnas min... Piedoj sin ekmovas.
 La Disinĵoro frapas ĉe l' anim'
 kaj kvankamforte fidi, kredi, mi ne povas;
 la vorto « e b l e » nun instigas min.

Post mi: elektra gurdo kri-muzikas,
 tintante tentas glasfrapanta bru',
 ebria diboĉul' pri « amliber' » predikas,
 sed mi obstine iras... iras plu.
 Apude la mortintan panjon nun mi vidas...
 Ŝi ploras: « Vin hufbato sortfuror' ».
 kaj el la dom' denove la virin' invitas:
 « Al pentobenk' vin vokas la Sinjor' ! »

Kaj iras mi plenfide... For vi peka vesto!
 La nudan koron portos mi al Krist'.
 Li donu novan veston por la nova festo,
 la kriptan pordon fendis Lia pist',
 Kaj mia preĝ' — se ĝemo, sed jam vojhavanta:
 aklama dankolarm', trovita Ver'.
 Polvigis la idol', naniĝis Tero vanta,
 en koro jen: *Konsolo kaj Esper'*.

JULIO BAGHY

Premiita en la Xlaj. Internaciaj Floraj Ludoj

Pro... kaj Por...

Inaŭguro de la «Barcelona Esperanto Societo» - okazos la 27an de Marto, en la granda salono de l' Ateneu Enciclopèdic Popular. Plej belaj poezioj el la «Kataluna Antologio» estas deklamotaj de S-roj. Grau, Domènech, Alberich, Capdevila kaj aliaj kompetentaj kamaradoj. Nia konata samideanino Palmira Gastellvi kantos popolajn kanzonojn ankaŭ el nia «Antologio». La fama kompilinto de nia granda verko parolados pri la literatur-recoj de Esperanto. Unuvorte, la nova Esperanto-Societo en nia ĉefurbo, regalos esperantistaron per interesege inaŭguro. — Paroladoj en Esperanto pri literaturaj kaj sciencaj temoj estas organizataj ankaŭ de la Barcelona Esperanto-Societo: D-ro. Marian Solà parolados la 24an de aprilo, en sidejo de l' Ateneu Enciclopèdic; temo: Novaj ideoj pri la imuneco.

Pri Amo

Sinjur' respektinda, pardonu ĉi paron da pekujoj. Aŭtunaj ventoj blovas hodiaŭ per furiozaj turniĝoj, forpelante polvon kaj malvivajn foliojn, kaj kune kun ili forflugis ankaŭ ĉiuj viaj instruoj.

Ne diru, ho patro, ke viv' estas vanto.

Ĉar ni faris fine interpacon kun la morto kaj almenaŭ por kelkaj bonodoraj horoj ni ambaŭ estas senmortigitaj.

Eĉ se la reĝ-armeo venus kaj kruelege nin atakus, ni ĉagrene kapskuus kaj dirus: Fratoj, vi malhelpas al ni. Se vi bezonas ĉi bruon ludon, iru kaj tintu per viaj armiloj aliloke. Ĉar nur por malmultaj rapidaj momentoj ni estas senmortigitaj.

Se amike popolo venus kaj ronde nin ĉirkaŭus ni humile ilin salutus kaj dirus: tia tro granda feliĉo nin ambarasigas. Da loko estas avare en la senfina ĉielo, kie ni troviĝas. Ĉar printempe floroj aperas amase kaj la agemaj abelflugiloj puŝadas sin reciproke. Nia malgranda ĉielo, kie troviĝas nur ni du senmortuloj, estas ridinde tro malvasta.

Meznokte la kvazaŭa asketo proklamis:

«Jen estas la tempo por forlasi mian hejmon kaj iri serĉi Dion. Ha, kiu tenis min tiel longe ĉi tie en trompo?»

Dio ekmurmuris: «Mi», sed la oreloj de l' homo estis ŝtopitaj.

Kun infano ekdorminta ĉe ŝia brusto kuŝis lia edzino, trankvile dormante en la dua parto de l' lito.

La homo diris: «kiuj vi estas, kiuj min tiel longe senprudentigis?»

La voĉo diris refoje: «Ili estas Dio». Sed li tion ĉi ne aŭdis.

La infano ekkriis en ĝia song' kaj ŝoviĝis pli al sia patrino.

Dio ordonis: «Haltu, stultulo, ne forlasu cian hejmon». Sed tamen li ne aŭdis.

Dio ekĝemis kaj plendis: «Kial iras mia servanto min serĉi, forlasante min?»

Ankoraŭ la tag' ne pasis, la foir' ne finiĝis, la foiro sur la river-bordo.

Mi estis timinta, ke mia tempo estis malŝparita kaj mia lasta penceto elspezita.

Sed ne, mia frato, ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

La vendad' kaj aĉetado finiĝis.

Ĉiuj apartenaĵoj de ambaŭ flankoj estas enkasigitaj kaj estas tempo al mi por iri hejmen.

Sed pordisto, ĉu vi postulas vian imposton?
Ne timu ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

La trankvil' en la vento minacas per uragano, la malaltaj nuboj sur la
okcidento nenion bonan aŭguras.

La silentigita akvo atendas la venton.

Mi rapidas transiri la riveron antaŭ ol la nokto min kaptos.

Ho, pramisto, vi volas vian salajron!

Jes, frato, ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

Sur la vojrande, sub la arbo sidas la almozulo. Ve, li rigardas je mia
vizaĝo kun timema espero.

Li pensas, ke mi estas riĉa pro la taga enspezo.

Jes, frato, ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

La nokto fariĝas malluma kaj la vojo-dezerta. Lampiroj brulas inter la
folioj.

Kiu vi estas, kiu sekvas min per ŝtel-silentaj paŝoj?

Ho, mi scias. Estas via deziro prirabi min de mia tuta perlaboraĵo. Mi
vin ne elrevigos.

Ĉar ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

Je mez-nokto mi atingas hejmon. Miaj manoj estas malplenaj.

Vi atendas min kun maltrankvilaj okuloj ĉe mia pordo, maldormanta
kaj silenta.

Kiel bird' timigita vi flugas sur mian bruston kun pasia amo.

Jes, jes, mia Dio, multa restis ankoraŭ. Mia sorto ne trompis min je
ĉio.

ED. WIESSENFELD

Premiita en la Floraj Ludoj 1925.

Pro... kaj Por...

S-ro. Direktoro de «Kataluna Esperantisto».—La 31an de Januaro okazis
general a kunsido de «Nova Sento», en ĝi estas elektita la jena komitato.
Prez. J. M.^a Gorriz; Vicprez. P. Vives; Sekr. J. Bolós; Vicsekr. A. Ribera;
Kalk. A. Mongay; Kas. S. Vives; Bibliot. E. Gili; Voĉdonantoj: R. Burgada,
P. P. Gorriz, J. Llunell, J. Farràs.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

* * *

La principoj, kiujn ni supraĵe trarigardis, estras en Esperanto, kie ili aperas en senĉesa interluktado kaj reciproka influado. La harmonio de la lingvo intime dependas de la ekvilibro de ĉiuj principaj fortoj, kiuj en ĝi funkcias.

En tio kuŝas rimarkinda simileco inter la lingvo kaj la vivulo, kies sano dependas de la ekvilibro de ĉiuj interbatalaj elementoj, kiuj funkcias en ĝia organaro.

Se unu el la elementoj nenormale plifortigas je malprofito por la ceteraj, tiam la vivulo suferas malsane aŭ hipertrofie. Same estus al la lingvo, en kiu kelkaj principoj superregus la ceterajn.

Ni vidu ekzemplojn de la interprincipa lukto. La kultureŭropa principo postulas akcepton de ĉiuj internaciaj elementoj: matr, sestr, duhter, tant, min, mikr, silv, leŝ, bas, rar, beb, dam, alb, lit, kalm, tempest,... Kontraŭ tio, la aŭtonoma principo penas forigi ĉiujn nenecesajn radikojn, anstataŭeblajn de la kunmetaĵoj: aboco (alfabeto), aerosfero (atmosfera) aeroŝtono (aerolito), belvidejo (belvedero), brakseĝo (fotelo), diismo (teismo), filido (nepo), fratido (nevo), organaro (organismo), evorto (adverbo), kma.

La ekonomia principo konsilas mallongigi laŭeble ĉiujn elementojn: foti (fotografii), kino (kinematografo), aŭto (aŭtomobilo), rio (rivero), sro (sinjoro), frino (fraŭlino), kado (kamarado), koopa (kooperativa), Eo (Esperanto), Ea (Esperanta),... sed la tradicio tion ne permesas.

La fonetika principo, kontraŭ la reglformeca, volus ke oni skribu: dizdoni, egbati; kabdoloro, ratknaro, kasformo,... (disdoni, ekbati, kapdoloro, radknaro, kazformo).

La aglutineco, kontraŭ la ekonomio, postulus formojn: patrinnjo, pa-trĉjo,... anstataŭ: panjo, paĉjo.

La fonetika principo, kontraŭ la tradicia, volas aliigi la vortojn: ekzemplo, ekzameno, absceso, absoluta, asbesto,... (kiuj estas flue elparolataj kiel egz..., aps..., azb...)

La origina etimologio postulas: abiso, ametiso, umero, hodie, balde, hiere, vipero, geneto, horazono, stofo, stono, stupo, svito, acipitro, alĝebro, buĝeto, ĉelulozo,...

ALDONAJ NOTOJ PRI LA PRINCIPOJ

§ 1. Esperanto estis kreita de pola kuracisto Lazaro Zamenhof (Lejzer Zamenov — laŭ la oficiala juda akto pri naskiĝo), naskita en Bialystok 1859. XXII. 15, tiama rusa urbo, kaj mortinta en Varŝava 1917. IV, 14, tiam okupita de la germanoj. Dum dekdu jaroj li laboris super sia projekto, senĉese ĝin provante kaj ŝanĝante, antaŭ ol li decidigis publikigi ĝin per rusa lingvo en la unua lernolibreto, je fino de la 1887.

Ido de la eŭropa kulturo, la kreinto de Esperanto, povis bazi nur sur la kultureŭropaj lingvoj. Sed elekto de tiu bazo havis ne sole personan karakteron, ĝi pravas ankaŭ pro la tutmonda supereco de la eŭropaj kulturlingvoj, kiuj, ekster Eŭropo, vastiĝas en la du Amerikoj, en Afriko, Aŭstralio, Oceanio, Insulindio, Siberio, kc.

La nuna eŭropa kulturo havas siajn radikojn en ĉiuj tri partoj de la Malnova Mondo: en Eŭropo mem, en Azio, kaj en Afriko. Ni ne havas dokumentojn pri la pratempa kulturo de la primitivaj hindeŭropanoj, vandoj, keltoj, kies komuna patrujo estis ie inter Elbo kaj Volgo. Sed ni scias pri la posta kultura evoluo — de Skandia landaro norde kaj de la Mezmarasude. Tiu lasta kulturo heredis de la Hindoj, Persoj, Asiroj, Babilonanoj, Siroj, Fenicoj, Hebreoj, Frigoj, Galatoj, Pelasgoj, Etruskoj, Lelegoj, Kretanoj, Iliroj, Trakoj, Skitoj, Kartagoj, Epigtanoj, Araboj. Tiel okazis ke la nunaj eŭropaj kulturlingvoj alprenis multajn radikojn de la aziaj kaj afrikaj nacioj. En nova tempo ili alprenis iom de la amerikaj, oceaniaj kaj orientaziaj popoloj.

§ 2. Per nombro de esperantistoj, loĝantaj en Eŭropo ($\frac{9}{10}$) kaj parolantaj en eŭropaj lingvoj ($\frac{99}{100}$), Esperanto nun travivas ankoraŭ eŭropan periodon de sia evoluo; tio klare videblas en ĝia literaturo, eĉ en la vortaroj. Ekzemple la «Universala Vortaro» kaj ĝiaj tri oficialaj Aldonoj entenas nur kvar nomojn de la sanktaj skriboj: Biblio, Evangelio, Korano, Talmudo. Sed tie mankas ne malpli gravaj por la homaro: Vedo, Zendavesto, Tripitako, Manuleĝo, la sanktaj libroj de bramanoj, budhanoj, kc. Ankaŭ la vortoj kiuj rilatas je bestoj, plantoj, vestoj, iloj, troveblaj en la samaj vortaroj, havas plejparte nur kultureŭropan karakteron.

§ 3. En antaŭa § ni vidis ke Esperanto prezentas plejparte eŭropan kulturon. Ankaŭ ĝia «sankta libro», la Fundamento, estas verkita naciilingve, nur por francoj, angloj, germanoj, rusoj, poloj. Nun, kiam en Esperanta movado partoprenas ankaŭ italoj, hispanoj, finnoj, estonoj, latvoj, lietuvoj, maĝaroj, ĉeĥoj, horvatoj, bulgaroj, serboj, kc. eŭropanoj, la limigita nacieco de la Fundamento prezentas baron al la lingva unueco. Tiu baro, kun la kreskanta ekstereŭropa tutmondeco de Esperanto, ĉiam pliiĝas. Post la 1909-10, kiam aperis Esperanto-Esperantaj vortaroj de Boirac kaj de Kabe, jam neniuj dubas pri tio, ke sole la internacia Fundamento, t. e. nuresperante verkita, povas servi kiel vera lingva bazo egala por ĉiuj nacioj kaj gentoj. Eĉ por la nomitaj kvin nacioj la nuna Fundamento ne estas egala

bazo, ĉar ekzistas gravaj diferencoj inter la naciaj tradukoj de l' samaj Esperantaj radikoj. Ĉar, pro la naturo mem de la naciaj lingvoj, ne estas eble ĝuste traduki vortojn de unu nacio per vortoj de la alia, tial ĉiu provo difini Esperantan radikaron per samtempa plurnacia radikaro estas antaŭe kondamnita al malsukceso.

Male, se estonta, internacie verkita, Fundamento enhavos erarojn aŭ malklaraĵojn, pro tio ne suferos la unueco de Esperanto, ĉar tiuj eraroj kaj malklaraĵoj ekzistos egalaj por ĉiuj nacioj. En ekstrema okazo estus preferinda uzo de unu nacia lingvo, ol de la pluraj inter si neniel akordeblaj. En la estonta Fundamento povus esti larĝe uzataj la bildoj, desegnoj, teknikaj signoj, formuloj, kaj la latinscienca terminaro, altgrade preciza kaj unuforma.

§ 4. Aŭtonomeco por Esperanto signifas la sendependan ekziston super la naciaj lingvoj, ne la konkuradon kontraŭ ili en pure naciaj medioj. Nia lingvo celas esti amika helpanto de ĉiuj nacioj kaj gentoj, sed ne la malamiko. La homaro fariĝus mizera, se anstataŭ multekolora naciaro ĝi estus unuforma landanaro, ĉar diversaj naciaj kulturoj kaj psikoj malfermas diversajn pordojn por la spiritoj, prezentas malsamajn vojojn por la intelektoj.

§ 5. Tendenco al la plifacilaĵoj en nia lingvo, laŭ la ĝisnuna kreskado, montris sin en tri direktoj. Unue, oni penas anstataŭigi tro longajn vortojn per la mallongaĵoj (varo, nano, foto, kino, aŭto, kado, dro, sro, UEA, LK, CK, KR, Eo, Ea, Eisto, ktp.). Poste, oni ŝatas regulajn formojn pli ol la neregulajn (finaĵo, virhundo, jarcento, gimnasto, mekanisto, restorejo, observejo, aliu, kelkiu,...). Tria, oni preferas pli simplajn kunmetaĵojn (belo, libero, virgino, limita, kolorita, ree, ene, iĝi, ema, ano, ismo,...). Nuntempe iu japano aŭ ĉino bezonas 2 jarojn por ellerni Esperanton, kaj 10 jarojn por ellerni la francan, anglan aŭ germanan.

§ 6. Kiel ĉiu nacia lingvo, tiel ankaŭ Esperanto prezentas variojn de la sonoj, individuajn kaj lokajn, kiuj tamen ne malhelpas la buŝan interkomprenon, ĉar ili ete diferencas de la meza elparolo. Konata franca lingvisto, s-ro Meillet, ie skribis, ke ne ekzistas en Parizo du denaskaj parizanoj kiuj tute egale elparolas sian hejman langaĵon. Des pli estas pardoneblaj la malsamaĵoj en la buŝoj de diversnaciaj esperantistoj. La tradicia meza elparolo de Esperanto originas de la lingvaŭtoro mem, kaj nun ĝi estas senrompe disvastata, kaj gardata per la persona tradicio. Ĝi krome estis plurfoje fiksita sur gramofondiskoj, kaj fonetike difinita en la naciaj lernolibroj. Fine, post la milito, la radiotelefono multe kontribuas al la tutmonda unuformiĝo de la modela elparolo.

En Esperanto ekzistas 28 normaj sonoj, al kiuj aldoniĝas la aliaj, tro multaj kaj delikataj por ke oni ilin ĉiujn registru. El ili nur la ĉefaj estas ĉi tie notindaj: 5 nazaj vokaloj, palata n, 2 konsonantaj j, ŭ, kaj okluziva dz. Ekzistas do entute 37 ĉefaj sonoj.

La konsonantoj estas: 10 okluzivaj, 10 frikativaj, 3 razaj, 2 likvaj. La okluzivaj estas:

k	p	t	c	ĉ
g	b	d	dz	ĝ

Oni nomas ilin ankaŭ alimaniere: kg malantaŭlangaj, pb dulipaj, t d dentolangaj, la ceteraj kvar - siblaj, aŭ kunmetitaj (ts dz tŝ dĵ). La frikativaj estas:

f	ĥ	j	s	ŝ
v	h	ŭ	z	ĵ

Oni nomas ilin ankaŭ alimaniere: fv lipodentaj, szŝj antaŭlangaj, ĥ malantaŭlanga, h laringa, ĵ mezlanga, ŭ dulipa. La nazaj estas:

m	n	nj
---	---	----

m dulipa, n dentolanga, nj palata aŭ mola. La lasta ekzistas en la franca (gn), portugala (rh), en la hispana, pola, ĉeĥa (n supersignita), en la rusa, serba, ĥorvata, k. a. La likvaj estas:

l	r
---	---

l flanka-antaŭlanga, r rula antaŭlanga. Kartava r, simila je ĥ, ne havas en Esperanto memstaran rolon, estante nur individua vario de rula r.

La vokaloj estas 5 normalaj kaj 5 nazaj. La normalaj, orditaj laŭ la tonalto, estas:

u	o	a	e	i
---	---	---	---	---

La nazaj aŭdeblas en jenaj ekzemplaj vortoj:

fungo	longo	rango	venĝo	ringo
-------	-------	-------	-------	-------

kie un-on-an-en-in signas la nazajn vokalojn. Normalaj vokaloj sonas same kiel en la itala, serba, ĥorvata. La nazaj estas parte konataj en la franca, pola, ĉina, manĝura, rusa, macedoslava, k. a.

La duonvokalaj j, ŭ, ekzemplas en vortoj: *kaj, ajn, laŭ, aŭdo*. La samaj literoj, starante en la komenco, signas la konsonantojn, ekz. *ja, je, juna, ŭo, ŭato*.

Alisonado estas fiziologie natura fenomeno, kiu konsistas en aliĝo de la sonoj pro reciproka influo. Ekz. n sonas normale en vorto *melono*, ĝi naze sonas en vortoj *melonkampo, melongusto, melonĉapelo*. K normale sonas en *ekaŭdi*, ĝi sonas kiel g en *ekbati*. N sonas normale en *pano*, kaj palate en *panjo*. Kaŭzo del alisonado kuŝas en interadaptiĝo de la sonoj, kiuj en flua parolo formas unu tuton. Por kuufandiĝi la sonoj ofte bezonas iom ŝanĝi sian nuancon, iufoje eĉ multe aliĝi; tiel aperas la alisonado.

La lingvaŭtoro konis la alisonadon, kaj menciis ĝin ne nomante per speciala termino. «Kiel en ĉiuj lingvoj, tiel ankaŭ en Esperanto la sono j ordinare moligas la konsonanton, kiu staras antaŭ ĝi; oni sekve ne devas miri, ke ekzemple en la vorto *panjo* la plimulto de la esperantistoj elparolas la nj kiel unu molan sonon (simile al la franca gn). Tiel same oni ne miru, ke en praktiko oni ordinare antaŭ g aŭ k elparolas la sonon n naze.. (Zamenhof en Of. Gaz. 1911, p. 222).

La alisonado analogas je la kolora interinfluo, konata en optiko kaj pentrarto. Ekzemple la blanka makulo, metita apud la verda, ŝajnas esti bluroza aŭ lila. En in pentraĵo la koloraj formoj prezentas unu harmonian tuton kaj ŝajnas nuancitaj alispece ol kiam ili estas rigardataj izole. Alia ekzemplo: en rapida maneskribado oni nevole kaj devige ŝanĝas la modelajn formojn de la izolaj literoj, kiam ili estas ligataj laŭvice por konstitui la tutajn vortojn.

La alisonado aperas kiam surda konsonanto antaŭas la sonorajn, aŭ la sonora antaŭas la surdan.

En suba tableto sub ĉiu sonora konsonanto staras ĝia surda korespondanto.

b	dz	d	v	g	h	ĵ	z	ĝ	sonoraj
p	c	t	f	k	ĥ	ŝ	s	ĉ	surdataj

Sonora konsonanto povas ligiĝi nur kun la sonora, surda konsonanto kun la surda. En malaj okazoj aperas alisonado tiamaniere ke la antaŭa konsonanto adaptiĝas al la sekvonta: *kapdoloro* (bd), *ladkesto* (tk), *lavtuko* (ft), *disdoni* (zd), k. s.

P. STOJAN L. K.

(daŭrigota)

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Al Fraŭlino Caterina Montaner

Reĝino de la Internaciaj Floraj Ludoj
en Palma de Mallorca

Se vi estis Reĝin' «de unu tago»
ĉe l' Floraj Ludoj prezidante nin,
vi tamen ĉiam restas en l' imago
de ĉiuj kun admir' vidintaj vin.

Via figuro sub la verda flago,
dum la solena fest', brilos sen fin'
por tiuj kiuj kisis -- dolĉa ago --
viajn manojn majestajn de reĝin'.

Ne mortos la memor' pri tiu festo
kie hele radiis en kunesto
poezio kaj am' : eterna bel'.

Ke de tiuj momentoj l' emocio
eterniĝu ĉe vi, kaj Poezio
ĉiam brilu por vi kun sama hel' !

JAUME GRAU CASAS



XIII.^a Kongreso de K. E. F.

Santa Coloma de Farnés 23-25 Majo 1926.^a

XII^{aj} Floraj Ludoj

LISTO DE VERKOJ RICEVITAJ

(fino)

136. Qu'ien am la plus de bon aire, del mon mais que nulla re... — 137. Ne eble. — 138. La verko de l' majstro. — 139. Elefanto. — 140. Unueco donas forton. —

Sóller, Vendrell, Rubí, Sabadell, Lleyda, Mataró...? Kiu urbo en nia lando atingos la gloron esti la scenejo de la Floraj Ludoj kaj Kongreso de K. E. F. en 1927? Samideanoj kiuj amas sian urbon kaj Esperanton pretiĝu por peto kaj akcepto de niaj solenaĵoj en 1927.

Tri novaj aferoj estas nepre priraktotaj en nia proksima Kongreso en Santa Coloma: 1a Ja reguligo de Institucio por Floraj Ludoj, kiuj atingis en Esperantujo tian gravecon, ke ili decas konsisti regulan Institucion. 2a, Oficialigo de Eldona Komitato por servado pri, por kaj per Esperanto en la Radio- Stacioj de nia teritorio. — La florldandoj, la verkistoj kaj la radiamataroj de nia Federacio estas petataj pretigi por orientigo kaj organizo de tiuj tri gravaj aferoj.

La granda Poeto Joan Alcover

Nia Majstro el Majorko por la katalunlingva elegio. Li ordinare loĝis kaj profesie laboris plej honeste en sia kaj nia kara Baleara Insulo de Romon Llull kaj grandaj poetoj, — mortis korpe antaŭ kelkaj semajnoj, kaj eniris en la senmortecon por la kataluna literaturo. Jen biografiaj notoj el nia «Kataluna Antologio»:

Joan Alcover naskiĝis en Palma de Mallorca (Balearaj Insuloj). Li studis Jurosciencon en la Barcelona Universitato. Poste li reiris en sian urbon, kie li agis kiel advokato kaj deputito Provinca kaj Parlamenta. Malfrue li aperis en la kataluna poezio, sed baldaŭ lia nomo fariĝis tre konata. Nun li estas akceptata de ĉiuj kiel unu el la plej bonaj katalunaj poetoj. Li havas klasikan guston kaj produktis kelkajn perfektajn juvelojn. Li verkis ankaŭ tre interesajn literaturajn studojn.



Pro... kaj Por...

Tutmonda Literaturo, la por Esperanto granda entrepreno de la firmo Mosse en Berlin, estas definitiva kaj sukcesa. Pli ol mil abonintoj jam pagis. Baldaŭ aperos la unua volumo. Niaj amikoj ne forgesu aboni. Abonilojn kaj priskribon petu: «Tutmonda Literaturo» — Dro. Ernest Kliemke, Firmao Mosse, Schützenstr, 24 Berlin S. W. 68. Germanujo.

Tre grava por la Esperanto-movado estas la kunlaboro de *fak-entnultuloj*! Tia altranga eminentulo estas en Wien la landlerneja inspektoro Hofrat D-ro *Franz Wollmann*, la direktoro de la ŝtata Esperanto-ekzamena komisiono. Per la ekfunkciado de tiu ĉi komisiono estas ankaŭ vekita la intereso de la mezlernejaj profesoroj. Pro tio la ĉefredaktoro de la fakgazeto "Der Mittelschullehrer" (organo de la „deviga unuiĝo de la aŭstria mezlernejaj instruistoj") ricevis multajn demandojn de mezlernejaj profesoroj kaj petis s-ron D-ron Wollmann, ke li skribu artikolon. D-ro Wollmann plenumis la peton kaj skribis longan kaj bonegan artikolon por la nomita fakgazeto. Tiu propagandlaboro de la plej altranga landlerneja inspektoro de Wien, kiu estas aktiva profesoro kaj landlerneja inspektoro por *modernaj* lingvoj, tre utilas al la Esperanto-movado, multe pli ol sennombraj paŝoj de privataj personoj. Ankoraŭ pli! Tiu ĉi landlerneja inspektoro eĉ mem gvidas Esperanto-kurson por instruistoj (preskaŭ 60 geinstruistoj)!—André Baudet, nia eminenta franca samideano, Vicprezidanto de la Komerca Ĉambro en Paris, mirige rimarkigas ankaŭ kiel paca batalanto por nia afero: en la grava «Index des Industries du cuir» (54 rue de Bondy, Paris) aperis granda artikolo de li subskribita pri Esperanto, kaj resumoj aŭ klarigoj en nia internacia lingvo. — D-ro. R. Torres i Carreres, nia eminenta kataluna radiologiisto aperigis sciencan gravan artikolon kun resume en Esperanto en la «Revista de Diagnóstico» (Dro. Josep Cusi, Rambla Catalunya, 29, Barcelona), kaj aldonigis noton kun deklaro ke ĉar esperanto estas praktika kaj neŭtrale internacia lingvo, de nun li nur verkos pri scienco en kataluna lingvo kaj en esperanto. — Jen efika agado, jen efektiva progreso de Esperanto en sciencaj rondoj.

La Barcelona Muzikeldonejo «Iberia Musical» eldonis du kanzonojn por kanto kaj piano, de la kataluna komponisto Armand Fluvià, kun la originalaj vortoj de la kataluna poeto Josep Maria Lòpez-Picó kaj esperanta traduko de Jaume Grau Casas.

La kanzono «Tinc enveja del mati» (Mi envias je l' maten') kostas 2 pesetojn; la kanzono «Vostre riure» (Via rido) kostas 1'50 pesetojn.

La konata muzikeldonejo intencas eldoni ankoraŭ pli da katalunaj kantoj kun esperanta traduko, dank' al la influo de nia samideanino F-ino Palmira Castellví, muzika instruistino kaj ĉarma kantantino.

Radio-statistiko. — Por certigi akuratan statistikon ni tre petas, ke tiuj samideanoj, kiuj ankoraŭ ne resendis nian demandaron, bonvolu tion fari tuj por ne malhelpi la bonan funkcion de nia laboro. — *Dokumentoj pri Esperanto.* — Por ebligi kompilon de taŭga propaganda materialo ni petas informi nin pri ĉiuj oficialaj rekonaj, dekretoj, rekomendoj, subtenoj de Esperanto en kiu ajn sfero kaj havigi al ni ĉiujfoje la originaltekston (en la koncerna lingvo) kun ĉiuj referencoj, mencioj ktp. kun akurata traduko en Esperanto. Tiu peto direktigas ĉefe al tiuj samideanoj, kiuj sin okupis pri la koncerna afero kaj ne rilatis kun ni. Ni samtempe ripetas la peton informi

pri tiaj delatoj la respektivan landan societon kaj la fakorganizon, se temas pri aparta fakafero. — *Rondvojaĝo de s-ro Ĉe, sekr. de I. C. K.* — Laŭ lia peto, ICK konsentis al s-ro Ĉe libremtempon de tri monatoj kun kora danko por lia sukcesa, sed laciga vojaĝado. Novaj vojaĝoj estas projektitaj por printempo kaj aŭtuno venontaj. Interesatoj bonvolu jam nun interrilati kun siaj asocioj, federacioj, ligoj kaj karteloj por starigo de provizora plano. — *Gazeta statistiko.* — La gazetarajn servojn en la diversaj landoj ni petas afable sendi al ni siajn monatajn ciferojn por ebligi korektan statistikon. Anoj de landoj sen gazetara servo bonvolu daŭrigi la sendon de eltranĉaĵoj al nia adreso. Por ŝpari sendkostojn ni ne konfirmas ilian alvenon.

Ĝis finigo de tiu statistiko alvenis por monato januaro artikoloj en la sekvantaj lingvoj: angla 27, franca 25, germana 14, hispana 2, hungara 14, itala 6, kataluna 3, kroata 1, litova 1, latva 3, pola 3, rumana 1, rusa 1, sveda 2. — *Korespondantoj.* — Kun plezuro ni ricevos adresojn aŭ aliĝojn de samideanoj, kiuj per jara pago de 100 sv. fk. deziras fariĝi korespondantoj de nia komitato. — *ROB. KREUZ.* Ĝen. Sekr. de Internacia Centra Komitato: 12 Bd. du Théâtre. — Genève (Suisse).

Pro la nova organizo de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (T. E. K. A.) kaj pro la plibonigo de la Internacia Medicina Revuo; Doktoro Bartomeu, el Barcelono (Tallers, 11. Apoteko) kiu estas ĝia reprezentanto por Hispanujo, nun ricevas multajn aliĝilojn el diversaj hispanaj urboj sed estas citinda tiu de S-ro. J. G. Armendaritz-ĉefdirektoro de la veterinaraj servoj de la sanstato je Madrido ĉar li estas tute kuraĝa kaj fervora al Esperanto, kiel ankaŭ D-ro. Gómez Aguado (Córdoba) direktoro de la revuo «Por la Infancia».

Grava Esperanto-festo ĉe «Radio Barcelona» (325 m.). — Okazos la 7an de aprilo, nokte, de 9 ĝis 11 h. — Paroladoj, i. a. de D-ro. Bartomeu kaj profesoro S-ro. Domènech. Deklamo de zorge elektitaj poeziaĵoj. Eminentaj kantistino samideanino Palmira Castellví, regalaos nin per belaj kantoj esperantaj. Disaŭdigo de gramofon-cilindroj per kiuj emocie, oni aŭdos niajn neforgeseblajn Zamenhof, Bourlet, kaj aliajn. Ankaŭ oni ludos belan muzikaĵojn. Radio-esperantistoj! Samideanoj el tutmondo! Aŭskultu, kaj sendu gratulan poŝtkarton al: Radio Barcelona, Casp, 12, primer. Barcelona.

Nekrologo

Nia estimata samideano Jacint Comella en Vich, havis la malfeliĉon senhaviĝi de sia bopatrino Teresa Molas i Castells. Bonvolu nia kara amiko kaj lia edzino akcepti la sinceran esprimon de nia kondolenco pro tiu dolora fakto.

Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitaĵn)

ORGANIZA STATUTARO. — Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, Genève, 12 Boulevard, du Théâtre. 1925. 31 paĝoj, 17 × 12. Sen-paga por la Naciaj Societoj.

Ĝi enhavas: I. Kontrakto de Helsinki. 11, Regularo de la Kongresoj. 111. Regularo de K. R. IV. Statuto de U. E. A.

Kiu interesiĝas pri la organiza demando, legu tiun ĉi libreton.

INFORMILO POR JUNAJ ESPERANTISTOJ. — 48 paĝa broŝureto, 12½ × 9. Eldonis Esperantista Junularo, A. Neupert, Leipzig-Möckern, Wedellstrasse 17. (Germanujo). Prezo: 1 respondkupon.

Regularo de Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara, notoj pri ĝia historio kaj organizo, fundamenta gramatiko de Esperanto kaj aliaj interesaj detaloj pri la esperanto-organizo.

DEKSEPA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. — (Genève, 2-7 aŭgusto 1925) Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado: 12 Boulevard du Théâtre. Genève 1925. 48 paĝoj, 25 × 16½. Prezo: 1'25 sv. fr.

Protokolo, Financa Raporto, Statistikoj kaj Raporto de la oficialaj institucioj al la XVII Universala Kongreso de Esperanto.

Tre interesa volumeto, lerte redaktita kaj zorge presita. Ĉiu esperantisto akiru tiun dokumentaron por bone konatiĝi kun la disvolvigado de niaj oficialaj institucioj kaj por ĝuste informiĝi pri la progreso de nia tutmonda organizo.

R. U. R. ROSSUM'S UNIVERSAL ROBOTS de Karel Čapek. Kolektiva dramo je enkonduka komedio kaj tri aktoj. Esperantigita el ĉeĥa lingvo kaj eldonita de Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1926. 190 paĝoj, 21 × 15. Mendebila ĉe Ant. Kudela, Olomouc, Novosady. Prezo: 2 sv. fr.

Scienco kaj tekniko sukcesis krei robotojn, t. e. artefaritajn homojn, kies vivo povas daŭri 20 jarojn proksimume. La uzino fabrikas milojn da robotoj. Roboto ne sentas amon, ĝi estas simple maŝino. Fine robotoj ribelas kaj deklaras la homon malamiko kaj senrajtulo en la universo. La ribelo sukcesas kaj la homaro pereas sed, jen la grava problemo, la manuskripto de Rossum estis forbruligita kaj nepre la robota raso pereos post kelkaj jaroj; ili ne kapablas fabrikis robotojn. Feliĉe, unu el la doktoroj en la uzino en siaj eksperimentoj fabrikis robotojn kun ĉiuj sentoj. Tiuj ĉi rekreos la homaron; roboto kaj robotino en lasta akto eksentas la ekfloron de amo, kiu savos la homaron de neevitebla pere.

La aŭtoro de la utopiaĵo pravas sian lertecon per la viveco, kiun li donas al ĉiu rolulo. Diversfoje li sukcesas reteni la atenton de la publiko en duonekstaza stato.

Se oni prezentus la dramon al nia kataluna publiko, ŝajnas al mi, ke ĝi ne trovus grandan sukceson. La utopio estas tiel granda, ke ŝajne la belaj ideoj kaj pensoj montrataj de Helena estus ne atentataj. Oni vidus nur la fantazian flankon.

Bele presita, ĝuste tradukita, la nova akiro estas de ĉiu flanko laŭdinda. Eble kelkaj neologismoj estus forigindaj. «Morta» anstataŭ «mortinta» estas diversfoje uzata. — SALJO.

Esperanto, lingvo de Radio

Ĉiuj niaj legantoj certe konscias pri la graveco de la nuna propagando de Esperanto ĉe radiistoj. Necese estas, ke ni esperantistigu multajn radiistojn kaj, por tio, ke ni igu por ili Esperanton utila. Ankaŭ, ni devas radiistigi kiel eble plej multajn Esperantistojn, montrante al ili, kiel facile kaj interese estas konstrui mem radio-ricevilon, por ke multaj el niaj samideanoj aŭskultu la sendojn de la radio-stacioj kaj povu instigi ilin al uzado de Esperanto aŭ gratuli ilin pro ĝia uzado.

Tial ni kun ĝojo salutas la aperon de la unua numero de «*Internacia Radio Revuo*», monata organo de «*Internacia Radio-Asocio*». Dank' al ĝi Esperanto utilos ne nur al nunaj Esperantistoj, kiuj trovos en ĝi ĉiajn konsilojn necesajn, por konstrui mem malkare radio-aparatojn, sed ankaŭ al radiistoj ankoraŭ ne esperantistoj, kiuj legos en ĝi internaciajn informojn alie ne haveblajn, se nur ili konsentos dediĉi tre malgrandan penon al ioma lernado de Esperanto.

«*Internacia Radio Revuo*» ja celas kontentigi jenajn kategoriojn de legantoj:

1-e Esperantistojn, kiuj interesiĝas pri Radio, pri uzado de Esperanto en Radio, kiuj volas propagandi Esperanton inter radiistoj aŭ deziras fariĝi radio-amatoroj;

2-e Komencantajn radio-amatorojn, bezonantajn sisteman gvidadon en ilia laboro, emajn ekkoni la teorion, la «misterojn» de Radio, solvi multajn dubindajn problemojn, kiujn ili renkontas dum sia laboro;

3-e Spertajn radio-amatorojn, kiuj volas trovi la kronikon de la tutmonda radio-movado, analizojn de plej interesaj artikoloj el la tutmonda radio-literaturo, lastajn novaĵojn kaj inventojn.

La unua numero entenas interalie originalan artikolon pri propagigo de la elektro-magnetaj ondoj, verkitan de nia fama malnova samideano, profesoro Mesny; konsilojn pri diversaj metodoj por instalado de antenoj; detalan priskribon de malmultekosta facile konstruebla ricevaparato; unuan artikolon el teoriaj babiladoj «Paŝo post paŝo»; humoran felietonon «Zoologia studo pri la radio-amatoro»; artikolojn de la ĉefredaktoro D-ro P. Corret, pri la propagando de Esperanto ĉe radiistoj kaj pri la Esperanta teknika radio-vortaro; detalan kronikon de la radiista kaj radi-esperantista movado, k. t. p. Bela kovrililo kaj multenombraj ilustraĵoj certe ne malplaĉos al la legantoj.

La unua numero estos *senpage* sendata al ĉiu esperantisto, kiu mendas ĝin de la eldonisto, sendante samtempe, por la sendelspezoj, unu internacian respondkuponon (por Francujo unu 30-centiman poŝtmarkon). Nepre mendu ĝin, ĉar dank' al ĝi vi povos tre malmultekoste konstrui vian propran aparaton.

La abonprezo por unu jaro estas nur duon-dolaro. Via esperantista devo estas aboni, por subteni la tiel gravan propagandon de Esperanto ĉe radiistoj, samtempe havigante al vi tre interesan kaj fruktodonan legaĵon.

La abonmendojn sendu laŭ adreso: «*Internacia Radio Revuo*», E. Chiron, eldonisto, 40, rue de Seine, Paris - 6.^e

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto», València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

Ĉu vi deziras aliĝi al “Universala Esperanto - Asocio”, “Kataluna Esperantista Federacio”, Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara”, aŭ aboni al “Esperanto”, “Kataluna Esperantisto”, “Literatura Mondo”, “Heroldo de Esperanto”, kaj “Esperantista Junularo?” Petu tuj detalojn al Ferdinando Montserrat, str. Villarroel, 107, 2. - 2.^a, Barcelona. — Ankaŭ li peros pri ĉiuj esperantaj libroj naciaj kaj fremdaj, steloj k. t. p.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO
per poŝtmarkoj, ni sendas sortimenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA

KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfí Dalmau, Jaume Herp

Justificació de l'Esperanto

A mesura que el temps va assenyalant nous progressos del pensament de l'home, es fa més evident la necessitat d'un mitjà de comunicació verbal que doni als humans la facilitat d'entendre's reciprocament, sense minvar cap dret que, el renunciar-hi, constitueix una humiliació i a l'ensem representa la força del fort damunt del feble.

Tots els pobles tenen el mateix dret de respecte i tots els pobles tenen l'obligació de respectar la parla dels altres, i mentre no sigui acomplert aquest principi natural romandrem en un estat neguitós que com a conseqüència immediata portarà el reviscolament d'odis i menyspreus.

Es en aquest aspecte que l'esperanto té una importància molt gran: davant les imposicions lingüístiques que el vencedor vol fer acceptar al vençut, l'esperanto ha d'ésser el mitjà conciliador que sense ferir cap sentiment pugui ésser usat en les relacions dels que naturalment tenen una parla diferent.

No volem dir pas en fer aquestes manifestacions que sempre hàgim de patir les maleïdes guerres, no, però el fet que arreu del món es manifesti cada dia més amenaçadora la diferència de parles, ens autoritza a assenyalar el perill i també a indicar el mitjà d'una solució justa, sense caure en cap abjecció ni villipendi.

Tots els que lluitem pel triomf de l'esperanto tenim el convenciment que defensem un ideal noble, que tots els esforços que hi esmercem s'ajunten amb tots aquells altres que tants d'homes de tots els països, per diferents viaranyes però amb el mateix fi, treballen per atènyer una humanitat més justa, més racional, més enlairada.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (ĉ), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), ĵ (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al

femení

heroino, reĝino
katino, leonino

O

*terminació
substantiu*

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

*terminació
adjectiu*

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

*terminació verb
(infinitiu)*

kompreni
labori
komer-ci
(comerciar)

E

*terminació
adverbial*

klare
konstante
komer-ce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

*mode condi-
cional*

U

*mode impera-
tiu o subjunc-
tiu*

Mi skribas
Jo escrib

skribis
escrivi

skribos
escriuró

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escrib la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

Pri nia Kongreso

Santa Coloma de Farnés post malmultaj semajnoj — 23-25 majo — akceptos la batalantojn de la paca idealo okaze de la XIII Kongreso de nia Federacio kaj XII Internaciaj Floraj Ludoj. Santa Coloma, ĉarma urbeto, ne havas multajn esperantistojn sed feliĉe ilia fervoro kompensas kontentige la mankon de la nombro.

La katalunaj esperantistoj nepre devas atenti la proksimiĝon de niaj Festoj kaj ne forgesi alvojaĝi la kongreslokon ĝustatempe. La entuziasmo de niaj federacianoj kaj ceteraj samideanoj partoprenontaj la Festojn certe sukcesos akceli la progreson de Esperanto en Santa Coloma kaj apudaj vilaĝoj.

Oni pripensu, ke apud la flankoj amuza, instrua, organiza de niaj Kongresoj ni havas tiun gravan de la propagando. Al tiu ĉi aspekto oni turnu la rigardon kaj vidu kiel belan okazon donas ĉiu kongreso por diskonigi la celon kaj tutmondan disvolvigaĉon de nia movado. Ne nur al amikaj rondoj ni povas turni nin tiuokaze, sed ankaŭ pere de la gazetaro al la tuta publiko. La fakto ke 140 verkoj venis por la Floraj Ludoj, valoras pli ol multaj argumentoj: ĝi nerefuteble pravas, ke la internacia lingvo vivas, progresas, konstante iras sian vojon.

Ni alvokas ĉiujn samideanojn al la batalo. Ĉiuj gazetoj kaj ĵurnaloj parolu pri la veraj sukcesoj de Esperanto okaze de nia baldaŭa Kongreso. Ni ja ne bezonas la falsajn argumentojn de iu fuŝisto, kiu en nia lando ekpredikas la ŝajnan superecon de iu mortinta reformajo.

Samideanoj, starigu por la batalo!!!

Pri Kataluna Antologio

Mi ĵus legis sur flugfolio pri la irlanda lingvo, tiujn profundajn pensojn, «Nacioj, simile al homoj, havas korpojn kaj animojn, kaj en ambaŭ, la animo estas la altvalora, senegala parto. Kiam ili apartiĝas, la korpo de la individuo pereas. Sed kontraŭe, kiam la korpo kaj animo de nacio disiĝas nerevokeble, estas la animo kiu mortas — La vivo de la morta parto de homo, nome de la korpo, centriĝas en la koro, kaj kiam la koro ĉesas pulsadi, la surtera laboro de la homo finiĝas kaj li estas mortinta. La animo de nacio, kiu estas la pereebla parto de ĝia komplikita strukturo, troviĝas en ĝia lingvo, kaj kiam la lingvo malaperas, tiu nacio estas mortinta».

La mezo de la 19.^a jarcento estis rimarkinda pro la reviviĝo de nacioj ŝajne malfortaj kaj eĉ mortontaj. Nun ili staras kun renovigita forto, pro la sindonemo kaj naciismo de siaj poetoj kaj verkistoj. Inter ili troviĝas Katalunujo.

Usona verkisto, Ralph W. Emerson, diris, «Ligu vian veturilon al stelo». Sola inter la «malgrandaj nacioj», Katalunujo tion faris, ligante sian nacian lingvon al la nove aperinta stelo, Esperanto. Nun per Esperanto, la cetera mondo havas la okazon konatigi kun la literaturo, antikva kaj moderna, de katalunaj verkistoj.

Laŭ mia opinio, Kataluna Antologio estas la plej grava Esperanta libro ĝis nun eldonita; ĉar ĝi malfermas vojon al la kulturo de fremda lando. La enhavo estas miriga, la arango bonega, la lingvaĵo simpla kaj facila sed esprimplena kaj fundamenta. Speciale laŭdindaj estas la skizo pri kataluna lingvo, la biografiaj notoj, kaj la bonstilo de la diversaj tradukaĵoj. La Antologio estas bela florbedo en la Esperanta ĝardeno.

Inter tiom da belajoj estas preskaŭ neeble distingi, sed el la poemoj multe plaĉis al mi, «Plaĉa Marbordo», kies ritmo rememorigis al mi la ondiritmon de la maro, «Granda Arbo» veroplena bildo, kaj «Popola», ĉarma balado.

La antikva poemo «Desert d'Amics», de Sant Jordi, similas al malnova irlanda poemo, «Slán le Maig». El similaj suferoj naskiĝas similaj sentoj. El la rakontoj, kiujn mi elektos inter tia riĉamaso?

«La Studento» de Rossinjo estis ja kortuŝanta, sed certe, «Antaŭtatiĝo» kaj «Rezignacio» estas geniaj verkoj, tiel simpatie verkitaj kaj tradukitaj, ke oni povas vidi la geaktorojn kvazaŭ sur kinema filmo.

Konstatinte ke la du lastnomataj estas verkoj de virino, mi estis tre kontenta, ĉar unuavide mi pensis, ke nur viraj nomoj estis en tiu granda aro. Oni tamen ne povas imagi, ke nacio povus sukcese barakti por sia antaŭeniro se virinoj ne partoprenis. La poetoj kaj prozistoj sendube ricevis impreson kaj instigon de siaj patrinoj sed estas malfacile por virinoj mem preni la plumon kaj esprimi la pensojn; ili devas mastrumadi, zorgi infanojn, plenumi la sennombrajn taskojn ĉiutage alvenantajn, kaj samtempe fortigi la animojn de la edzoj kaj filoj. Ju pli do, mi ĝojis vidante nomojn de du virinoj en ĉi tiu rimarkinda verko.

Fine, ĉi tiu pionira libro montras ne nur la entuziasmon, sed la persistemon kaj paciencon de niaj katalunaj samideanoj, kaj precipe de Sro. Jaume Graŭ, kaj mi esperas ke ĝi instigos la aliajn «malgrandajn naciojn» al simila laŭdinda agado.

EMMA L. OSMOND.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

Pro Amo

Provinca urbeto. La de ĉiuj estimata fabrikanto, estro de multaj bonfaraĵaj societoj, viro, kies poŝo estis ĉiam malfermita al progresemaĵ sed malriĉaj junuloj, festis la 70an datrevenon de sia naskiĝtago. La tuta urbeto, kies estro li ankaŭ estis, uzis la okazon por montri al li sian profundan dankemon kaj oni honoris lin per diversaj festoj kaj paroladoj. Publike kaj en la familiaj rondoj oni preparolis liajn bonfarojn kaj en la fortan simfonion laŭdantan ne intermiksiĝis eĉ unu falsa tono. Samaĝuloj de li rakontis al la pli junaj samurbanoj interesajn kaj ofte tre humorajn epizodojn el lia vivo kaj la instruistoj montris eĉ en la lernejo al la infanoj lian vivon kiel vivon modelan. Tamen neniu sciis pri lia deveno. Li venis en la urbeton kiel fremdulo.

Por la vespero de la honortago li invitis la plej intimajn geamikojn de de sia domo, por esti kelkajn horojn en agrabla societo. Post la vespermanĝo iris tuta societo en la kamenĉambron, kie brulis en malferma kameno grandaj lignopecoj varmigante kaj samtempe lumigante la ĉambron. Li amis ĉi tiun duonlumon. La gastoj sidiĝis ĉirkaŭ la fajro sur malaltajn apogseĝojn. La konscio, ke ekstere estas malseka malvarmo — estis aŭtuno! — faris la ĉambran varmon duoble agrabla. La stranga duonlumo de la ĉambro mallaŭtigis iom la gajecon kaj seriozigis la pensojn de la societo; ĝi farigis iom pensema. Tial oni unuanime akceptis la proponon de la sinjoro doktoro, urba kuracisto, ke ĉiu rakontu sian plej mirindan travivaĵon.

Jus finis s-ro lernejestro sian rakonton. Ĉiuj jam estis rakontintaj, nur la mastro mem, la fabrikanto, ĝis nun silentis. Li estis per siaj propraj pensoj tiel okupita, ke li eĉ nerimarkis, ke ĉiuj ĉeestantoj lin rigardas kvazaŭ petante lian rakonton. Nur post kelka tempo lin vekis la ĝenerala silento el lia sonĝo — liaj pensoj vagadis en jam longe pasintaj tempoj — kaj preskaŭ perforte li deŝiriĝis de siaj agrablaj fantaziaĵoj.

«A jes, nun estas la vico je mi». Liaj okuloj denove ekrigardis tiel strange, kvazaŭ li rigardus scenejon de teatro sed senfine malproksiman. Malrapide li komencis.

«Mi estis ankoraŭ juna homo. Neniam mi estis timema, ĉar mia bona panjo estis prudenta virino kaj edukis min sen helpo de iu ajn timiga fantomo, kiel multaj patrinoj kutimas. Tamen mi eĉ paŝon ne faris sen revolvero enpoŝe kaj nakte ĝi kuŝis kompreneble sur la kesteto, el la lito facile atingebla. Ne estis timemo, sed sekuro kontraŭ eventualaĵoj.

Estis vintra vespero. La filino kaj la edzino jam de longe dormis. Mi multe laboris kaj fininte la laboron, mi enlitiĝis. Longe mi ne povis endormi, kvankam mi estis tre laca, ĉar miaj nervoj estis ekscititaj per la troa laboro. Mi provis kalkuli ĝis cent — ducent — certa rimedo por endormi. Mi kalkulis jam 132 kaj intermiksitis jam la nombrojn, signo, ke la dezirata dormo alproksimiĝas. Subite mi aŭdis palpadon ĉe la fenestro. Tuj estis denove miaj nervoj streĉitaj. La ĉambro estis malhela; nur la objektoj sta-

rantaj inter mi kaj la fenestro estis videblaj kiel nigraj siluetoj. Klare mi ekvidis kapon, kiu alproksimiĝis mairapide al la pordo de la najbara ĉambro. Kion fari? Ĉu krii? Ĉu pafi? Nepre mi volis indulgi mian edzinon dormanta en la apuda ĉambro; ŝi eble pro ektimo malsaniĝus. Mi ekstaris kaj alproksimiĝis mallaŭte kaj per mallaŭtigita sed tre ordona voĉo mi diris: «Silentul!» Mi forŝovis lin en mian laborĉambron. Tie mi ligis liajn manojn — li tute ne kontraŭstaris. Mi vestis min kaj sonorigis la serviston por venigi policiston. La servisto estis maljunulo kaj pro tio daŭris lia vestado eterne longe — dank'al Dio! Dume mi sidigis apud la tablo, kontraŭ mi sidis mia kaptito. Li estis ankoraŭ junulo, bonvestita kaj havis inteligentan vizaĝesprimon tute ne krimulan. Aĝrabla sento de venkinto plenigis mian koron.

«Nu, mia bela birdeto, por vi oni konstruis pli fortan kaĝon ol estas mia ĉambro kun malfermitaj fenestroj. Sed vi devas esti tre malofta ekzemplero — bonvestita. Des pli bone, vi plibeligos la societon de paseroj».

Nun li turnis al mi sian vizaĝon kaj mi ekvidis en ĉiu okulo — grandan larmon.

«Ho, ne moku, sinjoro», li diris per simpatia voĉo. «Ankaŭ mi havis patrinon, kiu min, estante bubeto, alten levis kaj kisis milfoje ĉiutage. Ankaŭ ĉe mia lulilo vidis neniu la malbonan feĥnon kaj mia vojo en la vivon ŝajnis esti ebenita — per la laboro de mia patro kaj per la amo de la panjo.

Kaj tamen...»

Min ekregis subite tia kompato kaj intereso por la junulo, ke mi ekstaris kaj malligis liajn manojn.

«Kaj nun rakontu sengene vian historion».

«Sinjoro, simpla estas mia historio. Miaj gepatroj estis honestaj sed malriĉaj. Mi studis, ricevis oficon kaj vivis kiel miaj gepatroj simple sed honore, ĝis mi enamiĝis. Enamiĝis en knabinon el tiu ĉi urbeto. Por esti pli proksime al ŝi, mi decidis ŝanĝi mian oficon. La hazardo estis al mi favora, ĉar vi serĉas oficiston sed kun granda kaŭcio. Ĉion mi havas, bonajn atestojn, sufiĉan sperton, sed monon, tiel multe da mono, kiom vi postulas, mi ne havas. Mi tre amas la knabinon, sed ĉar ŝi estas el domo riĉa, ŝi ne estas al mi atingebla. Tamen ŝi amas ankaŭ min. Estis mia sola kaj ununura penso: esti ĉe ŝi, vidi ŝin. Pro mia amo mi preskaŭ freneziĝis kaj malsaniĝis. Tial mi decidis peti vian oficon liberan. Sed de kiu prunti aŭ preni la necesan mongarantiaĵon? Tutajn horojn mi vagadis tra la urbo. «Mi bezonas monon; mi urĝe bezonas monon. Mi devas havi monon; mi nepre devas havi monon. Kiel havigi al si la monon? Kiel? Mi ankoraŭ ne scias. Sed mi havigos al mi la monon per ĉiu ajn rimedo mi havigos ĝin al mi». Ĉi tiun ideeton mi senĉese ripetis al mi. Miaj pensoj jam ne povis iri alian vojon, kiel radioj sur strato kun profundaj reloj. Kiel homo en deliro mi ĉiam ripetis la frazojn. La frazoj hipnotigis min. Ion alian mi ne povis pensi. Ĉion mi estus farinta, ĉion, se ĝi nur havigus al mi la necesan sumon. Hazarde mi legis pri granda ŝtelo en banko. Alta sumo estis la kaptaĵo de la rabis-

toj... ho, kaj dekono de tiu sumo sufiĉus por ricevi vian oficon! Ĝi ebligis al mi vidi ĉiam mian fianĉinon, sen kiu la vivo estus al mi senseca, sencela kaj unuforma. Mi pripensis: se ankaŭ mi...?! Mi ankoraŭ ne kuraĝis finpensi», Ŝtelisto! rabisto! krimulo!» estis la respondo de mia konscienco. Mi ektemis. La fivortoj malebriĝis min. Mi vidis la moralan profundecon en kiun mi falis. Sed la penso: «Se ankaŭ mi...» mi jam ne forlasis. Ĝi tenis min per fortaj ungegoj. Mi al ĝi al kutimiĝis eĉ tiel, ke post kelka tempo mi tute ne vidis la krimecon en tiu ago. «Mi ja poste povos iamaniere redoni la sumon kaj per fidela servo mi egalos la domaĝon», tiel mi trankviligis mian konsciencon. Mi estas konvinkita, ke mia fianĉino mem estus ŝtelinta la necesan sumon al sia riĉa patro, se mi estus al ŝi dirinta mian planon. Sed mi ne volis riski ŝian honoron. Tial mi riskis la mian kaj mi — perdis ĝin».

«Ankoraŭ ne» mi respondis. Mian komencan indignon anstataŭis profunda kompatemo. Lia rakonto min forte emociis. Mi ne estis kapabla detru ian vivon. Mi tuj decidis.

«Bone, mi donos al vi la oficon sen kaŭcio kondiĉe, ke vi kondutos vin unu jaron je mia kontento. En tiu okazo vi post unu jaro edziĝos kun via fianĉino. Ĉiujn malhelpaĵojn — se ili estos nur monaĵ — mi forigos. Kredu je mia vorto. Sed dum la tuta jaro vi ne parolos kun via fianĉino: estos pruvo por via kaj ŝia amo. Ĉu vi konsentas kun la kondiĉoj?»

Anstataŭ respondi li ekstaris, genuiĝis kaj kisis miajn manojn. — — —

La maljuna servisto frapis je la pordo. Mi starigis lin kaj diris: «Nu, morgaŭ je la oka». Al la servisto mi aldonis: «Malfermu al la sinjoro librotenisto la pordon»!

Kiel ŝtelisto li venis tra la fenestro en mian domon, kiel homo honora li ĝin tra la pordo forlasis.

Matene mi jam estis je la 7^a horo en mia laborĉambro kaj atendis lin. Mia nokta travivaĵo ŝajnis esti sonĝo kaj por certigi min pri ĝia realeco, mi demandis la serviston, je kia horo mi lin vokis. «Je la 1.^a».

Nun mi pripensis la tutan aferon. Ĉu mi ne agis iom naive? Preni lin kiel oficiston? Ha, kapro kiel ĝardenisto! Kio okazos, se li venos? Kaj li ne venos! Ne, li venos! Ĉu lia konduto estus nur komedio? Tiel mi meditis. Subite ekfrapis iu je la pordo.

«Mi petas»!

Jes, estis mia nokta gasto. Li prezentigis, petis je ofico, montris atesojn kaj kondutis tiel, kvazaŭ li ne estus min ankoraŭ vidinta. Lia konduto min iom surprizis, sed tamen ĝi plaĉis al mi.

Mi akceptis lin oficiale. Neniam mi tion bedaŭris, ĉar neniam mi ankoraŭ havis tiel fidelan kaj konscian oficiston. Sed kiu estas la fianĉino? Mi lasis lin observi tage kaj nokte. Sed li konis ŝajne nur du mondojn: mian oficejon kaj nokte lian ĉambron. Neniam li foriris en restauracion aŭ teatron. Li havis neniam amikon kaj la vesperojn li pasigis per legado. Neniam oni lin vidis en societo de iu ajn fraŭlino. Eĉ mian filinon, se ŝi venis en mian oficejon, li kvazaŭ ne rimarkis. Mi fariĝis scivolema.

10
110

Venis la jartago. Venis ankaŭ li en mian laborĉambron kaj dankis al mi por mia konfido.

«Vi estis brava, kaj pro tio mi forstrekos ĉion pasintan el mia memoro. Sed mi devas ankoraŭ plenumi mian promeson rilate vian fianĉinon. Kiu ŝi estas?»

«Via filino!»

Mi eksaltis de mia seĝo je surprizo.

«Kiu?»

«Via filino, sinjoro estro!»

Li diris la veron. Mia filino amis lin tiel freneze kiel li ŝin kaj post mallonga kontraŭstaro mi donis al li mian filinon kaj kiel doton la fabrikejon.

Ĉiuj ĉeestantoj ekrigardis la bofilon de la maljuna fabrikanto. Sed li ja neniam servis ĉe sia bopatro! — ?

Ridetante aldonis la maljuna fabrikanto:

«Pardonu geamikoj, ke mi iom interŝanĝis la rolojn. La fabrikanto bonulo estis mia bopatro kaj la junulo estis mi!

Jes, ĉiu havas sur sia pasinteco ian nigran makulon».

THEODOR KILIAN

Premiita en la XI Internaciaj Floraj Ludoj



La premio

Poeton — tre verŝajne pro kaprico —
Fortuno foje dotis kun gracio:

«Poet', ĉar fine venis via vico,
jen prenu por vi: gloro, monpremio!»

Li kuris al patrino pala eta...

Ŝi kiskaresis lin kun dolĉa ravo:

«Komuna estas ĝoj', sed fil' poeta,
la glor' kun mono restu via havo...»

«Sed, panjo kara, panjo, mi vin petas,

ne rompu filan ĝojon, per obstino!

La mono estu vial... Mi aĉetas
ŝuetojn varmajn por vi, ho patrino...»

Persvadis li kaj ŝi larmante cedis:

«Jes... varmajn ŝuojn por maljunulino...»

El tiu mon' ŝi ŝuojn ne aĉetis,
sed ŝia fil' — tombkrucon al patrino.

JULIO BAGHY

Menciita en la XI Internaciaj Floraj Ludoj

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

La vokala alisonado konsistas en tio ke la antaŭa vokalo tone altiĝas, se la lasta estas pli alta ol ĝi, kaj male. Alta vokalo povas ekzisti apud la alta, malalta vokalo apud la malalta. La duonvokaloj ankaŭ influas sammaniere. Ni supozu ekzemple ke en vorto *la* sonas la normala meza *a*; nu, tiam ni komparu la sonojn *a* en la vortoj: *aŭlo-ajlo-vilao-balai*. Ni tiam sentos diversajn tonojn de *a*. N kiu staras inter vokalo kaj posta konsonanto preskaŭ ĉiam kaŭzas la alisonadon tiamaniere ke la antaŭa vokalo iĝas naza, kaj la normala *n* malaperas. Ĝeneralmaniere, la alisonado estas kaŭzata de la sona harmonio, kiu postulas la interadaptigon de la konsistaj sonoj.

En malrapida posilaba elparolado oni povas eviti ĉian alisonadon, kaj tia elparolo estas teorie sola ĝusta, eĉ rekomendinda por komencantoj, kursesstroj kaj telefonantoj. «Laŭ la teoria vidpunkto ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte; sekve se ni deziras paroli severe regule, ni devas elparoli «pan-jo», «san-go», «mi-a». (Zamenhof, Of. Gaz. 1911, p. 222).

La sonoj ne egalas laŭ sia reciproka kvalito kaj rolo, ankaŭ laŭ sia maniero de la kuniĝo. Ekzemple *r* «volonte» najbaras kun *t*, nevolonte kun *ŝ*, tute ne kun *ĵ*. Same, *k* ofte najbaras kun *l*, *r*, *s*, sed neniam kun *m*, *d*, almenaŭ en la Fundamento. Tiu rimarko ne koncernas la kunmetaĵojn, nur la radikojn.

La sonoj kombinitaj en iu vorto estas pli aŭ malpli facilaj por elparolanto; oni diras ke la vorto estas pli aŭ malpli belsona. Ĝenerale, la sona harmonio, la alternado de konsonantoj kun la vokaloj, la neesto de alisonado, estas kondiĉoj por la belsoneco; kaj male, la sona malharmonio, la amasiĝo de konsonantoj aŭ de vokaloj, la alisonado, estigas la malbelsonecon. Se kelkaj nacioj toleras aŭ ŝatas la amasiĝon de konsonantoj (ekz. germanaj *Pfipps*, *Obst*, *Handpferd*, serbaj *rt*, *trst*, *čvzst*, *srbin*), la aliaj, precipe orientaziaj, tion ne toleras. Manĝuro, ekzemple, ne povas elparoli eŭropan vorton «*frank*» alie ol «*faranga*». Por faciligi nian parolatan lingvon, oni povas atenti pri la kondiĉoj de la belsoneco. Lastatempe oni komencis ion tiurilate, ekz. proponante novaĵojn: monarko (monarĥo), buĝeto (budĝeto), hodia (hodiaŭa), espozi (ekspozi), eskurso (ekskurso) multekolora (multkolora), vortofarado (vortfarado), kma.

§ 7. Akcento estas maniero elparoli plialte kaj plilonge, ol kutime, la akcentatan silabon. Ĝi falas antaŭlastan vokalon de' l vorto kunfinaja, kaj la lastan de' l vorto apostrofita. Tial apostrofo povas montri finan akcenton en fremda vorto: *Paskal'*, *Ali' Bordo'*, *Neva'*, *Moskva'*, *Oman'*.

La fraza akcento falas tiujn vortojn de la frazo, kiujn oni volas elstariĝi. *Ne li estas kulpa pri tio, sed lia frato*. En ĉi frazo la frazakcento falas sur *li* kaj sur *frato*.

La fraza tono estas natura rimedo por aldone esprimi tion, kion ne povas komprenigi la solaj vortoj kun iliaj akcentoj. En ordinara parolo la tono aperas sen nia intenco, eĉ kontraŭ nia volo, kiel reflekto de ia emocio aŭ sentimento. Unu sama frazparto («kiam vi venis») tonas malsame en jenaj frazoj:

Kiam vi venis, mia amiko?

Kiam vi venis, mia amiko, estis pluvo.

En la unua plitonas vorto *kiam*, en la dua *venis*.

Eĉ unu vorto, dirita kun la tono, povas multon esprimi en la viva interparolo. La gestoj kaj mienoj multe helpas al la esprimoriĉa interparolo.

Krom la ordinaraĵ artikumataj sonoj, skribataj perlitere, estas la alispecaj, por kiuj ne ekzistas apartaj signoj, ekz. sonoj de rido, ĝemo, tuso, terno, singulto, nazblovo, langoklako, ankaŭ blekoj kaj krioj de bestoj, birdoj, fine sonoj de bato, frapo, falo, knaro, gutado, fluado, ktp. Oni penas ilin konvencie signi per la literoj, ekzemple: ha-ha, ĥi-ĥi, oh, uf, oj, aj, ĉrip, kra-kra, muu, grr, miaŭ, haŭ-haŭ, ap, ding-dong, tam-taram, kc.

Parolo, deklamo, kanto, — prezentas tri suprenirajn ŝtupojn de la voĉa esprimado. Gramatiko studas el ili nur parolon, lasante la du ceterajn al belartoj.

§ 8. Se Esperanto akceptas sensaĝe la jam internacian natursciencan terminaron, ĝi per tio akceptas aldonajn literojn (q w x y) kiuj ekzistas en tiu terminaro. Jam delonge tiuj kvar literoj estas uzataj en Esperanta literaturo por skribi proprajn nomojn: Grabowski, Verax, Mybs, Baquet, Won Kenn, Cox, Loy, Warden, Eyquem, kc. Kvankam tiuj aldonaj literoj ne apartenas al pure Esperanta aboco, tamen ilia fakta uzado necesigas starigon de ilia konvencia elparolo, se oni ne ĉiam notas la originan elparolon de tiu aŭ alia propra nomo.

§ 9. Krom pure naciaj nomoj, ekzistas nomoj de landoj, urboj, riveroj, kiuj apartenas ne al unu nacio, sed samtempe al la pluraj. Por starigi tiajn nomojn oni sekvas la principon de pleja internacieco, penante ekvilibrigi la ortografion kun la elparolo, ĉio en limoj de Esperanta aboco kaj fonetiko. Tiel ekzistas nomoj: Alpoj, Pireneoj, Karpatoj, Reno, Rono, Dunavo, Besarabio, Galicio, Macedonio, kc.

La demando pri ujo (lando) estas solvebla kontentige, se ni forigos ĉian partiecon kaj konsideros la realaĵojn. Laŭ la Fundamento la sufikso -uj- interalie signifas «lando loĝata de», nenie la Fundamento difinas ĝin kiel «regno». Kaj Zamenhof tre bone sciis diferencon inter la regno kun di-

versaj subpremitaj gentoj kaj la nacio, kies teritorio apartenas al pluraj ŝovinistaj regnoj. Estas ekster dubo, ke la Zamenhova frazo: «La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo» (Ekzercaro § 40), tiu frazo signifas nur ke la rusoj loĝas en la rusa teritorio ktp. Certe, Zamenhof ne povis skribi: «En Rusujo loĝas la rusoj, la poloj, la latvoj, la kirgizoj, ..» ĉar por nomi la rusan imperion oni uzis vorton «Ruslando». Se ni volas ĝuste kompreni «ujon», laŭ la Fundamento, ni devas diri *Francujo* por la tuta landaro kie oni parolas france: granda parto de la regno, okcidenta Svisio, suda Belgio, Kanado, Haitio, kc. Kaj por nomi la francan regnon ni povas diri *Francio*. Ni ne rajtas diri *Kanadujo* ĉar ne ekzistas kanada lingvo, nek *Svisujo*, *Belgujo*, *Aŭstrujo*, ĉar tie loĝas francoj, germanoj, italoj, flamandoj, kc. La naciaj nomoj de landoj ordinare ne notas la etnografiajn teritoriojn, nur la regnojn: Suisse, Schweitz, Belgique, Belgie, Belgium, Autriche, Österreich, Austria, Avstrija, Italie, Italia, Russia, Russie, Rusija, Rossija, kma. La provincoj kaj regionoj ordinare portas karakterizan sufikson -i- en pli-multo da eŭropaj lingvoj: Picardie, Normandie, Algérie, Galicie, Lombardie, Lombardia, Galicia, Normandia, Albania, Macedonia, Besarabia, Siria, Armenia, Rumelia, Sicilia, Kalabria, Apulia, Kampania, Bavaria, Bohemia, Moravia, Ungaria, Podolia, ... Por ili sufiĉas ŝanĝi *e, a* je *nia o*, por ricevi tute taŭgajn nomojn.

§ 10. Oni proponis, por justa elekto de la internaciaj radikoj konsulti la statistikon, kiu permesas kvazaŭ pesi la relativan uzatecon de la radikoj en ĉiu nacio. Tiucele oni uzas tabelon da nombroj de lingvouzantoj (naciaj nomoj kaj fremduloj kune):

En milionoj da homoj:

angla	150	ĉeĥoslovaka	11
rusa.	100	nederlanda	10
germana	80	blankorusa.	8
hispana	70	greka.	7
franca	60	sveda.	6
itala.	40	dan-norvega	5
ukrajna	35	latvo-lituva	5
pola.	25	kelta.	5
sudslava	15	kataluna	2
rumana	12	albana	1

Sub la nomo franca estas enkalkulita la provanca; sub la sudslava la serba, la horvata, la slovena. Sub la nederlanda la holanda, la flandra. Sub la kelta la bretona, la kimra, la irea, la skota, la manksa; sub la rumana la valaka, la moldava; sub la albana la gega, la toska.

Uzante tiun statistikon, neeviteble malprecizan, oni memoru ke ĝi koncernas ĉiujn parolantojn, eĉ infanojn, kamparanojn, kiuj ne konas vortojn sciencajn; librecajn, altklasajn.

§ 11. Malfacila estas demando pri tio, kian sencon ni devas asigni al

la genraj botanikaj kaj zoologiaj nomoj, ekz. al la *Aquila*, *Passer*, *Ulmus*, *Brassica*, *Acer*,... kiujn ni volas identigi al Esperantaj: *aglo*, *pasero*, *ulmo*, *brasiko*, *acero*,...

La scienca senco estas tre larĝa: ĝi atribuas al ĉiu genro ĉiujn ĝiajn specojn de la tuta mondo.

La nacia senco estas tre mallarĝa: ĝi atribuas al la genra nomo nur tiun specon kiu estas nacie konata en ĉiu aparta loko; malofte ĝi entenas la plurajn specojn.

La scienca vidpunkto kaj la Fundamenta traktado pri tiaj nomoj — ambaŭ ne kontentigas la internacian lingvon, kiu celas fariĝi tutmonda.

§ 12. Ĉi sube ni havas ekzemplojn el la fleksiaj lingvoj, komparitajn kun la samsencaj Esperantaj vortoj, en kiuj la aglutina nevarieco kontrastas kun la fleksia varieco:

FRANCA	ESPERANTA	ESPERANTA	RUSA
voir	vidi	sidi	sidjetj
vois	vidas	sidas	siĵu
vis	vidis	sidis	sidjel, sjel
verrai	vidos	sidos	sjadu
vu	vidita	sidita	sajen
voyant	vidanta	sidanta	sidjaĉij

§ 13. Esperanto nun havas pli ol 10.000 elementojn, kiujn oni povas klasigi jene:

finajoj	12
afiksoj	53
rilataj vortoj	205
radikoj	10.000

Plurala finajo -j neniam uziĝas por la artikolo kaj por la verboj, tamen se en estonteco oni volus ĝin ambaŭokaze uzi tio ne estus kontraŭ la spirito de Esperanto.

Esperantaj duoblaj temoj estas konstruataj laŭ regulo: difinanto antaŭ difinato. Sammaniere oni agas en la germana kaj angla. En la rusa kaj franca oni iufoje sekvas la malan regulon: unua vorto estas la ĉefa; ekzemple:

fr.	<i>chien-loup</i>	lup-hundo
fr.	<i>terre-plein</i>	plat-tero
r.	<i>ptica-muĥa</i>	muŝ-birdo
r.	<i>baba-jaga</i>	jaga virino

Krom la afiksoj, troveblaj en la Fundamento, estas uzataj aliaj afiksoj jen rekonataj kiel tiaj (sed neoficialigitaj), jen kaŝitaj en la temoj, kiujn oni konsideras kiel unuoblaj radikoj. Antaŭe ni vidu la oficialajn elementojn, kiujn oni ne citas kiel afiksojn, malgraŭ tio, ke ili fakte estas tiaj:

a) *prefiksoj*: eks- pra-

b) *sufiksoj*: ant at int it obl on ont op ot

Krom tio povas servi kiel prefiksoj: ĉiuj prepozicioj, ĉiuj nombroj, ankaŭ jenaj vortetoj — plej, pli, plu, po, tre, tro, mem, fi, ve, jes, ne, ambaŭ, sin, sia, mia, unua, ktp.

Neoficialaj prefiksoj:

a - ne, sen, mal: anormala, amoral, amorf,...

ak - pinta: akra, akuta, akacio,...

amfi - ambaŭ: amfibio, amfibrako,...

anti - kontraŭ: antikristo, antipatio,...

aŭto - sin, mem: aŭtobiografio,...

bi - du, duobla: bikvadrato, bigamo,...

bio - vivo, viva: biologio, biografio,...

cis - maltrans: cisalpano, cislejta,...

di - du, duobla: diftongo, didimo,...

eŭ - bona: eŭfonio, eŭfemismo,...

geo - tera: geologio, geografio,...

heksa - ses: heksametro, heksagono,...

ko - kun: kooperi, kolegio,...

mikro - eta: mikrokosmo, mikrono,...

mis - malbone: misuzi, misordo,...

neo - nova: neologismo, neolatina,...

pan - tut, ĉies: panteismo, paniko,...

pre - antaŭ: prefikso, prehistoria,...

pseŭdo - nevera: pseŭdonomo,...

retro - malantaŭen: retrospektiva,...

sin - kun: sinoptika, sintezo,...

te - dio: teismo, teologio,...

ultra - trans, ekster: ultravioleta,...

Neoficialaj sufiksoj:

- *acoj* vegeta familio: liliacoj,...

- *acio* ado, aĵo, antaro: deklaracio,...

- *ala*: sociala, neŭtrala, normala,...

- *ario* oficulo: komisario, notario,...

- *atorio* ejo: observ-, purgatorio,...

- *ela*: fidela, modela, nobela, kruebla,...

- *enco*: scienco, kadenco, konkurenco,...

- *enda* kion oni devas: legenda, farenda,...

- *eo* vegetaĵo: nimfeo, alteo, centaŭreo,...
- *iero*: bankiero, inĝeniero, kanceliero,...
- *iko*: lingvistiko, mekaniko,...
- *io*: fotografio, telefonio, tipografio,...
- *iro*: kavaliro, oficiro, pioniro,...
- *ito* inflamo: bronkito, apendicito,...
- *ifo* ŝtono: granito, sienito,...
- *iva* kapabla: aktiva, produktiva,...
- *izi*: elektrizi, centralizi,...
- *logio* scienco: geologio, biologio,...
- *logo* sciencisto: geologo, biologo,...
- *metro* ilo: mikrometro, termometro,...
- *oida* formesimila: sferoida,...
- *olo* vegetaĵo: lupolo, fazeolo,
- *ono* patrono, matrono, fripono,...
- *oro* oficulo: senatoro, revizoro,...
- *oro* ilo: motoro, elevatorio,...
- *oza* riĉenhava: sabloza, feroza,...
- *patio* sento: simpatio, telepatio, ..
- *poni* meti: disponi, komponi,...
- *skopo* vidilo: mikro-, teleskopo,...
- *teko* ejo: biblioteko, pinakoteko,...
- *uaro* ejo: buduaro, trotuaro, kuluaro,...
- *uro* faritaĵo: skulpturo, miksturo,...

Oni multe skribis pri la kategorieco de la radikoj, kiuj estas esence aŭ substantivaj, aŭ adjektivaj, aŭ verbaj, aŭ adverbaj. La radika kategorieco certe ekzistas iomgrande, sed ĝi estas alispeca ol oni volas ĝin prezenti. Unue la termenoj mem: «substantiva radiko», «adjektiva radiko», kc., estas netaŭgaj, ĉar ili jam dekomence trudas malĝustan ideon pri la kategorieco.

La vortoj «substantivo», «adjektivo», kc. estas tre klaraj termenoj, pure naciaj (aŭropaj), kiuj ne havas ekziston en Esperanta gramatiko. Tiuj termenoj havas senvon en fleksiaj lingvoj, sed ne en la aglutinaj, kia ja estas Esperanto.

En la naciaj substantivoj oni ne povas ĉiam distingi la radikon de la finaĵo, ekz. en la franca *chat*, angla *cat*, slava *koť*, la substantivo kaj la radiko estas la samo; al la nacia substantivo korespondas iom (sed ne tute) la Esperanta ovorto, ekz. *kato*, formaĵo duobla: *kat-o*, kiu facile disfalas, se necesas, por doni: *kat-a*, *kat-e*, kc.

La samon oni povas diri pri la nacia adjektivo, vorto kristaliĝa, al kiu neplene korespondas nia avorto, formaĵo provizora: *kat-a*, *bon-a*

Inter multegaj Esperantaj evortoj ekzistas kelkaj, kiuj preskaŭ korespondas al la naciaj adverboj, ekz. hodiaŭ, ĉiam, neniam, ks. Sed ĝuste ilin ne tuŝas la pretendata kategorieco, ĉar ili ja ne estas radikoj, sed jam pretaj vortoj.

La verboj ekzistas en Esperanto nur kiel la radikoj kun finaĵoj *i*, *as*, *os*, *is*, *us*, *u*. En momento kiam radiko perdas sian verban finaĵon, ĝi refariĝas neŭtra rilate je la kategorieco suprenomita. En jena tabelo oni vidas ekzemplojn de la radika adaptado al la kvar gramatikaj (sintaksaj) formoj.

substantiva rolo	adjektiva rolo	verba rolo	adverba rolo
agaco	agaca	agaci	agace
atento	atenta	atenti	atente
aprobo	aproba	aprobi	aprobe
domaĝo	domaĝa	domaĝi	domaĝe

Tamen, kelkaj teoriistoj diras ke radiko *agac* estas esence substantiva, *atent* adjektiva, *aprob* verba, *domaĝ* adverba. La kuranta praktiko de Esperanto ĉiupaŝe renversas tiun teorion, kiun brile, sed vane, disvolvis Antido.

Se oni nepre volas klasigi la radikojn, oni povas distingi:

- a) *radikoj personaj*: abat, barbir, car, doktor, edz, frat,...
- b) *radikoj animalaj*: alk, bird, cerv, dog, ezok, fazan, gazel,...
- c) *radikoj kreskaĵaj*: abi, betul, cipres, datur, ebon, fab, kanab,...
- ĉ) *radikoj ilaj*: broso, grifel, sabro,...
- d) *radikoj koloraj*: blank, flav, griz, nigr, ruĝ,...
- e) *radikoj sonaj*: bru, tint, tondr, voĉ, zum,...
- f) *radikoj agaj*: tranĉ, tond, hak, frap, bat, atak,...
- g) *radikoj stataj*: star, kuŝ, pend, sid,...
- ĝ) *radikoj tempaj*: hor, tag, monat, semajn, jar,...

Kaj ankoraŭ multaj aliaj kategorioj...

Ĉiu radiko, se tion postulas la frazfaro, alprenas finaĵon *o*, aŭ *a*, aŭ *e*, aŭ *i*,... por ludi konforman rolon en la frazo.

La teorio pri la kategorieco de Esperantaj radikoj aperis pro tio, ke Zamenhof difinis en la U. V. la radikojn per la naciaj tradukoj, devige kategoriaj. Se Zamenhof ilin difinus per Esperantaj vortoj, tiu teorio eĉ ne ekzistus. Ke Zamenhof ne celis marki la kategoriecon, sed nur doni plej oportunan nacian tradukon, tion pravas la radikoj «ambiguaj» (por la nomitaj teoriistoj) sed tute klaraj por la ceteraj studentoj. Ekz. radiko *intern* estas tradukita jen adjektive, jen adverbale, *sput* jen verbe, jen substantive. Tia diferenco venas de la nacilingvoj, kiuj neegale esprimas la samajn ideojn. Se ni objekte analizos radikojn *bril*, por ekzemplo, ni vidos, ke ĝi egale bone signifas lumon («substantivo»), kvaliton de lumoj («adjektivo»), luman vibradon («verbo») manieron de lumoj («adverbo»).

P. STOJAN L. K.

(daŭrigota)

Pro... kaj Por...

Barcelona Esperanto Societo. — Ĝi publike prezentigis al la esperantis-toj la 27 de marto ĉe Ateneu Enciclopèdic Popular (Barcelona). Bela vespe-ro estis ĝuata de la multnombra ĉeestantaro. Ne nur la ĉiam laŭdinda tas-ko de F-ino. Palmira Castellví, kiu regalis la aŭskultantaron per siaj belaj esperantaj kantoj, sed ankaŭ la belaj poezioj deklamitaj estis bela frapo de la festo.

Ni varme deziras, ke la celoj montritaj de la prezidanto de B. E. S. okaze de lia malferma parolado rapide estu atingitaj por la bono de nia sankta afero kaj por la rapida akcelado de nia movado en Barcelona.

Radio Barcelona. — La 7 de la kuranta monato Radio Barcelona, kiu tiel bonvole akceptas kaj alte juĝas Esperanton, disaŭdigis Esperantan Feston. Kanto, poezio, paroladoj plenigis la tutan tiutagan programon. F-ino Castellví, D-ro. Bartomeu. Prof. A. Domènech kaj diversaj lernintoj de la radio-kurso partoprenis la belan feston. Kun profunda emocio ni aŭskultis la fonografcilindrojn de D-ro. Zamenhof, Bourlet, Grabowski, k. a. — Pro subita malsaniĝo de F-ino. Montserrat Grau oni ne povis ludi, kiel oni anoncis, akton de Ifigenio en Taŭrido.

Eksterlandaj samideanoj, kiuj aŭdis la esperantan feston, estas petataj sendi gratulan poŝtkarton al Radio Barcelona, str. Casp 12, Barcelona.

En la ĝenerala kunveno de la Grupo «Barcelona Stelo», oni elektis la jenan estraron: Prez. C. Domènech; Vicprez. E. Alba; Sekr. E. Capdevila; Vicsekr. J. Pruna; Kas. A. Valdepeñas, Kalk. M. Palomera; Bibliot. A. López; Voĉdonantoj: J. Gili, J. Guixà, I. Martínez kaj Ll. Hernàndez. — La 8an de Marto komencis kurso de Esperanto en la Grupo «Barcelona Stelo» sub gvido de profesoro S-ro. E. Capdevila, ĉeestata de ĉirkaŭ 15 personoj. La samideanoj S-roj. C. Domènech, A. Valdepeñas, J. Bargalló kaj Ll. Hernàndez, starigis komercan entreprenon sub la nomo «Komercesta Kompanio Kataluna. — Reprezentoj per Esperanto. — Barcelona». por importi, eks-porti kaj peradi dankon al nia karega helplingvo. — La esperantaj komercaj entreprenoj dezirantaj disvastigi niajn artiklojn en Katalunujo, sendu kon-diĉojn, katalogojn kaj specimenojn al la Direktoro de K. K. K. S-ro. C. Do-mènech, Marqués del Duero, 101. Barcelona. — La «Komercesta Kompanio Kataluna» estas jam nomita filio de Esperanta Komercesta Grupo el Dres-den.

Esperantista Konferenco en Locarno. — La ĵus okazintan Konferencon partoprenis la prezidanto de K. E. F. S-ro Delfi Dalmau, reprezentante la katalunlingvajn esperantistojn. — Nia maja numero publikigos raporton pri la ĉefaj aspektoj de la Konferenco.

Festo ĉe Barcelona Stelo. — Por la 17 de aprilo Barcelona Stelo anon-cas esperantan feston ĉe sia sidejo Marqués del Duero, 101. Oni ludos

«Amors Esperantistes» de nia amiko Joan Gili Norta, krom deklamado, koncerto, kantado, k. t. p. Ni varme deziras bonan sukceson al la festo.

Esperantista Vivo. — Nia kara ĉefredaktoro, Prof. Delfi Dalmáu, la 24 de marto edziĝis kun F-ino. Carme Argemí Suana el Terrassa. Al la multaj gratuloj kaj bondeziroj de li ricevitaj ni aldonas nian plej sinceran kaj korean esprimon de estimo. Al la nova esperantistino nian respektoplenan saluton. — Komitato de K. E. F. kaj Redakcio de K. E.

Pri Kritiko. — Ofte, tro facile oni plendas pri kritiko. Tamen neniu estas perfekta kaj tial ĉiu el ni devus deziri kritikon de siaj agoj, por estontece plibonigi ilin.

Kiam aperas ĵurnalo aŭ libro malbone tradukita aŭ redaktita, estas ne nur rajto sed devo montri ĝiajn nekorektaĵojn por ke la komencantoj *ne legu ĝin*. Se ne, malfacila legado kredigos al ili, ke Esperanto estas neklara komplikita lingvo, kaj baldaŭ, perdinte kuraĝon, ili forlasos ĉion.

Kompreneble, la afero montriĝas multe pli grava pri lernolibro, kiu povus erarigi la lernantojn, kaj eble okazigi, ke neniam ili konu la veran Esperanton.

Se iu samideano, kvankam nove veninta, deziras per ia publikigo alporti sian helpon al la komuna laboro, li, antaŭ ĉio, prenu konsilon de iu pli sperta, kaj tiam, tre kredeble, li povos liveri ion taŭgan. Sen tiu antaŭzorgo, plej ofte liaj klopodoj fariĝos nur malutilaj, kaj tiam li ne rajtos plendi pri kritiko; des pli ĝentile akceptinda ju pli ĝentile ĝi estis prezentata. — SPECTATOR. — El «*Le Monde Espérantiste*».

Ĝeneralajoj. — Estas konate, ke la radioamatoro apartenas al speco de bestoj, nomataj latine *homo sapiens* (esp. : homo saĝa??). Same, kiel ĉiu alia «homo sapiens», ĝi posedas du brakojn, iafoje kapon kaj eĉ edzinon. Tamen la radioamatoro estas facile distingebla laŭ la surkreskaĵoj, kovrantaj ĝiajn orelojn kaj nomataj «telefonaŭdiloj».

Ĝenerale la radioamatoro ne havas liberecon de transmoviĝo, ĉar ĝiaj telefonaŭdiloj estas ligitaj per dika metalfadeno al ricevilo. Tiamaniere ĝi forte similas koralojn kaj eĉ vegetaĵojn. Tamen Brem sukcesis unufoje observi tiel nomatan «vagantan radioamatoron», kiu rapide moviĝis, sin direktante al magazeno de radiaĵoj.

Ankaŭ Darwin en sia fama verko «Deveno de specoj» rakontas, kiel li foje observis sur la tegmento de kontraŭa domo grandan beston, rapide moviĝantan inter reto de fadenoj. Komence li konsideris ĝin, kiel gigantan araneon, sed post kelkaj koroj la eminenta sciencisco komprenis, ke tio estas radioamatoro, aranganta sian antenon. — El «*Internacia Radio Revuo*».

Grava pliriĉigo al la esperanta literaturo

Al la Esperantistaro tutmonda!

La Esperanta literaturo sendube jam estas granda. Tamen, laŭ la opinio de diverslandaj kompetentuloj, ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe granda. Oni diras: Malgrandaj nacioj ne povas ĝui la tutmondan literaturon samamplekse kiel la grandaj. Ju pli malgranda iu nacio estas, des malpli da alilingvaj verkoj estas tradukataj en ĝian lingvon, ĉar por la tradukaĵoj mankas la ebleco de sufiĉa vendiĝo. Se oni per unu fojo, nome per Esperanto, al ĉiuj nacioj havigus la literaturajn trezorojn de la aliaj, tio instigus antaŭ ĉio la anojn de malgrandaj nacioj al la lernado de Esperanto. Oni eligus la malgrandajn naciojn, pere de Esperanto, el literatura izoleco kaj havigus al ĉiuj nacioj trezorojn, kiuj alie nur al proporcie malmultaj interesigantoj povas fariĝi konataj.

Ni opinias, ke penindas fari provon en la dirita senco. Tial ni ĝojas pri tio, ke *prezentigas okazo por realigi la ideon*: La eldonejo *Rudolf Mosse* en Berlino, kiu jam de kelka tempo grandstile okupas sin pri Esperanto kaj praktike uzas ĝin en kelkaj el siaj eldonaĵoj — ekz. en la granda German-regna Adresaro por Industrio, Metio kaj Komerco kaj en la Semajna Eldono de *Berliner Tageblatt* — intencas eldoni sub la titolo

BIBLIOTEKO TUTMONDA

multampleksan, malmultekostan kaj bele aranĝitan bibliotekon, kiu respondu al la supre priparolita celo. La biblioteko prezentos elekton el la plej bonaj literaturaj verkoj tutmondaj kaj ankaŭ originalajn verkojn de kompetentaj Esperantistoj, ĉu beletristikajn, ĉu popularsciencajn. La unua numero antaŭvideble elvenos en Aprilo nunjara; ĝis la fino de l' jaro entute elvenos 24 numeroj.

Ĉiu numero de la biblioteko enhavos proksimume 60-64 paĝojn en formato de 10,5 x 17 cm. Pro tre malalta prezo ponumera ne estas eble, liveri unuopajn numerojn, sed oni nur povas aboni laŭ serioj de po 10 numeroj. La prezo de *unu serio, inkluzive afrankon* por la alsendo de ĉiu kajero tuj post elveno, estas 4 RM aŭ 1 Dol. aŭ 5 sv. fr. aŭ egalvaloro en alia valuto. *La koncerna sumo devos esti antaŭpagata kune kun la alsendo de la mendo.* Mendojn kaj pagojn oni adresu nur al la firmo *Rudolf Mosse, Buchverlag, Abteilung Esperanto, Berlin SW 68, Zimmerstrasse 61* (Germanujo).

Do, vi samideanoj, kiuj deziras posedi tiun altvaloran bibliotekon malmultekostan, *mendu senprokraste!*

Esperantista Literatura Asocio

J. ZSCHEPANK

Prezidantino

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Presejo J. Vinyals, Plaça Constitució, 6 : BARCELONA (Sarrià)

ATENTU

Ĉu vi volas helpi efike

K. E. F.?

Pagu tuj vian abonon!

Pagu tuj vian kotizaĵon!

Instigu viajn amikojn aliĝi al nia Federacio!

Diskonigu nian gazeton kaj varbu abonantojn!

Venigu multajn esperantistojn al nia Kongreso en
Santa Coloma!

Ju pli multe vi laboros por tiuj punktoj, des pli efike
vi helpos nian movadon.

Adresu ĉion: Carrer València, 245-Barcelona

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto», València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

Ĉu vi deziras aliĝi al "Universala Esperanto - Asocio", "Kataluna Esperantista Federacio", Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara", aŭ aboni al "Esperanto", "Kataluna Esperantisto", "Literatura Mondo", "Heroldo de Esperanto", kaj "Esperantista Junularo?" Petu tuj detalojn al Ferdinando Montserrat, str. Villarroel, 107, 2. - 2.^a, Barcelona. — Ankaŭ li peros pri ĉiuj esperantaj libroj naciaj kaj fremdaj, steloj k. t. p.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO
per poŝtnarkoj, ni sendas sortimenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA

KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfí Dalmau, Jaume Herp

*ELS DIES 23 I 24 MAIG 1926; GRANS SOLEMNITATS
ESPERANTISTES A SANTA COLOMA DE FARNÈS.
SAMIDEANS ESTRANGERS DE RENOM UNIVERSAL HI
VINDRAN EXPRESSAMENT. ÈS DEURE DE TOTS ELS
DEL NOSTRE TERRITORI, D'APLEGAR-S'HI.*

MÉS PROGRESSOS:

El Duc de Connaught forma part del Comitè del 17è Congrés — el d'aquest any — de l'Associació Britànica Esperantista.

A Rússia són publicats segells i cartes postals, amb les inscripcions oficials en rus, francès i esperanto.

Al 6è Congrés de la medicina tropical per a l'Extrem-Orient, tot just celebrat a Tokio, han estat presentades en esperanto algunes informacions mèdiques per professors de la Facultat. El Butlletí de la Facultat imperial de medicina de Tokio, redactat fins aleshores solament en alemany, conté des d'ara una part en Esperanto. Recordem sobre aquest punt que l'Associació Internacional Esperantista de Metges, que compta amb adherits en 40 països, publica una revista mèdica completament redactada en Esperanto.

Biblioteko Tutmonda

Titoloj de la kajeroj elvenontaj en 1926

- * N^o. 1 Merimée: Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj. El la Franca tradukis Borel.
- N^o. 2 Baudouin: La arto de la memdisciplino (Psikagogio). Originalo.
- * N^o. 3 Karinthy: Humoraĵoj. El la Hungara tradukis Bodo.
- N^o. 4-5 Inglada: La sismologio (tertremoj, vulkanoj). Originalo.
- * N^o. 6-8 Van Eeden: La Malgranda Johano. El la Nederlanda tradukis Bulthuis.
- N^o. 9 Penndorf: El grekaj papirusoj. Originalo.
- * N^o. 10 Bratescu-Voinesti: Niĉjo Mensogulo kaj aliaj noveloj. El la Rumana tradukis Morariu.
- * N^o. 11-12 La aventuroj de Munchhausen. El la Angla tradukis Applebaum.
- * N^o. 13 Korĉak: Rakontoj humoraj. El la Pola tradukis Weinstein.
- * N^o. 14-15 Puŝkin: Kapitanfilino. El la Rusa tradukis Ŝidlovskaja.
- * N^o. 16-17 Tabory. Cikonikalifo. El la Hungara tradukis Babits.
- N^o. 18 Collinson: La homa lingvo. Originalo.
- N^o. 19 Bujwid: Higiena vivado. Originalo.
- N^o. 20 Bovet: La instinktoj de la infanoj kaj ilia valoro por la edukado. Originalo.
- N^o. 21-22 Kamaryt: Ĥemio en la hejmo. Originalo.
- N^o. 23 Kenn: La penso de Konfucio. Originalo.
- * N^o. 24 Korolenko: La sonĝo de Makaro. El la Rusa tradukis Ŝidlovskaja.

La verketoj signitaj per * estas beletristikaj, la ceteraj estas popular-sciencaj. Ŝanĝoj en la sinsekvo de la verketoj estas rezervitaj.

La gvidantoj de tiu Biblioteko petas la katalunlingvajn aŭtorojn kaj tradukantojn proponi manuskriptojn al «Tutmonda Literaturo» Gvid. Dro. Ernst Kliemke. — Berlin SW 68, Schützenstrasse 24, Germanlando.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

Vojstrato Blankerna

En Valldemossa ekzistas vilaĝestro, kiu en la nunaj travivataj tempoj estas ia *avis rara*, ia blanka merlo, aŭ kiel oni diras ĉi tie, ia vera verda ĉevalo. Ekpasis tra lia kapo, kaj li sukcesis ke ĝin aprobus la Komunumo, titoli la stratojn de la monta vilaĝo per aŭtoĥtonaj nomoj, skribitaj tiamaŭ kiel konvenas. En bela blanka marmoro, en noblaj romaj literoj, ĉe ĉiu stratangulo pompigas glora nomo: *Nikolao Kalafat'*, la inkunabla presisto kiu en la dezerto de Miramar' ĝemigis la unuan presmaŝinon, samhore kiam pastro Posa, en Barcelono, ĝemigis la sian; *Fratino Ano Mario de la Sanktega Sakramento*, esploristino en la lulja bosko kaj ekspoziciistino de la mistika idilio inter la Amiko kaj la Karulo; *Reĝo Jakó II^a*, kiu fondis kaj provizis per kvincent florenoj el oro la kolezion de orientaj lingvoj... Al la larĝa aleo kiun la platanoj ombrigas kaj kiu tra cindrokoloraj olivarboj kaj kverkoj nigriĝantaj longiras serĉi la malfermitan horizonton kaj la sennombran rideton de la ondoj, li almetis la nomon *Vojstrato Blankerna*. Decis ke estus poeto, greftita je vilaĝestro, tiu kiu eltrovus tiun nomon tiel belan kaj tiel ĝustan kaj sukcesus titoli per ĝi vojstraton kaj dekoracii poluritan marmoron. Se nia Ramono Luljo (1) estus ekpensinta trapasigi tiun proteikan personegon sian kiun per la nomo Blankerna li baptis, kaj el kiu li faris la spegulon de la kristana perfekteco en ĉiuspeca el la sociaj klasoj, tio estas jene, de geedziĝo, de religio, de prelato, de apostola sinjoreco, kaj fine, de ermita vivo; se nia Ramono Luljo, mi diras, estus ekpensinta trapasigi Blankerna' n tra tiu civita magistrato de la Komunumo, en la bongusta ĉapitro kiun li estus priverkinta: *Pri tio kion faris Blankerna estante vilaĝestro*, ne mankus iu el la aferoj kiujn efektivigis la vilaĝestro de Valldemossa, Antonio Llorens kaj Clariana.

(1) Vidu biografion en «Kataluna Antologio»

Blankerna estas personego de nubo kaj de sonĝo, riĉa je multe da vi-
voj, kiu efektive meritis stratnomon en tiu vilaĝo kiu lin ekvidis ermito kaj
kie, sub la maldelikata kaj granda vestaĵo, li travivis siajn tagojn plej or-
pentritajn kaj trankvilajn. La vojstrato kiu beligas per tia nomo estas tiu
kiu kondukas al Miramar' kaj al la kapelo «antikva» de la Sanktega Tri-
unuo, kaj al la Kaverno de Ramono, kaj al la fonto «kie persono kiu ne amas
enamiĝas kiam li trinkas el la fonto», kaj en tiun lokon «inter la vinberkampoj
kaj la fenkolejoj» kie Blankerna restadis en ploroj kaj sopiroj. Se, la vinber-
kampoj jam ne estas tie, tamen ankoraŭ la fenkolo, kiu faras tiun izolejon aro-
ma, kreskas, inter roko kaj roko, kaj malfermas siajn grajnhavajn korimbojn
de akra anizo. Ŝajnas ke ankoraŭ estas vivanta la idilio inter la Amiko kaj
la Karulo. Ankoraŭ tie kantas la samaj birdoj saltetante de branĉo al branĉo:

«Ekkantis la birdo en la ĝardeno de la Karulo. Venis la Amiko kiu
diris al la birdo: Se ni ne interkompreniĝas per lingvaĵo ni interkompreniĝu
per amo...»

Ankoraŭ la asketaj voĵetoj estas dornaj kaj malperfektaj kiel en la tem-
po kiam, kiel lilio inter kardoj, ekfloris la enamitula dialogo:

«Pensmalkviete marŝadis la Amiko tra la ĉefvojoj de lia Karulo, kaj li
ektuŝegis kaj falis inter dornoj, kiuj estis al li ŝajnaj kvazaŭ ili estus ro-
zoj kaj floroj kaj kvazaŭ ili estus lito de amoj...»

Plenan amason da rapidforigantaj rememoroj, pro la granda multego da
landoj kaj da urboj kaj da homoj kiujn, kiel dia nova Uliŝo, estis travidinta
Ramono Luljo, li kunportis, al la silenteco de Miramar', ĉirkaŭen de sia
medita kapo; sed ili ne sukcesis trovi sian internan pacon kaj sian intiman
feliĉegon. Mi trapasis, noktomeze, tra la arbaro de Miramar', noktomeze
ĉar estis la horo kiam kuŝleviĝis Blankerna. Ĉio reprenas spektran pres-
tiĝon; kvazaŭ dolĉa tondro alvenas el la profundega maro; zumas la foliaro;
kaj en la horo kiam la lampiroj ekbruligas, inter la herbo, la timeman luma-
taĵon, ankaŭ havas ĝin brulanta la astroj en ĉeesto de Dio. Kaj la sono de
sonorileto kiel marteletoj el kristalo, trafendas tiun silenton kaj rektiras
vundi la serafan kaj trembrilantan kunestadon de la steloj. Kaj, kiel abe-
lejo, la ermita kapelo pleniĝas de bruetoj kaj de mielo. Tio estas Blankerna,
revivanta, kiu levigas eksnorigi ĥorpreĝojn kaj ilin preĝi. Kaj kiam li estas
ilin preĝinta, ĉe la fenestro de sia ĉelo, tra la vualo de piaj larmoj, li elri-
gardas la ĉielon kaj la stelojn; kaj poste reiras dormadi ankoraŭ unu dor-
mon, flugilhavan kaj facilan, kiu ekvekiĝas dum la ektagiĝo...

«Tiamaniere vivadis kaj restadis Blankerna, ermito, konsiderinte ke
neniam li sintrovis en tiel plaĉa vivo».

En tiun superbela izolejon kiun Ramono Luljo saturas per sia ombro,
kondukas la ĵusnova *Vojstrato Blankerna*, kiun la platanoj surversas per
ombra makulaĵo kaj la olivarboj traplenigas per anĝelaj murmuretoj.

Katalune Verkis LLORENÇ RIBER

Tradukis JOSEP VENTURA

Premiita en la XI Internaciaj Floraj Ludoj

Pri Landnomoj

La sistemo de D-ro. Zamenhof

En la ĉi suba esploro mi tute *objektive* klarigos la Zamenhofan sistemon. Ĝin mi ne intencas, ne *volas* diskuti, sed mi rajtas konstati, ke ĝi zorge atentis pri la necesa rilato inter la nomo de la lando kaj tiu de la regnanto, ke tre sufiĉe *logika* ĝi estas kaj ke, kiel skribis, en sia Raporto (pag. 8 konkludo), Prof Grosjean Maupin «la fideleco al la ĝenerale akceptita tradicio estas el praktika vidpunkto pli sendanĝera ol ia ajn provo», sed plie, ke ĉia alia sistemo okazigas fatale inter la Esperantistoj kontraŭstaron, proteston kaj diskutojn nepre evitindajn.

MALNOVA MONDO

Eŭropo, Azio kun Egiptujo (1)

La gento donas sian nomon al sia lando per aldono de l' sufikso *-ujo* (2).

Gento:	Adjektivo:	Lando:	Gento:	Adjektivo:	Lando:	Gento:	Adjektivo:	Lando:
Angl-o	-a	-ujo	Grek-o	-a	-ujo	Pers-o	-a	-ujo
Bavar-o	»	»	Hind-o	»	»	Pol-o	»	»
Belg-o	»	»	Hispan-o	»	»	Portugal-o	»	»
Brit-o	»	»	Holand-o ⁽⁴⁾	»	»	Prus-o	»	»
Bulgar-o	»	»	Hungar-o	»	»	Ruman-o	»	»
Dan-o	»	»	Hin-o	»	»	Rus-o	»	»
Egipt-o	»	»	Ital-o	»	»	Saks-o	»	»
Fin(n)-o ⁽³⁾	»	»	Japan-o	»	»	Skot-o ⁽³⁾	»	»
Franc-o	»	»	Katalun-o	»	»	Sved-o	»	»
German-o	»	»	Norveg-o	»	»	Svis-o	»	»
						Turk-o	»	»

(1). Por la antikvaj Grekoj kaj Hebreoj *Egiptujo* estis kvazaŭ Azia «Kromlando» Ĝi — sed ne la cetero de Afriko, apenaŭ konita, — apartenas al la Malnova Mondo — same por D-ro Zamenhof, la tradukinto de la Biblio.

(2). Anstataŭ *-ujo* oni ĉiam rajtas uzi *-lando*: *Franclando* (mallongige kaj skribe: *Francel.*) apud *Francujo*, kiel *pomarbo* apud *pomujo*, *preĝdomo* apud *preĝejo*.

(3). Anstataŭ *Fin(n)ujo*, *Skotujo* oni ĝenerale uzas, konforme al la nacia nomo, la formojn: *Fin(n)lando*, *Skotlando* (Vidu Rim. 2).

(4). La vorto *Nederlando* estas nomo, ne de gento sed de lando; sekve la nomo de l' regnanto estas: *Nederlandano*. — Same por *Islando* kaj *Irlando*, se *Ira* gento ne ekzistas.

La sama regulo taŭgas kompreneble por la postmilita restarigitaj sendependaj landoj:

Aŭstr-o	-a	-ujo*	Latv-o	-a	ujo	Slovak-o	-a	-ujo
Ĉeĥ-o	»	»	Litov-o	»	»	Ĉeĥoslovak-o	»	»
Eston-o	»	»	Slav-o	»	»	k. t. p.		

* Fakte, nova ŝtato: ŝtato de la Aŭstroj.

NOVA MONDO

Afriko (!), Ameriko kaj Oceanio.

Ĉar, politike, malaperis la primitivaj gentoj, la lando mem donas sian nomon al la regnano per aldono de l' sufikso *-ano*.

Lando	Adjekt.	Regnano	Lando	Adjekt.	Regnano	Lando	Adjekt.	Regnano
Alĝeri-o	-a	-ano	Kanad-o	-a	-ano	Peru-o	-a	-ano
Argentin-o	»	»	Kapland-o	»	»	Tunizi-o	»	»
Aŭstrali-o	»	»	Kolombi-o	»	»	Urugvaj-o	»	»
Bolivi-o	»	»	Marok-o	»	»	Uson-o	»	»
Brazil(i)-o	»	»	Meksiki-o ⁽²⁾	»	»	Venezuel-o	»	»
Ĉil(i)-o ⁽²⁾	»	»	Nov-Zeland-o	»	»			

NOMOJ DE PROVINCOJ KAJ URBOJ

Aldoni la finaĵon *-o* al la provinca nomo: *Branderburgo*, *Silezio*, *Provenco*, — se ne eble, senŝanĝe: *Loiret*, *Essex*.

Kelkaj nomoj de gravaj ĉefurboj esperantiĝis: *Parizo*, *Ĝenevo*, *Kopenhago*. — Aliaj simple alprenas la finaĵon *-o*: *Londono*, *Bertino*, — se ne eble, senŝanĝe: *Versailles*, *Breslau*.

Plej bona gvidanto restas por ni D-ro. Zamenhof.

TH. CART

Prez. de la Lingva Komitato
kaj de ĝia Akademio

(1) Eŝeptinte *Egiptujon* (vid. Rim. 1).

(2) Ambaŭ formoj: *Brazil-* kaj *Brazili-o* estas pli malpli internaciaj kaj uzitaj. Oni do rajtas elekti inter ili. Persone mi preferus — ĉar pli simplaj — la formojn *Brazilo* (adjektivo: *brazila*; sed, de *Brazilio* la adjektivo estas necese *brazilia*). Pri *Ĉil(i)-o* oni rajtas same argumenti. — Ĉar tiaj detaloj neniel kontraŭas al la Zamenhofs kaj Fundamenta principo, plej bone decidis la enlandanoj mem en interkonsento kun la Akademio.

(3) Formo konsilita de D-ro Zamenhof por diferencigi la landon kaj la ĉefurbon.


Nia Internacia Konferenco en Lokarno 3-6 Apr. 1926

REGULARO DE K. R.

Gravaj organizaĵaj kaj propagandaj aferoj estis en la tagordo de la Konferencoj.

Post la Universala Kongreso en Ĝenevo, aperis bruado de la Franca kaj de la Pola Asocioj por reformoj al la Regularo de la Konstanta Reprezentantaro. La afero estis vere delikata, ĉar, aliflanke tiuj du asocioj plendis ke en la koncernaj kunsidoj dum la Kongreso en Ĝenevo oni ne deĉe atentis iliajn projektojn. Ŝajnis okazonta interna batalo inter la pacaj batalantoj; sed la kontentigo pro la evidenta kaj antaŭeniga laborado de niaj organizaĵaj Institucioj faciligis la konkordon, la akordiĝon. Kaj denove evidentiĝis ke plej ofte malkonkordon naskas la malkompreno: la franca Reprezentanto, kiu ankaŭ reprezentis la polan asocion, kaj la pri tiu afero kontraŭflankaj Reprezentantoj tion deklaris; do anstataŭ akraj interdisputoj okazis amikaj interparoladoj kaj klarigoj, pro kiuj la Regularo de K. R. estas plibonigita per utilaj kaj precizigaj aldonoj el la projekto de la Franca kaj Pola Asocioj.

Reprezentanto de nia Federacio ĉeestis la kunsidojn kaj partoprenis diskute, voĉdone kaj balote la konkludojn. La inteligenta pioniro kaj prezidanto Privat kaj la franca Reprezentanto bone interkonsentis efike helpa-



Kunsido en Lokarno

taj de la agema Ĝenerala Sekretario Robert Kreuz. Kompromisa teksto de la statutoj estis farita, tamen la franca Reprezentanto, kiu ankaŭ partoprenis la diskutojn akordiĝeme, petis voĉdonigon por la teksto prezentita de liaj reprezentataj Asocioj. Nia Reprezentanto tiam demandis: «Kial, do, ni ĉiuj prilaboris la kompromisan tekston?» Sed, tamen, oni voĉdonis, por komplimenti la franc-polan, kaj tri voĉoj estis favoraj; du estis liaj mem, franca kaj pola, kaj la alia, tiu de la Belga Ligo. Ĉiuj ceteraj estis malaprobaj aŭ sindetenaj; la unua sindetena estis tiu de nia Reprezentanto, ĉar li opiniis ke oni ne devis voĉdoni por la franc-pola teksto post ĉies kunlaboro por komuna teksto. Kaj, efektive, post tiu malnepa voĉdono, oni voĉdonis la kompromisan tekston, kaj ĝi estis aprobita *unanime*. Tio ĉi plene pruvigas ke oni ne devis voĉdoni por la unua. Fine ĉiuj estis kontentaj, akordaj.

ELEKTOJ

Por la nova periodo estas elektitaj en Lokarno la Prezidanto kaj Sekretario de K. R.: unuanime ankaŭ oni elektis la Belgan Ligon por okupado kaj plenumado de tiuj postenoj, kiujn ĝis nun okupis la Brita Asocio, meritanta dankemon por la ekfunkciigo de K. R. Ni havas ĉiujn motivojn por antaŭvido de bona agado de la Belga Ligo por nova kaj vigla funkciigado de K. R.

Por la Centra Komitato ankaŭ okazis elektoj: pro la eksigo de la angla S-ro. Page, kaj memrezigno de S-ro. Privat, kiel plej juna Komitatano, por havigo de laŭstatuta elekto de du membroj. Ankaŭ unuanime estas elektitaj S-roj. Privat kaj Stromboli. — Bona elekto! — Kiu diris ke ne estas harmonio en la esperantista movado?

FESTENO KAJ EKSURSOJ

Tre ĝentila estas la urbestro de Lokarno. Li malavare regalis la esperantistan Delegitaron per ĝojiga festeno en ĉarmega Hotelo Palace, kiu estas vera, tera, ĝardena, viviga paradizo. Fine estis elokventaj tostoĵoj de Lokarnaj aŭtoritatuloj kaj Delegitoj de nia Movado. Ĉiuj konstatas ke la «Spirito de Lokarno», por efektiviĝo, devas esti ne nur nomo, dokumenta, diplomata, sed popola, senta, kora. Kaj la ĉefa Movado kun plej efikaj cirkonstancoj por realigo de la spirito de Lokarno, por kiu estas nepre «tuteŭropa lingvo», nenacia, internacia, neŭtrale homa lingvo, pro sia ekstero kaj sia interno, pro sia korpo kaj sia animo estas ja Esperanto kaj Homaranismo, estas ja la kreaĵo de Zamenhof. Tiu veraĵo estas konstatita en Lokarno, okaze de la Oficiala konferenco de Centra Komitato, Konstanta Reprezentantaro kaj Universala Esperanto-Asocio.

Krom la nomita Festeno, ankaŭ la malavara urbestro de tiu rava svisa urbo, regalis nin per biletoj por ekskursoj, kiuj evidentigis al ni, ke Lokarno, krom la nomo de la paca celita spirito postmilita, estas urbo de montoj belegaj, akvofaloj mirigaj, lago reviga, urba komforto, ripozejo, ĝuejo plej alloga.

DELFI DALMAU



Ĝenera vidaĵo de Santa Coloma

Santa Coloma de Farnés, urbo de nia Kongreso en 1926, Majo 23-25

La urbo Santa Coloma de Farnés kun la najbararo Sant Marçal, la vilaĝo Castanyet kaj la vilaĝeto Sant Pere Cercada, formas komunuman distrikton kiu sidas sudokcidente de Ĝerono sur la riverbordo Tordera; norde estas la distriktoj Osor, Brunyola kaj Vilovi; oriente Riudarenes; sude Riudarenes kaj St. Feliu de Buixallén, kaj, okcidente, Sant Miquel de Cladells kaj Sant Hilari.

Ĝia loĝantaro atingas la nombron 5000: estas 1175 domoj kaj aliaj konstruaĵoj en la distrikto.

Unuaranga banloko, Thermes Orion, je bonegaj kuracakvoj por trinko kaj bano estas sudoriente de nia urbo, propraĵo de nia amiko D-ro Manuel Burch, kies filino Maria, estas ĉarma samideanino.

La urbo Santa Coloma komunikiĝas kun la provinca ĉefurbo Ĝerono per ĉarvojo 22-kilometra kaj per fervojo, kies stacio estas je naŭ kilometroj malproksime. Regulaj aŭtomobiloj dufoje ĉiutage servas al veturantoj de la urbo al la fervoja stacio kaj revene.

Ĉiulunde okazas ĝenerala distrikta foiro en nia urbo. La kongresanoj vidos ĝin la Pentekostan lundon.

Sur apuda monto, kies pinton okupas ruino de fama kastelo Farnés, estas la sanktejo de la Virgulino de Farnés, kie okazas ĉiujaraj solenaĵoj.



Sonorilejo paroĥa kaj publika horloĝo.

La urba paroĥejo, nomata Sankta Petro estas romana templo. Loka «Sinjoro» Pere Ramon de Vilademay fondis ĝin en 1137 aŭ 39.


Historiaj rimarkoj. — En la XII^a jarcento estas jam nomado de la Kastelo kaj de familio Farners (en dokumentoj) *Farners* (jaro 1111^a), *Farneris* (en 1200), *Farneriis* (en 1245), kaj *Farneriis* (en 1362). La kastelo en 1359, havis 51 pafejojn kaj apartenis al la nobela familio Vilademany

subrilata al vicgrafoj Cabrera. En 1640 oni kontraŭstaris eniron de soldataro de Leonard Moles, kiu trarabis en la lando. Post kelkaj tagoj alvenis la urbon reĝa servisto Monrodó, kies malmodera sinteno elstarigis la popolon kontraŭ li, kie li mortis pro popola bruligo de la konstruaĵo en kiun li rifugiĝis. Poste eniris la urbon la soldatoj de Moles kiuj, plej multaj, estis napolitanoj; ili bruligis la urbon kaj detruis pli ol 200 domojn. Tiu fakto ĉefe influis por elstarigo de Katalunujo kontraŭ la registaro de la Reĝo Filipo IV de Kastilujo. Tiu milito estas historie nomata «malkuniga».


La familia domo de Farnés, kies loko estis apud la preĝejo, kaj okupis parton de la nuna *placo de Konstitucio*, estis malaperigata antaŭ 50 jaroj.

En nia urbo naskiĝis fama Beat Dalmau, de la Ordeno de la Predikistoj, kiu mortis 50 jara; en la paroĥa preĝejo estas konservitaj brako kaj dento liaj, kiuj inspiras al multaj religian senton.

Tipika festo estas de Santa Coloma ĉiujare ankoraŭ okazigata, nomata de l' «Pelegri» de Tossa, kies unuafojo datumiĝas de XIII jarcento.



Fama kastelo Farnés



El la belaj ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

Propono *

Ĉiujare alfluas al la Internaciaj Floraj Ludoj grandega kvanto da esperantistaj literaturaĵoj, kaj el ili konsiderinda nombro estas premiata.

Sed el la premiitaj verkoj aperas nur tre malmultaj, relative, en la esperanta gazetaro, kaj pli malgranda eĉ estas la nombro de la «menciitaj», kiuj estas publikigataj, kvankam inter tiuj ankaŭ ofte troviĝas valoraj kaj bonaj poemoj kaj prozaĵoj.

Opiniantes, ke estus por la esp-a literaturo granda avantaĝo kaj por la verkistoj potenca instigilo alia maniero de rapida disvastigado kaj diskonigado.

(1) A La premiitaj verkoj estu ĉiujare okaze de la Floraj Ludoj eldonataj en libro-formo kaj vendataj; la kongreskotizo eble povus jam enhavi la prezon.

(1) B Se tio ne estas ebla, oni interrilatu kun «Literatura Mondo» ke

* La koncernatoj memoru ankaŭ la konsideraĵon pri la F. L., aperintan en nia gazeto, paĝo 281 (januaro).

Kongreso de K. E. F. 1926 Santa Coloma de Farnés

PROGRAMO

UNUA TAGO (23 MAJO)

- Je la 10^a kaj duono: oficialakcepto de la kongresanoj.
- Je la 11^a: Malfermo de la kongreso kaj disdono de la kongreslibro ĉe la urbdomo.
- Je la 14^a kaj duono: solenaj Floraj Ludoj ĉe la Círculo Columbense.
- Je la 18^a: ekskurso al la Banĵo Termes Orion.
- Je la 20^a Oficiala Festeno en la Hotelo Termes Orion.
- Je la 22^a Serenado antaŭ la urbdomo.
- Je la 23^a Hora arta kunveno ĉe la societo Artística Farnense kie estos kantata la Espero.

DUA TAGO (24 MAJO)

- Je la 8^a, solena meso kun esperanta prediko de D-ro. Johano Font, Profesoro de EL COLLELL ĉe la preĝejo St. Sebastia.
- Je la 10^a laborkunsido kaj formaligo de Kataluna Esp. Instituto (por eldonoj kaj Floraj Ludoj), ĉe la Urbdomo.
- Je la 12^a, vizito al la foiraj placoj.
- Je la 16^a, vizito al la Kulturdomo, Biblioteko kaj Parko, kaj ekzamenoj de la kandidatoj al kapableco aŭ profesoreco pri Esperanto.
- Je la 18^a ferma kunsiko ĉe la urbdomo.
- Je la 23^a Sardanoj kaj aliaj dancoj honore de la kongresanoj.

TRIA TAGO (25 MAJO)

- Je la 8^a, Deiro de la ekskursanoj al Montseny, vizite al St. Hilari Sacalm, ĝiaj fontoj kaj banejoj.
- Je la 8^a kaj kvarono. Deiro de la ekskursanoj al kastelo Farnés kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.
- Je la 9^a kaj duono, meso ĉe la Sanktejo de Nia Virgulino de Farnés.
- Je la 10^a Vizito al la arta sanktejo de la Infano Jesuo de Praga.
- Je la 10^a promenado tra la «Turó del Vent» kaj kastelo Farnés.
- Je la 13^a. Kampartagmanĝo en la arbaro de Farnés ĉe la mirinda Font Vella de Sant Hilari Sacalm.
- Je la 15^a Vizito al la fonto kaj banejoj.
- Je la 18^a. Vizitoj al la tieaj fontoj.
- Je la 19^a. Afabla adiaŭo al la kongresanoj.

VAGONAROJ al Santa Coloma-Sils, eliras el Barcelona matene je la 5^a 40 kaj je la 7^a 45. (Estació de França).

*Kataluna Esperantisto Maj 1926 N° 23 Tria
Espero*

Kongresaj Sciigoj

Vojaĝo. — Estas petate, ke ĉiuj kongresanoj forveturontaj de Barcelona uzu la vagonaron de la . Oni rememoru, ke en Sils oni devas deiri la vagonaron por atingi la kongresurbon pere de aŭtomobiloj, kiuj atendas la kongresanojn.

Grupaj Standardoj. — Kiel kutime oni rekomendas, ke la grupaj standardoj ne manku ĉe la Kongreso. Espereble ĉiu grupo portos la sian por plireliefigi la alvenon de la kongresanoj kaj la ĉarmon de la festoj.

Salutado de delegitoj. — Ĉe la Malferma Kunsido, post la parolado de la prezidanto, la delegitoj povos alparoli la kongresanojn. Por tio estas necese, ke la delegitoj prezentu sian rajtigilon al la sekretario.

Membrokarto. — Kun tiu ĉi numero ni sendas al ĉiu membro lian membrokarton por 1926. Al la grupoj ni ankaŭ sendas la respondan nombron da kartoj laŭ la nombro da membroj por kiuj ili pagis en 1926. Grupoj, kiuj ne pagis ankoraŭ, faru tion tuj por ĝustatempe ricevi la kartojn. Oni rememoru ke por voĉdoni estas necese prezenti la membrokarton.

Kongreslibro. — Al ĉiuj kongresanoj, membroj de K. E. F. aŭ aliĝintoj, oni donacos la Kongreslibron, kiel oni anoncas en la programo.

Labora Kunsido. — Laŭ la jena tagordo ĝi okazos: sekretaria raporto, aprobo de bilanco, diskuto de la prezentitaj proponoj, elekto de komitatanoj, elekto de kongresurbo por 1927 kaj eventualaj petoj kaj proponoj.

Ekzamenoj. — Bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ la samideanoj, kiuj deziras sin prezenti al la ekzamenoj. Por tio oni turnu sin al la O. K. de la XIII Kongreso de K. E. F., Sta. Coloma de Farnés. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de kapableco kaj profesoreco.

Oficiala Festeno. — Nepre necese estas sendi tuj la enskribiĝon al la O. K., se vi deziras partopreni la Festenon. La koston oni devos pagi ĉe la Akceptejo.

Ekskursoj. — Por bli bona organizo de la ekskursoj kaj kun la deziro ke ĉio funkciu sen plendoj nek bedaŭroj, ĉe la alveno al Sta. Coloma bonvolu sciigi la O. K. pri la ekskurso, kiun vi deziras partopreni.

ĝi post la F. L. dediĉu specialan numeron pliampleksan, almenaŭ, al la ĉef-verkojpremiitaj.

(2) La «menciitaj» verkoj estu presitaj pli ofte ol nun en K. E. kaj L. M., tiel ke post la jarkonsumo la tuta provizo estu elĉerpita.

(3) La plej bonaj versaĵoj kaj prozaĵoj de la ĝisnunaj F. L. estu kolektataj en bele bindita libro por disvendado.

(4) La ĉiujara publikigaĵo de la F. L. povus enhavi ankaŭ la raporton pri la festo kaj la fotografaĵojn.


JOSEF BERGER




Enirejo de Thermes Orion.

Pro... kaj Por...

Antaŭ kelkaj monatoj ni aludis la laboron de la sekretario de Komitato en Santa Coloma, kiu organizas nian Kongreson 1926. Hodiaŭ ni devas honore nomi niajn malnovajn samideanojn Josep Canaleta kaj P. Costa, kiuj, en la prezido de nia loka Komitato la unua, kaj kiel urbestro la alia, plej efike ambaŭ laboras por sukcesi nian nunjaran Kongreson en tiu ĉarma urbo. — Koran dankon al ĉiuj, kiuj, en la lastaj momentoj devos ankoraŭ pliigi sian agadon kaj oferon por heroa elteno en la organizo kaj finpretigo.



Biblioteko kaj kulturdomo.



Fasado de Thermes Orion.

XII^a Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

Verdikto

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta Amon: Premio al la verko n-ro. 31, devizo: **Amo Miraklojn Okazigas**. Unua mencio: n-ro. 1, devizo: «Vivanta strofo»; Dua mencio: n-ro. 3, devizo: «I aqnelles grâcies en son rostre...»; Tria mencio: n-ro. 39, devizo: «Cyrano»; Kvara mencio: n-ro. 2, devizo: «Un sonnet sans défaut vaut seul un long poème...»; Kvina mencio: n-ro. 4, devizo: «Manta gens me mal razona...»; Sesa mencio: n-ro. 136, devizo: «Qu'ieu am la plus de bon aire...».
- II. — Originala «Ama» verko en prozo: Premio: n-ro. 45, devizo: **Ereto**; Unua mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo» kun titolo «En la mondon...»; Dua mencio: n-ro. 76, devizo: «Papilia Ludo»; Tria mencio: n-ro. 82, devizo: «Seniĝi estas ĝui»; Kvara mencio: n-ro. 115, devizo: «Ĉu amo devigas...?»; Kvina mencio: n-ro. 9, devizo: «Paco Amo kaj Esperanto».

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la kataluna versaĵo: «Les Noces de l'Alosa i El Llessami»: Premio: al neniu. Unua mencio: n-ro. 8, devizo: «Zamenhof»; Dua mencio: n-ro. 62, devizo: «Kompreno estas vojduono».
 - II. — Traduko de la kataluna prozaĵo «Caminar amb la Lluna»: Premio: n-ro. 117, devizo: **The Moon**; Mencio: n-ro. 123, devizo: «Lumhela nokto».
- La Natura Floro estas aljuĝita al la verko n^o 31, devizo: «Amo miraklojn okazigas»**

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de la Komitato de K. E. F.: n-ro. 67, devizo: **Ne faru Frazojn pri la Vivo, sed Penu Ekkoni Ĝin**; Unua mencio: n-ro. 138, devizo: «La verko de l' Majstro»; Dua mencio: n-ro. 66, devizo: «Per Esperanto al Dio»; Tria mencio: n-ro. 11, devizo:

- «Kion oni volas tion oni povas»; Kvara mencio: n-ro. 101, devizo: »Kabe».
- II. — Premio de la Redakcio de «Kataluna Esperantisto»; n-ro. 140, devizo: **Unueco Donas Forton**; Mencio: n-ro. 129, devizo: «Nominata sunt odiosa».
- III. — Premio de S-ro. Narciso Bofill: n-ro. 5, devizo: **Sonetoj kaj Madrigaloj**; Unua mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo» titolita: «La nubeto»; Dua mencio: n-ro. 59, devizo: «Laboru senĉese, ne zorgu pri fin! la tombo atendas ne verkon, sed vin»; Tria mencio: n-ro 119, devizo: «Dies irae dies illa...».
- IV. — Premio de S-ro. Miquel Argemí: Dividita en du partojn.
Unua Parto: Premio: n-ro. 14, devizo: **Pax Tibi, Marce, Evangelista Meus**; Unua mencio: n-ro. 92, devizo: «Belaĵo estas ĝojo por ĉiuj»; Dua mencio: n-ro. 41, devizo: «Blankaj birdetoj»; Tria mencio: n-ro. 63, devizo: «Mi faris mian aferon kaj atendos ceteron»; Kvara mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo», titolita: «Dimanĉe»; Kvina mencio: n-ro. 34, devizo: «Ni proponas, vi disponas»; Sesa mencio: n-ro. 132, devizo: «Sub la sankta signo».²⁵
Dua Parto: Premio: n-ro. 33, devizo: **Mi diris, Penu, Hom', kaj Firme Fidu!**; Unua mencio: n-ro. 48, devizo: «Serĉante ni lernos»; Dua mencio: n-ro. 106, devizo: «Miraklo».
- V. — Premio de Universala Esperanto - Asocio: Al neniu. Laŭ iniciato de la donacinto, ĝi restas ne aljuĝita, ĉar neniu el la verkoj prezentitaj montras kvalitojn por meriti ĝin.
- VI. — Premio de la grupo «Barcelona Stelo»: n-ro. 38, devizo: **Procede et Semper - Italia - Semper!**
- VII. — Premio de D-ro. Sekretulo: Trionigita inter la verkoj, n-ro. 50, devizo: **La Vivo ne estas Plej Valora Posedaĵo...**, n-ro. 93, devizo: **Tradukoj estas kiel Virinoj kaj** n-ro. 98, devizo: **La Sinjorino kun la Skarlata Masko**. Mencio: n-ro. 40, devizo: «Mitologio».
- VIII. — Premio de Registara Urbeŝtaro de Sta. Coloma de Farnés: N-ro. 80, devizo: «**Aglo blanka**» Mencio: n-ro 113, devizo: «**Homo devas pensi ne nur pri siaj rajtoj, sed ankaŭ pri siaj devoj**».
- IX. — Premio de S-ro. Ramón Masgrau: n-ro. 29, devizo: «**Modesta batalanto por rajto kaj honoro**»; Unua mencio: n-ro. 22, devizo: «**Amu vian patrujon**»; Dua mencio: n-ro. 130, devizo: «**El floroj la abel', alportas ion al la ĉel'**».
- X. — Premio de S-ro. Paroĥestro de Sta. Coloma de Farnés: n-ro. 36, devizo: **Honny soit qui mal y pense**; Mencio: n-ro. 128, devizo: «Dofoto».
- XI. — Premio de ĵurnalo «La Veu de la Selva»: n-ro. 61, devizo: **Zuiderzee**.

- XII. — Premio de la firmo «Grafikaj Artoj»: n-ro. 108, devizo: **Rapidu**.
- XIII. — Premio de «Granda Hotelo»: n-ro. 72, devizo: **Bone tiu sidas al kiu la sorto ridas**.
- XIV. — Premio de «Centra Hotelo»: n-ro. 69, devizo: **Kaj tamen... nia fina celo estas ja - La Morto**. Unua mencio: n-ro. 77, devizo: «Virino kiu neniam perfidos»; Dua mencio: n-ro. 131, devizo: «Popoloj devas fariĝi al centro celantaj eroj...».
- XV. — Premio de Pastro Josep Puig: Ne konkursita.
- XVI. — Premio de Bauloko «Orión»: Ne konkursita.
- XVII. — Premio de D-ro. Manuel Burch: n-ro. 94, devizo: **Por la XX^a**; Mencio: n-ro. 86, devizo: «Ĉiam antaŭe kaj antaŭen».
- XVIII. — Premio de S-ro. Josep M.^a Iglesias: n-ro. 58, devizo: **Amb la llum del teu mirar has omplert la meva vida**.
- XIX. — Premio de «Ĥora Societo»: Ne konkursita. Konsente kun la donacinto, oni aljuĝas la premion al la verko n-ro. 114, devizo: **Ĉu la muziko efektive malkaŝas nian animon?**
- XX. — Premio de S-ro. Josep Callís.
- XXI. — Premio de S-ro. Josep Corominas.
Grupigitaj tiuj ĉi premioj kaj aljuĝitaj jene:
XX. — al n-ro. 70, devizo: **Kio en la koro sidas, la vizaĝo perfidas**.
XXI. — al n-ro. 71, devizo: **Plej granda potenco kuŝas en la komenco**.
Unua mencio: n-ro. 83, devizo: «Polvo kaj ombro ni estas»;
Dua mencio: n-ro. 46, devizo: «Tagiĝas en la mondo».
- XXII. — Premio de Ekscelenca S-ro. Joan Ventosa i Calvell. Duonigita inter la verkoj, n-ro. 107, devizo: «**Historio**» kaj n-ro. 103, devizo: «**Laboremo**». Mencio: n-ro. 104, devizo: «**Kredo**».
- XXIII. — Premio de la grupo «Paco kaj Amo»: n-ro. 44, devizo: «**Kiu amas sian kunhomon amas Dion**». Unua mencio: n-ro. 96, devizo: «Multaj idiomoj: milito! unu lingvo: paco!»; Dua mencio: n-ro. 57, devizo: «Por la bono ne ekzistas nacia limo».
- XXIV. — Premio de la grupo «Ĝerona Espero»: n-ro. 78, devizo: «**Radio per Esperanto**». Mencio: n-ro. 110, devizo: «Per flugiloj de subtila etero...»
- XXV. — Premio de S-ro. Ivan H. Krestanoff.
- XXVI. — Premio de S-ro. Narcís Massagué.
- XXVII. — Premio de la grupo «Lumon».
Grupigitaj tiuj ĉi premioj kaj aljuĝitaj jene:
XXV. kaj XXVI. al n-ro. 24, devizo: «**Mieux vaut tard que jamais**».
XXVII. al n-ro. 105, devizo: «**Ruzo**».
Mencio al n-ro. 51, devizo: «Vian mizeron fabeligu»

- XXVIII. — Premio de «Agrikultura Sindikato»: n-ro. 23, devizo: «**Tragedio**»; Unua mencio: n-ro. 18, devizo: «Merlin»; Dua mencio: n-ro. 97, devizo: «Hanibalo kaj Scipiono»; Tria mencio: n-ro. 6, devizo: «Amiko fidela, trezoro plej bela»; Kvara mencio: n-ro. 47, devizo: «Mi riskis ĝin»; Kvina mencio: n-ro. 111, devizo: «En la moudon venis nova sento».
- XXIX. — Premio de D-ro. Ramon Torres i Carreres: n-ro. 124, devizo: «**Atakema**». Mencio: n-ro. 95, devizo: Ĉiam antaŭen — Zaaz».
- XXX. — Premio de D-ro. Sennomulo: n-ro. 17, devizo: «**Vojaĝanto**»; unua mencio: n-ro. 99, devizo: «En la infero de l' milito»; dua mencio: n-ro. 74, devizo: «La okuloj perfidas la animon, sed ne ĉiu scias en ili legi»; tria mencio: n-ro. 88, devizo: «Glis»; kvara mencio: n-ro. 121, devizo: «Paŝo post paŝo», titolita: «Adigaj proverboj».
- XXXI. — Premio de S-ro. Esteve Rossell: n-ro. 79, devizo: «**Memorare novissima tua...**»
- XXXII. — Premio de S-ro. Joaquim Trias.
- XXXIII. — Premio de S-ro. Francesc Trias.
- Grupigitaj tiuj ĉi premioj kaj aljuĝitaj jene:
- XXXII. — al n-ro. 109, devizo: «**Tales of the Crusaders**».
- XXXIII. — al n-ro. 120, devizo: «**Ni hi són tots els que ho són, ni ho són tots els que hi són**».
- Unua mencio al n-ro. 100, devizo: «En la sankta nokto»; Dua mencio: n-ro. 133, devizo: «Vintra suno»; Tria mencio: n-ro. 89, devizo: «Kio estas la plej dolĉa? La Dormo».
- XXXIV. — Premio de S-ro. Esteve Monegal: n-ro. 37, devizo: «**Lingvo estas fosilia historio**»; Unua mencio: n-ro. 81, devizo: «Kiu deziras efikon, tiu uzu rimedon»; Dua mencio: n-ro. 28, devizo: «Modesta konsilanto»; Tria mencio: n-ro. 102, devizo: «Babilado»; Kvara mencio: n-ro. 122, devizo: «La bonuloj estas ĉiam la gajuloj krom pro malbonŝanco»; Kvina mencio: n-ro. 65, devizo: «Malŝagulo».

Laŭ la dua regulo de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj aŭ menciitaj fariĝas propraĵo de la institucio, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «KATALUNA ESPERANTISTO» aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Eventuale oni petu al la Redakcio de «KATALUNA ESPERANTISTO» permeson por reprodukto.

Majo 1926. — D-ro. Edmond Privat, *Prezidanto*; Joseph Berger; Josep Rosselló; Josep Gener, Artur Domènech; Josep Ventura, *Sekretario*.

Sciigo. Oni informas nin ke la laŭreato per la Naturo Floro estas la talenta kaj batalema pioniro S-ro. Teodoro Jung el Horrem bei Köln (Germanujo) al kiu ni sendas de ĉi tie nian plej sinceran gratulon pro lia venko. Li bonvolis elekti kiel Reĝinon de la Festo la ĉarman kaj distingindan fraŭlinon *Mercè Burch de Barraquer*, filino de D-ro. Manuel Burch, posedanto de Banloko «Orion» en nia kongresurbo. Ni prezentas ankaŭ al ŝi, tiamotive, nian fervoran gratulon kaj la esprimon de niaj respektoplenaj salutoj kaj komplimentoj.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

§ 14. La regulformeco estas sekvo de la ekonomia principo. Estas pli facile sin orienti en urbo kun rektaj stratoj paralelaj aŭ radiecaj, ol en kurbostrata urbo. Estas pli facile lerni kaj uzi nian nombraron ol la francan aŭ la rusan. La reguleco en formoj plaĉas ankaŭ al la estetika instinkto, kiel plaĉas simetrio kaj ritmo, en desegno kaj sonartoj.

Zamenhof celis atingi simetrian regulecon en sistemo da rilataj vortoj ekz. anstataŭ hindeŭropa serio da pronomoj: eĝ (me) tu (te) i (iti) noŭs (mes) vus (tes) oni (onti) svo (se) li starigis pli simetrian: *mi ci ti ni vi ili si*.

Anstataŭ *ci* ni atendus *ti*, sed lasta formo estis necesa por alia serio: tio, tia, tie,...

Por kompletigi la pronomojn Fauvart-Bastoul proponis aldoni *iŝi* apud *ŝi*.

En la unua lernolibro 1887 ekzistis: *kian, tian, ian*,... kun senco: kiutempe, tiutempe,... la unuaj adeptoj tuj rimarkis neoportunecon de tiu serio, kies formoj koincidis kun akuzativo de *kia, tia, ia*,... Tial Zamenhof proponis ilin ŝanĝi je la nunaj *kiam, tiam, iam*, ĝi estis unua ŝanĝo en la primitiva Esperanto.

Inter ceteraj neregulaĵoj, facile korekteblaj, ni povas konsideri radikon *ĉi*, kiu havas duoblan uzon: en la serio *ĉio, ĉia, ĉiu*,... kaj en la serio *ĉi tio, ĉi tia, ĉi tiu*,... Plej simple estus ĝin lasi en la unua serio, alpreninte por la dua: ce tio, ce tia, ce tiu,... Tiu proponata *ce* estas neokupita elemento, sufiĉe internacia: franca *ce*, latina *ecce, hīce*, ukraina *ce*, irea *ce*, eola *ke*, slava *se*, kartvela *ese*. Eĉ estus racie starigi la duan serion jene: *ceo, cea, cee, ceu*,... rezervinte simplan *ce* por rilatuzo: *ce libro, ce homo*,... Alia neregulaĵo estas en duobla uzo de *kiu*, kiel nomo de persono kaj kiel rilata pronomo:

Kiu iris? Iris homo.

Homo, kiu iris, estas pala.

Kio falis? Falis pomo.

Pomo, kiu falis, estas ruĝa.

En estonta Esperanto kredeble oni uzos *kiu* nur por persono, alpreninte por la dua rolo pli simplan *ki*:

Kiu iris? Iris homo,

Homo, kiu iris,...

Kio falis? Falis pomo.

Pomo, ki falis,...

Fine, ni ne havas kompleta la serion: alio, alia, alie,... Tial, por diri «aliu» oni ŝanceliĝas inter *alia*, *aliulo*, *alia homo*, kc. Sed same kiel *tia*, *kia* ne povas signifi: tiu, kiu, ankaŭ la alia ne povas signifi: aliu. Pri multaj ne-regulaĵoj nin atentigis s-ro Wüster en siaj prilingvaj artikoloj, ekz. pri uzaĉo de prepoziciaj konjunkcioj.

En nomoj de bestoj ekzistas alispeca nereguleco; laŭ la fundamento ni havas:

vira ulo	ina ulo	neŭtra ulo
?	hundino	hundo
?	bovino	bovo 1
bovo 2	bovino	?
kapro	kaprino	?
ŝafo 3	ŝafino	?
?	ŝafino	ŝafo 4
koko	kokino	?
kato 5	katino	?
?	katino	kato 6
?	ĉevalino	ĉevalo 7
ĉevalo 8	ĉevalino	?
?	anserino	ansero
?	anasino	anaso

1. laŭ la franca, angla, germana traduko.
2. laŭ la germana, rusa, pola.
3. lau la franca, rusa.
4. laŭ la franca, angla, germana.
5. laŭ la rusa, pola.
6. laŭ la franca, angla, germana.
7. laŭ la franca, angla, germana.
8. laŭ la rusa, pola.

En uzado de pronomoj ankaŭ ne ekzistas reguleco. Pri tiu uzado ni povas konsulti opinion de Zamenhof en liaj «Lingvaj Respondoj»: «La pronomoj *li* kaj *ŝi* estas uzataj nur por personoj. Se ni tamen, parolante pri objektoj aŭ bestoj, volas esprimi difinitan sekson (viran aŭ virinan), tiam ni povas uzi *li ŝi*.» (1892). «Kiam oni parolas pri bestoj, mi konsilas ĉiam uzi nur *ĝi*... eĉ en tiaj okazoj, kiam ni parolas precize pri la sekso de la besto.» (1908). «Parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj... ni uzas la vorton *ĝi*. Tiel same ni parolas ankaŭ pri *persono*.» (1893). «Kiam ni parolas pri homo (kaj infano) ne montrante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon *ĝi*. Sed ĉar la vorto «*ĝi*» enhavas en si ion malaltigan kaj por la ideo de *homo* ĝi estus iom malagrabla, tial mi konsilas al vi uzi por *homo* la pronomon *li*.» (1907). Post Zamenhof ni nenion novan tiurilate akiris, kaj la uzado de tiuj pronomoj ĉiam estas lasita al libera bonvolo de ĉiuj lingvuzantoj.

§ 15 Ekzistado de sinonimoj (samsignifaj vortoj) ankaŭ kontraŭas la principon de unusigneco. Oni distingas du specojn da sinonimoj: proksimumaj kaj perfektaj. La proksimumaj sinonimoj prezentas tre similajn, sed ne tute identajn, signifon, ekz. instrui kaj lernigi, eta kaj malgranda, kolonelo kaj regimentestro, mondo kaj universo. La perfektaj sinonimoj prezentas unu saman signifon, ekz. evolucio = evoluo, idiomio = dialekto, kirŝo = ĉerizbrando, vermuto = absintaĵo, likva = fluida, deismo = diismo, letono = latvo, kroatino = korvato, hungaro = maĝaro, malgrandruso = akraĵonono, ktp. Studo de naciaj lingvoj montras, ke en unu matura lingvo, en unu ĝia momento, ne povas ekzisti en komuna uzado du samsignifaj vortoj. La perfektaj sinonimoj do povas ekzisti nur dise, en malsamaj tempoj aŭ en diversaj lokoj. La vortaroj, kiuj entenas diversfontan materialon, prezentas ofte grandan kvanton da perfektaj sinonimoj.

En nuna, provizora kaj prepara, periodo de Esperanto ekzistas tolerataj multaj sciencaj kaj teknikaj radikoj, kies perfektaj sinonimoj estas la kunmetaĵoj. Poste, kiam nia lingvo definitive akceptiĝos, ni ne plu bezonos la sciencodevenajn vortojn, kaj ili nature iom post iom malaperos el la komuna uzado, simile je la helpa trabaro kiu servas dum la konstruo de domo, kaj kiun oni forigas, kiam la domo estas finkonstruita.

P. STOJAN L. K.

(daŭrigota)

Pro... kaj Por...

La verkaĵo «Pri Amo», subskribita de Ed. Wiessenfeld, aperinta en nia marta numero, estas originala de la fama hinda poeto R. Tagore.

Jaume Pruna. Jen nomo de kunfederaciano modestega, kiu tamen bone servas al nia celo. Plej malgranda ekstera organiza ŝango aŭ novaĵo kiun li ekscias estas de li tuj komunikata al ni por evitigi erarojn de nia Federacio aŭ por informado al nia gazeto. Li, kiu ne akceptas noman honoron aparteni al nia Komitato, bonvolu hodiaŭ akcepti publikan esprimon de nia dankemo kaj simpatio.

Helpu progresigi Esperanton ĉe blinduloj, sendante ĉiuspecajn naciajn kaj internaciajn blindulaĵojn, precizajn informojn kaj statistikojn pri la blindula stato en via lando, por Tutmonda Porblindula Ekspozicio (aprilo-majo 1926 en NewYork kaj en aliaj gravaj urboj de Usono), adresante ĉion al Prof. J. Benšahar, President, World Union of Associations for the Blind, Inc., 455 W. 42nd Street, NewYork City, Usono.

Via Devo - Grava — Se vi aŭdas senpere aŭ per viaj lokaj radio-stacioj la staciojn de Anglujo, ni petas vian helpon subteni petskribon, kiun ni sendas al la Brita Brodkasta Kompanio, por instigi ilin fari brodkastojn en aŭ pri Esperanto. Skribu leteron al tiu Kompanio, esprimante viajn dezirojn tiurilate, kaj montrante kiom utile estus, ke la anglaj radiosendaĵoj tiel trovu pli vastan komprenantaron. Kelkaj minutoj sufiĉos, sed la servo estos granda. Adresu al 5XX, ĉe Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, London, W. C. I., Anglujo.

«Esp. Klubo Palma», la vigla centro de nia insulara movado, organizas ekzamenojn por la lernantoj, en Palma de Mallorca. Nia konata pioniro N. Boŝill, granda paca batalanto kaj lerta profesoro de nia lingvo internacia, kaj la komitatanoj de la Klubo S-ro. Rosselló kaj Pastro Font konsistigas la tribunalon. Estas certe granda sukceso por la profesoro kaj lernantoj. Ni antaŭe gratulas ilin, kaj ĝoje memoras ke niaj balearaj samideanoj organizas de antaŭ kelkaj monatoj karavanon por ĉeesto al nia Kongreso en Santa Coloma.

«Nova Sento», la plej riĉa grupo esperantista en nia lando, vigle malvolviĝas en proletara kvartalo de Barcelona, kie ĝi organizas instruajn paroladojn, kursojn de Esperanto k. a. — En la programo de ĝiaj proksimaj okazigotaĵoj estas kurso sub gvidado de nia amiko A. Domènech, kaj karavano al Santa Coloma por ĉeesto al nia Kongreso.

Nia malnova ĉiam vigla Societo «Paco kaj Amo» publikas bulteneton. Laŭ la aprila numero ties samideanoj organizas karavanon al Santa Coloma de Farnés, okaze de nia Kongreso. — La malnova ano de «Paco kaj Amo» kaj kara samideano Masachs revenis al Barcelona kaj ricevis multajn simpatiesprimojn. Bonvolu la nian sinceran ankaŭ akcepti.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

18-a Universala Kongreso de Esperanto

kaj

Internacia Somera Universitato

EDINBURGO — 31 Julio ĝis 7 Aŭgusto 1926 — EDINBURGO

Adreso por leteroj. — Sekretarioj, 18-a Kongreso de Esperanto, EDINBURGO, Skotlando.

Aliĝiloj. — Nericevintoj bonvolu peti aliĝilon rekte de la sekretarioj.

Kotizo. — 20 ŝilingoj Britaj = proksimume 20 Ger. Rmk., 25 Svis. fr., Nederl. guld., 5 Uson. dol. Oportuna maniero sendi la kotizon, estas per Brita ŝtatbileto por L1 ("currency note, one pound"), havebla ĉe bankoj en multaj urboj, kaj sendota per registrita (rekomendita) letero; aŭ per ĉeko por L1 : 0 : 3.

Garantia Kapitalo. — Jam garantiita L266.

Donacoj ricevitaj. — Por ordinara Kaso L39.

Por Blindula Kaso L13 (Kaso por ebligi blindulojn partopreni la Kongreson). Por Speciala Celo L60: de du malavaraĵ samideanoj, sub la ĉifra devizo, "Smizropga tivüüt hahome un ĉosopjuh".

La unua solvonto de tiu ĉifro ricevos de la donacintoj senpagan kongreskarton.

Somera Universitato (Senpage por ĉiuj Kongresanoj). — Al la listo de paroladoj donita antaŭe oni aldonu sub "Folkloro kaj Popolaj kantoj": — *Katalunaj*: S-ro Jaime Grau Casas; kaj *Hispanaj*: S-ro. Julio Mangada Rosenorn. S-ro. Andreo Ĉe prelegos pri "La rekta metodo en la instruado de Esperanto. Por kursgvidantoj" anstataŭ pri la temo anoncita antaŭe.

Fakaj Kunvenoj. — Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn. Ĝis nun malmultaj anoncis.

Oratora Konkurso. — Konkursontoj bonvolu avizi pri siaj intencoj partopreni.

Tramveturoj. — La L.K.K. sukcesis fari finanĉan arangon, laŭ kiu ĉiu Kongresano povos uzi senpage dum la Kongresa periodo, ĉiujn Edinburgajn tramveturilojn, kaj urbajn omnibusojn.

Mendiloj por Loĝado, k.t.p. — Nericevintoj bonvolu peti mendilon rekte de la sekretarioj.

Kongresa Fotografiĝo. — Okazos mardon, 3 Aŭgusto.

Kongresarangoj. — Aldone al informo citita antaŭe, la L.K.K. nun plezure anoncas, ke la internacie konata fortepianisto, S-ro Jean Baptiste Toner, ludos solaĵojn ĉe dimanĉa koncerto.

Akcepto ĉe Britaj Havenoj. — Kongresanoj irontaj al iu el la jenaj havenoj, anoncu al la respektive nomataj samideanoj, sufiĉe longe antaŭtempe, la daton de alveno, por ricevi dum la trapaso ian helpon bezonatan.

LONDON London Congress Committee, c/o British Esperanto Association, 17 Hart Street, London, W.C.1.

DOVER S-ro W. Chitty, 51 Park Avenue, Dover.

FOLKESTONE S-ro J. S. Clough, 62 Guildhall Street, Folkestone.

GLASGOW F ino Yuille, 32 Minerva Street, Glasgow, C. 3.

GRIMSBY S-ro W. M. C. Nowell, 194 Farebrother Street, Grimsby.

HULL S-ro A. E. Hepton, 89a Grafton Street, Hull. S-ro F. W. Coulson, ĉe ŝipkompanio, "Wilson Line", Hull.

LIVERPOOL S-ro J. D. Applebaum, 11 Mayville Road Mossley Hill, Liverpool.

NEWCASTLE S-ro A. R. Fairbairn, 21 St Mary's Terrace, Ryton-on-Tyne.

SOUTHAMPTON S-ro R. N. Bruton, 14 Suffolk Avenue, Southampton.

La dek devoj de la Esperantisto laŭ U. E. A.

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.

2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

3. La plibonigistoj diskutu: vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu.

4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.

5. Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravaĵon.

6. Verkante en Esperanto, ne kedu interesa, kion nacilingve ne niu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu.

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U. E. A.

9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10. *Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.*

La Kataluna Esperantista Federacio estas la ĉefa organizo de nia movado, en la katalunlingva teritorio kaj la unika kiu subtenas la centran Komitaton kaj la Konstantan Reprezentantaron, oficialajn internaciajn Instituciojn de la Esperantistaro. — Via aliĝo al nia Federacio estas plej efika.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

CHESTERTON, eminentissim homo stultus, homo stultissimus, ignorant de l'Esperanto, en la sessió del P. E. N. Club de Catalunya a son honor, digué unes quantes nícieses sobre la llengua internacional. Després de recomanar al gros paradoxista anglès «L'homme stupide», editat per E. Flammarion, 26, Rue Racine, París, de l'honest coneixedor de l'Esperanto Charles Richet, distingit amb el Premi Nobel per a la Ciència, li aconsellem de reflexionar tot el substanciós article «Una Llotja en el Circ», del nostre amic JOAN SACS, publicat a «La Publicitat» del 15 juny, motivat per la vinguda de Chesterton a Barcelona, que diu entre altres consideracions: «Cal saber veure al primer cop d'ull la falàcia; cal no deixar-se enllepolir massa per l'humorisme que condimenta freqüentment la literatura paradoxista. Aquesta és la condició de l'asaboriment d'aquest gènere literari imposat pels escriptors anglesos, aquesta literatura que els mateixos anglesos han anomenat «fiction». Perquè el paradoxisme anglès és, més que filosofia, un gènere de «fiction», més curtet, però més intel·lectualista que la novel·la, gènere propi per a magazines, diaris i revistes d'amena intel·lectualitat.

L'humorisme que assaona el paradoxisme està ja molt lluny de l'«humour»; perquè l'«humour» volia dir moltes coses substancioses, mentre que el paradoxisme cerca justament a desdir coses substancioses i a substituir-les per una mixtificació. L'humour extreia de la vida la paradoxa vivent i la matava, o bé en matava el verí. El paradoxisme posa una paradoxa d'invenció i la fa empassar al públic babau». Si el paradoxista aconsegueix de fer empassar la seva gratuïta paradoxa a un públic que s'estima cultivat, aleshores l'ensarronador podrà estar content del seu propi talent. — Però, i si aquest triomf prové d'una curtedat de gambals del seu públic, qui podrà estar content aleshores?»

La bone konata kaj en ĉiuj landoj uzata

BES - Adresaro

de esperantistoj el ĉiuj landoj
aperos denove — jam en 6-a. eldono — aŭtune 1926.

ALIĜU SENPROKRASTE!

Simpla aliĝo 0.25 fr. sv, aliĝo kun adresaro 0.50 sv. fr, publikigo de portreto 0.50 sv. fr, anonca linio 0.25, 1 sv. fr. = 1.20 pes.

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

Moravany v. Ĉ.

Ĉeĥoslovakujo

APUDMARA RENKONTEJO ESPERANTISTA

(CANNES, CÔTE D'AZUR, FRANCUJO)

Jam antaŭ unu jaro, en la Franca Esperantista Kongreso de Clermont-Ferrand, S-ro André Moussier el Vienne Isère Francujo, esprimis al kelkaj samideanoj ideon organizi «Apudmaran Renkontejon» (La Plage Esperantiste).

Provizora Komitato starigis sub la Prezidanteco de S-ro G. ROY, delegito UEA en Gaillac s/ Tarn. S-ro Cresp, delegito UEA en Cannes konsentis igi sekretario. Donacemaj samideanoj disponigis al komitato monon por aranĝi tiun someran renkontejon en Cannes.

La entrepreno ne estas komerca. Ĝia principo estas «Unu por ĉiuj, ĉiuj por unu».

De kelkaj jaroj, Cannes fariĝis somera marbordo. Ĝia temperaturo en Aŭgusto ne superas 28 gradojn C. La marbordo estas el maldika dolĉa sablo. Amuzaĵoj: Teniso, ŝipkurado, banoj, urba muziksocieto de 50 ludantoj. Ekskursoj piede, vagonare kaj aŭtomobile.

Organizita servo por la vizito de la proksimaj urboj, insuloj, montoj. Esperantista ĉambrego por kunveni, babiladi, muzikadi.

Holtago de 25 francaj frankoj. Rabato laŭ la daŭro de la restado. Jam sin enskribigis kelkaj samideanoj por la semajno 22-28 Aŭgusto kiu estos la «Esperantista Semajno».

Pri informoj demandi Sinjoron Ch. Cresp, 14 Rue du Docteur Gazagnaire CANNES. Alpes Maritimes. Francujo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH JOFRÉ

La XIII^a Kongreso de K. E. F. Santa Coloma de Farnés — Majo 1926

Sukceso: pro entuziasma akcepto kaj festeno, pro paca interparolado kaj decido pri utilaj aferoj; pro solenaj Floraj Ludoj, pro beleco de Reĝino kaj korteganinoj, pro ĉeesto de la ĉefa premiita poeto, pro ĉiuj detaloj, agrablaj, favoraj, kaj neniu malplaĉa, kontraŭa.

Ĉeestas la fama organizinto de nia Kongreso en Palma de Mallorca, la Reĝino de la Xlaj Floraj Ludoj, kaj ĉiuj pioniroj de nia movado en nia teritorio. La urbestro de Santa Coloma estas malnova samideano kiu elokvente alparolis la kongresanojn en Esperanto. Ankaŭ urbkonsilanto de tiu ĉarma urbeto estas malnova kara samideano.

En la laborkunsidoj ĉiuj partoprenantoj flue kaj korekte diskutas en Esperanto honore al nia internacia lingvo kaj al ĉeesto de nia fama samideano Direktoro de «Heroldo de Esperanto» — Bedaŭrinde ambasadoraj baroj malebligis la ĉeston de nia hungara kamarado en Paris, S-ro. Jozefo Major.

La fondo de Kataluna Esperanto-Instituto, la nomigo de Delegito de K. E. F. por ĉiu urbo kie estas esperantistoj, la nomigo de du voĉdonantoj de la Komitato de K. E. F. por la katalunlingva teritorio Baleara, ekzamenoj pri kapableco kaj profesoreco de Esperanto, kaj aliaj efektivajoj estas pruvoj pri la vigleco de nia movado, pri la efiko de nia Federacio, pri la sukceso de nia Kongreso en Santa Coloma de Farnés,

Popola akcepto

La lernantaro de la publikaj lernejoj de Santa Coloma orde staras sur la vojo por akcepto al la kongresanoj. Atende al ni estas ankaŭ en la stratoj de la urbo publiko, popolo. Inter ni estas standardoj de kelkaj Grupoj el Barcelona kaj aliaj urboj, kaj agrable, ĝoje renkontiĝas ĉe la alveno malnovaj samideanoj kaj pioniroj eĉ el Palma, eĉ el Horrem bei Köln. Petas por silento organiza komitatano, kaj salutas nin per kanto de «La Espero» la nomita lernantaro. Ni kore dankas per aplaŭdo kaj piediras tra la urbeto al la Urbodomo kie okazas:

Oficiala akcepto

La Urbestro, malnova batalanto por nia Movado, en la nomo de la urbo bonvenige salutas nin per elokventa kaj korektega Esperanto. Katalune danke respondas la Prezidanto de K. E. F. en la nomo de la kongresanoj, kaj nin salutas la poeto-reĝo de la XIIaj Floraj Ludoj, elveninta el sia lando, nia germana amiko Teo Jung, per la jenaj frazoj:

«Tre estimataj gesamideanoj, karaj kunbatalantoj por nia granda ideo!

Mi havas la honoron saluti vian Dektrian Kongreson en la nomo de *Germana Esperanto-Asocio*, de *Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo*, de *Esperantista Literatura Asocio* kaj de la redakcio de *Heroldo de Esperanto*.

Volontege mi sekvis la afablan inviton de la komitato de via Kongreso kaj ĝoje alrapidis de la ĉarmaj bordoj de l' Rejno trans la vastajn kamparojn de Francujo kaj trans la Pireneajn montgigantojn al via bela Katalunujo por partopreni vian Kongreson kaj viajn Internaciajn Florajn Ludojn en tiu ĉi admirinde lokita urbeto.

Mi ĝojas, ke mi nun povas persone konatiĝi kun la anoj de tiu popolo, kun kies animo mi jam konatiĝis per la verkoj de viaj famaj poetoj tiel majstre interpretitaj de via samnaciانو s-ro Grau Casas en la *Kataluna Antologio*, kiu estas ĝis nun unika verko en la traduka Esperanta literaturo kaj kiu povos servi kiel modelo por ankoraŭ sekvontaj antologioj de aliaj nacioj.

Jam antaŭ du jaroj vojaĝinte en la Sudo de Eŭropo, en Dalmacio kaj Italujo kaj sur la Adriatika Maro, kiom mi sopiris revidi kaj ree ĝui, enmeze de kara samideanaro, la senmakulan bluecon de la suda ĉielo, la same intensan bluan de l' vasta Mediteraneo, kaj la varman, ĝojon portantan sunon! Dank' al via afabla invito, karaj gesamideanoj, kaj dank' al via komplezemo mia sopiro nun estas plenumata: Ree volbiĝas super mi la bela blua ĉielo kaj ree min karesas la varma suno de l' sudo. Tio donas al mi ĝojon kaj feliĉon, kaj la saman ĝojon kaj feliĉon mi legas ankaŭ en viaj okuloj.

Vi ja kunvenis por kongresi pro nia alta idealo, pro nia kara *Esperanto*; vi kunvenis por renkonti ĉi tie amikojn kaj samideanojn, por reciproke preni viajn manojn, por interŝanĝi viajn pensojn kaj ideojn, por elŝuti vian

koron plenan de idealismo kaj altaj sentoj, por entuziasmigi unu la alian kaj entuziasmiĝi unu je la alia kaj por, post la Kongreso, disiri kun *nova fervoro*, nova kuraĝo, nova forto kaj kun la firma volo, daŭrigi la bataladon por nia grandioza, kulturprogresiga ideo, ĝis la fina venko estos atingita!

En tiu senco mi deziras al via Kongreso grandan sukceson!»



Malferma Kunsido

En la ĉefa salono de la urbdomo okazas ankaŭ la unua kunsido de nia Kongreso. Kiel tradicie la Prezidanto legas raporton pri la funkciado de K. E. F. en la lasta interkongresa periodo. Jen la

Raporto de la prezidanto de K. E. F.

«Superflua estus nuna detalado pri nia agado en la lasta periodo de nia Federacio, pri la antaŭa Kongreso en Palma, neforgesebla, nesuperebla, por kies heroo mi proponas ke ni ĉiuj esprimu en ĉi-tiu feliĉa okazo rehavi lin kun ni, simpatian kaj dankemon per forta ĉies aplaŭdo, — ĝis hodiaŭ. Laŭ la aferoj estas direblaj sub la nuntempa reĝimo, ili estas diritaj en nia gazeto. Mi simple akcentos kaj memorigos kelkajn faktojn, kiuj tion meritas.

La nova organizo de K. E. F., la fervoro, la oferemo, kaj la lerteco de miaj kunkomitatoj, la favoraj por Esperanto postmilitaj cirkonstancoj kaj atmosfero k. c. permesis al nia Federacio efektivigi solidarecon kaj fortikecon de nia movado en nia teritorio, unuigi la elementojn subtenajn necesajn por la granda verko de la Katalunlingva esperantistaro, por la glora Kataluna Antologio, por kies kompilinto kaj ĉefverkinto Jaume Grau Casas ni devas nun danke aplaŭdi. Ni atingis sendeficitan situacion de K. E. F., kaj eĉ devis kaj povis, *lecionige, hontige* por nia malamika iu, pagi monpupon, pro... kaj por... ni tion siatempe dece klarigos. Ni ne plu povas diri pri tiu afero hodiaŭ.

Fakto vere rimarkinda estas la nuna graveco de la Kataluna Esperantista Federacio, ne nur por nia teritorio, sed ankaŭ por la Universala Movado; Ĉirkaŭ tridek kvin subtenantoj estas en la Mondo por la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado — nia Federacio estas unu el ili. Estas ĉirkaŭ 15 pagantaj membroj de la Konstanta Reprezentantaro de la Esperanto-Movado — Nia Federacio estas unu el ili. Estas en Esperantujo pli malpli dudek regulaj korektaj esperantaj gazetoj — *Kataluna Esperantisto* estas unu el ili. Ĉiujaraj naciaj gravaj kongresoj okazas multaj — la nia estas el la plej sukcesaj kaj solenaj. Konkursoj por literatu-

raĵoj estas provitaj kelkaj en Esperantujo—konstanta, plej internacia, plej fruktodona pruviĝis unu: la Floraj Ludoj.

Raportoj pri nia centra internacia Movado atestas pri la reprezentiteco de K. E. F. en ĉiuj.

Karaj K. E. F-anoj, Grupoj kaj amikoj, ĉu K. E. F. ne laboras por Esperanto plej vigle? Aldonu ankoraŭ ke tion kaj plu ni faras sen favoro de registaroj kaj eĉ monpunigitaj kaj kalumniitaj de sin nomantaj samideanoj, kiujn ni ne malamas sed kompatas. Kompatindaj estas la homoj kiuj per unu klopodo defendas esperantismen, kaj per alia kontraŭstaras esperantismen. Sed rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, ni iras la vojon celitan.

Aproboj kaj laŭdoj de samideanoj hispanlingvaj kiuj konas nin kaj nian agadon, certigas pri nia deca agado rilate al la hispanlingva samideanaro. Aproboj kaj laŭdoj de ĉiulandaj samideanoj kiuj vidis nian laboron certigas pri ĝia deca en la ĝenerala Movado.

Mi devas nun laŭdi kiel esperantisto la kunlaboron de la urbestro de Santa Coloma, kiu ĉiam estis amiko de K. E. F., kaj en la nuna okazo li tion evidentigis de sia aŭtoritateco en tiu ĉarma urbo per efektiva helpo al la Loka Komitato de la nuna Kongreso. Laŭdegon meritas la membroj de la Loka Komitato, kies tasko silenta, longa, humila estus neelportebla de samideano ne tre fervora.

Dum la pasinta periodo la Direkta Komitato de K. E. F., malgraŭ kelkaj individuaj laciĝoj aŭ faletoj aŭ devigaj foriĝoj, alvenis la finon proponinte publike per nia gazeto helpon al ĉiuj Grupoj, kaj plenuminte la proponon por ĉiuj kiuj akceptis ĝin. Eksterkomitate efike helpis nin la kamaradoj S. Alberich, D-ro. Bartomeu, Valdepeñas, Bofill, Comadran, Ratés, Pastro Casanovas, D-ro Bremon, Artur Domènec, Santamarina, D-ro. Torres Carreras, D-ro. Figuerola, D-ro. Orriols, Pruna, k. a. Publikan dankon al ĉiuj.

Nun ĉesos kelkaj aŭ ĉiuj lastperiodaj komitatanoj de K. E. F., laŭ ĉies ebleco, kaj laŭ volo de la kongresanoj membroj rekte de K. E. F. aŭ de Grupo apartenanta al K. E. F. — Nun vi aprobu aŭ malaprobu nian taskon en la responda Kunsido. Eĉ admonu kuraĝe, libere, tiun aŭ tiujn komitatanojn kies agado ne plaĉis al vi; sed ne konfuzu la Komitaton kun la Federacio. La Federacio estas vi kaj ni. La Komitato estas personoj iuj aŭ aliaj. La Federacio estas la necesa organizaĵo por la defendo kaj venko por nia sankta afero en nia lando. Amo al nia idealo gvidu nian kongresan laboron».

Salutoj kaj Delegitoj

Telegramo de F-ino. Palmira Castellví.

» » "Paco kaj Amo"

» » "Empordanaj Ebenaĵoj".

Letero de la Provinca Deputitaro sciiganta pri subvencio da 200 ptoj. por la Kongresaj elspezoj.

S-ro. Bofill salutas reprezente de la jenaj Grupoj balearaj:

«Esperantista Klubo Palma»

«Esperantista Grupo Sollerica»

«La Verda Stelo» el Consell

«Bela Espero» el Binisalem.

kaj «Esperantista Grupo» el Capdepera.

S-ro. Capdevila, reprez. de «Barcelona Stelo»

S-ro. Valdepeñas » » «Barcelona Esperanto-Societo»

F-ino. Maymí » » «Girona Espero» el Girona

S-ro. Prat, » » «Bela Espero» el Manresa

Pastro Font-Giralt, » » «Studenta Juneco» el Girona

S-ro. Valls, » » «Esperanta Nesto» el Ripollet

S-ro. Pernas, » » «Esperanta Burgono» el Rubí

S-ro. Solà, » » «Lumon» el Terrassa

S-ro. Oliver, » » «Aplec» el Sabadell

S-ro. Alberich » » «Paco kaj Amo» el Barcelona

kaj aliaj.

Eksterlandaj salutoj estas ankaŭ multaj: el amikoj de *K. E. F.*; el abonantoj de *K. E.*; el konkursantoj kaj juĝantoj de la Floraj Ludoj; el laŭdantoj de nia agado en Esperantujo, inter kiuj, kiel ekzemplon ni represas tiun de la «Sudslava Esperantista Ligo», el «Zagreb» (Jugoslavio) 11-an de Majo 1926. Kataluna nacia Esperanto kongreso — Santa Coloma de Farnés. — Al la samideanoj, kiuj pli prudente ol iuj aliaj sciis uzi la veran valoron de Esperanto por montri al la profana mondo la trezorejon de sia koro, do al la filoj de popolo vivanta, vivkapabla kaj nepre trovonta sian belan destinton — ni sendas, okaze de via nacia kongreso, niajn varmajn gratulojn kaj aklamojn».



XII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Tiu glora Institucio por la kataluna lingvo kaj por Esperanto, tradicia por la unua kaj ankaŭ por la dua, kiel internacia efektivigata de *K. E. F.* kaj okazigita en la nuna jaro kiel ĉefa solenaĵo de nia Kongreso en Santa Coloma, alvenigis grandan amason en la plej grandan salomon en tiu urbo. Multnombra kaj varia publiko atendis aŭde pri la majesteco kaj soleco de la Florluda Festo. Je la kvara kaj minutoj posttagmeze aperas sur la estrado la aŭtoritatuloj de la urbo kaj de la Kongreso. La urbestro anoncas la komencon de la Festo de Beleco kaj Poezio. Subite emociĝe, ĉiu silentegas, kaj la Sekretario de la XIIaj. Floraj Ludoj, nia talenta samideano el Terrassa, S-ro Josep Ventura, eklegas majstran raporton pri la nunjara Konkursaro. Jen, do, la

RAPORTO DE LA SEKRETARIO

Gesinjoroj!

Kun kia ĝojo kaj feliĉa ekstremo ni venas hodiaŭ al tiu ĉi sanktega nunjara Templo de nia internacia Poezio trinkigi en la varmeta enaero de nia ĉefa jarfesto, nian animon soifantan je amo kaj pureco, el la ĝentila sprucilo de niaj poetoj kaj prozistoj! Kun kia fervoro ni ĉeestas tiujn ĉi momentojn de intima ĝuo, de religia sento por nia kara idealo kiu nin kunigas ĉi tien por eltrinki la mielon de la kantoj de niaj zumantaj orabeloj kaj suprenlevigi por momentoj for de la trenanta mondo en kiu ni travivas! Ho vi, potencaj bardoj kaj ceteraj artistoj de la parolo, per viaj kantoj vi levas nian spiriton al la altaj regionoj de la Beleco kaj Poezio kaj igas nin ricevi ĉielradion meze de l' mallumo de la pasioj kaj malamoj de l' homoj.

Dum tuta jaro vi knedas en via elektita animo la fermenton de novaj konceptadoj, por ilin proponi plej delikate al la esperantista popolo dum la ekflorado de tiu ĉi pompa magnolio de niaj Internaciaj Floraj Ludoj. Kaj vi kantas la vivon tiel dolĉe, kun tia kristala sonoro en nia koro, ke vi nin sorĉas kaj igas nin ami la vivon spite ĉiuj kontraŭaĵoj kaj turmentoj kiuj povus nin, fulmrapide, ĝin abomenigi. Tiajn momentojn, kiel rimarkas fama kataluna poeto, ni volus restigi por eterne en nia koro por ke ili faru nin ĉiufoje pli amindaj kaj bonaj, pli toleremaj kaj respektemaj, pli sinceraj kaj bonfidaj, pli sindonemaj kaj komprenemaj ol ni estas, ke ili farus la miraklon transformi nin en estaĵojn indajn je la teraj glorioj kaj je la ĉiela imperio de Dio. Orfeo malsuprenvenis kun citro el Olimpo por dresi la sovaĝbestojn el la tero: do, la freŝa muziko de viaj liroj, poetoj, tuŝu nian plej profundon dispelante la balaston de niaj malbonaj sentoj, kaj agoj!

La festo de la Floraj Ludoj en nia lando, estis la plej forta bastiono de la kataluna lingvo kaj la plej klara manifestiĝo de ĝia vivpova beletristiko en tiu ora epoko kiam ĉio floris mirinde meze de la reĝaj kortegoj kaj meze de dolĉa nomo kiun nur Libereco povus egaligi. Enkondukita en nian landon de la kataluna reĝo Johano I^a, alnomita la Amanto de Ĝentileco, fine de la XIV^a jarcento, kaj greffita el la Oklingva florlda institucio de Toulouse, ĝi atingis sub la patriarka apogo de tiu reĝo nesuspektitan apogeon kiu transcendis, dank' al la tiamaj katalunaj trobadoroj, al la eŭropaj reĝpalacoj kie ili aŭdigis siajn geniajn produktaĵojn en nia patra lingvo.

Bedaŭrinde, tiu brilanta epoko de la kataluna elflorado ne daŭris tre longtempe, ĉar je la fino de la XV^a jarcento oni spertis la unuajn simptomojn de malrapida sed certa dekadenco de la literaturo kaj de ĉiaj artoj, sciencoj kaj metioj, al kiu dekadenco kontribuis plej ĉefe la trobadoroj mem el la lasta tempo kiuj disiris forlasante sian landon en la orfeco de la plej puraj kolonoj de sia literaturo. Sekvis al tio malaltiĝo de la morala nivelo de la popolo kaj ioma elvaporigo de ĝiaj sanaj moroj kaj tradicioj ĝis kiam la Destino finhakis la landon kaj ŝajne kun tio la vivsukon de la lingvo kiu restis sveninta en la cindroj de l' forgeso kaj malestimo, preta baldaŭ droni

en la mortospasmoj, se la filoj de la lando, ĝiaj adorintoj, reakirinte konsciencon pri si mem, ne venos ame ĝin eltiri el tia situacio.

Kaj jen: la restarigo de la Floraj Ludoj meze de la pasinta jarcento, estis la komenco de nova epoko por la kataluna lingvo, kiu reviviĝis kun forto, dank' al la patra varmo kaj adoro kiujn oferis al ĝi la novaj trobadoroj kvazaŭ ili estus novaj enamigintaj princoj kiuj al militus la karcerkastelon por malensorĉi tie la principinon de siaj plej dolĉaj amoj. Ili sukcesis per siaj kantoj ekforigi la vestaĉojn de sia Cindrulino kaj surmeti al ŝi la brilliantan diademon kaj mirbelan tualeton de princino kiujn majeste ŝi surportas en la nuna tempo.

Se do tia komuniigo inter poetoj kaj popolo, efektivigita de tiaj altaj solenaĵoj, povis tiel efike influi en la renaskiĝo kaj vivpotenco de la lingvo, en ĝia literaturo kaj en la vivo kaj moroj de nia lando, kion do ĝi ne sukcesos atingi por nia kara internacia lingvo Esperanto, se ni daŭrigas okazigante ĉiam pli brile kaj entuziasme ankoraŭ, tiajn spiritaĵajn interluktojn kiuj nin ravas, kaj eĉ ne ĉesas peni ke ili vastigu ekster la limojn de la patra teritorio, por ke, fine, la tuta Esperantujo sentu sin flamigita de tiu sama korinklino al idealo de Beleco kaj Poezio kiu en ni fajras! Kian miraklon ne okazigos al nia internacia Cindrulino tiuj ĉi manifestadoj de poetoj kaj prozistoj kiuj konstante dediĉas al ŝi la raven de siaj geniaj verkoj por enblovi en ŝian artefaritan sed belan korpon la eternan vivoforton kiu ne plu mortas tra la tempoj?

Se nia patra lingvo reviviĝis tiel profunde sub la influo de la Floraj Ludoj, Esperanto, ankaŭ, per ilia starigo kaj regula okazigo, povas plene disvolviĝi kaj triumfi en la fundo de la universala animo.

Oni ne plu diru ke Esperanto ne vivas, ke ĝi ne estas vivpova lingvo. La poetoj kantas kaj vibrigas niajn animojn per siaj ĝojaj kaj malĝojaj sentesprimoj; do, la lingvo vivas kaj ekregas jam mirinde sur la tero.

Se malgranda semo povas produkti arbegon, nia semo, la semo de la Floraj Ludoj kiun ni, katalunoj, ĵetis en la esperantistan mondon, fekundigu tra ĝi kaj kreu la jarcentan arbon de nia internacia lingvo. Kiel bele estus, se ĉiu lando, kompreninte la efikon de nia Festo, unu post alia, proprigus al si la spiriton kiu informas ĝin kaj ekstarigus similajn altarojn al la Diino Poezio kiu tiel superabunde regas la lingvon kaj nin mem! Nia sankta afero antaŭen marŝus kun nesuspektita rapideco kaj ne malfruus la definitiva venko kiun ni arde deziregas ĉar ĉies koroj ekkonsumiĝus en la flamo de ĉio bona, nobla kaj bela, kvazaŭ Dia padonaco por eterne.

Gesinjoroj: Jam estas tempo ke mi proklamu la feliĉan triumfonton en la beletristika turniro kiun ni nunjare organizis.

La poeto favorita de la Muzoj estas la talenta pioniro, S-ro. **Teo Jung** el Horrem bei Köln (Germanujo). Al li la palmo de la gloro kaj la trofeo de la venko!

Li elektis la ĉarman kaj distingindan fraŭlinon **MERCÉ BURCH DE BARRAQUER** el tiu ĉi urbo, por proponi al ŝi la sceptron de Reĝino de la Festo.

Ni sciu riverenci, kiel konvenas, antaŭ Ŝia Moŝto, pruvante ke nia admiro al Ŝi estas senlima kaj ke ni Ŝin akceptas por tia alta posteno kun la pordoj de la koro plenlarge malfermitaj.

(En tiu ĉi momento la aŭtoritatuloj iras akcepti la Reĝinon kaj Kortegani-
nojn ĉe la enirejo de la salono, kaj baldaŭ revenas al la estrado laŭ-
pare kun ili dum orkestro ludas konvenan muzikaĵon).

Adorinda Reĝino

Brilaj Korteganiĵoj

Mi volus posedi la inspiron de Dante por kanti al vi la ekscelencojn de via nobla korpo kiu elspiras la plej ravajn parfumon kaj ĉarmon, sed mi ne estas tuŝita de la Dia graco, kaj mi nur intencos trovi la ĝustajn esprimojn por eldiri al vi la tutan admiron kiun ni sentas pro Via senfina ĝentileco, kaj la profundan dankon kiun ni ŝuldas pro Via bonvolo akcepti la altan postenon al kiu la liro de poeto vin levis. En Via trono de Reĝino, Vi simboligas la bonecon kaj purecon de la homaj sentoj kunfanditaj en la idealo de Beleco kiu estas pano de vivo. Kaj kvankam via regado estas tro mallonga, ĝi fariĝas, pro tiu lingvo por kiu ni klopodas, la plej vasta kaj la plej dolĉa el ĉiuj regadoj, ĉar ĝi regas la tutan esperantistan mondon kaj ne kreas malamojn kaj malpacojn kiel la ceteraj. Al Vi, do, kara Reĝino kaj ĉiuj Korteganiĵoj, la homaĝo de respektoplena saluto kaj danko kiun adore proponas al Vi viaj humilaj vasaloj!

Ekscelencaj aŭtoritatuloj

Distingindaj reprezentantoj

Sinjorinoj kaj sinjoroj!

Kun granda ĝojo ni povis vidi tiun ĉi jaron la gravan nombron da verkoj alvenintaj por partopreni la diversajn konkursojn de la Floraj Ludoj. Ili atingis la n-on. 140, sed fakte ili estas 144, ĉar du devizoj el la listo, la n-roj. 121 kaj 140, entenas respektive kvar kaj du verkojn, kio pligrandigas la nombron ĝis 144.

Efektive, sufiĉe da ili sin montras tre valoraj verkoj, sub kies riĉa stilo kaj brilantaj pensoj oni divenas la lertan manon de eminentaj verkistoj en nia literaturo.

Oni nur povus iomete riproĉi la trolongecon de la plimulto inter kiuj, kelkaj vere atingas rekordon en la historio de niaj Floraj Ludoj. Ŝajnas ke niaj verkistoj baraktas por plilongigi ĉiujare siajn produktaĵojn, kio, se en certaj okazoj estas pruvo de lerteco kaj de pli vastaj konceptadoj de la aŭtoro, en multaj aliaj, estas montro de malforteco karakterizita de difuzeco de pensoj kiujn anstataŭas superabundeco da vervo. Kaj ne ĉiam la pli longaj verkoj estas la plej bonaj. Oni ĉiam memoru ke koncizeco estas unu el la plej ŝatataj kvalitoj en verkado.

Ĉe la aljuĝo ni povis konstati kun bedaŭro, la malgravecon de la premioj proponitaj, kio malebligis al ni dece premii kelkajn verkojn meritan-

tajn pli grandan kompenson. Malgraŭ tiu cirkonstanco, la verkoj alfluis el 15 malsamaj nacioj, en nombro kaj kvalito vere rimarkindaj.

Tiu nombro estiĝas la plej alta atingita de ĉiuj antaŭaj konkursoj, escepte pri la X-aj Floraj Ludoj kiuj superis la nunajn je unu verko. Kaj pri kvalito, ĉiuj verkoj pli malpli distingigas, pli malpli havas ian valoron, krom kelkaj kiuj vere pekas kontraŭ gramatiko kaj pruvas la heziton kaj mallertecon de novico dezirega kontribui al la plialtigo de la lingvo kaj pliriĉigo de ĝia literaturo. Al ili ĉefe mi rekomendas studi funde la lingvon kaj praktikiĝi en ĝia regado, kaj poste kulturiĝi per legado de grandaj verkoj, por ke, fine, sen malpaciencoj, ili povu fari ion bonan kaj definitivan.

Tre plendinda estas la preskaŭ kompleta manko de partopreno en la ordinara tradukitaj tekstoj, specimenaj floroj de nia enlanda literaturo. Nur du verkoj por la versaĵo kaj sama nombro por la prozaĵo, alvenis, sen-signifa kvanto konsiderinte la kompetentajn plumojn kiuj kapablus transdoni al Esperanto la esprimojn kaj stilon el la originalo. Kaj eĉ la versaĵoj, nek laŭ lingva, nek laŭ poezia vidpunktoj sukcesas respeguli la sonoran kaj flugilhavan kreaĵon de nia juna kataluna poeto. Tial, mi instigas la kompetentulojn ne resti brakplektitaj antaŭ tiuj ĉi du konkursoj kiuj formas du ĉefajn kolonojn de niaj Floraj Ludoj. Ili ekpretiĝu estonte kontribui per propra fardo, ke tiaj kolonoj montru la reziston de la ceteraj, tiamaniere ke la ekvilibro konserviĝu en nia konstruaĵo de ordinaraĵoj.

Farinte tiun ĉi ĝeneralan skizon pri la verkoj, alvenas la momento de tale raportiri pri ili, al kio mi tuj transiras.

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj tekstoj I — Versaĵo kantanta Amon.

Dek tri versaĵoj aspiris al la premio sed nur sep el ili estas vere rimarkindaj kaj montras kapablon de poeto. Atentinte tiujn ĉi sep verkojn, la Jugantaro preskaŭ unuanime, kun sola kontraŭa voĉdono, decidis aljuĝi la premion kaj sekve la Naturan Floron al la verko n-ro. 31, devizita «**Amo miraklojn okazigas**» kiu estas longa poemo konsistanta el cent du kvar-versaj strofoj, dividitaj en du partoj, kiuj strofoj rimas ĉe la dua kaj kvara versoj. Krom tio ke iaflanke de la poemo enŝoviĝas preskaŭrimoj en la unua kaj tria versoj, ĝi rimas kaj ritmas perfekte. Ĝi estas granda laboro de la verkinto kiu ne forprenas al ĝi ĉarmon. Ĝi pentras vastan panoramon da scenoj de dolĉeco kaj doloro kiuj allogas ĝis la fino. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **Teo Jung** el Horrem bei Köln (Germanujo).

(La poeto, S-ro Jung, alpaŝas sur la scenejon kaj legas sian verkon)

LA ALTA KANTO DE LA AMO

Alte super la abismo
Roko kun ruino pendas.
Raukaj korvoj ĉirkaŭgrakas,
Kaj en fendoj vento plendas.

Antaŭ longe tiun rokon
Altkastel' fiero kronis;
Nokte el fenestroj lumaj
Laŭta festobruo sonis:

En salon', nun rubiginta,
Hejmenveninte de ĉasado,
Kun kunuloj gaje festis
Brava kavalir' Konrado.

Estis viro li tre forta,
Tre riskema kaj sen timo;
Sed sovaĝa en ĝuado
Kaj en la koler' sen limo.

Tamen, kiel eĉ la feron
Fandas la puriga flamo,
Ankaŭ lia kor' moligis
En la ardo de la amo.

Bel' Krimhildo ŝia nomo
Kies amon li akiris,
Kies ĉarm' printempe virga
Ĉies miron al si tiris.

Pacience provis bona
Bel' Krimhildo lin mildigi,
Al pli altaj, noblaj pensoj
Kaj bonagoj lin instigi.

Sankta tasko de virino!
Beno estas la sukceso:
Suna amo kaj feliĉo
Sen nubeto kaj sen ĉeso...

Venis vok' de Sankta Patro,
Vok' al Kruca Militiro,
Kaj ĝin aŭdis tra la landoj
Ĉiu brava kavaliro.

Ankaŭ kavalir' Konrado
Zonis glavon, prenis ŝildon,
Lasis hejmon kaj kunulojn
Kaj edzinon, Bel' Krimhildon.

Sanktan Landon liberigi
Rajdis li' por venk' aŭ morto
Ploris post li Bel-Krimhildo,
Ĉar malhela estas Sorto.

Sidas ŝi en hejm' soleca,
Preĝas, ploras kaj laboras.
Malrapide rampas tempo,
Atendado tro doloras.

Iam la kastelan pordon
Frapis fremda ĵunsinjoro,
Kun la harpo sub la brako —
Signo de la trobadoro.

Kaj li paŝas al Krimhildo,
Tuŝas kordojn — dolĉa gamo:
En sonoraj ondoj fluas
Alta kanto de la Amo.

Pri feliĉo kaj sufero
Kantas juna trobadoro,
Sentoj dolĉaj kaj amaraj,
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

Kaj ŝi petis, kaj li restis,
En muziko ŝin instruis,
Ĝis la kant' de ŝiaj lipoj
Kiel de la liaj fluus.

Kaj la trobador' foriris.
Ree ŝi soleca estis;
Sed la harpo kaj kantado
Ŝia korkonsolo restis. —

Jam forpasis tuta jaro,
Sed Konrado ne revenis.
Plu solecan Bel' Krimhildon
Hejm' malgaja ne retenis.

Iutage oni vidis
En la mondon ŝin foriri;
Sed de ŝia voĵ' la celon
Ja neniu povis diri.

Intertempe furiozis
La milit' en Oriento,
Akra estis la luktado
Inter Kruco kaj Krescento. *)

*) Krescento = Duonluno.

Brave batis kavaliroj
Brunajn filojn de l' Profeto.
Jen la batalvoko: Kristo!
Jen: Allah' kaj Mahometo!

Ankaŭ kavalir' Konrado
Kun leona fort' batalis,
Kaj per lia glav' laŭvice
Saracenaĵ kapoj falis.

Tamen kie cento falis,
Tie releviĝis milo.
Sen decido la batalo
Daŭris ĝis la lasta brilo.

Noktmantelo stelbrodita
Kovris sangan bataĵkampon,
Super kiu preterŝovis
Luno sian paltan lampon.

Kiam frumatena suno
El dezert' levigis ore,
Staris novaj turkaj vicoj
Alvenintaj noktahore.

Brave luktis kavaliroj
Jam denove ĝisvespere.
Multaj estis mortbatataj
Aŭ kaptataj malespere.

Ankaŭ kavalir' Konrado
Estis viva, sed vundita.
Kvankam li la morton serĉis,
Li retrovis sin — kaptita.

Kun aliaj sklavigite
Kaj ligite je katenoj
Estis li forkondukata
Por laboroj, peza peno.

Servutante, en ĉifonoj,
Ili penas kiel sklavoj —
Kiuĵn iam la kiraso
Kovris kaj ornamis glavoj.

Mute, kun klinitaj kapoj
Ili faras la laboron,
Kaj ne sentas vipobatojn
Nek alian korp doloron.

Kio ilin dolorigas,
Estas iu prem' anima;
Ĉar la pensoj ĉiam migras
Al la hejmo malproksima.

Al la montoj, al la valoj
En la Frankolando bela,
Al kunuloj hejmrestintaj,
Al edzino korfidela.

Iutage — kia sono?
Kia dolĉa melodio?
Hejma lingvo — glora kanto!
Ĉu miraklo? Fantazio?

La palacon de l' sultano
La kaptitoj ŝtel-aliras
Kaj aŭskultas spirretene
Kaj rigardas, forte miras:

Antaŭ la sultanon paron
Paŝis knab' gracia, bela,
Kantas pri la Frankolando,
Kantas ĝin kun voĉ' angela;

Kantas ĝin kun varma koro,
Kun rideto ĉirkaŭbuŝe,
Akompane sonigante
Kordojn delikatatuŝe. —

Kant' finiĝis. Emocie
Sidas la sultana paro,
Emocie ankaŭ staras
En la korto la sklavararo.

Larmo brilas en okulo
De la bela sultanino,
Puran perlon ŝi malligas
El ĉenet' sur sia sino.

Ĝin ĵetante al la knabo,
Montras ŝi favorrideton.
Kaj li riverencas danke,
Sentetante ŝian peton:

Paŝas paŝon pli proksimen,
Reekludas — dolĉa gamo:
En sonoraj ondoj fluas
Alta kanto de la Amo.

Pri feliĉo kaj sufero
Kantas knabo — trobadoro,
Sentoj dolĉaj kaj amaraj,
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

Kiam li pri ĝojo kantas,
Estas, kvazaŭ sun' aperas:
Montoj brilas oraveste,
Sonoj ondoj tremfajreras.

Sed dum li suferon pentras,
Nigra nokto sin etendas;
El senlumaj abismegoj
Mil animoj plore plendas. —

Kaj denove kant' finiĝis.
Ĉio restas mirsilente.
Sultanino nur singultas,
Larmoj falas jam forente.

Kaj sultano Saladino
De la alta trono paŝas;
«Knabo», diras li, «miraklan
Sorĉon via voĉo kaŝas.

Puran perlon mia kara
Beledzino al vi ĵetis;
Sed de mi, tuŝita same,
Vi ne jam favoron petis!» —

«Ho, se vi la rajton donas —
Via estas ja la forto;
Liberigu tiujn sklavojn,
Jen starantajn en la korto!

Samlandanoj ili estas;
Kaj vidante sortobaton,
Kiu akre ilin trafis,
Sentas mia kor' kompaton!» —

«Multon, knabo vi postulas,
Kvankam ne por vi persone;
Sed promeso estu firma,
Ne ŝangebla laŭbezono!

Baldaŭ viajn samlandanojn
Hejmen portu vel' kaj masto!
Sed vi, knab', ankoraŭ restos
Kelkatempe mia gastoj!

Via harmonia ludo.
Viaj kantoj melodijaj
Estos artoplenuo
Por soifaj sentoj miaj!

Sciu, altvalorojn tenas
Mia trezorejo kara;
Kontraŭ vera arto ĉiam
Mi min montris malavara!

Poste, ĝis la landa limo,
Sur rapidaj ras-ĉevaloj
Vin kondukos tutsekure
Kavalkado da vasaloj!» —

Ĝoj' ekbrilis en okulo
De la knabo — trobadoro,
Kaj profunda klin' esprimis
Lian dankon pro l' favoro.

Same ĝojis la kaptitoj,
Kies koroj preskaŭ krevis;
Libereco! Jam ĝi venos,
Kiun longe ili revis.

Kio ilin dolorigis;
For terura pren' animaj!
Baldaŭ ili ja revenos
Al la hejmo malproksima!

Al la montoj, al la valoj
En la Frankolando bela
Al kunuloj hejmmrestintaj,
Al edzino korfidela.

II

Kavalir' Aŭtuno spronis
Sian grizan ventĉevalon —
Kie ĝiaj hufoj trapas,
Ĝi ellogas la fatalon.

Velkas vivo, flavas floroj,
Kaj malgaja melodio
Tra la nudaj branĉoj flustras,
Tremas lasta nur folio. —

Kaj alian kavaliron
Vidas landon mi trapaŝi;
Sen ĉevalo, malfiere,
Kvazaŭ li sin volus kaŝi.

Ne kiras' juvelradia
Lian bruston plu protektas;
Nur ĉifonoj... Jam neniu
Kavaliro lin konjektas.

Lace penas li, sin trenas
Dum la longa voj' surstrata.
Unu penso nur; Antaŭen
Al la hejmo sopirata!

Ĉion li feliĉe venkis;
La atakon de l' korsaroj,
Uraganon, ŝiprompiĝon,
Eraradon sur la maroj!

Kie la kunuloj vagas?
Ĉu pereis, hejmenvenis?
Li ne scias. Ĝis ĉi tie
Sola li sin pene trenis.

Sorto ilin disbloyadis
Kiel vento en aŭtuno,
Li nur — lasta folieto —
Alkroĉiĝis al Fortuno.

Baldaŭ celon atingonte,
Nun li ne plu iri povas.
Staras gastodom' ĉevoj —
Tie li ripozon trovas. —

Mastro metas dolĉan moston; *)
«Kien, kaj el kiu lando?» —
La migranto en ĉifonoj
Ne respondas je l' demando.

Sed preninte fortan gluton,
Mem al mastro li parolas:
«Kiel tie ĉi aferoj
Statas, ĉu vi diri volas?» —

Kaj la mastro tro inkline
Pri kastelo ekrakontas,
Ke perfida sinjorino
Eĉ adulti jam ne hontas.

«Brava edzo militiris
Kaj ŝin devis lasi sola.
Venis juna bela viro —
Kun parolo tente — mola.

Longe restis la fremdulo,
Tamen fine sin retiris.
Ankaŭ ĉasta Bel' Krimhildo
Iutage monden iris.

Longe staris la kastelo
Tutsoleca, forlasita,
Ĉar nur antaŭ kelka tempo
Ŝi revenis riĉdotita.» —

«Vi mensogas!» kriis gasto,
«Vian langon gardu, bubo!» —
«Ŝajne vi pli bone scias,
Mokas mastro, «ja sen dubo!» —

Sur la seĝon gasto falas,
Kaptas lin sovaĝa spito.
Poste li longtempe sidas
Silentante en medito.

Sed subite li eksaltas
— Most' verŝiĝas, seĝo krakas —,
Kaj senlima furiozo
Kaj kolero lin atakas.

Jam li estas eksterdome.
Mastro sentas fortan miron;
Ne ekkonis en la gasto
Revenintan kavaliron.

En salono ĉe fenestro
Bel' Krimhildo jen enpense!
Vento la muregojn skuas,
Nub' peliĝas nigre — dense.

Dolĉe — duba antaŭĝojo
Laŭtfrapigas ŝian koron.
Kiomfoje ŝi travivis
Reve la revidan horon!

Nun ĝi estas jam proksima,
Baldaŭ la amato venos
Kaj fidelan la edzinon
Amoplene ĉirkaŭprenos. —

Pord' puŝiĝas. Enpenetras
Homfigur' teruraspekta
Kaj sin ĵetas sovaĝege
Al virino sensuspekta.

«Jen vi havu vian punon,
Vi serpento malfidelal!» —
Kaj en lia man' ekfulmas
Jam ponardo koroncela.

Mortpaligas Bel' Krimhildo
Pro sensenca la insulto:
Ĉu li volas — nekredeble! —
Ŝin akuzi pri adulto?

Sed vidante, ke aŭskulton
Por defendo ŝi ne trovas
— Ĉar li staras vengoprete —,
Ŝi nur tempon gajni provas:

«Se ja morton mi meritas,
Mi ne mortu sen preparo:
Unu preĝon nur konsentu
Antaŭ sankta la altaro!» —

*) Mosto estas nova bersuko (dolĉa vino).

«Unu preĝon — sed rapide!» —
Jam salonon ŝi forlasis.
Kavalir' Konrad' atendis —
Ne rapide tempo pasis.

Ĉar tro longe daŭras preĝo,
En koler' la kavaliro
Kuras al la kapeleto.
Sed jen — lin haltigas miro:

Jam ne trovas li Krimhildon,
Sed la knabon, kies kanto
Pordojn de Liber' malfermis
Al la jam malesperanto.

Kaj la knabo harpon prenas,
Kordojn tuŝas — dolĉa gamo:
Ekaŭdigas jam konata
Alta kanto de la Amo.

Pri feliĉo kaj sufero
Kantas knabo — trobadoro,
Sentoj dolĉaj kaj amaraj,
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

Kavalir' Konrado staras —
Rigidigis la rigardo.
Lia mano mallevigas,
Teren falas la ponardo.

Nun en knabo — trobadoro
La edzinon li ekkonas.
Surgenuen li sin jetas:
«Sankta vi, ĉu vi pardonas?» —

Kaj ŝi levis lian kapon
Kaj pro emocio tremas
Kaj sur lian kulpan frunton
La pardonokison premas.

Majo sternis flortapiŝojn
Sur la belan Frankan teron.
El kampar' alaŭdoj trile
Levas sin en bluaeron.

Oraj sunradioj plektas
Varman ĝojon tra la lando,
Per agrabla tuŝ' karesas
Junan paron sur verando.

Man' en mano, kor' ĉe koro —
Jen Konrad' kaj Bel' Krimhildo,
Rigardante malproksimen
Al la rave sorĉa bildo.

Ĉie la Printempo ridas.
Admirinda panoramo!
Tuta la natur' rekantas
Altan kanton de la Amo.

Kaj infana ĝojo trilas,
La kastelon reunigas:
Knaboj du kaj knabineto
Amon eĉ pli firme ligas.

Longe vivis Konrad' idoĵ
En feliĉo kaj en gloro.
Brava gento ili estis:
Ja sen tim', sed ne sen koro.

Tamen, kiel ĉio tera,
Fine ankaŭ ili ĉesis;
Sed ilian nomon oni
Ĝis hodiaŭ ne forgesis.

Ruinaĵo nun funebras,
Kie altkastelo tronis,
Kaj la raŭkaj korvoj grakas,
Kie iam festoj sonis.

Sidis inter la ruinoj
Mi, aŭskultis korvan grakon;
Metis, laca de migrado,
Pezan kapon sur la brakon.

Kaj en sonĝo reviviĝis
Amokanto melodias...
Kion ĝi al mi inspiris —
Jen la frukto poezia!

Unuan honoran mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 1, devizo «Vivanta strofo», lirika poemo, brile verkita, tamen montras ĉe strofo du ritmajn makuletojn. Aŭtoro: S-ro **Jaume Grau Casas**.

Meritas duan mencion la verko n-ro. 3, kun devizo «I aquellas gracies en son rostre juntas, cerco disperses per tants rostres d'altres!» kolekto de kvin versaĵoj tre bonstilaj kaj sufiĉe inspiritaj kiun ni ŝuldas ankaŭ al la facila liro de S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Estas aljuĝita tria mencio al la verko n-ro. 39 kun devizo «Cyrano», ampasia soneto, kies aŭtoro estas S-ro. **Cuvi Lovostan** el Budapeŝt (Hungarujo).

Kvaran mencion ni aljuĝas al la verko n-ro. 2, devizita «Un sonnet sans défaut vaut seul un long poème...» soneta triptiko plezurige kantanta tri aspektojn de amsento. Aŭtoro: S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Al la verko n-ro. 4, kun devizo «Manta gens me mal razona...» oni aljuĝas kvinan mencion. Ĝi estas amsopira versaĵo ne ĉiam inspirplena, kies sesversaj strofoj egale rimas. Ĝia aŭtoro estas ankaŭ S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Ricevas sesan kaj lastan mencion la verko n-ro. 136, devizo «Qu'ieu am la plus de bon aire...» ankoraŭ amkanto produktita de S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Originalaj tekstoj II — Ama verko en prozo.

Ok verkoj konkursis tiun ĉi temon, sed el ili, du vere povus atingi la premion; sed ĉar tiu kun n-ro. 45, kun devizo «Ereto» malgraŭ sia plimal-longeco, komunikas pli da emocio, oni aljuĝas al ĝi tiun premion. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **E. Aisberg** el Parizo (Francujo).

Sekvas en merito la verko n-ro. 121, devizita «Paŝo post paŝo» kaj titolita «En la mondon...» kiu montras pli fluan kaj perfektan stilmanieron de la verkinto, sed kies fundo, malgraŭ ĝia longeco, ne tiel forte impresas kiel la antaŭa. Al la aŭtoro de tiu prozbrilanta verko, kiu rezultas esti S-ro. **P. Stojan** el Genève, oni aljuĝas la unuan honoran mencion.

Dua mencio estas aljuĝita al la verko n-ro. 76, surportanta la devizon «Papilia ludo» kiu delikate priskribas freŝajn amscenojn inter floroj. Aŭtoro F-ino. **Hilde Scholze** el Reichenberg (Ĉeĥoslovakujo).

Trian mencion meritas la verko n-ro. 82, devizo «Seniĝi estas ĝui», ama noveleto tre bone disvolvita de F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Kiel kvaran mencion ni elektis la verkon n-ro. 115, kun devizo «Ĉu amo devigas...?» agrabla rakonto bonstile verkita de S-ro. **H. J. Hoen** el Köln (Germanujo).

Atingas kvinan mencion la verko n-ro. 9, devizita «Paco, Amo kaj Esperanto» kies aŭtoro estas S-ro. **Narciso Bofill** el Palma de Mallorca.

Tradukitaj Tekstoj I — Traduko de la kataluna versaĵo «Les noces de l'Alosa i el Llessamí».

Kiel dirite, neniuj verkoj meritas la premion. Oni decidis mencii en unua vico la verkon n-ro. 8 devizo «Zamenhof» kiu sekvas ritmon sed ne rimon. Aŭtoro: S-ro. **Narciso Bofill**.

Duavice atingas mencion la verko n-ro. 62, devizita «Kompreno estas voĵduono» kiu sekvas rimon sed malatentas pri ritmo. Cetere enmontriĝas

gramatikaj makuletoj implikitaj de postulo ĉe la verskonstruo. Aŭtoro: Pastro **Josep Casanovas** el Girona.

Tradukitaj Tekstoj II. — Traduko de la kataluna prozaĵo «Caminar amb la lluna».

Unu verko meritas sendiskute la premion: ĝi estas tiu kun n-ro. 117, devizo «The moon» tre ĝusta kaj flustila traduko farita de la lerta plumo de S-ro. **Marian Solà** el Terrassa.

Mencion ni aljuĝas al la alia verko n-ro. 123, sub devizo «Lunhela nokto» sufiĉe bona traduko kiu tamen en kelkaj okazoj ne sukcesas trafi la ĝustan ideon de la originalo. Aŭtoro: S-ro. **Jaume Herp** el Barcelona.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I. — *Interna ideo de Esperanto. Premio de la Komitato de K. E. F.*

Sep verkojn ni kolektis por konkursi tiun ĉi interesan temon. Preskaŭ ĉiuj enhavas rimarkindajn kvalitojn pro la ideoj elmontritaj pri la afero, kiun ili pritraktas laŭ malsama vidpunkto.

Reliefiĝas pro sia konceptado pri la temo, la verko n-ro. 67, sub devizo «Ne faru frazojn pri la vivo, sed penu ekkoni ĝin» al kiu estas aljuĝata la premio. Ĝin verkis D-ro. **Emmanuel Olsvanger** el London (Anglujo).

Oni kreas kvar menciojn kiujn oni aljuĝas laŭ jena ordo:

Unua mencio al la verko n-ro. 138, devizita «La Verko de l' Majstro» kiu celas difinon de la temo pere de tre bonstila rakonto. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **Otto Wehlitz** el Rahnitz - Hellerau (Germanujo).

Dua mencio al la verko n-ro. 66 kun devizo «Per Esperanto al Dio» fragmento de parolado verkita de S-ro. **Leopold Berger** el Moravany (Ĉeĥoslovakujo).

Tria mencio al la verko n-ro. 11 surhavanta la devizon «Kion oni volas tion oni povas» serio da komentarioj pri kongresparoladoj de D-ro. Zamenhof rilate la aferon kaj rilate homaranismon. Aŭtoro: S-ro. **Boucon** el Anancy (Francujo).

Kvara mencio al la verko n-ro. 101, devizo «Kave» kiu glosas la temon en flua lingvaĵo. Aŭtoro: S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

II. — *Fideleco al la Fundamento de Esperanto. Premio de la Redakcio de «Kataluna Esperantisto»*

Kun ĝojo ni devas rimarkigi, ke el la du verkoj ricevitaj por tiu ĉi konkurso, unu, tiu kun n-ro. 140, kaj devizo «Unueco donas forton!» meritas tre specialan atenton ĉar ĝi estas tre dokumentita monografio, 82 paĝa, detale kaj funde studanta nian Fundamenton kaj la historion de la lingvo ĝis la okazigo de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne

sur Mer, kiam nia Fundamento ricevis plenan oficialigon kontraŭ la surdaj atakoj de certaj tiamaj famavidaj papoj de nia movado kiu tion kontraŭstaris por povi efektivigi propramove sinsekvon da reformoj en nian lingvon. La verko dividiĝas en dek du ĉapitroj kaj kvar aldonoj, korekte verkitaj, kiuj vekas grandan intereson. Krom tio, la verko kunigas mallongigitan skizon pri la sama temo, en formo de demandoj kaj respondoj, kiu bone solvas la temon proponitan. Pro ĉio-ĉi la Juĝantaro senhezite aljuĝas al ĝi la premion kaj solene deklaras ke ĝi estas efektive inda je pli alta distingo neebila en la nunaj Floraj Ludoj. Estas ĝia aŭtoro: S-ro. **Andreo Petroviĉ Andrejev** el Tiflis Kaŭkazo (Rusujo)

Menciinda sin montras la alia verko n-ro. 129, devizita «Nomina sunt odiosa» kiu faras bonan defendon pri la netuŝebleco de nia Fundamento, kaj kies aŭtoro estas S-ro. **Jakobo Ŝapiro** el Bialystok (Polujo).

III. — Tradukitaj versaĵoj (I.^a grupo) — Premio de S-ro. Narciso Bofill.

Konsistigas tiun ĉi grupon sep verkoj, post kies analizo oni decidas premii la n-ro. 5, devizo «Sonetoj kaj madrigaloj», kolekto da kvin sonetoj kaj du madrigaloj el la ora jarcento hispana majstre tradukitaj de nia talenta poeto S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Atingas unuan mencion la verko n-ro. 121, devizo «Paŝo post paŝo» titolita «La nubeto» delikata traduko el la rusa lingvo ŝuldata al la lerteco de S-ro. **P. Stojan**.

Duan mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 59, devizo «Laboru senĉese, ne zorgu pri fin', la tombo atendas ne verkon sed vin», aro da kvin versaĵoj el la latinidaj lingvoj kiun tre bone tradukis nia multfoja laŭreato S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Oni liveras trian mencion al la aŭtoro de la verko n-ro. 119, sub devizo «Dies irae dies illa...» por lia traduko de dek naŭ triversaj kantstrofoj, ĉiu samrima, eltiritaj el la *Sequentia Misae Defunctorum*. Li estas S-ro. **Pere Bayona Roca** el Girona.

IV. — Originalaj versaĵoj — Originalaj sciencaj verkoj. Premio de S-ro. Miquel Argemí.

Tiu ĉi premio estas duonigita inter la du esprimataj temoj kiuj formas du grupojn da verkoj.

ORIGINALAJ VERSAĴOJ

Dek ok verkojn ni envicigis en tiun ĉi grupon, kaj malgraŭ ĝia alta nombro, tre malmultaj estas la verkoj kiuj havas verajn kvalitojn por ricevi la premion. Traesplorinte kun atento ilian apartan valoron ni konkludis ke la verko n-ro. 14, devizita «Pax Tibi, Merce, Evangelista meus» meritas tiun premion kaj al ĝi ni ĝin aljuĝis. Ĝi estas kristana poemo, verkita en la pompo de la klasikaj dekunusilabaj versoj kaj enkadrita en kvar kantoj ĉiu

mezuranta cent versojn. Vera pruvo de la potenca Muzo de S-ro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Unuan mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 92, devizo «Belaĵo estas ĝojo por ĉiu» flua versaĵo verkita de S-ro. **Jan van Schoor** el Antverpeno (Belgujo).

Atingas duan mencion la verko n-ro. 41, devizita «Blankaj birdetoj» pro ĝia stilo kaj kadenco. Aŭtoro: S-ro **Teo Jung**.

Estas inda je merito por la tria mencio la verko n-ro. 63 sub devizo «Mi faris mian aferon kaj atendos ceteron» Aŭtoro: F-ino. **Catharina J. Roskes** - Dirksen el Hago (Nederlando)

Ricevas kvaran mencion la verko n-ro. 121, devizo «Paŝo post paŝo», titolita «Dimauĉe» kiun sendis S-ro. **P. Stojan**.

Al la verko. n-ro. 34, distinganta per la devizo «Ni proponas, vi disponas» oni aljuĝas kvinan mencion. Aŭtoro F-no **Catharina J. Roskes** — Dirksen.

Estas aljuĝita sesa kaj lasta mencio al la verko n-ro. 132, kies devizo estas «Sub la sankta signo» sendita de S-ro. **Veniamin Vozdvjenskij** el Odessa (Rusujo).

ORIGINALAJ SCIENCAJ VERKOJ.

Por tiu ĉi temo ni grupigis tri verkojn kaj aljuĝis la premion al tiu kun n-ro. 33 kaj devizo «Mi diris, penu, hom' kaj firme fidu!» ĉar ĝi estas vasta traktato pri naturfilozofio, kiu pruvas profundan konon de la aŭtoro pri tiu scienco. Verkinto: S-ro. **Joseph Major** el Parizo (Francujo).

Por la unua mencio ni elektis la verkon n-ro. 48, sub devizo «Serĉante ni lernos» kiu studas la fontojn de agado de la Universo en formo tre preciza. Ĝia aŭtoro estas: S-ro. **Sydney J. Smith** el London (Anglujo).

Al la alia verko n-ro. 106, kun devizo «Miraklo» ni aljuĝas la duan mencion. Flustila verko faranta tre interesan defendon de miraklo laŭ sci-enca vidpunkto. Ĝin verkis: S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

V. — Temo rilatanta al U. E. A. Premio de tiu Asocio.

Ni ricevis por la dirita temo tri verkojn, sed ĉar neniu el ili kolektas sufiĉajn kvalitojn en ĝia pritrakto, laŭ iniciato de la proponinto oni rifuzas aljuĝi la premion.

VI. — Originalaj teatraĵoj — Premio de la grupo «Barcelona Stelo»

Du verkoj interluktis por la atingo de la premio, kaj ĝin gajnas la verko n-ro. 38, devizita «Procede et semper — Italia — semper!» kiu estas amuza teatraĵo bonstile verkita de S-ro. **Arturo Ghez** el Trieste (Italujo).

VII. — *Tradukitaj prozaĵoj (1.^a grupo) — Premio de D-ro. Sekretulo.*

Estas rimarkinda la nombro da tradukitaj prozaĵoj ricevitaĵ por la konkurso. Por faciligi ilian plibonon elekton kaj premion ni ilin disdividis laŭ tri grupoj.

El la kvar verkoj entenataj en tiu ĉi grupo, tri montriĝas kun sama kvanto da meritoj; tial ni decidis trionigi la premion kaj ĝin aljuĝi al la jenaj verkoj:

Al n-ro. 50, devizita «La vivo ne estas plej valora posedaĵo...» traduko el la germana lingvo bele ĉizita de F-no **Ella Graszau** el Woldshūt (Germanujo).

Al n-ro. 93, devizo «Tradukoj estas kiel virinoj», valora traduko el la flandra lingvo ŝuldata al la plumo de S-ro. **Jan van Schoor** el Antverpeno (Belgujo)

Al n-ro. 98, sub devizo kaj titolo «La sinjorino kun la skarлата masko» interesa rakonto ĝuste tradukita de S-ro. Profesoro **Adolf Hainschegg** el Graz (Aŭstrujo).

Al la verko n-ro. 40 kun devizo «Mitologio» oni aljuĝas mencion pro ĝia korekteco kaj agrabla enhavo. Tradukinto: S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

VIII. — *Versaĵo aŭ prozaĵo plej bone kantanta la naciajn gloriojn — Premio de Eskcelenca Urbeŝtraro de Sta. Coloma de Farnés.*

La temo proponita ne tre altiris la atenton de niaj verkistoj, ĉar nur du verkoj estas ricevitaĵ. El ili, tiu kun n-ro. 80, devizita «Aglo blanka» kvankam ne tre ampleksa en detaloj, montras certajn kondiĉojn por ricevi la premion. Tion opiniinte, la Jugantaro ĝin aljuĝis al tiu verko kies aŭtoro estas F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Mencion meritas tiu kun n-ro. 113, devizo «Homo devas pensi ne nur pri siaj rajtoj sed ankaŭ pri siaj devoj», kiu, se iel apartiĝas el la temo, tamen estas bonstila kaj interese verkita de S-ro. **Léon Agourine** el Parizo (Francujo).

IX. — *Temo patrujama. — Premio de S-ro. Ramon Masgrau.*

Kvin verkoj kolektiĝas sub la arkaĵo de la dirita temo. Tuj reliefiĝas el ili, pro sia majstra priskribo de la vivo kaj agoj de landa heroo, tiu kun n-ro. 29, portanta la devizon «Modesta batalanto por rajto kaj honoro». Aŭtoro: S-ro. **Ivan H. Krestanoff** el Pirdop (Bulgarujo).

Oni distingas per unua mencio la verkon n-ro. 22, devizo «Amu vian patrujon» kiu tre koncize pritraktas la demandon. Aŭtoro: S-ro. **Erich Wagenbreth** el Elze — Hannover (Germanujo).

Duan mencion atingas la verko n-ro. 130, kun devizo «El ĉiuj floroj, la

abel' alportas ion al la ĉel'» du versaĵoj pri patrujamo el la rusa lingvo tradukitaj de S-ro. **Veniamin Vozdvjenskij**.

X. — *La malmoraleco ĉe la virina vesto* — Premio de S-ro Paroĥestro de Sta. Coloma de Farnés.

Tri verkoj aspiris al la premio, sed nepre ĝin meritas kaj al ĝi estas aljuĝita, la verko n-ro 36, sub devizo «Honny soit qui mal y pense» kiu disvolvas la temon en tre facila kaj originala formo.. Verkinto: S-ino **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

Estas aljuĝita mencio al la verko n-ro. 128, devizo «Dofoyo» kies enhavo estas korekta diatriba pri la temo. Aŭtoro: F-ino **Anna Kühn** el Dresden (Germanujo).

XI. — XII. — XIII. — *Originalaj prozaĵoj (1.^a grupo)*.

Tiu ĉi grupo envicigas ses verkojn. Post detala esplorado pri ilia valoro, la Juĝantaro opinias ke tri el ili estas premiindaj kaj preskaŭ samvaloraj. Sekve ĝi destinis al ili la tri aluditajn premiojn kiujn ĝi aljuĝis jenmaniere:

Al la verko n-ro. 61, devizita «Zuiderzee» kiu estas bele priskribita rakonto, la premion XI de la ĵurnalo «La Veu de la Selva». Aŭtoro: S-ro. **J Kramer** el Enkhuizen (Nederlando).

Al la verko n-ro. 108, kun devizo «Rapido» la premion VII de la firmao «Grafikaj Artoj» ĉar ĝi posedas agrablan allogon. Ĝin verkis la kapabla plumo de S-ro **Jakobo Schmid** el Bern.

Al la verko n-ro. 72, devizo «Bone tiu sidas al kiu la sorto ridas» bona rakonto kun eleganta stilo, la premion XIII de «Granda Hotelo». La aŭtoro estas S-ro. **Ivan Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

XIV — *Tradukitaj versaĵoj (2.^a grupo)* — Premio de «Centra Hotelo».

El la kvar verkoj enhavataj en la nuna grupo akiras nediskuteblan reliefon la du verkoj n-roj. 69 kaj 77, kiuj, kvankam ne sekvas metrikon nek rimon, sed nur la ritmon de la pola originalo el kiu ili estas tradukitaj, transdonas en tre bona lingvo la potencon inspiron de l' enhavo kies legado faras kortuŝan impreson. Tamen, ne povante premii ambaŭ verkojn, la Juĝantaro pesis ilian apartan valoron kaj inkliniĝis ĝia prefero por la verko n-ro. 69, ampleksa apologio pri la vivo, kies devizo estas «Kaj tamen... nia fina celo estas ja — la Morto!» Rezultas aŭtoro de tiu verko: S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio. (Polujo).

Ni aljuĝas unuan mencion al la alia verko n-ro 77, kies argumento montras alkroĉigon al la vivo kaj bedaŭron pri la morto, en maniero ke ĝi kaŭzas fortan emocion. Ĝin tradukis per tiu delikata peniko kiun li scias dismovi, la sama S-ro. **Edward Wiesenfeld**.

Dua mencio estas liverata al S-ro. **Veniamin Vozdvijenskij** por lia verko n-ro. 131, sub devizo «Popoloj devas fariĝi al centro celantaj eroj...» poemo el la rusa lingvo, kies fluan tradukon iom makuletas la enekzisto de sufiksaj kaj asonancaj rimoj.

Restas bedaŭrinde nekonkursitaj la temoj XV kaj XVI de Pastro **Josep Puig** kaj de Banloko «**Orión**» respektive.

XVII. — *Tradukitaj teatraĵoj* — Premio de D-ro. **Manuel Burch**.

Kvar verkoj interdisputis la premion sed nur du havas la rajton ĝin posedi pro la diskonigo de grandaj produktaĵoj el la eksterlanda literaturo kiun ili faras. Inter tiuj du estas nedubeble ke meritas la trofeon kaj ĝin oni donas al ĝi, la verko n-ro. 94, devizita «Por la XX.^a» triakta teatraĵo el la flandra lingvo majstre tradukita de la forta kapablo de S-ro. **Jan van Schoor** el Antverpeno (Belgujo).

Sekvas en merito la verko n-ro. 86, devizo «Ĉiam antaŭe kaj antaŭen» liberversa traduko el la kvinakta komedio de la fama Molière, «La Mizantropo» kiu ne tute respondas al la vigla stilo de la originalo pro manko de fleksebleco kiu ĝin rigidigas, sed tamen donas bonan ideon pri ĝia argumento. Verkinto: S-ro. **Boucon el Annecy** (Francujo).

XVIII. — *Plej bona traduko de versaĵo de la fama kataluna poeto Joan Maragall*. — Premio de S-ro. **Josep M.^a Iglesias**.

La sola verko ricevita por la dirita temo ne tute sukcesas transdoni la subtilecon kaj ĉarmon de la originalo kiu estas la kvina kanto el la poemo «Hajdé» de nia senmorta poeto. Cetere la ritmo ofte implikiĝas kio faras ne tre agrablan impreson. Tamen ĉar la verko, kiu estas la n-ro. 58, kun devizo «Amb la llum del teu mirar has omplert la meva vida» donas ideon pri la kataluna teksto, ni aljuĝas al ĝi la premion difinitan por tiu temo. Estas ĝia aŭtoro: S-ro. **Jaume Grau Casas**.

XIX. — *Muzikverkado kaj ĥorkreado de la el la pasinta XIX.^a jarcento kataluna muzikverkisto Clavé* — Premio de **Hora Societo**.

Neniu verko alvenis por tiu ĉi temo kaj la proponinto bonvolis konsenti ke la Juĝantaro havigu la premion al la verko de temo pli simila. Esplorinte tiun fakton, ni opinias ke la verko n-ro. 114, devizita «Ĉu la muziko efektive malkaŝas nian animon?» pli proksimiĝas al la dezirita temo. Ĝi estas perfekta traduko el la rusa lingvo, kiu, kompreneble, ne glosas la verkon de Clavé, sed fantazie kaj agrable rakontas pri la origino de du muzikinstrumentoj kaj pri la kontraŭaj sentoj kiujn ĉiu el ili elvokas per ludado. Al ĝi, do, la Juĝantaro cedas tiun premion. Rezultas ke ĝia aŭtoro estas: S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

XX — XXI. — *Originalaj prozaĵoj (2^a grupo).*

Ni grupigis por tiu ĉi temo kvar verkojn. Du el ili estas tre valoraj kaj montras la puran stilon de plenmatura verkisto. Cetere ilia alloga fundo priskribas riĉmaniere originalajn situaciojn kiuj vere impresas. Pro tio ni aljuĝas al ili la du aluditajn premiojn, tiamaniere:

Al la verko n-ro. 70, devizo «Kio en la koro sidas la vizaĝo perfidas» la XX de S-ro. *Josep Callis*. Aŭtoro. S-ro. **Ivan Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

Al la verko n-ro. 71, devizo «Plej granda potenco kuŝas en la komenco» la XXI de S-ro. *Josep Corominas*. Aŭtoro: la sama talenta verkisto S-ro. **Ivan Ŝirjaev**.

Ni distingas per unua mencio la verkon n-ro. 83, kun devizo «Polvo kaj ombro ni estas» tre bona rakonteto sendita de F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Duan mencion ni donas al la verko n-ro. 49 sub devizo «Tagiĝas en la mondo» iel difuza sed bonstila verkita prozaĵo kies aŭtoro estas S-ro. **Hector Vermuyten** el Antverpeno (Belgujo).

XXII. — *Katolikaj verkoj. — Premio de S-ro. Joan Ventosa i Calvell.*

Estas vera ĝojo povi grupigi sub la dirita epigrafo tri grandajn verkojn pri katolikismo kiuj venis partopreni kaj honorigi nian konkurson. Ĉiuj ili meritas gravajn distingojn, kiujn pro la diritaj pli antaŭe kaŭzoj, ni ne povas fari al ĉiuj. Ni trastudis ilian meriton kaj venis al la konkludo ke du el ili, originalaj, estas preskaŭ egalvaloraj; sekve, ni duonigis la premion kaj ĝin aljuĝis al ili. La premiitaj verkoj estas la n-ro. 107, devizo «Historio» kaj n-ro. 103, devizo «Laboremo» ŝulditaj al la kompetenta mano de S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

Al la alia verko n-ro. 104, devizo «Kredo» ni havigas mencion. Ĝi estas bela specimeno de peco el la Katekismo de la Katolika Eklezio, kiun plene kaj sukcese tradukis la sama kapabla verkisto S-ro. **Jakobo Schmid**.

XXIII. — *Pri paco kaj amo — Premio de la grupo «Paco kaj Amo».*

Pretendis la premion kvar verkoj kiujn ni kribris kun atento. La verko kiu restis sur la kribrilo estas tiu kun n-ro. 44, devizita «Kiu amas sian kunhomon amas Dion» tre bonstila verko kun malprecizaj flankoj ĉe l' enhavo. Ĝin verkis S-ino **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

Estas kreataj du mencioj por laŭri la bonan intencon de la aŭtoroj de sama nombro da verkoj kiuj prezentas iajn bonajn kvalitojn. Ni ilin disdonas jene:

Unua mencio al n-ro. 96, kun devizo «Multaj idiomoj: milito! unu lingvo: paco!!» verkita de S-ro. **A. Posener** el Berchem (Belgujo).

Dua mencio al n-ro. 57, devizo «Por la bono ne ekzistas nacia limo» sendita de S-ro. **Hans Windisch-Sartowsky** el Berlin (Germanujo).

XXIV.—*Esperanto kaj Radiofono.*—*Premio de la grupo «Ĝerona Espero».*

Prezentigis du verkoj kun aspiro al la sukceso. Ili havas preskaŭ saman valoron, ĉar dum unu raportas kun serĉitaj faktoj kaj detaloj, la alia pritraktas la temon sub filozofia vidpunkto. Konsiderinte ke tiu ĉi lasta superas la unuan pro sia karaktero ni aljuĝas al ĝi la premion. Ĝi estas la verko n-ro. 78, kun devizo «Radio per Esperanto» kaj ĝia aŭtoro: S-ro. **E. Aisberb** el Parizo (Francujo).

Ricevas mencion la alia verko n-ro. 110, devizita «Perflugiloj de subtila etero...» kiu donas sufiĉajn detalojn pri la proponita temo. Verkinto: S-ro. **Angel Valdepeñas** el Barcelona.

XXV-XXVI-XXVII — *Originalaj prozaĵoj (3.^a grupo).*

Konsistigas tiun ĉi grupon tri verkoj kun tri premioj aljuĝotaj. Ĉiuj estas bonaj literaturaĵoj kiuj venas riĉigi nian literaturon; sed la verko n-ro. 24, kun devizo «Mieux vaut tard que jamais» montras pli vastan laboron kaj sukcesas kun amuzo kaj lerteco alveni al la solvo de la argumento projektita de la aŭtoro. Konsiderinte ĝian meriton oni havigas al ĝi la du premiojn XXV kaj XXVI de S-roj. **Ivan H. Krestanoff** kaj **Narcis Massagué** Verkinto: S-ro. **K. Saarov** el Leningrado (Rusujo).

La premion XXVII de la grupo «Lumon» oni aljuĝas al la verko n-ro. 105, devizita «Ruzo» kiu estas facila rakonto verkita kun la flua stilo al kiu nin kutimigis la produktema talento de S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

Mencion meritas la n-ro. 51 devizo «Vian miron fabeligu» pro ĝia korekteco kaj agrabla fabela enhavo. Estas ĝia verkinto: S-ro. **Edouard Jung** el Strasbourg (Francujo).

XXVIII—*Tradukitaj versaĵoj (3.^a grupo) Premio de «Agrikultura Sindikato».*

Sub tiun ĉi temon venis sin ŝirmi ok verkoj preskaŭ ĉiuj rimarkindaj, tiel pro la boneco de la traduko kiel pro la fameco de la aŭtoroj elektitaj. Estis vera malfacileco profunde juĝi pri la kvalitoj de la tradukoj kaj pri la eminenteco de la originaloj. Sed post daŭra atentado ni konsideris ke tri manuskriptoj povus indi la premion. Limigita nia laboro al tiuj ĉi tri verkoj, ni juĝis pli grava laŭ ĉiuj vidpunktoj la verkon n-ro. 23, devizo «Tragedio» majstra traduko el la tria sceno de la tria akto el la verko de Shakespeare «Otello, la maŭro de Venecio» kaj ni aljuĝis al ĝi la premion. La aŭtoro de tiu verko estas F-ino **Louise Briggs** el Leeds (Anglujo).

Puŝas en merito tiun verkon, kaj ĝin oni mencias unuavice, la n-ro. 18, kun devizo «Merlin» kiu faras brilantan tradukon el parto de «La alveno de Arturo» de Tennyson. Estas ankaŭ aŭtoro de tiu traduko F-ino **Louise Briggs**.

Al la verko n-ro. 97, devizita kaj titolita «Hanibalo kaj Scipiono» oni

aljuĝas duan mencion. Ĝi estas drama sceno el la verko de sama nomo de Franz Grillparzer, vicle tradukita de S-ro. Profesoro **Adolf Hainschegg** el Graz (Aŭstrujo).

Trian mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 6 kun devizo «Amiko fide-la trezoro plej bela» korekta traduko de la versaĵo «Hektoro adiaŭas Andromahon» el Schiller, ŝuldita al la inteligenta plumo de S-ro. **Boucon** el Annecy (Francujo).

Estas aljuĝita kvara mencio al la verko n-ro. 6, kun devizo «Mi riskis ĝin» traduko de poemo el la germana lingvo kiu spegulas ne tre flekseble la originalon kaj montriĝas kun ia rigideco kaŭzita de postuloj ĉe la rimado. Aŭtoro: S-ro. **Hermann Steding** el Bremen (Germanujo).

Kvina mencio estas aljuĝata al la verko n-ro. 111 sub devizo «En la mondon venis nova sento» traduko el la baska lingvo farita de F-ino **Amalia Núñez Dubús** el Pamplona.

XXIX. — *Originala aŭ tradukita scienca studo pri la eltrovo de la Radioj X. (Roentgenologio) Premio de D-ro. Ramon Torres i Carreres:*

Konkursis la diritan temon du verkoj: unu originala disvolvas kun sufiĉeco da pruvoj la demandon, ĝi atingas la premion. Ĝi estas la n-ro. 124 sub devizo «Atakema» kaj ĝia verkinto: S-ro. **Hans Tomczak** el Charlottenburg (Germanujo).

Al la tradukita verko ni rezervas mencion ĉar ĝi interese komentarias pri la afero. Ĝia n-ro. 95 kaj devizo «Ĉiam antaŭen-Zaaz» kaŝas la tradukaŭtoron kiu estas S-ino **Wecker-Eckert** el Saaz (Ĉeĥoslovakujo).

XXX. — *Tradukitaj prozaĵoj (2.^a grupo) Premio de D-ro. Sennomulo.*

El la verkoj enhavataj en tiu ĉi grupo fariĝas rimarkinda la verko n-ro 17 sub devizo «Vojaĝanto» senpeka traduko el la angla lingvo elfinita de la terta plumo de F-ino **Louise Briggs** el Leeds (Anglujo).

Indas unuan mencion la verko n-ro. 99, traduko de du ĉapitroj el romano de **Paul Busson** sukcese farita de Profesoro **Adolf Hainschegg** el Graz (Aŭstrujo).

Duan mencion forĝajnas la verko n-ro. 74, kun devizo «La okuloj perdidas la animon, sed ne ĉiu scias en ili legi» impresa rakonto bone tradukita el la pola lingvo, de S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

Estas aljuĝata tria mencio al la verko n-ro. 88, devizita «Glis», facila traduko el «Psalms of the West» verkita de F-ino. **F. M. Bartholomew** el Letchworth (Anglujo).

Kaj kvaran mencion meritas la verko n-ro. 121, devizo «Paŝo post paŝo» titolita «Adigaj proverboj» kiu kolektas aron da proverboj el Adigujo, vere interesaj. Aŭtoro: S-ro. **P. Stojan** el Genève (Svisujo).

XXXI. — *Kio estas kaj kiel efikas la spiritaĵoj de Sta. Ignaco de Lojola kaj la koncerna gvidado de Pastro Vallet de Katalunujo. — Premio de S-ro. Esteve Rossell.*

La sola verko ricevita por tiu ĉi temo havas la sufiĉajn meritojn por atingi la premion ĉar ĝi donas rimarkindajn detalojn pri la organizo de tiaj ekzercoj kaj komentarias ilian efikon en konvena formo. La verko estas numerita per n-ro. 79, devizita «Memorare novissima tua...» kaj ĝin verkis: Pastro **Joan Font Giralt** el Banyoles.

XXXII-XXXIII. — *Tradukitaj prozaĵoj (3.^a grupo).*

Kvin verkojn ni envicigis sub tiu ĉi temo el kiuj fariĝas nepre premiinda la verko n-ro. 109 surhavanta la devizon «Tales of the Crusaders» superbela traduko el la dua ĉapitro de «La Talismano» de Walter Scott kiun ellaboris en vibranta prozo S-ro. **Marian Solà** el Terrassa. Al ĝi ni destinas la XXXIII premion de S-ro. **Joaquim Trias**.

Du verkoj hezigitis nin por la aljuĝo de la alia premio XXXIII de S-ro. **Francesc Trias**. Ambaŭ ili havas proksimuman meriton. Ni opiniis, tamen, pli inda la verkon n-ro. 120, devizita «Ni hi són tots els que ho són, ni ho són tots els que hi són» kiu estas tre ĝusta traduko el la kataluna lingvo, kaj ni aljuĝis al ĝi tiun premion. Aŭtoro: S-ro. **Delfi Dalmau** el Barcelona.

Al alia verko interluktanta kun la esprimita, t. e. la n-ro. 100, sub devizo kaj titolo «En la sankta nokto», ni aljuĝas unuan mencion pro ĝia korekteco kaj boneco de l' enhavo. Aŭtoro: S-ro. Profero **Adolf Haischegg** el Graz (Aŭstrujo).

Dua mencio estas atingita de la verko n-ro. 133, devizita «Vintra suno», speco de fabelo pri Kristnasko, tradukita el la germana lingvo de D-ro. **Phil. Wolfzernoz Bielher** el Graz (Aŭstrujo).

La verkon n-ro. 89, sub devizo «Kio estas la plej dolĉa? La Dormo» ni distingas per tria mencio. Ĝi estas beleta prozaĵo kiun tradukis el la hebrea lingvo S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio.

XXXIV. — *Studoj diversaj — Premio de S-ro. Esteve Monegal.*

Estas aparte interesaj la ses verkoj ricevitaĵ kiujn ni kunigis por konkursi la cititan grupon. Ili ĉiuj ĝuas bonan stilon kaj fariĝas indaj je distingo. Sed la Juĝantaro zorge pesis ilian meriton kaj opiniis ke la verko kapabla ricevi la premion estas tiu kun n-ro. 37, devizo «Lingvo estas fosilia historio», profunda studo pri la literaturo kaj lingvo de Irlando, kiun priverkis S-ino. **Emma L. Osmond** el London (Anglujo). Al ĝi, do, ni donas la premion.

Ricevas unuan mencion la verko n-ro 81, kun devizo «Kiu deziras efikon tiu uzurimedon» bonega studo farita de F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Dua mencio estas aljuĝita al la verko n-ro. 28, sub devizo «Modesta konsilanto» kiun sendis al la konkurso S-ro. **Ivan H. Krestanoff** el **Pirdop** (Bulgarujo).

Oni aljuĝas trian mencion al la verko n-ro. 102, devizo «Babilado» flua studo verkita de S-ro. **Jakobo Schmid** el **Bern** (Svisujo).

Meritas kvaran mencion la verko n-ro. 122, surhavanta la devizon «La bonuloj estas ĉiam la gajuloj krom pro malbonŝanco» ŝuldata al S-ino. **Emma L. Osmond**.

Kaj kvinan mencion ni liveras al la verko n-ro. 65 devizita «Malsaĝulo» sendita de F-ino **E. B. Ireland** el **Hove, Sussex** (Anglujo).

Finiĝis jam la raporto pri la verkoj distingitaj en la XII-aj Floraj Ludoj. Kiel vi vidis, la kolekto estis abunda kaj bonkvalita kiel korespondas al la laboro kaj graveco de nia institucio. Sed la tasko de la Juĝantaro ĉiujfoje plipeziĝas per la kresko de la nombro da verkoj konkursantaj kaj de ilia pligrandiganta vasteco. Kaj la tempo por trajugo ne vastiĝas en konvena proporcio tiamaniere ke la Juĝantaro povu dediĉi sufiĉan tempon al ĉiu verko ricevita. Pri tiu punkto estas necese insisti por ke, estonte, oni disponu almenaŭ duoblan tempon ol nun, per kiu oni plenumos pli ĝustan kaj elfinitan laboron.

Kaj nun, ĝesinjoroj, mian lastan kaj tradician vorton: Dankon!

Oni trovu eutenita en tiu profunda vorto la tutan esprimforton el nia sincera animo por ĉiuj kiuj iamaniere ne ŝparis sian helpon al la sukceso de la Floraj Ludoj: Al la malavaraj donacintoj de premioj; al la konkursintoj, premiitoj kaj ne premiitoj, unuaj kontribuintoj al la efektivigo de la Festo, al niaj eksterlandaj kunjuĝintoj, D-ro. **Edmond Privat**, nia kara Prezidanto, kaj S-ro. **Josep Berger**, kies mirindan taskon en la juĝado de la verkoj mi ne scias kiel pli bone taksi, al la organizintoj de tia brilanta solenaĵo kies rememoron ni konservos kiel unu el la plej belaj faktoj dum nia vivo; al nia superbela Reĝino kaj ravanta Kortego per kies ĝentileco kaj lumelradianta entroniĝado, ili sciis doni al sia simbola posteno la altan signifon de majesteco kiu ĝin koncernas; al la premiita poeto kiu el malproksime bonvolis vojaĝi ĉi tien por partopreni nian entuziasmon kaj doni reliefon al la okazaĵo; al la distingindaj aŭtoritatuloj el tiu ĉi nobla urbo kiuj honorigis nin per sia afabla ĉeesto, kaj fine, al vi, gastama popolo el Sankta Coloma, kiu montris vian gradon de idealeco veninte ĉi tien kuraĝigi per aplaŭdoj niajn triumfintojn kaj varmiĝi en la ideala fajraĵo de komuna elasta lingvo sonoranta plej delikate sur la refaldojn de ĉies koroj kiel amfrapeto invitanta al nova vivo kiu forigos ĉiajn malkomprenojn kaj ŝanĝos la mondon en pli perfektan larmovalon.

JOSEP VENTURA

Ĉiuj aŭtoroj aŭ reprezentantoj, kiam nomataj de la Sekretario, alpaŝas al la Reĝino ricevi de ŝia mano la respektivan premion ĵus enmanigitan al ŝi de paĝio. Kelkaj premiitaj verkoj estas legataj de la koncerna

aŭtoro tuj post ricevo de la premio. Per aplaŭdoj la publiko esprimas simpatian al la premiitoj kaj al la Sekretario.

Fine la prezidanto de K. E. F. klarigas kaj laŭdas la verkaĵojn de D-ro. Ed. Privat, Prezidanto de la Juĝintaro de XII-aj Floraj Ludoj, senditan kiel paroladon por la Florluda Festo. Jen la

Saluto de la Prezidanto de la Floraj Ludoj

Karaj ĉeestantoj:

La Floraj Ludoj katalunaj! Kiom da belaj rememoroj ili vokas. Kiom da goĝo kaj poezio! Kiom da nobla entuziasmo! Antaŭ dek sep jaroj en 1909 ankaŭ la subskribinto partoprenis en ili kaj venis ricevi de la Reĝino Sinjorino Marie Hankel la premion por poemo, kiun li devis laŭtleĝi.

Tiu Reĝino havis grizajn harojn. Ŝi nun havas blankajn. Ni ĉiuj dankememoras pri ŝia bela talento kaj homa amindeco. Al la Reĝino de la nunaj Ludoj mi deziras la longan feliĉon kaj saman ĝojigan rememoron pri la hodiaŭa tago kiel neforgesebla floro en la ĝardeno de l' vivo.

Per tiu ĉi literatura festo vi ligas la pasinteco kun la estonteco en belega maniero. La Floraj Ludoj estas antikva ĉarma tradicio. Ĝi kantas pri via riĉa kulkuro. Ĝi simbolas la vivan spiriton kaj artan guston de via nobla popolo kataluna. Samtempe ĝi ornamas nun per novaj kreaĵoj la lingvon de l' espero, la komunan ligilon inter ĉiuj popoloj, grandaj kaj malgrandaj.

Nenie pli bone aŭ pli trafe ol en via bela lando oni sukcesis mortigi la kalumnian asertaĵon ke esperanto malfavoras naciajn kulturojn. Per la «Kataluna Antologio» vi donis al la mondo la rimedon eklerni pri via nacia literaturo ĝuste pere de nia internacia helplingvo. Per la Floraj Ludoj vi ebligas nian komunan literaturon plikreski en tuta mondo per varma brilo de la kataluna suno.

Via festo parolas al homaj koroj pri sankta harmonio kaj egaleco inter ĉiuj gentoj de la homaro. Tie, sur via tero, vi saĝe kulturas tiun duoblan amon, kiu devos iam esti regulo por ĉiuj homoj: amon al via bela lingvo, parolanta al koroj pri la hejmo, pri la infaneco, pri la patrino dorlotado, pri la juneco kaj arda fervoro, pri la karaj vivantoj kaj la karaj mortintoj, kunsantaj pace en tombejoj de viaj vilaĝoj, pri ĉio granda, kiun katalunoj faris kaj faros ankoraŭ, unuvorte pri viaj glorioj, viaj suferoj kaj viaj fervoraj aspiroj; amon al nia komuna Esperanto, la lingvo pura je ĉiu intergenta batalo, la lingvo de l' sopiro homara al pli justa, pli egala, pli frata interrilatado de popoloj unuj kun la aliaj.

Per tiu duobla amo vi staras fiere kaj solide kiel nobla kverko kun fortaj radikoj en la riĉa nutra tero kaj delikataj verdaj folioj altiĝantaj al ĉielo.

En la nomo de l' esperantistaro mi dankas al vi pro viaj Floraj Ludoj. Ili estas valora helpilo al riĉigo kaj progresigo de nia lingvo per la vojo de l' naturo kaj gusto. Gratulon al ĉiuj sukcesintoj. Saluton al ĉiuj ĉeestantoj. Vivu kataluna bongusto kaj esperantista frateco!

EDMOND PRIVAT

Dua Kongrestago.

24 de majo

Je la 8-a. multaj kongresanoj troviĝas en preĝejo St. Sebastia kie okazas meso speciala por la esperantistoj kaj esperanta prediko. La predikanto, Dro. Johano Font, tre korekte kaj bele disvolvas la predikon, kiu forte altiras la atenton de la aŭskultantoj pro la altaj pensoj kaj bele trafitaj argumentoj. Oni povas aserti, ke la prediko de Dro. Font estas modelo, ne nur pro la koncepto sed ankaŭ pro la ĝusta elparolado kaj gramatika korekteco.

LABORA KAJ FERMA KUNSIDOJ

Je la 10-a. la bela kunsido de la Urbdomo estas plena de kongresanoj.

Sro. Dalmau malfermas la kunsidon je la 10. 15. Oni elektas Sron. Josep Alberich kongresa sekretario.

S-ro. Herp raportas pri la agado de K. E. F. dum la interkongresa jaro kaj precipe detalias la financon situacion. Ambaŭ aspektoj de lia raporto meritas la aprobon de la kongresanoj.

Oni aprobas la elekton de delegitoj en diversaj urboj por pli rapide eukasigi la kotizaĵojn kaj abonojn. Tiu rimarkinda malfruo de la membroj kaj abonantoj kaŭzas ĉiam malhelpon al la Federacio. Sro. Bofill proponas kaj oni aprobas, ke nia organo publikigu la liston de la delegitoj.

Sro. Casanovas proponas ke la Federacio organizu konkurson kun premio por havigi al nia kaso profiton el la kotizaĵoj, kiujn oni devus fiksi por partopreni la konkurson. Kelkaj kongresanoj partoprenas la diskuton kaj oni ne aprobas la proponon, kiu, ŝajne, ne povus havi sukceson.

Sro. S. Alberich, en la nomo de la iniciatintoj de Kataluna Esperanto-Instituto, detale priskribas la celon de la iniciatintoj kaj la kaŭzojn, kiuj konsilas la starigon de la Instituto. La matureco atingita de nia kataluna lingvo kaj la fikseco gramatika al kiu alvenis la rapida evoluo de nia lingvo devigas nin havigi al la lernantoj pli modernajn lernolibrojn. Krom tio la novaj metodoj de pedagogio starigas la materialon, kiun ni havas hodiaŭ, je tre malalta nivelo. La K. E. I. ne nur solvos tiujn du ĉefajn aspektojn, sed aŭkaŭ okupiĝos pri la propagandiloj necesaj en la nuna epoko. La Instituto havigos al si la materialon kaj sistemon de la Komitato por Kataluna Antologio por daŭrigi la sukcesan vojon.

Dro. Bregon faras kelkajn rimarkojn kaj akcentigas la gradon de respondeco, kiu postulas la eldono de novaj vortaroj kaj gramatikoj, precipe el financa vidpunkto. Li opinias ke la verkoj de Sro. Pujolà ne farigis tiel malnovaj kaj ke ilia reeldono kun la necesaj sintaksaj kaj ortografiaj reformoj povus doni ankoraŭ kontentigan rezulton.

Prof. Dalmau opinias, ke nova eldono nepre devus esti sub la postuloj

de la hodiaŭa kataluna lingvo kaj ankaŭ akorde kun la nova pedagogio kaj pliriĉiĝo de Esperanto. Pro tio li subtenas la celon de la iniciatintoj de la Instituto, ke oni verku novajn gramatikojn kaj vortaron kaj, se tio fakte ne estas ebla, ke Sro. Pujulà kompletigu siajn verkojn laŭ la necesa grado.

Sro. Alberich klarigas ke la Instituto neniam forgesos la gravecon de la entrepreno kaj pro tio ĝi ĉiam konsiliĝos kun la koncernuloj antaŭ ol ĝi entreprenos iun gravan paŝon.

La Kongreso kun ĝojo salutas la baldaŭan starigon de la Instituto kaj promesas al ĝi sian helpon.

Sro. Capdevila, kasisto de Komitato pro Kataluna Antologio, raportas pri la brila sukceso de la entrepreno. En la daŭro de tiel mallonga tempo oni disvendis tra la tuta mondo 375 ekzemplerojn ĉirkaŭe. La verko trovis nur laŭdojn kaj hodiaŭ la beleco de nia patra lingvo estas ĝuata en la vasta Esperantujo. Li anoncas ke al la akciuoj oni povas repagi la 40% de la akcioj.

Sro. Bofill proponas ke la balearaj samideanoj havu sian reprezentanton en la komitato de K. E. F. Oni iom diskutas pri la maloportuneco de rilatoj inter komitatanoj el diversaj urboj kaj fine oni unuanime aprobas, ke la balearanoj havu du lokojn en la komitato.

Oni longe diskutas pri la reorganizo de la Konservantaro de la Floraj Ludoj por fine veni al la konkludo ke ĉio restu kiel ĝis nun.

Sro. Teo Jung, kiun oni invitas por ke li detale klarigu sian proponon aperintan en unu el niaj lastaj numeroj, opinias ke niaj Floraj Ludoj havus apartan allogon por la neesperantista publiko, se la premiita poeto partoprenus ĉiam la Feston de la Poezio. Por tio li proponas ke estonte oni deprenu de la premioj ian procenton por pagi la elspezojn de vojaĝo al la poeto, kiu venus el eksterlando. Se la poeto premiita per la Natura Floro estus enlandano, oni povus konservi la monon por estonta jaro.

La proponanto objekte argumentas sian proponon kaj la kongresanoj komisiis la komitaton de K. E. F. ke ĝi klopodu efektiviĝi la ideon.

Ankaŭ oni komisiis la komitaton atenti la proponon de Sro. Berger kaj efektiviĝi tiujn punktojn, kiuj praktike povas solviĝi.

La prezidanto anoncas la fermon de la kunsido sed ĉar kelkaj kongresanoj esprimas la deziron ke la Ferma Kunsido okazu jam nun por doni liberon al tiuj, kiuj por la posttagmezo havas alian planon, oni daŭrigas la kunsidon post kelkminuta ripozo.

Oni reprenas la kunsidon kaj estas decidade danki Radio Barcelona pro la helpo, kiun ĝi ĉiam donis al nia movado. Ankaŭ oni decidas sendi telegramon al verkisto Vidal i Planes, kiu pro politikaj aferoj estis maliberigita. Oni petas la komitaton ke ĝi esprimu al la familio de nia neforgesebla Gastón, mortinta antaŭ kelka tempo, la esprimon de doloro de la Kongreso pro la malapero de tiel komprenema kaj fervora samideano.

Oni elektas la novajn komitatanojn kaj estas akceptataj unuanime la jenaj kandidatoj: S. Alberich Jofrè, prezidanto, Joan Gill, Jaume Grau, Edu-

ard Capdevila, Jaume Herp, Josep Alberich, Conrad Domènech, Narcís Bofill, Josep Rosselló, Angel Valdepeñas kaj Jaume Prunà.

Neniu invito venis por la Kongreso de 1927. La komitato oni komisiis, ke ĝi prizorgu la elekton de urbo.

La prezidanto fermas la kuusidon kaj Kongreson je la 13.30, esprimante al la Organiza Komitato kaj al la gastama urbo la plej profundan dankon de la kongresanoj.

EKZAMENOJ

Sub la prezido de profesoroj Solà, Dalmau kaj Alberich (S.) okazas la ekzamenoj, kiujn partoprenas Sroj. Narcís Bofill kaj Conrad Domènech. Post unuhora ekzamenado oni aljuĝas al Sro. Bofill la diplomon de Profesoro kaj al Sro. Domènech tiun de Kapableco.

VIZITOJ

Apartan intereson havis por la kongresanoj la vizitoj, kiuj okazis posttagmeze al la Kulturdomo kaj Biblioteko. La unua, staranta en la ekstero de la urbo, inter arboj kaj floroj, havas la plej novan materialon por eduki infanojn. Sta. Coloma, malgranda urbo staranta je 9 kilometroj de la plej proksima fervojstacio, havas aspekton de moderna urbo laŭ ĉiuj aspektoj. Oni tuj rimarkas ĉe la alveno, ke la loĝantoj havas ĝenerale altan kulturon kaj la afablecon de veraj katalunoj. La frukto de la Kulturdomo ĉie videbliĝas kaj pri ĝi la Sta Coloma' anoj zorgas kiel pri plej valora juvelo.

La Biblioteko, kreita de Caixa d'Estalvis, superas multajn oficialajn bibliotekojn. Meze de parko ĝi staras, riĉaj ĝardenoj ĉirkaŭas la bellinian dometon, kiu malgraŭ la malgrandeco, enhavas grandan bibliotekon. La legoĉambro, el klasika stilo kataluna, invitas la eniranton al pensado, al la guado de la valoraj libroj atendantaj ĉe la belaj ŝrankoj amikan manon.

Sta. Coloma, vi estas enviinda urbo laŭ ĉiuj vidpunktoj. Vi estas ja urbo pri kiu ĉiu pensas: tiun ĉi urbon mi volus havi kiel naskiĝurbon.

FESTOJ DIVERSAJ

Honore de la kongresanoj okazis sardanoj kaj balo. Multaj kongresanoj sin fordonis al la ravo de la dancoj kaj estis vera plezuro por la junuloj kaj ankaŭ por nejunuloj admiri la belecon de la enurbaj junulinoj, kiuj ĉiam havis apartan rideton por ni.

Ni menciuj ankaŭ la altan valoron de Societo Artistica Farnense, kiu la antaŭan vesperon regalís la kongresanojn per belega kunveno. La ĥoro belege kantis nian himnon kaj harmonie aŭdigis kelkajn katalunajn kantojn.

Ĉiu festo estis tre alloga kaj vera plezuro por la esperantistoj, kiuj havis la feliĉon ĉeesti.

LASTA VORTO

Pro tio ke malmultaj kongresanoj enskribiĝis por la ekskursoj de la lasta kongrestago oni decidis ne okazigi ilin.

Kiam la aŭtomobiloj forkondukis la kongresanojn oni sentis kiel rapide forglitis la rememorindaj kongrestagoj. Kun la varma adiaŭo ni forportis al niaj respektivaj urboj la konvinkon, ke ni kunvivis en granda harmonio kun la plej fervoraj defendantoj de la Zamenhofa verko. Ni ĉiuj havis la konvinkon ke nia XIII ne estus povinta elekti pli belan lokon por nia ĉiujara festo.

Varma adiaŭado, longaj manpremoj disigis la kongresanojn. Ĝis la XIV.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

Ĉiu arĥaismo (malnoviĝa vorto) estas sinonimo por la neologismo kiu ĝin anstataŭas. La arĥaismoj kiuj apartenas al la Fundamento, ne estas forigataj el la vortaroj, eĉ kiam ili foriĝis el la uzado. Oni ilin represigas ĉiam, pro la respekto al la unuaj pioniroj. Tamen ne estus juste konsideri ilin kiel nuran balaston aŭ relikvaron. Iu lerta verkisto povus ilin profiti por skribi en la solena stilo, por kiu la ordinaraĵoj kaj parolturnoj ne konvenas. Tion ni vidas en ĉiu granda kultura lingvo kun antikva tradicio, ekz. en la ĉina, franca, rusa. Laŭ tiu vidpunkto ju pli larĝe ni disvolvos Esperanton, des pli riĉa estos provizo da arĥaismoj, necesaj por la alta stilo.

Esperanto estas preskaŭ matura lingvo en siaj formoj, en la ekstero, sed en la interno ĝi travivas unuan periodon de ŝancela malprecizeco. Unu el plej urĝaj taskoj de nuna momento de la Esperanta movado estas preparo de la internacia Fundamento, finlaborita semantike. La egala kaj ĉie la sama kompreno estas esenca kvalito de tiu lingvo, kiu celas klaran interkomprenon. Sed ĝis nun tia interkompreno ne estas garantiita en nia lingvo, kiu estas prezentita malsame ĉe diversaj nacioj. Unu sama radiko estas komprenata tiel en unu lando, kaj aliel en la alia. Nacilingvaj korektoj kaj aldonaj klarigoj, aldonitaj al la Fundamento, pligrandigas konfuzojn kaj senordon. Ne ekzistas por tio alia solvo ol eldono de unika normala Fundamento, redaktita nur en Esperanto. Sur tiu internacia bazo estos verkitaj novaj, pli akorditaj, lerniloj por ĉiuj nacioj, tiam egale profitantaj la novan bazon.

P. STOJAN. L. K.

(daŭrigota)

Pro... kaj Por...

Palmira Castellvi, kiun ni ofte laŭdis pro ŝia kantarto kaj ŝia fervoro por Esperanto, bonege ludis sian rolon en la Esperanta Festo per Radio Barcelona, kaj en Koncerto en Barcelona Teatro Colisseu Pompeia. — De nove al ŝi nian dankemon kaj nian gratulon.

Chesterton, la granda paradoksulo de la penso, la eminenta angla literaturisto, estas ankoraŭ pli paradoksa pensulo pri la lingvo internacia. En kunveno de la P. E. N. Klubo kataluna, antaŭ kelkaj semajnoj okazinta en Barcelona, honore al la angla penklubano Chesterton, okaze de lia vizito kaj kelksemajna gastigado en Katalunujo, tiu paradoksa granda paradoksulo samlandano de Lord Cecil kaj profesoroj Collinson kaj Flügel, parolade diris ke nur homa lingvo internacia povas esti la latina, tial ke nur lingvo per kiu oni povas preĝi kaj blasfemi kaj amindumi povas esti homa lingvo. Niaj anglaj samideanoj estas petataj, kompate al tiu kiu ne scias, evangelie sciigi ke hodiaŭ estas nekonataj latinlingvaj amindumantoj, ke li mem post multjara eminenta praktikado (?) de latina lingvo ne povas tiel facile amindumadi per ĝi kiel per Esperanto simplaj ĉiunaciaj personoj post kelksemajna, foje eĉ post kelktaga simpla lernado de nia internacia lingvo. La universalaj Kongresoj de Esperanto prezentas nekakuteblajn pruvojn, atestojn, faktojn de nia aserto. — Karaĵ samideanoj samlandanoj de Chesterton, bonvolu nome de la katalunoj sciigi al tiu el via lando kaj lingvo kiu eminente nescias pri afero simpla kaj universala. Evitu ke li dubigu aŭ evidentigu pri lia nesciado. Li diris tiajn sensencaĵojn pri Esperanto al aŭtoroj katalunlingvaj el kies verkaĵoj estas esperantaj tradukoj en la «Kataluna Antologio». La asertoj de la aŭtoro de la *Homo kiu estis jaŭdo* publikitaj en ĵurnaloj en Barcelona, pensigis al multaj legantoj ke Esperanto estas nekonata afero en Anglujo.

Nova Sento. — La 8an de la lasta Majo okazis, ĉe nia Societo, parolado. La salono estis tutplena kaj la ĉeestantaro estis tre bone impresita pro la trafa parolado de nia amiko kaj profesoro S-ro. A. Domènech Mas. — La 10an oni malfermis novan kurson sub la gvido de S-ro. Artur Domènech Mas, kiu dum monato klarigis la plej elementajn partojn de gramatiko. — La 7an de junio li komencis la esperantan kurson kiu estas pleneestata, kaj ĝiaj lecionoj tre fruktodonaj. La novaj lernantoj estas 37.

Nekrologo

Nia kara amiko Bernard Esparza havis la malfeliĉon perdi sian patron. Tiu ĉi terura doloro, la plej forta kiun povas senti homa koro, nun premas nian bonan amikon. Li akceptu la esprimon de nia profunda kondolenco.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto». València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

La

Esperantista Lerneja Servo

serĉas en via lando infanojn kaj gejunulojn, kiuj volas korespondi kun samaĝuloj, en Germanlando. Sciu, ke multaj mil infanoj lernas Esperanton en la germanaj lernejoj kaj sopiras korespondadon kun la eksterlando. Tuj skribu al instruisto Richard Pfuetze

Feldstr. 18 FALKENSTEIN I. V.
Germanlando

"ORIENT - VOGTLANDA ESPERANTO-LIGO" GERMANLANDO

Ni serĉas hispanajn amikojn por korespondado kun niaj membroj pri iuj problemoj kulturaj kaj internaciaj.

Donu adresojn multajn al:
Komerĉisto Hans Linke, Falkenstein i.
V., Germanlando, Ellefelder Str. 37.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), ĥ, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA

artícle determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al

femení

heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komer-ci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
kome-rc
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

Mi skribas
Jo es-crib

IS

temps passat

skribis
es-crivi

OS

temps futur

ŝkribos
es-criur-é

US

mode condicional

skribus
es-criuria

U

mode imperatiu o subjunctiu

skribu
es-crigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo es-crib la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo,

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

XVIII CONGRÉS UNIVERSAL D'ESPERANTO

Durant la primera setmana del mes present ha tingut lloc a Edimburg el XVIII-è Congrés Universal d'Esperanto, sota el patronat del Duc de Connaught, de l'Ajuntament d'Edimburg, del batlle de Glasgow, del de Sheffield, de la Cambra de Comerç d'Edimburg, de la Edimburg Education Authority, de diferents professors de les Universitats de Liverpool, Manchester, Oxford, Birmingham, Londres, etc.

La 11 Universitat Internacional d'Istiu ha tingut lloc al mateix temps que el Congrés, sota la presidència honorària del professor i esperantista Charles Richet de la Universitat de París. Les Facultats organitzades ho han estat amb l'assistència de professors de les Universitats de Ginebra, Cracòvia, Leipzig, Londres, Birmingham, Liverpool, París, etc.

Novament han demostrat els esperantistes que la qüestió d'un idioma internacional, per mitjà del qual els homes de diferent parla es poden entendre perfectament, és ja un fet. Més de 1000 esperantistes procedents de més de 35 nacions s'han reunit a la General Assembly Hall i a la United Free Church of Scotland i l'idioma únic ha estat el mitjà de comprensió.

Cal remarcar que l'esperit que es respira a tots els Congressos Universals d'Esperanto fa sentir la germanor que regna entre homes que lluiten per un ideal noble, entre homes que encara que se saben procedents de nacionalitats diferents, saben que per damunt de tot hi regna la germanor universal, sense imposicions de cap mena, sense dominadors ni dominats.

En representació de la Federació Catalana d'Esperantistes ha assistit a les sessions del Congrés el Dr. Marian Solà de Terrassa, el qual properament donarà una conferència pública en un dels nostres Ateneus de Barcelona, per tal de posar de relleu l'importància i transcendència del Congrés suara celebrat.

El lloc i hora s'anunciarà oportunament per mitjà de la premsa.

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provezkemplero 2 respondkuponoj.
 Federacia sidejo kaj redakitejo: carrer València, 245 - BARCELONA

FEDERACIAJ GRUPOJ

Esperantista Klubo Palma
 Mesquida, 6. ent. Palma de Mallorca
Empordanana Ebonaĵo
 (Girona) Armentera
Esperanta Nesto
 (Joventut Katòlica) Ripollet
Fratego
 Placo Pi i Margall, 14. Vendrell
Gerona Espero
 (Creu Roja) Girona
Lumon
 St. Antoni, 64. Terrassa
Studenta Juneco
 (Seminari) Girona
Aplec (Soc.)
 Mendizábal, 3. Sabadell
Bela Espero
 Carretera de Vich, 41. Manresa
Esperanta Idealo
 Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés
Esperantista Amikeco
 Plaça Bernardí, 10. Manlleu
Esperanta Burgono
 (Centre Democràtic) Rubí
Internacia Fratego
 (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet
Paco kaj Amo (Soc.)
 Planeta, 16, pral. Barcelona
Barcelona Stelo
 Marquès Duero, 101. Barcelona
Barcelona Esperanto-Societo
 Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona

LOKAJ DELEGITOJ

Ager: Fino. Maria Plans
Almúnia de Castellví: Sro. Pere Esvertit
Amellá de Merola: Sro. Miquel Arpa
Artés: Sro. Manuel Monrós

Armentera: Empordanana Ebonaĵo
Banyoles: Sro. Joan Aulina
Figueres: Sro. Carles Varela
Girona: Sro. Josep M-a Dalmau
La Garriga: Sro. Joan Blancafort
Mahó: Sro. S. Ortega Barceló
Manlleu: Sro. Marian Vilardell
Manresa: Sro. Josep Albagés
Mataró: Sro. Francesc Torres
Molins de Rei: Sro. A. Canals
Monistrol de Montserrat: Sro. F. Orobitg, Pastro
Palafrugell: Sro. Francesc Sagrera
Palau de Montgut: Fino. Lluís Bargés
Palma de Mallorca: Sro. Narcís Bofill
Reus: Sro. Enric Agnadé
Ripollet: Sro. Josep Planas, Pastro
Rubí: Sro. Joan Ratés
Sabadell: Sro. J. Comadran
St. Adrià del Besòs: Sro. S. Arnella
St. Martí Sapresa: Sro. Joan Rieradevall
Sta. Coloma de Farnés: Sro. Pere Costa
Sta. Coloma de Gramanet: Internacia Fratego
Sallent: Sro. Lluís Solé
Sóller: Sro. M. Arbona
St. Feliu de Pallarols: Sro. J. Collteldevall
Terrassa: Sro. Ramon Marsà
Teyà: Dro. Jacint Barrera
Vendrell: Fino. Maria Julivert
Vich: Sro. Pere Farrés
Vidreres: Sro. Josep Macià
Vilanova i Geltrú: Sro. Jaume Fort
Vilassar de Mar: Sro. Pere Domènech

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH JOFRÉ

Redaktoroj: Delfi Dalmau, Jaume Grau, Marian Solà

Neceseco de Komuna Agado

Antaŭ kelka tempo ni dissendis al diversaj samideanoj en la lokoj, kie ni ne havas delegiton, cirkuleron celantan la elekton de delegitoj, la stariĝon de grupoj, la organizon de propagando kaj kursoj, k. t. p. Al la federaciaj grupoj ni faris kelkajn demandojn, al aliaj ni proponis, ke ili venu al niaj vicoj, kaj kun bedaŭro ni konstatas, ke preskaŭ absoluta silento estas la rezultato.

Depost la komenco de la jaro diversfoje ni admonis niajn abonantojn, ke ili pagu kiel eble plej baldaŭ la abonkoston por eviti al nia gazeto financajn malhelpojn, sed malgraŭ niaj petoj triono de nia abonantaro ne kvitigis ankoraŭ sian ŝuldon.

Se nia financa situacio ne dependus de niaj membroj kaj abonantoj, se nia gazeto ĝuus sendanĝeran ekzistadon, ni ne devus altiri ankoraŭfoje vian atenton al tiu ĉi malagrabla temo, la plej grava por K. E. F. kaj por ĝia presorgano.

Komuna agado estas necesa en tiuj movadoj, kiuj okupas en la vivo malgrandan kampon, kiuj bezonas la kunhelpon kaj kunlaboron de ĉiuj siaj partianoj por iom pezi en la publika opinio. Superflue estas konsenti, ke nia afero, ke la fortoj subtenantaj la esperanto-movadon ne estas tiel gravaj, ke oni povas malatenti la sugestojn kaj klopodojn de la centro por libere disvolvigadi, ĉiu laŭ sia plaĉo kaj deziro.

K. E. F. esperas, ke ĝiaj membroj atente pristudos la neceson de komuna agado kaj la utilecon de baldaŭa plenumo de la devoj, por eltiri maksimuman rezulton el la kunagado de la katalunaj esperantistoj.

Por la bono de nia afero, por la prospero de via Federacio kaj gazeto, laboru saĝe, propagandu konstante kaj varbu samideanojn por K. E. F.

La interrompita poemo

Hier, entre ses bras, sur sa lèvre fidèle,
j'ai surpris quelques vers que j'avais faits pour elle.
Et sa bouche, au moment que je l'allais quitter,
m'a dit: "Tes vers sont doux, j'aime à les répéter."

ANDRÉ CHENIER

Sur ŝiaj dolĉaj lipoj poemo mia sonis
kaj flui ĝin mi aŭdis en plej konfuza mir'.
En ĝi mian esprimon apenaŭ mi rekonis
kaj ŝajnis ĝiaj sonoj el pli sonora lir'.

Kun rava melodio fluadis la esprimoj
nur akre eligintaj el mia kruda pens'.
En miaj versoj estis pli belaj novaj rimoj
kaj ĉiu vorto havis mirige pli da senc'.

Min ravis de la strofoj la ondoj harmoniaj,
de tuta la poemo la ritmo kaj sonor';
surprize tiujn strofojn mi ja ne kredis miaj,
sed ŝia l' ampasion ja sentis mia kor'.

Miraklo tio estis de ŝia voĉo bela,
de ŝia gest' gracia, akcent' plena de varm'.
De miaj pensoj vibris en ŝi l' eĥo fidela
kaj tial en ŝi estis por mi tiela ĉarm'.

En ŝia voĉo estis la tono plej muzika,
la milda energio kaj ritmo de deklam'...
mi sentis ian ĝuon pri amo romantika,
aŭdante ŝin esprimi pri mia propra am'.

Sed jen subite estis en ŝi petol' gracia:
ŝi kvazaŭ al mi turnis l' esprimojn de l' poem';
mi ĝojis plej feliĉe pri tia ŝerc' pasia:
poemon ŝi ne finis pro ama ĉirkaŭprem'.

La lastan strofon mian laŭtvoĉe ŝi ne legis
pro tiu de l' poemo subita ĝoja fin'.
Sed tamen la fervoro de tiu strofo regis,
ĉar ambaŭ ni tutkore per kisoj legis ĝin...

JAUME GRAU CASAS

Ruĝa Lanterno

— Ŝajne, vi ankaŭ interesiĝas je fotografado? — mi demandis la mastron, ĵus li enkondukis min en sian kabineton, kie estis aranĝita por mi lito.

La mastro, dika, senhara bonanima bienhavanto, en kies domo mi trovis rifuĝejon de pluvego, kiu atakis min subite, dum mi revenis piedire el la urbo, kun miro fikse ekrigardis min kaj nee ekbalancis per la kapo.

— Plej malmulte... — li respondis. — Pli ĝuste, mi havas tute nenian ideon pri ĝi. Sed kial venis subite vian kapon tia stranga demando?

Mi senvorte montris al li per la mano grandan elegantan kupran lanternon kun ruĝaj vitroj, kiu, starante sur supra breto de libroŝranko, tuj altiris mian atenton, ĵus mi transpaŝis sojlon de la ĉambro.

— Ha, vi pri la lanterno! — diris la mastro surprizita kaj agrabla ride-to ekglitis tra lia vizaĝo. — Oni efektive iam uzis ĝin ĉe fotografado, sed mi ricevis ĝin donace antaŭ longe kaj de tiam mi konservas ĝin zorge, kiel memoraĵon. Eble, detala rakonto pri ĝi estos tro longa, eble, vi preferos aŭskulti ĝin alifoje?

Mi tuj rimarkis, ke per mia subita demando mi tuŝetis ian neordinaran temon, ke mi vekis en mia amiko ian malproksiman kaj karan rememoron kaj, malgraŭ laceco, kiun mi sentis pro longa piedirado, mi trankviligis lin, ke mi kun plezuro aŭskultos la rakonton, kiom ajn longa ĝi estus, ke mi ne ekdormos dum la tuta nokto, se li prokrastos ĝin.

Mia amiko agrable ekridetis kaj, neatendante miajn pluaĵn petojn, sidigis. Kvazaŭ rememorante detalojn, li poste sulkis la frunton, sed post nelonge, kun dolĉa memkontenta mieno, gaje frapetante per la fingroj je la tablo, komencis:

— Nu, tio ĉi okazis antaŭ longe, ankoraŭ dum mia malproksima feliĉa juneco. Mi tiam lernis en sesa aŭ sepa klaso de gimnazio, fininte kurson post kiu, mi revis, laŭ deziro de la patro, eniri medicinan fakultaton de universitato. Estis belega printempa sezono kaj en la junan kapon venis kiaj ajn ideoj kaj pensoj, krom tiuj, kiuj estis studotaj en enuigaj lernolibroj. Post unu-du tagoj devis okazi unu el plej malfacilaj ekzamenoj, tial mi devis streĉi ĉiujn miajn kapablojn. Sed, kiel intence, je tiu ĉi fojo mi ne prosperis en tio ĉi: miaj pensoj nerimarkeble kuris malproksimen, for de la urbo kaj nevole kunportis min kun si en la kamparon. Ĝuste dum unu tia minuto de maldiligenteco kaj malatenteco mi ricevis leteron de la patro. Mi devas diri al vi, ke la patro tre amis min, fieriĝis je miaj sukcesoj kaj ĉiamniere penis kuraĝigi min. Interalie, dum ekzamenoj, aŭ antaŭ ili, li ĉiam promesis al mi ian allogaĵon, ricevotan post sukcese finotaj ekzamenoj. Nu, je tiu ĉi fojo lia allogaĵo estis plej ĝustatempa kaj surprizplena. Li skribis, ke somere, baldaŭ post fino de miaj ekzamenoj, li entreprenos longedaŭran vojaĝon al la sudo, ke samvoje li vizitos sian alipatran fraton kaj

tie restigos min gasti dum tri-kvar semajnoj ĝis sia reveno. Ne imagu, ke la onklo mem tiel allogis min ial al si, — tute ne! Li estis tre severa murmurulo kaj granda strangulo, tute ne tolerinta petolaĵojn, je kiuj mi, konforme al mia aĝo, estis eltrovema. Ĉiuj, senescepte, eĉ la patro timis lin, kiel subitan noktan fulmotondron, kaj nomis lin «frenezulo». Kompreneble, gastado ĉe tia parenco prezentus nenion agrablan, se la onklo loĝus sola. Sed tie ĉi estas la esenco mem. La onklo estis seninfana vidvulo, en lia domo mastrumis du jam ne junaj virinoj — iaj parencinoj de li, unu el kiuj havis filinon, mian samaĝulinon, Julia'n.

Antaŭ unu jaro la onklo pasigis kun ŝi preskaŭ la tutan someron en nia bieno kaj tiam mi ekvidis ŝin je unua fojo kaj tre baldaŭ amikiĝis kun ŝi en plena senco de la vorto. Ŝin oni ne povus nomi belulino, tamen ŝi estis tre ĉarma kaj delikata ekzistaĵo, bone edukita kaj neordinare talenta. De ŝiaj belaj versaĵoj estis ravataj ne sole mi, sed ankaŭ ĉiuj ŝiaj parencoj. La onklo adoris ŝin, nomis ŝin sia filino, treege zorgis pri ŝi kaj, kiel mi poste spertis, tre ĵaluzis ŝin al iu ajn. Estas superflue paroli, ke la somero pasis por mi en societo de tia amikino, kiel unu bela tago. La onklo havis multajn aferojn, li ofte kelkajn tagojn pasigis jen en la urbo, jen ĉe niaj najbaroj — nobeloj kaj neniu dum lia foresto malhelpis al ni, neniu ĝenis min. Mi ne scias, eble, ŝi preferus min al iu el knabinoj, sed en nia familio ili tute forestis kaj filinoj de niaj najbaraj nobeloj ne plaĉis al ŝi pro sia malhumileco kaj tromemfido. Krom tio ili interesiĝis sole je amuzaĵoj kaj ornamoj, kion ne ŝatis Julia, naskita kaj edukita idealistino. Jen, kio estis alloga kaj surprizplena en la letero, — revido de la ĉarma knabino, rememoroj pri kiu estis ankoraŭ tiel freŝaj en mia memoro.

Nature, mi uzis ĉiujn fortojn por venki mian maldiligentecon kaj malatentecon kaj triumfe finis la ekzamenojn. La patro, kiel ĉiam, senprokraste plenumis la promeson kaj mi ankoraŭ ne havis tempon por viziti en ĉirkaŭaĵoj de la bieno ĉiujn vidiindaĵojn, konatajn de la infaneco, kiam la vojaĝo al la sudo jam estis entreprenita de li.

La maro, sur kies bordo mem staris la somerloĝejo de la onklo, la belegi montaro, neniam ankoraŭ vidita de mi luksa kreskaĵaro de la sudo ne impresis je mi tiel forte, kiel Julia. Meze de la sorĉa suda naturo ŝi, neniom simila al knabinoj, kiujn mi vidis en la urbo kaj en la kamparo, ŝajnis al mi ia nesurtera estaĵo. Ni renkontiĝis kiel malnovaj amikoj kaj dum la unuaj tagoj de mia estado ĉe la onklo, estis nedisiĝantaj dum tutaj tagoj. Sed la patro baldaŭ forveturis ien kaj la onklo, plu jam ne okupata de li, tuj rimarkis nian intiman amikecon kaj pro ĉi konsidero opiniis ĝin nedeca kaj nepermesebla. Sekrete de mi la knabino estis transloĝigita kune kun la patrino en najbaran somerloĝejon, kiu kuŝis je tri kilometroj proksimume de la somerloĝejo de la onklo en pentrinda monta regiono, kie loĝis ŝia avino. Tiel senkompate kaj kruele senigita je la sola homo, kiun mi tie konis kaj ŝatis, mi treege enuis. Ĉiuj belaj de la ĉirkaŭaĵoj, kiuj antaŭ nelonge ŝajnis al mi tiel majestaj kaj pentrindaj, tuj perdis por mi tutan

sian allogantecon, eĉ pli, — mi rigardis ilin malamike, kun abomeno, kvazaŭ ili estis kaŭzo de mia malĝojo. La onklo, malgraŭ siaj multaj strangaĵoj kaj ekscentreco, estis homo ĉiufanke instruita. En lia domo estis multaj libroj, interesaj sciencaj kolektoj, sed tio ĉi tedis al mi en la urbo kaj ne pri tio mi revis, venante al la sudo. Pasiginte en la izoleco tri tagojn, mi, fine, decidis profiti oftajn vizitojn de la onklo en Jalta' on kaj entrepreni viziton al Julia en ŝia nova loĝloko. Mi sciis nur ĝian nomon kaj proksimuman direkton, en kiu ĝi kuŝis, sed tio ne timigis min, mi estis tute certa pri tio, ke mi atingos ĝin kaj vidos tie mian amikinin. Mi ne eraris. La vojaĝo estis tre sukcese plenumita kaj mia kuraĝo inde taksita de la knabino kaj de ŝia patrino, kiu ankaŭ ŝatis min. Post tiu ĉi provo mi jam preterlasis nenion foreston de la onklo kaj ofte vizitis la intermontan somerloĝejon, rekompencante per tio min por longaj horoj de la kontraŭvola izoleco. Lastatempe mi eĉ trovis plej proksiman piedvojeton, kiu kunligis la ambaŭ somerloĝejoj kaj plu ne uzis por miaj montekskursoj la bruplenan ŝoseon.

Unufoje, jam en fino mem de mia gastado ĉe la onklo, li devis pasigi tri tagojn ekstere de la hejmo. Mi, kompreneble, bonuzus la okazon kaj ĉiutage farus miajn kutimajn ekskursojn en la montojn, sed ĝuste tiam okazis tiu ĉi historio kun la lanterno. La onklo forveturis frumatene per vagonaro kaj mi preskaŭ samtempe entreprenis la ekskurson kaj venis al miaj montaninoj ĝuste antaŭ matenmango. La tagon mi kutime pasigis plej gaje en la ĉarma societo kaj, kiel ĉiam, revenis hejmen nur antaŭ tagmango, kiu estis ordinare en la onkla domo en la kvara de vespero. Ĵus mi revenis, komenciĝis terura fulmotondro, kiu daŭris ĝis malfrua vespero. La maro furioze ondigiĝis kaj bruis obtuze, neĉesanta tondro sonore eĥis en la montoj kaj pluvo fluis torente, kvazaŭ ĝi intencis je tiu ĉi fojo fortiri kun rapidegaj ŝaŭmantaj pluvriveretoj en la maron ankaŭ nian domon. Kaj tuj post la reveno, dum furiozis la fulmotondro, mi eksentis neordinaran, senkaŭzan premitecon kaj maltrankvilon, kiuj kreskis en mi kun ĉiu horo. Mi penis distriĝi je muziko, je libroj, sed nenio helpis, — la koro obtuze doloris en la brusto kaj ia neklara antaŭsento de danĝero, minacinta al mi, potence pelis min for de la domo. Sed kien iri? Krom la loĝantoj de la intermonta somerloĝejo mi konis nenion, kaj kion mi faros tie tiom neĝustatempe? Kion oni pensos pri mi? Sed ia nevidebla potenco, kiu tute ekregis min, permesis al mi jam nek longe rezoni, nek plu resti hejme.

La pluvego ĉesis, sed la ĉielo ankoraŭ estis malserena kaj sur la teron malleviĝis mallumo. Komenci ian ekskurson ĉe tiaj malfavoraj cirkonstancoj estus riskoplene kaj malsaĝe, mi nepre devis min provizi je ia lanterno, alie mi neeviteble povus droni en ia torento, aŭ perdi la vojon en la montoj. Mi kuris, kiel frenezulo, tra la ĉambroj, serĉante ian lanternon, sed ĉiuj serĉadoj estis senfruktaj: en la domo tute forestis lanternoj. Mi jam volis iri tra la ŝoseo, kie mi nek renkontus ian malhelpon, nek metus min en ian danĝeron, sed la potenco, ekreginta min, postulis, ke mi elektu por la ekskurso ĝuste la pli mallongan kaj pli riskoplenan piedvojon.

Jam vestinte pluvkitelon kaj ĉapelon kaj tute preta al la neĝustatempa promeno, mi tute senkonscie venis en la kabineton de la onklo. Kaj, ĵus mi malfermis ĝian pordon, mia rigardo falis sur la lanternon, starintan en vitroŝranko, kie en severa ordo estis metitaj tre valoraj fotografiloj de la onklo, kiu ŝatis iafaje sin okupi je fotografado. Mi sciis, ke mi neniam farus tian sakrilegion, ankaŭ mi sciis, ke la onklo neniam pardonus ĝin al mi, sed en tiu minuto, ne konsiderante sekvojn de tia bravulaĉa ago, mi eĉ sen plej malgranda hezito malŝlosis la ŝrankon kaj prenis la lanternon.

De la verando mi malsupreniris en la ĝardenon; kiel turnovento, mi trapaŝis ĝin diagonale, transsaltante florbedojn, barintajn mian vojon, kaj baldaŭ estis en vasta vinbergardeno. Nur tie ĉi mi haltis por unu momento kaj bruligis la lanternon. Ĵus larĝa strio de ruĝa lumo lumigis la apenaŭ rimarkeblan piedvojeton, mi ekkuris tra longa deklivo, sur kiu kuŝis la vinbergardeno kaj kiu limtuŝis mallarĝan ŝtonplenan valeton, en kies mezo fluis neprofunda rivereto. La mallumo plidensiĝis kaj la nekutima ruĝa lumo aldonis groteskajn, fantaziajn konturojn al bone konataj objektoj, kiuj estis je ambaŭ flankoj de la vojeto. Penante ordigi en la kapo pensojn, kiuj haose interplektiĝis, kaj konjekti, kion povus signifi tiu ĉi mia nevenkebla maltrankvilo, kio povus okazi al la amata knabino kaj kion mi trovos tie, veninte, — mi kun plej malgrandaj detaloj rememoris ŝiajn vizaĝotraĵojn, hodiaŭan kostumon kaj nian interparolon dum promeno tra la montoj. Antaŭe bruegis la rivereto, kiu nun post la pluvego estis furioza torento, kaj post ĝi, sur alta fervoja surŝutaĵo, briletis tra la mallumo, kiel fajreretoj, fajroj de alproksimiĝanta vagonaro. Alte levinte en la mano la lanternon, mi senhezite eniĝis en la furiozan torenton, kiu, ŝajnis, uzis ĉiujn penojn por faligi kaj engluti min, — kaj malseka ĝis la zono mem mi leviĝis sur la kontraŭan bordon. Nur kelkaj paŝoj nun apartigis min de la surŝutaĵo, la bruado de la vagonaro jam supersonis la torenton kaj mi, senkonscie, svingante per la lanterno, daŭrigis frenezan kuradon, kvazaŭ puŝata de ia nevidebla, kontraŭstarebla forto.

Estis nepardonebla frenezaĵo transkuri la fervojon antaŭ la vagonaro mem, sed mi, kvazaŭ, celis fari ĝuste tion ĉi. Levinte la lanternon, kiel eble plej alte, antaŭ mi kaj lumigante per ĝi la krutan kaj glitigan pro la pluvego surŝutaĵon, mi faris frenezan penon per unu fojo suprensalti sur ĝin, sed la maŝinisto ĝustatempe rimarkis min, pli ĝuste mian lanternon, kaj akre-sona alarma fajfo neatendite skuigis min. Mi perdis ekvilibron kaj falis sur la deklivo, metinte, tamen, la lanternon apud la reloj mem.

La vagonaro tuj haltis, ekaŭdiĝis laŭtaj virvoĉoj, iaj nigrevestitaj figuroj kun lanternoj en la manoj amasiĝis apud la lokomotivo, iu penis levi min kaj persiste demandis ion. Neniel povante kompreni la okazintaĵon, mi, tuta tremante pro interna malvarmo, fine, levis la kapon de glua malseka sablo kaj la unua afero kion mi ekvidis, estis hela fajreraro de vagonaro, nerimarkeble aperanta elpost kruta vojkutbiĝo ĝuste renkonte al la haltinta. Penso pri la minacanta kunpuŝigo de la vagonaroj, kiel fulmo, traku-

ris mian cerbon kaj mi ekkriis el ĉiuj fortoj, montrante la alproksimiĝantan danĝeron kiun ankoraŭ neniu rimarkis.

Sur la lokomotivo kaj la surŝutaĵo komenciĝis neimagebla tumulto. Iu, preninte mian lanternon svingis per ĝi sur la surŝutaĵo, aŭdiĝis ies terurkriegoj, la lokomotivo, alarme fajfante, ekmoviĝis malantaŭen. Sed oni baldaŭ rimarkis la avertojn kaj la danĝero preterpasis.

Baldaŭ la ambaŭ lokomotivoj pace staris senmove nazo al nazo. Ĉiuj pasaĝeroj forlasis la vagonarojn, gratulis unu la alian kun la savo, kelkaj kortuŝe ploris.

Pro la fatala eraro oni ne atendis la unuan vagonaron, kiu ankoraŭ ne atingis la stacion, kaj sendis renkonte al ĝi la alian, tute forgesinte, ke la vojo estas jam okupita de la unua. La eraro estis rimarkita, nur kiam la dua estis malproksime. Antaŭvidante la neeviteblan katastrofon, oni tuj telegrafis en ĉiujn flankojn, petante helpon kaj pli frue, ol la timigitaj pasaĝeroj trankviliĝis, venis helpvagonaroj.

Nur tiam oni komencis serĉi la antaŭforiginton de la neevitebla katastrofo. Trovinte min sur la sama loko, oni kondukis min ien kaj enmanigis al mi mian lanternon. Baldaŭ ĉirkaŭis min rondo de sciivoluloj, kiuj volis vidi min. Oni dankis min, premis mian manon, sed mi malklare ankoraŭ konsciis la okazintaĵon kaj rolon, kiun mi ludis en ĝi. Min rekonsciigis nur la bone konata voĉo de la onklo, kiu staris antaŭ mi, larĝe malferminte la okulojn kaj fikse rigardante ĵen min, ĵen la lanternon.

— Sentaŭga knabaĉo!... — li balbutis. — Ĉu vi?... Kaj de kie vi aperis, de kie aperis la lanterno? Kiu permesis al vi preni mian lanternon...

Iaj urĝaj aferoj devigis la onklon ŝanĝi la antaŭan planon kaj reveni ĝuste kun tiu ĉi vagonaro. Kiam mi, konfuziĝante, ĉion rakontis al li, prisi-lentinte mian vizitadon de la monta somerloĝejo, li ne volis daŭrigila vojon ĝis la stacio per la vagonaro, sed nepre postulis ke mi konduku lin hejmen tra tiu mallonga piedvoĵeto, tra kiu mi venis kaj kiun li tute ne konis.

— Kara onklo, tio ĉi estas neebila, vi malsekiĝos, vi dronos en la torrento... — mi komencis malkuraĝe kaj neniel povis trovi konvenajn vortojn por sciigi al li pri miaj sekretaj ekskursoj kaj ke la monta somerloĝejo kuŝas pli proksime, ol la hejmo.

— Ĉu ni tie ĉi pasigos la nokton? Vi, ŝajne, tute frenezigiĝis, — la onklo diris, sulkante la brovojn.

— Onklo, pardonu... sed tiel proksime de tie ĉi kuŝas la monta somerloĝejo... kaj mi volas, ke Ju... Julia tuj sciigu... pri via feliĉa reveno, — mi diris, kolektinte tutan mian kuraĝon kaj ruĝiĝante.

La onklo estis surprizita, tamen li konsentis.

De tiu ĉi tago mi povis vizitadi Julia' on, kiam mi volis kaj post kelkaj tagoj, la onklo ree transloĝigis ŝin en sian domon. Kaj la lanterno estis restigita al mi, kiel memoraĵo pri mia heroaĵo, savinta vivon, eble, de kelkaj centoj da homoj.

La rakontanto subite silentiĝis kaj enpensigis.

— Kaj Julia?... — mi demandis lin. — Ĉu ŝi poste fariĝis via edzino?

Responde, li nee ekbalancis per la kapo, premis malfacilan ekspiron, kontraŭ lia voĉo elflugintan el la brusto, kaj per pli mallalta voĉo aldonis:

— Nel ŝi mortis pli frue...

— Kaj kian rekompencan vi ricevis poste por via heroaĵo? — mi ree demandis lin, por dispeli malgajecon, kiu kovris lian belan vizaĝon.

— Rekompencan?... — li ripetis la demandon kaj fiksas je mi siajn large malfermitajn okulojn, kvazaŭ mia demando entenis en si ion tre strangan, neordinaran. — Kion vi parolas? Ĉu vi forgesis, en kia land... Se tio ĉi okazus ie en Francujo, Anglujo... sed niaj samlandanoj ne ŝatas tiajn sentimentalajojn... Ĉu vi kredas, oni volis puni min, ke mi, estante privata persono, uzis dum mia ekskurso en ĉirkaŭaĵoj de la fervojo la ruĝan lanternon, kiu estas fervoja dangersignalo. Nur klopodoj de la onklo kaj kelkaj gravaj personoj, savitaj de mi, liberigis min de malagrablaĵoj, kiuj minacis al mi.

Li etendis al mi la manon kaj eliris el la ĉambro.

IVAN ŜIRJAEV

Premiita en la XII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Principoj de Esperanto

(fino)

§ 16. En kelkaj fakoj (marveturo, industrio, militado) kaj en kampara vivo, kie distancoj aŭ bruoj malhelpas la interparolon, ankaŭ en telefonio, kie la voĉo iom malklariĝas, fine inter diversnecianoj kiuj ne perfekte parolas, estas grava por lingvo ĝia sona klareco kaj facila distingebleco de formoj. El tiu vidpunkto oni jam rimarkis troan similecon inter la korelativaj vortoj: *kia, kiam, kian, kien, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiun, kiuj, kiu, tiu, ...* ktp. La praktiko de nia lingvo do elpensis pli distingeblajn formojn: *kiamaniere, kiomgrade, tiutempe, pro kio, ...*

Oni proponis ankaŭ la internaciajn: *eosto-ŭesto*, anstataŭ praktike neoportunaj: *oriento-okcidento*. Eble estus pli trafe alpreni ankoraŭ pli distingeblajn: *eoso-veso*, kies etimologio jenas: *helena eos* matenlumo, *aŭroro*, *angla east*, *franca est*, *germana ost*, *oriento*; *latina vesper*, *angla west*, *germana west*, *franca ouest* *okcidento*.

Ankaŭ: *ses-sep* ne sufiĉe diferencas, kaj oni proponis *sis*, prenita el la franca.

§ 17. Unu el malklaraj punktoj de la sintakso estas la artikolo. Fakte, krom la difina artikolo (la) estas large uzata ankaŭ la nedifina (unu aŭ iu).

En la Fundamento ni legas (Ekzercaro § 11): «Unu vidvino havis du filinojn. La pli maljuna...» (§ 15): «En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto...» La Fundamenta Krestomatio siavice prezentas multajn similajn ekzemplojn. Nuntempe, por rolo de nedifina artikolo oni prefere uzas *iù*, ekz. en la «Literatura Mondo».

La Fundamento ne donas regulojn pri uzado kaj ne uzado de la difina artikolo. Ĝi nur diras, ke «la uzado de l' artikolo estas la sama kiel en la franca kaj en la germana. Kaj la personoj, kiuj trovas ĝian uzadon malfacila, povos tute bone ĝin ne uzi». Tiu klarigo pri la artikolo ŝajne pruvas ke Zamenhof mem malmulte ĝin ŝatis, allasinte ĝin en Esperanton nur por ne ŝoki la nacian kutimon de angloj, francoj, germanoj. La latina, slava, kma. ne havas la artikolon. La uzado de l' artikolo en la franca kaj en la germana lingvoj kune ne estas ĉiam klara kaj firma.

Aliflanke, la uzado de l' artikolo ĉe bonaj esperantistaj aŭtoroj ne estas unuforma kaj reguleca. Ekzistas eĉ verkoj tute sen la artikolo. Aŭtoroj, kiuj ne havas klaran komprenon pri la artikolo, ĝin uzas trafe kaj maltrafe, prefere ili ĝin trouzas, ĉar ili opinias ĝin elegantajo.

Ke la uzado de l' artikolo en Esperanto ne estas la sama kiel en la germana, tio estas facile provebla. Unue, la franca kaj germana artikoloj montras sekson (le, la, der, die, das). Due ĝi montras nombron (les, des, die). Trie ĝi montras kazon (du, au, des, aux, den, dem,...). Kvare ĝi servas por formi substantivojn el verboj (être-un être, coucher-le coucher, leben-das Leben, haken-der Haken). Kvine ĝi uziĝas ĉe geografiaj nomoj (La Corse, Le Chili, Les Antilles, der Rhein, die Rhone, das Categat). Ĉiuj kvin manieroj uzi la artikolon ne ekzistas en Esperanto.

La difina artikolo en Esperanto povas havi nur utilan rolon: mallongigi la esprimojn. Frazo: *Voku doktoron* povas signifi: voku iun ajn doktoron. Frazo: *Voku la doktoron* povas signifi: voku doktoron, kiun ni konas. *Mi portas ĉapelon* povas signifi: mi portas iun ajn ĉapelon. *Mi portas la ĉapelon*: mi portas mian ĉapelon. *En la 1925*: en jaro numerita per 1925. *Mia lando estas malriĉa, la via abundas*: mia lando estas malriĉa, via lando abundas. Kiel la nomo «difinita» artikolo, tiel la opinio ke ĝi «difinas» estas bazi-taj sur la miskompreno, sur la apliko de la naciaĵoj al la internacia lingvo.

§ 18. Kelkaj personoj, fremdaj al nia movado, malaprobis kaj primokis nian poezion, eĉ tutan nian belliteraturon, tradukan kaj originalan. Kontraŭ nia originala poezio ili afirmis ke nur en sia propra lingvo oni povas esti poeto. Kontraŭ nia traduka literaturo ili atentigis pri tio ke niaj tradukaĵoj, nekapablaj esprimi la originalojn, estas krom tio malsuperaj je la alinaciaj tradukaĵoj de l' samaj originaloj. La unua kontraŭdiro estas justa nur por la naciaj lingvoj, kiujn plene posedas nur tiuj kiuj ilin uzis depost la infanaĝo. Esperanton oni povas eĉ pli posedi ol sian propran lingvon. La dua kontraŭdiro estas egale justa por Esperanto kaj por la naciaj lingvoj. Kaj se oni tradukaĉas en la naciajn lingvojn, oni same povas tradukaĉi en Esperanton. Kelkafoje la Esperanta traduko, farita de la naciano mem, po-

vas esti pli ĝusta ol la alinacia, farita de la alinaciano. Se pluraj malbonaj tradukoj en Esperanto povas esti pardonitaj, pro la juneco kaj malriĉeco de nia movado, la multegaj malbonaj naciaj tradukoj ne povas esti pravigitaj. Esperanto, kiu vegetas dum 40 jaroj inter la kelkmilaj da ideemuloj, ne povas esti traktata same kiel lingvo de iu potenca nacio, ekzistanta dum mil jaroj, uzata de milionoj da homoj.

La poezio en Esperanto povas ekzisti kaj ekzistas, ĉar estas la homoj kiuj pensas, sentas, kaj ĝojas en Esperanto, kiel en loko pli kvieta kaj pli justa ol iliaj patrolandoj.

§ 19. Konservado de nia lingvo estas eble plej grava kaj plej malfacila tasko, kiu staras antaŭ tiuj, kiuj volas gvidi — idee aŭ materie — nian movadon. Se la lingvo estus simila al iu mekanismaĵo, la konservada tasko konsistus nur en zorgo pri la tuteco de ĝiaj partoj kaj pri la regula funkciado. Tiel efektive konsideras Esperanton reprezentantoj de la simplista konservemo.

Sed en realo nia lingvo travivas ankoraŭ periodon de kreskado kaj formiĝado, kiu koincidas kun periodo de disvastigado en la tutmondo. Tial la «konservado» de Esperanto havas tute alian sencon, almenaŭ por reprezentantoj de la evolua progresento. Por la lastaj gravas la konservado de unueco de nia lingvo, kiu senĉese aliĝas kaj maturiĝas. La unueco de Esperanto estas komuna celo de ĉiuj esperantistoj. Sed, dum la konservemuloj volas daŭrigi la unuecon per la netuŝebla senmoveco, male la progresemuloj opinias ke la unueco estos garantiata per la unuanima samtempa akceptado de la ŝanĝoj en la lingvo.

Zamenhof estis unua kiu faris la ŝanĝojn en Esperanto. Post kaj apud Zamenhof, centoj da pioniroj ilin akceptis, kaj faris aliajn ŝanĝojn. La tuta Esperantistaro nur uzas lingvon iom alian ol estis la primitiva Esperanto. Do, nia lingvo efektive ŝanĝas, kaj neniam forto en la mondo povas haltigi ĝian evoluadon. La konservemuloj iluzias, kiam ili kredas gardi netuŝebla nian lingvon. La libroj vere restas netuŝeblaj, ne la lingvo.

Se nia lingvo konstante aliĝas, do restas nur duaspeca konservado de la unueco, por kiu devas koncentrigi ĉiuj fortoj de lingve spertaj pioniroj. Estas bedaŭrinde ke pluraj influaj esperantistoj, anstataŭ kontribui al la interna ordo, foruzas siajn fortojn por haltigi la evoluon de nia lingvo al la plimatura ŝtupo. Historio de Volapuka movado estas instruoplena por ni, kaj estus utile ĝin eldoni en aparta broŝuro. Multe pli da estimo akirus prelato Ŝlejer kaj malpli da fortoperdo li kaŭzus, se — anstataŭ obstina konservemo — li tuj aliĝus al Esperanto, kiel al pli taŭga formo de tutmonda lingvo. Tial, neniu prudenta homo diras ke Esperanto estas lasta formo de la mondlingvo.

§ 20. Nia lingvo, se ĝi volas vivi, devas kreski. Sed ni ne devas ĝin subite kreskigi, per vojo de revolucio, radikala reformo, ni povas nur iompost-iom partopreni en ĝia evolucio, senrompa plibonigado, pliriĉiĝo.

Evoluo de naciaj lingvoj iras laŭhazarde, neregule, senhorde. Evoluo

de nia artefarita lingvo povas flui regule, se ni volas tion, ĝi fluas malregule, se ni malzorgas pri nia lingvo. Por prizorgi, eduki nian junan lingvon, necesas sistema agado de unu lingva centro, kiu havos sperton kaj forton por plenumi sian rolon. Tiu centro kolektos internacian materialon, preparos listojn kaj skemojn pri la reguleco, laboros super modela internacia fundamento. Ĝi ne havos centojn da honoraj anoj, sed tri-kvar fakulojn, sub kies gvidado utile laboros centoj da bonvoluloj, loĝantaj en la tuta mondo.

Por uzi ekzemplon, ni povas rememori ke la forto de UEA kreigis dank' al saĝa gvidado de tri-kvar samideanoj, kiuj fervore laboris por atingi la realan celon. Se UEA estus gvidata per dekoj aŭ centoj da personoj ĝi nun eĉ ne ekzistus.

La nuna LK povas bone daŭri en sia rolo de konservema organo, sen iniciativo, kun kontrolo aŭtoritato. La estonta «lingva centro» plenumos alian taskon: elekti taŭgajn formojn, iniciati ilian provan uzadon, zorgi pri la unuanimeco en la evoluo. Kun tiaj du institucioj, kies taskoj interekvilibras, nia lingvo evitos danĝeron de l' ekstremajoj: tro inertan senmovecon kaj tro rapidan progreson. Tia organizo ekzistas en ĉiuj vivipovaj regnoj, en kiuj forto de l' maljunuloj kaj forto de l' junuloj harmonie kuniĝas por la bono de l' regnolando.

* * *

Esperanta literaturo estas sintezo kaj plejalta esprimo de ĉiuj kvalitoj kaj tendencoj de nia lingvo, kiu naskiĝis en formo de l' libreto kaj kies estonta povo dependos de la libraro. Oni povus eĉ diri ke la tutmonda akcepto de Esperanto malfruigas pro manko de la kompletaj vortaroj, teknikaj verkoj kaj fakaj terminaroj.

Milionoj da islamanoj studas tre malfacilan araban lingvon por legi per ĝi nur unu libron, la Koranon. Ofte okazas, ke iu studento aŭ profesoro studas tiun aŭ alian fremdan lingvon por legi nur tri-kvar fakajn librojn, kies tradukoj ne ekzistas. Multaj filozofoj lernis la helenan nur pro verkoj de Plato kaj Aristotelo. El tiuj ekzemploj, kies nombro povas laŭvole esti grandega, oni povus tiri konkludon, ke la bona verko estas potenca disvastigilo de sia lingvo.

Se iu geniulo akceptus nian lingvon por skribi en ĝi siajn ĉefverkojn, tio estus por nia lingvo preskaŭ venko. Aŭ se ni povus eldoni Esperante dekon da kompendiaj verkoj por unu fako, ekz. por matematiko, fiziko, biologio, kemio, tiam nia lingvo estus studata de miloj da personoj en la tuta mondo, kiuj poste grave helpus nian movadon. Presigi logaritmaron, geografian atlason, plurlingvan leksikonon — kun klariga Esperanta teksto — estas pli utila ol akceptigi cent mil propagandajn artikoletojn en la ĵurnalaro. Ĉar per la unua ni donas faktajn utilojn, kies valoro daŭras jarcente, dum per la dua ni eldiras vortojn, kiujn forgesigas sekvanta tago.

La Esperantistaro ĉiujare elspezas por Esperanto pli ol unu miliono da oraj frankoj. Kvarono da tiu sumo, elspezota ĉiujare, sufiĉos por kons-tante eldonadi fakajn ĉefverkojn. — P. STOJAN. L. K.

Pro... kaj Por...

Preseraro — En la raporto de Sro. Josep Ventura, aperinta en nia lasta numero, enŝoviĝis preseraro. — Sur paĝo 363, Originalaj Tekstoj, 1, linio 8, oni legu: Ĝi estas granda laboro de la verkinto, kiu sciis disvolvi legendan argumenton en facila formo, kiu ne forprenas al ĝi ĉarmon.

Esperanto-tago en Rubi. — Kun eksterordinara sukceso okazis la 29 de junio la festo de propagando, kiun la loka Esperanta Burgono organizis kune kun Aplec el Sabadell kaj Lumon el Terrassa.

Granda nombro da samideanoj renkontiĝis en Rubi por partopreni la diversajn festojn, kiuj kun bona ordo kaj ĉarma allogo rapide fluigis la homojn. Multaj samideanoj partoprenis la atletajn konkursojn, kiuj okazis dum la mateno, antaŭ la vizitoj al Escoles Ribas kaj Celler Cooperatiu.

Tagmeze havis lokon festeno en Hotel Catalunya. Post la manĝo, kiu kunigis multajn gesamideanojn, paroladis kelkaj pioniroj kaj ankaŭ Sro. Teo Jung, kiu laŭdis la ĉarmon de niaj festoj, la belecon de nia lando kaj la gastamon, kiun li ĝuis ĉiuloke.

Posttagmeze kun la alveno de pli multaj esperantistoj, la propaganda festo okazinta en la bela «Centre Democràtic Republicà» atingis nepris-kribeblan sukceson. La tuta teatro estis plena de scivolemuloj, kiuj atente aŭskultis la trafajn argumentojn de Sroj. Dalmau kaj Solà. Niaj poetoj Jaume Grau kaj Artur Domènech deklamis kelkajn poeziojn. Sro. Jung alparolis la publikon kun la celo pruvi la facilecon de Esperanto inter homoj el diversaj lingvoj kaj Sro. Solà tradukis la necese mallongan sed efikan paroladon. Fine Fino. Palmira Castellví regalis la ĉeestantojn per sia bela voĉo. Komuna kanto de nia himno fermis la feston.

Ni esperas, ke la restariĝo de Esperanta Burgono alportos al nia enlanda movado plian forton. Ni estas certaj pri tio ĉar la fervoro de niaj amikoj Pernas kaj Ratés ne elĉerpiĝos.

Vespermanĝo de ĝentileco. — En Restoracio Pàtria, Barcelona, okazis la 2 de julio, intima vespermanĝo por honori nian nunjaran laŭreaton, Sron. Teo Jung.

Dum la vespermanĝo, kiun partoprenis ĉirkaŭ 25 samideanoj, okazis viglaj diskutoj pri diversaj temoj kaj tio efike impresis du ĵurnalistojn, kiuj akceptis la inviton partopreni la festeton.

La prezidanto de K. E. F. klarigis la kialon de la festo kaj mallonge priskribis la signifon de niaj Floraj Ludoj kaj proponis honoran lokon al Sro. Jung, kiu kun emocio eldiris siajn impresojn kaj travivaĵojn ĝitajn dum la kelksemaĵna restado en Hispanujo kaj precipe en nia teritorio.

Inter la ĉeestantoj ni vidis Drojn. Bremon kaj Bartomeu, Srojn. Grau, Domènech, Santamarina, Masriera kaj multajn aliajn.

La gazetoj «Las Noticias», «El Diluvio» kaj «Deutsche Warte» publikigis raporton pri la festo.

Ni dankas Sron. Jung, kiu revenis jam al sia patrujo, ke li honoris nin kaj niajn Florajn Ludojn per sia ĉeesto, kiun ni longe gardos en la koro.

Novaj grupoj. — En Santa Coloma de Gramanet fondiĝis nova grupo Internacia Frateco. Oni komencis kurson sub la gvido de s-no Arnella kaj kun la helpo de s-no S. Alberich. La nova grupo, al kiu varme ni deziras multajn sukcesojn, decidis aliĝi al K. E. F.

Esperantista Amikeco estas la nomo de la grupo stariĝinta en Barcelona (St. Andreu), ĉe la sidejo de Casal Catòlic. La organizintoj de la nova kunbatalanto estas certaj ke post kelka tempo ilia grupo enkalkulos multajn membrojn dank' al la favora situacio, kiun ili ĝuas en Casal Catòlic, socioeto kun kelkaj centoj da membroj. Granda ekspozicio estas organizata kaj komenco de kurso anoncita.

Radio Barcelona. — Regule okazas ĉiun trian merkredon, je la 22-a. hispana somera horo, parolado en Esperanto. Ĝis nun paroladis Sroj. S. Alberich, Domènec kaj Dalmau. La 15 de septembro parolados S-ro. Jaume Grau pri «La Kongreso en Edinburgo» kaj la 20 de oktobro pastro Josep Casanovas pri «Esperanto ĉe la katolikaro».

Ni petas niajn kolegojn, ke oni anoncu la paroladojn, kaj la aŭdintojn, ke ili sendu gratulan p. k. al Radio Barcelona, str. Casp, 12, Barcelona.

Geedziĝo. — Nia kara samideanino, Fino. Palmira Castellví, edziniĝis la 5 de julio kun Sro. Haver Haider el Landshut (Germ.). Tiu ĉi feliĉa paro forlasis nian landon por ĝui la miellunon kaj definitive resti en Landshut.

Al la novaj geedzoj ni esprimas nian plej profundan simpatian kaj la deziron, ke ili longe ĝuu la geedzan hejmon, dum nostalgie ni rememoros tie ĉi la dolĉajn kantojn de nia forfluginta najtingalo.

Esperantista Klubo Palma. — Kun granda sukceso okazis la 18 de julio la XX datreveno de la fondiĝo de Esp. Klubo Palma (Palma de Mallorca).

La festenon, kiu okazis en Hotelo Ca's Català, partoprenis granda nombro da samideanoj. Regis granda entuziasmo, kiu atingis sian supron ĉe la parolado de diversaj fervoraj samideanoj.

Pasttagmeze, en la sidejo de la Klubo, okazis literatura kunveno kaj malfermo de ekspozicio. Sro. Bofill alparolis la publikon kaj lia flua parolo elpruvis la utilecon de Esperanto, ĝian kontentigan disvolvigadon kaj pacan celon. Li ankaŭ raportis pri la kongreso de K. E. F. kies ordon kaj seriozecon li admiris, sed pri la kongreso de Hispana Esperanta-Asocio li ne povis diri la samon. — Sro. Rosselló kaj pastro Font ankaŭ paroladis.

Oni disdonis premiojn al la kursanoj, kiuj pruvis pli grandan lertecon kaj studemon dum la kurso 1925-26.

Finigis la festo per komuna kanto de La Espero.

Kongreslibro de K. E. F. — La O. K. de nia kongreso en Sta. Coloma de Farnés sendis al ni kelkajn ekzemplerojn de la Kongreslibro. Ni sendos ĝin senpale al ĉiuj petantoj, membroj de K. E. F.

Vizitoj. — Nia kataluna samideano Masriera el Madrid pasigis kelkajn tagojn kun ni. En la sidejo de Esp. Soc. Paco kaj Amo li faris tre interesan prelegon pri «Novaj idealoj de la vivo» per kiu li pruvis sian superan kulturon kaj altan konon de ĉiuj filozofiaj demandoj.



Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitaĵn)

VERDKATA TESTAMENTO. — Originalaj poemoj de Raymond Schwartz. Deponejo: Centra Librejo Esperantista, 51 rue de Clichy, Paris. — 1926. 121 paĝoj, $16\frac{1}{2} \times 13$. Prezo: 10 fr. fr. afrank.

La aŭtoro de Verdkata Testamento sukcesis ne nur la vivantojn sed ankaŭ la mortintojn amuzi per sia sprita verko. Antaŭ 13 jaroj mi konatiĝis kun Sro. Schwartz kaj malgraŭ tio ke mi ne scipovis Esperanton, li tiel sprite rakontadis siajn travivaĵojn al rondo de esperantistoj, ke mi bone komprenis liajn ŝercojn kaj ne imiteblajn vortludojn.

La poemoj estas bele rimitaj kaj ritmitaj. La vortoj estas facile uzataj de la aŭtoro, kiu montras specialan kapablon por ludi plej diverse kun ili. La senco de multaj versoj certe ne plaĉos al ĉiu leganto, kaj plej kredeble la legantinoj rigardos la paĝojn kaŝe por ne ruĝiĝi dum legado antaŭ la gepatroj, fianĉo aŭ edzo.

Mi antaŭvidas grandan sukceson al la verko de Sro. Schwartz, kiu liveris al ni ion tute novan, plene bonhumoran, lingve tre akceptindan.

Aĉetu, amikoj, V. T. kaj vi sendube bedaŭros, ke vi ne aĉetis ĝin antaŭe.

BENJAMENO F. SMITH. — Historieto pri elfarado de Everet W. Lord. Boston, 1926. 17 paĝoj, 18×13 .

Dank' al la malavareco de Sro. Smith oni povis eldoni la libreton, kiun oni donacis al la lernantoj en Kolegio de Komerca Administrado de Bostona Universitato.

La teksto priskribas la bonŝancan vivon de Sro. Smith, kies negocaj entreprenoj kontentige sukcesis kaj per tio oni intencas inspiri la leganton por similaj rezultatoj.

Ŝajnas al mi, ke la eldono ne multe sukcesos kiel fonto de inspiroj, tamen la bonhavigo priskribita multe povas helpi nian movadon kaj tio estas aparte interesa por nia afero.

La lingvaĵo uzata de la verkinto povus esti pli bona ol ĝi estas. Legante la malmultajn paĝojn de la libreto, oni ricevas la impreson ke la tekston skribis nespertulo kaj ke post supraĵa korektado oni presigis ĝin.

La eldono estas luksa sed kun amaso da sintaksaj malperfektaĵoj.

MATEO FALCONE KAJ ALIAJ RAKONTOJ de Prosper Merimée. — Biblioteko Tutmonda n.º 1. El la franca tradukis J. Borel. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S. W. 19. — 1926, 62 pĝ. $17 \times 10 \frac{1}{2}$. Prezo afrank. de la unua serio (10 numeroj): 4 R. M. aŭ 1 dolaro.

La unua volumo de la nova «Biblioteko Tutmonda», pri kiu ni parolis en niaj numeroj de aprilo kaj majo, superas la esperon, kiun havis la esperantistoj ĉe la anonco de la granda entrepreno de Rudolf Mosse. La tre malalta prezo anoncita por la tuta serio nepre devas altiri multajn abonantojn. Dek numeroj 64-paĝaj, bela bindo, bona preso, valoras ja pli multe ol 4 R. M.

Sro. Borel sukcesis traduki tre talente la belan priskriban stilon de Merimée. Kun facila stilo li respegulas la ĉarmon de la originalo. Sen eraroj, preskaŭ fundamente perfekta, la unua volumo estas garantio de la boneco de la sekvontaj. Preseraroj estas, sed tre malmultaj: pĝ. 16, 4-a. linio malsupre, *sia* estas uzata anstataŭ *lia*: pĝ. 55, *spite* de anstataŭ *spite*.

El la kvar rakontoj reliefigas Mateo Falcone. Ĝi estas belega priskribo de la karaktero de Korsikano.

Tre sincere ni rekomendas al niaj legantoj, ke ili mendu la unuan serion. Ni estas certaj, ke ili mendos la sekvontajn.

ESPERANTUJA KANTO. — Teksto de J. Roskes, muziko de Hugo Nolthenius. Havebla ĉe Sino. Cath. J. Roskes — Dirksen, Anemoonstr. 96, Hago. Prezo: 0. 20 florenoj.

Tre inspirita melodio kun harmonio tre vigla. La konstruo de la frazoj estas lerte disvolvita kaj ĝi ĝuste akordiĝas kun la entuziasmo de la muziko.

OFICIALA JARLIBRO de la Esperanto-Movado. — 1926. Universala Esperanto-Asocio, 12 Boulevard du Théâtre, Genève. 360 pĝ. 16×12 .

Libro tre interesa kaj utila ne nur por praktikuloj sed ankaŭ por propagandistoj, kiuj povas ĉerpi el ĝi tre interesajn informojn kaj statistikojn. Ĝi enhavas krom abundaj informoj pri esperantismo la kutiman adresaron de delegitoj, vicdelegitoj, grupoj, k. t. p.

Rimarkinde ke oficiala libro ne atentis oficialajn konsilojn pri lingvaj aferoj.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. — Kongresa Libro, Edinburgo 1926. 87 pĝ. $21 \times 12 \frac{1}{2}$.

Informoj pri la XVIII Kongreso kaj II Internacia Somera Universitato, informoj pri la Oficialaj Institucioj, Kontrakto de Helsinki, Gvidilo al Edinburgo, plano de la kongresurbo, k. t. p.

Luksa eldono tre interesa por la kongresanoj.

B. E. S — ADRESARO. — Eldono de Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Ĉeĥoslovakujo, 1926, 68 pĝ. 15 × 12. Prezo: 1. 50 sv. fr.

Adresaro de esperantistoj kaj neesperantistoj dezirantaj korespondi aŭ intersanĝi.

JARLIBRO de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. — Esperantista Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris. 1926, 32 pĝ. 16 × 11 1/2. Prezo: 2 fr. fr.

Ĝi enhavas la Regularon de la L. K., informon pri verkoj rekompencotaj de la Akademio, liston de la L. K. — anoj kaj Akademianoj kaj la Zamenhofan sistemon pri landnomoj. — SALJO.



Lingva Komitato

Elektioj 1926. — Voĉdonintoj: 103 Plimulto: 52. Estas elektitaj por 9 jaroj: Sroj. Bennemann. 94 voĉoj, Stroele (reelekto) 92, Scott 91, La Colla 84, Ĉernohvostov 83, Waringhien 83, Grau Casas (Jaume) 81, Ellersiek 79, Pillath (Zanoni) 79, Sino Dresden 78, Sro. Kreuz 77, Döhler 74, kaj Karolczyk (Eska) 74, Por 8 jaroj: Sroj. Grot 71, Grenkamp — Kornfeld 66, Rosselló Ordines 64, Kostecki 60.

* * *

Al tiu ĉi *Unua demando*: «Ĉu vi permesas, ke, por laŭeble egaligi la nombron de la ĉiujare elirantaj membroj, la Estraro Konsideru elektitaj por 8 jaroj anstataŭ 9, tiujn, kiuj ricevos malpli da voĉoj».

Respondis: 92, jes; 6, ne. 5 ne respondis.

Sekve la 13 unuaj estas elektitaj por 9 jaroj kaj eliros en la jaro 1935; la 4 lastaj, por 8 jaroj kaj eliros en la jaro 1934 kune kun la 8 anoj elektitaj en 1925. — Tiel 12 komitatanoj eliros en 1934 kaj 13 en 1935.

Al *Dua demando*: «Tre — eble tro — multnombraj estas nun la L. K. — anoj. Tia multnombro malplifaciligas la konstantajn interrilatojn kaj peze pligravigas la elspezojn. Kvankam laŭ la § 2 de nia Regularo la nombro de la L. K. — anoj ne estas limigita, ĉu vi ne opinias, ke saĝe estus oficiale esprimi al la Estraro la deziron, ke ĝi proponu *novajn* Kandidatojn nur por la postenoj, kiuj fariĝis vakantaj dum la pasinta jaro?»

Respondis: 95, jes; 3, ne. 5 ne respondis.

Ne estas necese certigi, ke la Akademio kaj ĝia Estraro plej atente zorgos pri la plenumo de tiu ĉi deziro primo de la Komitatanoj. — La Prezidanto de la Akademio: TH. CART.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Presejo J. Vinyals, Plaça Constitució, 6 : BARCELONA (Sarrià)

Prezo de unu klingo

0'30 ptoj.

Rabaton al la

Esp. Grupoj.



Oni serĉas seriozajn

reprezentantojn

kaj agentojn.

—

« ESPERO » estas la plej praktika kaj ekonomia razklingo.

Petu ĝin de «Komercesta Kompanio Kataluna»

str. Marquès del Duero, 101. - BARCELONA

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE

JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto». València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

Avís importantíssim

Novament hem de pregar als nostres abonats que encara no han pagat l'abonament de 1926, que sense més ajornament ens trametin el deute que tenen amb KATALUNA ESPERANTISTO si no volen comprometre seriosament la situació econòmica de la Federació. És un deure que cap bon samideano pot oblidar.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al

femení

heroino, reĝino
katino, leonino

O

*terminació
substantiu*

lakto
urbo
komerco
(comerç)

A

*terminació
adjectiu*

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

*terminació verb
(infinitiu)*

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

*terminació
adverbial*

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

*mode condi-
cional*

U

*mode impera-
tiu o subjunc-
tiu*

Mi skribas
Jo esric

skribis
escriví

skribos
escriuré

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo esric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

POBRA HUMANITAT

A l'entorn de la qüestió d'un idioma internacional mantes vegades s'ha parlat en periòdics que es creuen tenir cara i ulls i mantes vegades s'ha parlat d'una manera que palesava la ignorància que de la qüestió en tenia el que gosava tractar-lo, arribant al cas de dir que aprendre l'Esperanto és un entreteniment com col·leccionar cap-i-cues.

Quants són els que fan un somriure en trobar-se amb un esperantista. Quants són els que a causa de les diatribes d'un Andrenio, posem per cas, pensen que tractar amb un esperantista o bé amb qualsevol idealista és igual que tractar amb un beneit. I és que avui per avui es fa més cas d'un que marqui el *charleston* i vesteixi *oxford* que d'un home que raonadament defensi una teoria de progrés.

La humanitat, malgrat els seus vint segles, viu més endarrerida, dintre certs ordres, que les bèsties més bèsties. Presenteu-li qualsevol qüestió de valor positiu, presenteu-li qualsevol problema de progrés verament cultural i s'us tomarà d'esquena. Vivim un temps exemplar: de la còssa, del cop de puny i de la gran gatzara.

Malgrat l'espectacle desencoratjador, un petit nombre d'homes, plens de bona fe, amb sacrifici de vides alguns d'ells, lluiten entre les burles dels més, per les idees nobles, alts ideals, fites glorioses.

Que se'ns titlli de maniàtics o de grillats, tant se'ns en doni. Pobra humanitat, aixeca el cap cot que la vergonya t'empeny i escolta els que vertaderament volen fer-te un cel real de la terra!

“KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redakitejo: carrer València, 245 - BARCELONA

FEDERACIAJ GRUPOJ

Esperantista Klubo Palma
Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca
Empordana Ebenaĵo
(Girona) Armentera
Esperanta Nesto
(Jovenut Catòlica) Ripollet
Frateco
Placo Pi i Margall, 14. Vendrell
Ĝerona Espero
(Creu Roja) Girona
Lumon
St. Antoni, 64. Terrassa
Studenta Juneco
(Seminari) Girona
Aplec
Mendizàbal, 3. Sabadell
Bela Espero
Carretera de Vich, 41. Manresa
Esperanta Idealo
Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés
Esperantista Amikeco
Plaça Bernardí, 10. Manlleu
Esperanta Burĝono
(Centre Democràtic) Rubí
Internacia Frateco
(Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet
Paco kaj Amo (Soc.)
Planeta, 16, pral. Barcelona
Barcelona Stelo
Marquès Duero, 101. Barcelona
Barcelona Esperanto-Societo
Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona
Esperantista Grupo «Sollerica» Soller

LOKAJ-DELEGITOJ

Ager: Fino. Maria Plans
Almúnia de Castellví: Sro. Pere Esvertit
Ametlla de Merola: Sro. Miquel Arpa

Artés: Sro. Manuel Monró
Armentera: Empordana Ebenaĵo
Banyoles: Sro. Joan Aulina
Figueres: Sro. Carles Varela
Girona: Sro. Josep M-a Dalmau
La Garriga: Sro. Joan Blancafort
Mahó: Sro. S. Ortega Barceló
Manlleu: Sro. Marian Vilardell
Manresa: Sro. Josep Albagés
Mataró: Sro. Francesc Torres
Molins de Rei: Sro. A. Canals
Monistrol de Montserrat: Sro. F. Oro-bitg, Pastro
Palafrugell: Sro. Francesc Sagrera
Palau de Montagut: Fino. Lluís Bargés
Palma de Mallorca: Sro. Narcís Bofill
Reus: Sro. Enric Aguadé
Ripollet: Sro. Josep Planas, Pastro
Rubí: Sro. Joan Ratés
Sabadell: Sro. J. Comadran
St. Adrià del Besòs: Sro. S. Arnella
St. Martí Sapresa: Sro. Joan Rieradevall
Sta. Coloma de Farnés: Sro. Pere Costa
Sta. Coloma de Gramanet: Internacia Frateco
Sallent: Sro. Lluís Solé
Sóller: Sro. M. Arbona
St. Feliu de Pallarols: Sro. J. Collelldevall
Terrassa: Sro. Ramon Marsà
Teyà: Dro. Jacint Barrera
Vendrell: Fino. Maria Julivert
Vich: Sro. Pere Farrés
Vidreres: Sro. Josep Macià
Vilanova i Geltrú: Sro. Jaume Fort
Vilassar de Mar: Sro. Pere Domènech

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRE

Redaktoroj : Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

Fidele ni laboru (1)

Ĉu vi ĝuste povas kompreni kia emocio estas en mi ĉe la starigo kontraŭ la mikrofono? Jen mi, sola en tiu ĉi ĉambro serioza kaj impona, alparolas la nevideblon. Mia penso flugas for kun la misteraj ondoj, al la amikoj transmaraj, al la samlandanoj. Kiu aŭskultas min? Certe multaj amikoj, certe kelkaj malamikoj. Se niaj malamikoj devus ĉeesti niajn publikajn kunvenojn por esplori la sincerecon de nia esperantismo, certe ili ne venus. Dank' al radio, nia penso, la vivo de nia parolo, mistere flugas al la hejmo de ĉiu homo kaj oni libere aŭskultas nin. Ho! kia feliĉo por la esperantistaro se nia neforgesebla majstro estus ĝisvivinta la nunan epokon. Kia plezuro por la paca batalantaro, se la varma parolo de nia kara Zamenhof, de tempo al tempo venus al ni el la malproksimo kaj donus al ni la grandan instigon de liaj grandaj pensoj, havigus al la diverslandaj defendantoj de la sankta afero, tiun ĉarman fajron de internacia frateco kaj sincera amo.

Mi ne povas preterlasi tiun ĉi unuan okazon de mia spirita konatiĝo kun multaj esperantistoj el diversaj landoj, por laŭte diskonigi la fervoron kaj entuziasmon de la katalunaj esperantistoj por la verko de Zamenhof kaj, precipe, por la animo de tiu verko, por la vera esperantismo.

Se ni volas ĉerpi el la propagando de Esperanto sanan frukton, ni ne

(1) Ideoj ĉerpitaj el parolado disaŭdigita de la verkinto pere de Radio-Barcelona, la 16 junio.

devas devojiĝi, ni ne devas forlasi la vojon montritan de Zamenhof, la vojon, kiun, ŝajne, en kelkaj lokoj, oni facile forgesas.

Al vi, karaj samideanoj enlandaj, kiujn ne por la unua fojo mi alparolas, mi devas ripeti hodiaŭ, ke la lingva fideleco estas io eksterordinare grava por nia movado, sed, super tiu fideleco, pri kiu ni ĉiam montris grandan respekton kaj atenton en nia organo Kataluna Esperantisto, staras tiu fideleco al la spirito de nia movado. Prave deklaras la Bulonja deklario, ke esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas Esperanton por kiu ajn celo, sed ĉiuj niaj pensoj, ĉiuj niaj oferoj, serĉas rekompencon ne en tio ke la lingvo internacia trovas adeptojn ĉe komercistaj rondoj, unuvorte, ĉe praktikaj homoj, sed en tio ke la paca ideo de toleremo kaj respekto inter homoj el diversaj landoj kaj lingvoj, varbas novajn defendantojn, novajn batalantojn. Por tiu amo, kiun la majstro inokulis en sian verkon, por tiu mistika parfumo, kiun disradias nia himno, ni konstante batalas, ni konstante nin elmetas al moko kaj atakoj.

Kelkaj lecionoj sufiĉas por lerni la mekanismon de la lingvo, kelkaj homoj povas sufiĉi por konatiĝi kun la dek-ses reguloj de la gramatiko de Esperanto, sed por eniri, por asimili la internan ideon de la Zamenhofa verko, oni pli longe devas kunvivi nian movadon. Al la gvidantoj de kursoj, al la estrantoj de esperantistaj grupoj, ni turnu nin ĉiam kun la admono: ju pli multe vi predikos la internan ideon de Esperanto, des pli da bono vi semos por la estonta homaro.

Povas esti, ke la triumfo de Esperanto kiel lingvo internacia, sukcesos en baldaŭa tempo kaj ke la efektiviĝo de tiu interna ideo venos nur post pli longa tempo, sed ĉu pro tio ni devas forlasi tiun kaŝitan ĉefan enhavon de nia afero?

Ŝajnas al mi, ke pensema homo facile konsentos, ke oni devus nei al la homaro eĉ plej malgrandan porcion de racio, se kio estas logika, kio esence estas vera kaj natura, en la estonto ne trovus plenan efektiviĝon. Sekve, estas tre logike aserti, ke Esperanto iam plene sukcesos ĉar, ĉu estas io kontraŭnatura tio ke ĉiuj homoj en la mondo facile povas interkompreniĝi? Ne. Pli miriga ol tiu estonta triumfo de lingvo internacia estas la fakto ke tiel longa tempo pasis en la mondo — erare nomata civilizita — kaj ke tiu natura postulo ne efektiviĝis jam.

Ankaŭ al tiu sama ordo de ideoj apartenas la interna ideo de Esperanto. Ĉu la homaro vivos en konstanta batalo fratemiga? Ĉu eterne frato fraton atakos ŝakale? Ne, tute ne. Tiu malnobla agado estas kontraŭnatura kaj nedubeble ĉio, kio kontraŭstaras la leĝojn de la naturo, iam falos por eterne.

Eĉ sen apostoloj de tiuj pacaj ideoj, eĉ sen la viktimoj kiuj falas dispremitaj de antaŭjuĝoj, la idealoj kiuj apartenas al la moralo universala, per si mem trabatus al si vojon kaj iam venkus.

Seni havas antaŭ ni tiel belan perspektivon, se ni havas tiun intiman konvinkon, ke ni ne batalas por utopio, ĉu ni povas halti en la batalo? Ne, mi

fojojn ne. Ni, pioniroj harditaj en la longa vojirado al la celo, neniam haltos en la kantado de la sankta ideo.

Ni heredis de la kreinto de nia ideala mondo la ĉarmon de la plej alta homsento, kaj pro tio pulsas en ni la tuta forto de la pura vero, el kiu ni ĉerpas energion por la konstanta antaŭenirado.

Vere, bedaŭrinde, ni ne ĉiam vidas amikajn manojn. La katalunaj esperantistoj iafaje vidas, ke suspekto flugas ĉirkaŭ ilia tendaro. Ĉu ni eraras la vojon montritan de la paŝtisto? Ĉu nia agado ne akordiĝas kun la postuloj de esperantismo? Ni estas konvinkitaj, ke ni ne eraras, kaj ankaŭ estas konvinkitaj ke niaj kritikantoj, iafaje tro atakemaj, intermiksas Esperanton kun aferoj pure privataj, plene subjektivaj.

Zamenhof diris okaze de la unua kongreso en Bulonjo-sur-maro: «en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio».

Konstante ni rememoru tiun fragmenton el la unua parolado de la majstro. Plej bone ni iros nian vojon, se ni surpaŝos liajn postĉesigojn. Plej bone kaj rapide progresos nia afero, se ni ne forgesos liajn instruojn.

Ni restu fidelaj al la interna ideo de Esperanto. Ni gardu ĝin en la koro. Nia agado ĉie kaj ĉiam estu inspirita de tiu sankta beno. Nur tiel ni estos indaj je la nomo de spiritalaj filoj de la plej genia homo de la zamenhofa generacio.

Fidele ni laboru!

S. ALBERICH JOFRE



XVIII^a Universala Kongreso de Esperanto

Edinburgo 31 Julio — 7 Aŭgusto

Relative multaj katalunoj veturis al la malnova kaj bela ĉefurbo de Skotlando por partopreni tiun ĉi kongreson: Gesinjoroj Comellas el Vich, S-ro Jaime Grau Casas el Barcelono, F-ino C. Dalmases, mia edzino kaj mi mem el Terrassa; kune ni entreprenis la vojaĝon. Karaj amikoj adiaŭis nin en la Barcelona stacidomo, kaj nia karavano kun ĝoja koro tra Parizo kaj Londono venis sabaton la 31-an de Julio en Edinburgon. La unua ekvido de la skota urbo estis plej ĉarma kaj mi pensas ke mi neniam forgesos la belajn, en tiuj tagoj de la suno karesatajn, ĝardenojn en Princess Street. Post trarigardo de niaj ĉambroj en la pensionejo ni turnis nin al la kongresejo, alte lokita kaj severa palaco, kie flirtis la nacia kaj la verda standardoj,

videblaj el la tuta urbo. Kiel decas al sudanoj en norda lando, ni malfruis kaj trovis ĉiujn kongresanojn kunvenintaj en la granda festsalono por la interkonatiĝa vespero: diversaj gesinjoroj, pri kies nomo, mi petas pardonon, mi ne memoras, deklamis versaĵojn kaj kantis, kaj ankaŭ ofte kantis la tuta ĉeestantaro: oni devas diri ke la kunkantado estis unu el la ĉefaj trajtoj de tiu kongreso kaj por tio la Komitato tre saĝe eldonis kantolibron vere riĉan de melodioj. Post la fino de la festo ĉiuj vizitis en apuda ĉambrego la vendejon de libroj kaj memoraĵoj de Edinburgo, la akceptejon kaj sekretariejon tre orde aranĝitajn, la poŝtejon kaj monŝanĝejon kaj precipe superŝutitaj de samideanoj estis la skribotabloj, kiuj ne ripozis en la tuta daŭro de la kongreso kaj faciligis al ĉiuj la agrablan taskon dissendi poŝtkartojn al konatoj kaj parencoj, kio estas nemalgranda enspezo por la ŝtato kie okazas vasta kongreso. Multe da samideanoj, precipe karaj kaj konataj de la katalunoj, ni havis la plezuron saluti, inter ili F-ino L. Briggs, S-inoj Osmond kaj Grogan, S-ro Kreuz kaj aliaj de mi persone konataj. Multaj parolis al ni pri nia Antologio kaj estis tre kontentaj havi la okazon saluti ĝian kompilinton Jaume Grau Casas. La kongreso ĝoje kaj bele komencis.

Dimanĉon la 1-an de Aŭgusto, bela vetero; agrabla konato nia, la suno, nin salutas jam matene. Ni eliras al la strato kaj stranga kvieteco nin surprizas: aŭtomobilojn kaj tramojn oni ne vidas: estas dimanĉa ripozo kaj ĝis la deka matene ili ne deĵoras. Nia unua provo konstati ke oni povas senpage veturi nur montrante la kongresinsignon ne sukcesis pro manko da veturiloj; ni do piede nin turnis al la malnova Katedralo S-ta Giles kie okazis la esperanta diservo: unu el la plej rememorindaj okazaĵoj de la kongreso: kiel agrable sonis la esperantaj paroloj inter tiuj severaj, maljunaj muroj! Tute plena la preĝejo de diversnaciaj homoj, oni festis unue la aperon de la traduko de la Biblio en Esperanta lingvo, diversaj pastroj, ĉiuj esperantistoj, legis tekstojn el la Biblio kaj Pastro D-ro G. Bailey faris tre elokventan kaj klaran predikon en Esperanta lingvo. La Ĥoristaro de la Katedralo, sub la direktado de S-ro Greenhouse, kantis kelkajn belajn psalmojn kaj himnojn, kaj precipe ĉarmis nin per la kantado de la tutmonde konata Haleluja de Handel, kiun ili kantis vere arte kaj harmonie.

Elirinte el la diservo, per diversaj tramoj, ĉiuj kongresanoj veturis al la Skota Zoologia Parko, kie oni povas facile kaj sen laciĝo pasigi agrablan posttagmezon. Komuna lunĉo okazis en la restoracio kaj poste ĉiuj libere promenis kaj trarigardis la diversajn bestojn, kiuj tiel abundas en la parko. Agrable estas vidi sovaĝajn bestojn, kiuj ne estas gardataj en kaĝo, sed kvazaŭ en stato de libereco. Post trarigardo de la Parko kaj agrabla babilado kun eksterlandaj esperantistoj ni veturis denove en la urbon kaj iom ripozis sur la mola herbo en la koro mem de la urbo, sub la ŝirmo de la fiera kaj malnova kastelo de la estintaj skotaj reĝoj.

Vespere en Synod Hall okazis la unua Koncerto aranĝita de la Komitato, kiun prezidis S-ro Merchant: agrablaj kantoj, deklamoj kaj komuna kan-

tado plenigis la programon, kiu estis nur antaŭanonco de pli belaj vesperoj.

London matene je la deka malfermiĝis la Kongreso en la granda fest-salono de la Kongresejo; milo da kongresanoj, el kvardek diversaj landoj, sidas en la ĉambro, flagoj el multaj diversaj nacioj pendas en la galerioj. Oni kantas nian himnon, ĉiuj starigas kaj oni rimarkas en ĉiuj vizaĝoj la emocion, kiun la vortoj de Zamenhof ĉiam vekas en la koroj de ĝiaj fideluloj. Oni sciigas ke D-ro Privat pro malsano ne povis veturi al Edinburgo kaj S-ino Isbrucker, en la nomo de Centra Komitato proponas la nomojn de la estraro: S-ro Page, el la loka komitato estas aklande elektita kiel Prezidanto de la Kongreso kaj S-roj R. Kreuz kaj Butler kiel Sekretarioj, kiel Vicprezidantoj estas elektitaj aliaj personoj, kies nomojn, vi povos legi en la Oficiala Raporto. S-ro Page akceptas la prezidan postenon kaj faris tre belan paroladon: li salutis unue la filinojn de D-ro Zamenhof, kiuj venis al nia Kongreso, kaj laŭ sprita maniero faris la laŭdon de la skotoj kaj deziris al la eksterlandanoj plej koran bonvenon al Skotlando. Poste salutis la Kongreson la reprezentantoj de la registaroj kaj tiuj de la internaciaj societoj kiuj aliĝis al ĝi kaj fine la reprezentantoj de la diversaj landoj kaj lingvoj en la mondo uzataj: mi mem parolis en la nomo de la katalunoj, kaj la fakto ke tio ĉi naskis nenian disputon montras tute klare ke en aliaj okazoj la malfacilaĵoj estis simple afero de iu privata persono, kaj ke sufiĉas ke tiu persono ne ĉeestu la kongreson por ke nia rajto estu sendiskute akceptata de ĉiuj. Estas bedaŭrinde ke multaj delegitoj venas al la podiumo kun antaŭlernita parolado kaj malgrŭ malpermeso de la prezidanto de la Kongreso pretendas paroli pli ol unu minuton: ĉu ili ne komprenas ke tre longa parolo lacigus ĉiujn, precipe se tio estas en la fino de la kunsido? Ĝoje estas tamen aŭdi nian lingvon parolatan de tiel multaj diverslingvanoj kaj konstati kiel facile ĉiu estas komprenata. Kun tiu ĝoja sento en la koro ĉiuj forlasas la ĉambregon post fino de la kunsido kaj ni kun kelkaj amikoj malnovaj kaj novaj amikoj tie akiritaj marŝas al la magazenoj Patrick Thomson, en kies restoracio svarmas la kongresanoj, ĉar tie oni mangas malkare kaj bone kaj en ĉiuj tabloj oni havas la menuon en esperanta lingvo.

Je la dua kaj duono okazas la Malfermo de internacia Somera Universitato. Anstataŭ D-ro Privat, kiu ne povis veni al la Kongreso, Profesoro Bouvet el Ĝenevo faris la malferman paroladon. Je la tria Prof. Cart el Parizo, la simpatia Prezidanto de nia Akademio, faris tre interesan prelegon pri la Franca Folkloro kaj Popolkanto, kiun ĉeestis grandnombra publiko. Je la kvara Prof. Bujwid el Varsovio faris prelegon pri Homo kaj Mikroboj, kiu eble pro la specialeco de la temo ne interesigis multajn personojn: tamen oni kun granda atento aŭskultis la klarigojn. Eble estas oportune nun fari kelkajn rimarkojn pri la somera Universitato, kiun oni devus atenti en aliaj kongresoj, se oni volas ke la prelegoj estu interesaj: mi persone preferus, ke la prelegoj estu pure teknikaj paroladoj, ĉar se ili estas vulgarigaj prelegoj tiam la afero estas tia, la fakuloj enuas ĉar ili trovas en la parolado nenion novaĵon indan de aŭskultado

kaj la nefakuloj enuas ankoraŭ pli ĉar estas tute neeble per unu sola parolado kaj en mallonga tempo enkonduki personon en la komprenon de unu scienco aŭ fako; krom tio oni komprenu ke la kongreso okazas en somero kaj ke la tria posttagmeze en neniuj eŭropa lando estas taŭga horo por aŭskulti prelegon kaj tial oni povas vidi personojn, kiuj tute kontraŭ sia volo endormetiĝas.

Vespere je la 8^a la Urbeŝtraro en ceremonia kostumo kaj kun granda pompo akceptis la kongresanojn en Art-Lernejo Lauriston: Lia Moŝto la Urbeŝtro kaj lia edzino premis la manon al ĉiu kongresano, kiu vice venis unu post la alia kaj samtempe donis sian vizitkarton al urbeŝtrara oficisto. La Urbeŝtraro regalis la kongresanojn per bela koncerto kaj per bufedo abundega.

Mardon 3^a de Aŭgusto je la naŭa matene, sur la herbo-tapiŝo en la ĝardeno kuŝanta antaŭ la kongresejo staris ĉiuj kongresanoj por komuna fotografado. Post tio okazis la Unua Laborkunsido, en kiu oni diskutis kaj aprobis la raportojn de la Internacia Centra Komitato, de la Universala Esperanto-Asocio kaj de la prezidanto de la Akademio. La detalan raporton bonvolu legi en la oficialaj dokumentoj. Kun kelkaj amikoj ni havis ankoraŭ tempon viziti la malnovan kastelon, kiu tiel fiere superstaras kaj gardas la urbon, kaj la palacon en Holyrood kie loĝis la skotaj reĝoj. Posttagmeze S-ro Ĉe faris paroladon pri «La rekta metodo en la instruado de Esperanto» kaj S-ro Deuel pri «La modernaj sukcesoj en la Terapio de Ftizo», pri kiu mi ne raportas ĉar tie ĉi ne estas la oportuna loko. S-ro. Tarelli parolis ankoraŭ pri la Internacia Laboroficejo kaj S-ro Orenge pri la Suno, agrabla parolado ilustrita kun lumbiloj kaj kiun ĉeestis multaj personoj.

Vespere je la 7^a kaj duono en Synod Hall okazis la Skota Koncerto. Kiel S-ro Page diris tiu ĉi koncerto anstataŭas la prelegon pri la skota folkloro, kiu mankas en la programo de la Kongreso: efektive ni aŭdis belajn malnovajn skotajn melodiojn, ludon de sakfajfiloj, koncerton de fiŝvendistinoj el Newhaven kaj malnovajn skotajn daŭcojn: tre interesis nin vidi militistan dancon tute similan al tiu de nia sufiĉe konata *Hereu Riera*. Entute tre bela vespero. Samtempe en la radiostacio en Edinburgo okazis paroladoj en Esperanto kaj kantoj en la sama lingvo, kiujn ankaŭ dissendis la potenca stacio en Daventry kaj sekve estis aŭdeblaj en aliaj landoj.

Merkredon 4-an de Aŭgusto matene okazis prelego de D-ro Fournier D'Albe pri Radio kaj ĝia Estonteco, de D-ro Deuel pri Plilongigo de la Homa Vivo kaj de S-ro Bennemann pri la Germana Folkloro kaj Popolkanto: tio estis bela koncerto efektive sed oni riproĉis al S-ro Bennemann ke li donis al la vorto popolkanto tro vastan sencon kantante kantojn de konataj aŭtoroj kaj ne pure popoldevenaj. Posttagmeze nova prelego de S-ro Ĉe pri sama temo kaj de D-ro Stromboli pri Elektrametalurgio en Italujo. Prelego de nia amiko S-ro Jaime Grau Casas pri la Kataluna Folkloro kaj Popolkanto: ni povis konstati ke nia lando estas efektive konata de la esperantistoj kaj ke tiu temo interesis multajn personojn; nia amiko Grau fa-

ris tre belan paroladon kun korekta lingvo kaj eleganta esprimmaniero, li deklamis la tekstojn de la kantoj kaj lia amiko kaj malnova korespondanto S-ro W. H. Staveley sur la piano ludis la diversajn melodiojn, kiuj tre multe plaĉis al la aŭskultanta publiko. Post la fino de la prelego multaj personoj petis informojn pri la Kataluna Antologio kaj aĉetis ĝin. S-ro Orengo samtempe faris sian duan prelegon pri La Suno. Vespere en Central Hall, vasta koncertejo okazis la plej bela koncerto, kiun ni aŭdis dum la kongreso: la «Glasgow Orpheus Choir», kiu mirinde kantas, dum du horoj regalas niajn orelojn per la jen mildaj, jen gajaj, skotaj melodioj: multe da meritataj aplaŭdoj kolektis la kantistoj kaj ilia talenta direktoro S-ro Robertson. La Loka Komitato eldonis broŝuron kun la teksto de la kantoj kaj ilia traduko en Esperanto, kio faris la kantojn multe pli ĝuindaj.

Ĵaŭdon la 5-an de Aŭgusto matene, en la Kaledonia Stacio du vagonaroj atendis la kongresanojn kaj kondukis ilin al Gourok, en la okcidenta parto de Skotlando, tie ili eniris en la ŝipojn, kiuj promenigis ilin tra la fjordoj de la rivero Clyde: la veturado estis tre agrabla kaj daŭris preskaŭ tutan tagon; ĉiumomente la aspekto de la bordoj ŝanĝiĝis kaj la rigardo neniam laciĝis. Certe tiu estas la plej bela parto de Skotlando. Fine la ŝipoj kondukis nin al Wemys Bay, kie denove la vagonaro prenis nin kaj portis nin al Edinburgo, kiun ni atingis je la naŭa vespere.

Vendredon la 6-an de Aŭgusto matene, okazis prelego de prof. Collinson pri Esperanto kiel vojo al Lingvoscienco, de S-ro Tarelli pri la Internacia Laboroficejo, de D-ro Olŝvanger pri Hebrea Folkloro, de S-ro Ĉe pri sama temo kiel lia antaŭa prelego kaj de S-ro Kornfeld pri la Pola Folkloro kaj Popolkanto. Posttagmeze nova parolado de Prof. Collinson pri la sama temo. La prelego de S-ro Mangada pri Hispana Folkloro ne okazis pro neĉeesto de la aŭtoro.

Vespere en la Palais de Danse, luksa dancejo en Edinburgo, okazis la Internacia Balo. La dancejo estis certe tre belaspekta, kaj multaj naciaj kostumoj pliiĝis ankoraŭ ĝian ĉarmon: oni dancis kun la laŭta muziko de la sakŝafistoj skotajn dancojn kaj amuze estis vidi la malfeliĉajn provojn de la eksterlandanoj en la dancado de la skotaj dancoj. Agrablaj ludoj de la lampoj, kiuj lumigis la salonon, faris tiun ankoraŭ pli alloga. La balo daŭris ĝis noktomezo, ĝuste ĝis la horo kiam ĉe ni oni ekdancas.

Sabaton la 6-an de Aŭgusto matene, okazis la Ferma Kunsido: venis jam la horo malgaja de la adiaŭo: oni prezentis al la kunsido la diversajn rezoluziojn de la fakaj kunvenoj kaj oni transiras al la dankoj por la Loka Komitato, kiu tre bone kaj kontentige aranĝis la kongreson, al S-ro Warden, kiu tiel multe laboris por la eldono de la Biblio, al la Urbeŝtraro, kiu tiel ĝentile akceptis la kongresanojn kaj al ĉiuj, kiuj iel helpis la sukceson de la Kongreso. S-ro Page en la nomo de la skotaj esperantistoj adiaŭas la kongresanojn kaj diras al ĉiuj: Ĝis la revido en Danzig! La muziko de nia himno La espero vibras en ĉiuj gorĝoj kaj nia 18^a Kongreso estas finita.

Posttagmeze okazis ankoraŭ ekskurso al Forth-^a Fonto, kiun ĉeestis

multaj samideanoj kaj atente aŭskultis la klarigojn, kiujn sinjoro inĝeniero faris pri la fama konstruaĵo. Vespere ni vespermanĝis kun la sola kataluno, kiu loĝas en Edinburgo S-ro Juriol; oni diras ke katalunojn oni renkontas ĉie en la mondo kaj tiun ĉi fojon ankoraŭ la diro estas prava. Dimanĉon matene, la morgaŭan tagon ni forveturis el Edinburgo. Mi devas speciale danki F-inon L. Briggs, kiu kun kelkaj samurbanoj bonvolis adiaŭi nin en la stacidomo kaj ankaŭ S-ron Juriol, kiu tiel same agis. La granda festo de la esperantistaro estas finita; por la propagando en Skotlando ĝi multe efikis, kiel ni povis tion konstati en la lokaj ĵurnaloj, kiuj ĉiutage okupis sin pri Esperanto. La kongresoj havas nur unu malagrablaĵon: ke ili lasas en niaj koroj tro fortan deziron denove revidi la urbojn kie ili okazis kaj la multajn amikojn, kiujn ni ne plu renkontos tie. — MARIAN SOLĂ

Dimanĉe

Forpasas hor' post horo — horo senkonsola...
 Knabino sidas sola.
 Forbruas tram' kaj ree regas la silento...
 Foliojn movas eta vento.
 Doloras kor' en suna tago senlabora.
 La urbo dormas, polvo ora
 leviĝas jam pro tralastrata kuro
 de l'buboj, de la ĉarveturo.
 Ho, venu do, mistera dezirata
 amik', fianĉo aŭ la frato...

P. STOJAN

La Nubeto

M. Lermontov

Nokton dormis nubo ora
 sur la brusto grizmarmora
 de la rok' maljuna.
 Frumatene ĝi sopiris
 al libero, kaj foriris
 antaŭ levo suna...
 Malaperis gajludanta
 en lazur' nubeto,
 lasis ĝi sur brust' giganta
 gutojn da pluveto...
 Kaj maljuna sola roko,
 en dezerta vea loko,
 ploras en sekreto.

El la rusa tradukis

P. STOJAN

Mencitaj en la XII Internaciaj Floraj Ludoj.

La porcelana katino

Dediĉita al f-ino Roznikova el Odessa

Profesoro Irgen revenis hejmen post lekcio. Lin atendis malvarma ĉambro, la lasta, nedetranĉita ankoraŭ, numero de la «Matematika Revuo» kaj la malagrabla perspektivo de eventuala reveno de akraj podagraj doloroj.

Li estis malkontenta pri ĉio ĉi, sed precipe lin ĉagrenigis la ĵus tralegita lekcio. Certe, la plej pretendema kritikemulo ne trovis en ĝi iun riproĉindaĵon, kaj tamen... ĝi tute ne kontentigis la maljunan profesoron...

Jes, tio estis mirinde simpla kaj klara lekcio pri la komplikega tecrio de Hamilton'aj *kvaternionoj*, sed profesoro Irgen, la iama profesoro Irgen, povus krei ion pli bonan!

Io mankis... Li sentis tion, serĉis, analizis... Ĉu maljuneco?...

Pligrandiginte la fajron en kameno, li sidigis sur apogseĝon kaj prenis la ĵurnalon. Oreflavaj rebriloj de la fajro oblikve lumigadis lian grizan, leon-similan hararon kaj saĝan altan frunton, ĵetante profundajn ombrojn sur la akrajn trajtojn de l' vizaĝo, kiu ŝajnis nun esti ankoraŭ pli serioza, pli severa kaj senpasia, ol iam ajn...

Per kutimaj rektliniaj movoj li detranĉis la ĵurnalkajeron kaj foliumante ĝin li trarigardis la enhavon.

«Pri kelkaj proprecoj de la surfacoj de Rieman», tralegis li la titolon de unu el la artikoloj. Kaj ĝia aŭtoro... «Edith Lorn».

Ĉu tio estis ombroludo? Aŭ efektive lia vizaĝo ekposedis alian aspekton? Ĉu transformigis en ĝi io krom la okuloj?... Sed la okuloj ŝanĝigis! En ili aperis fajrero, ne respegulanta la fajron de l' kameno, sed iel interne lumanta.

Kiel en *stroboskopo* en lia menso pasis aro da rapide variantaj bildoj.

Granda salono... Homamaso...

La suno mem per siaj lumradioj, penetrantaj tra la fenestregoj, salutas la unuan lecion de juna profesoro.

La diverskolora bruaro ĉesas, kiam li suriras katedron. Streĉite la studentaro atentis ĉiujn liajn movojn. Kviete li metas sian paperujon, prenas kretpecon kaj komencas per melodia nuancoriĉa voĉo. Li parolas pri la konstanta variado en la naturo, pri la senĉesa evoluo de ĉio ekzistanta, pri la senfunda komplikeco de la naturfenomenoj kaj pri la akra, ĉion sekcianta metodo de matematika analizo... Kaj lia voĉo fluas, penetrante la animojn de ĉeestantoj, kunigante per nevideblaj fadenoj lian potencon cerbon kun cerboj de ĉiuj aŭskultantoj. Kaj iom post iom la nuda staturo de l' pura logiko estas kovrata per luksaj vestaĵoj de largaj ĝeneraligoj, per la perloj de brilaj analogioj.

La tuta figuro de l' juna lektiisto elradias la senton de l' certeco, de memkonfido, liaj gestoj estas samtempe noblaj kaj liberaj, kaj sole liaj

okuloj malkaŝas, ke tio estas lia unua lekcio; ili senĉese vagas tra la maro de sennombraj vizaĝoj, ili serĉas firman bazon en la milobla okulo de l' aŭdantaro. Kaj subite ankaŭ ili kvietigas, senmovigas, fiksigante al unu punkto. En dua vico sidas serioza studentino, kies rigardo hela kaj klara, ravigite direktiĝas al la profesoro. La belaj molaj linioj de ŝia vizaĝo harmonias kun simpla, sed bongusta vestaĵo; la duone malfermita buŝo havas ĉarman infane-naivan aspekton. Profesoro Irgen trovis de li serĉitan bazon. Kaj nun lia parolo estas ankoraŭ pli emociiga, liaj esprimoj pli koloraj kaj la voĉo pli fleksebla. Jen li apenaŭ aŭdeble, streĉigante ĝis maksimumo la atenton de l' aŭdantaro, rakontas pri senfruktaj provoj de antikvaj matematikistoj, penintaj en konstantaj nombroj respeguligi la naturprocedojn. Kaj jen, pasante rapidan «crescendo'n», li per tondra voĉo nomas tiujn, kies potenca spirito solvis la problemon, kunfandinte la logikon kun la naturo per variantaj nombroj.

Li finas, citante la vortojn de Arthur Cayley: «... la progreso de l' matematiko estas grandioza, la kampo de ĝia agado — senlima, ĝia estonteco — plena de esperoj».

Uragano de aplaŭdoj kovras la eĥon de tiuj vortoj. Tiel oni aplaŭdas nur talentegan artiston, kiun oni dankas por la momentoj de aparta estetik-ka ĝuo. Sed pli... multe pli, ol tiuj aplaŭdoj, ĝojigas la profesoron malgranda kristala larmo en okuloj de la serioza studentino.

Edith Lorn estas brilsukcesa studentino. Ŝiaj ekzamenoj plinombrigas la laŭrojn de l' juna, sed jam eminenta profesoro. Ŝia rigardo plivigligas lin dum la lekcioj: li ne preparas ilin hejme, li kvazaŭ ĉerpas ilian enhavon el tiuj profundaj belaj okuloj.

Ŝi finas la studadon triumflplene kaj estas lasata ĉe la universitato kiel asistantino kaj aspirantino de la matematika katedro. Pli kaj pli ofte li renkontiĝas kun ŝi; la aferajn interparolojn penetras iom post iom pli intimaj temoj. Ŝi rakontas al li iafoje pri sia hejmo, pri sia malproksima patrujo...

Kaj unufoje post kunsido de l' profesoraro ŝi deklaras al li. «Mi devas reveni patrujon... eble por ĉiam...» Ŝia voĉo sonas malĝoje.

Nokto sendorma... Nokto de pensoj decidigaj, malgajaj...

Li sentas, ke ne estas eble resti sen ŝi, ke la vivo perdos por li tutan sian aromon, se ŝi forveturos. Kaj tamen... kial ŝi forveturas?

Certe, ŝi havas en sia patrujo fianĉon, kiun ŝi amas, pro kiu ŝi forlasos la sciencon... forlasos lin, sian profesoron, kiun ŝi tre estimas... sed ne...

Kaj lia potenca volo, lia akra racio venkas la senton.

Ŝi venas adiaŭi lin, danki lin. Li estas trankvila... eble tro trankvila. «Jes! Ŝi estis bonega lernantino. Li ĉiam fieris pri ŝi. Ŝi havas talenton. Li konsilas al ŝi daŭrigi... se eblas... la laboron». «Ŝi ankoraŭ unufoje dankas lin por ĉio kaj petas lin akcepti kiel memoraĵon tiun ĉi porcelanan katinon. Ŝi tre ŝatas katinojn, do li bonvolu pardoni al ŝi tian infanaĵon». Ŝi abrupte premas lian manon, turniĝas rapide, foriras...

Nur du tagojn la profesoro ne lekciis. Mallonga avizo sciigadis studentojn pri lia malsano. Kaj poste ĉio daŭris kiel antaŭe... aŭ preskaŭ tiel...

Nun ĉio finiĝis. Restis nur la malnova porcelana katino, mediteme la profesoron rigardanta de l' kameno, kaj la nova numero de l' ĵurnalo, enhavanta la nomon de Edith Lorn... «Lorn»! Neŝanĝite!!

Per tremantaj pro emocio manoj la profesoro kareseme prenis la katino, sed ĝi elglitis, falis kaj rompiĝis. Inter pecoj da porcelano kuŝis flaviginta paperfolio. Li ĝin rapide kaptis, disfaldis kaj legis.

«Eble iam vi okaze rompos tiun ĉi porcelanaĵon. Vi estos, certe, jam forgesinta vian ekslernantinon Edith Lorn. Ŝi vin neniam forgesos...»

«En la tago de mia forveturo mi sentas nerezisteblan deziron konfidi miajn pensojn kaj sentojn al papero kaj... tempo. Mi skribas pri tio, kion vi neniam estus supozinta, kion vi eksciinte eble primokos...»

Li legis, legis kaj ju pli li legis, des pli ŝanĝiĝis lia aspekto. Nun li sidis pli rekte, liaj manoj ne tremis plu kaj la vizaĝo kvazaŭ juniĝis.

Li finis.

Nun li prenis telegrafmandaton kaj skribis sur ĝi kelkajn liniojn. Li re-legis ilin.

Subite akra podagra doloro trapikis lian kruron. Li kvazaŭ aŭskultis tiun doloron, sulkiginte la frunton. Kvazaŭ li aŭdis en tiu doloro ion... iajn superaĵajn argumentojn...

Malrapide, aŭtomate malleviĝadis lia mano kaj poste la telegrafmandato glitis el ĝi en la fajron de l' kameno.

Ĝi kunvolvigiĝis, ekbrulis, cindriĝis. Aerfluo kaptis la cindron kaj lude turnante forportis...

E. AISBERG

Premiita en la XII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.



Komitato por Kataluna Antologio

La "Komitato por Kataluna Antologio" sciigas al la subskribintoj de akcioj, ke ili povas reenspezi 40% de la subskribita sumo, laŭ la artikolo IX-a de la Regularo.

Samtempe la Komitato sciigas, ke estas venditaj jam 420 el la 500 ekzempleroj eldonitaj, kaj espereble baldaŭ povos esti redonata la tuto de ĉiu akcio.

EDUARD CAPDEVILA, KASISTO

La literaturo kaj lingvo de Irlando (1)

La granda paradokso de la 19^a jarcento estis la tendenco al unueco de civilizacio, scienco, kaj arto, samtempe kun tendenco al multobliĝo de lingvoj.

Multaj ŝajne mortontaj lingvoj inspiriĝis per nova vivo. Kaj la granda milito donis al ili fortan antaŭenpuŝon, ĉar ĝi pretekstis esti pro la profito de malgrandaj nacioj, por doni al ili memstaron kaj liberecon.

La ĉefa signo de individua nacio estas aparta lingvo. Ĉiu malgranda nacio parolanta kaj uzanta ĉiutage lingvon de granda nacio, pli-malpli frue malaperos, ĉar kiam ĉiu el ĝiaj nacioj povas uzi la lingvon de la granda nacio, tiam ĝia propra lingvo estas nebezonata kaj baldaŭ okupas lokon de dialekto aŭ kampara ĵargono, malestimata de kleruloj.

Kun la subiĝo aŭ malapero de la propra lingvo, velkas ĝiaj propraj kutimoj, moroj, pensmanieroj, kaj ĝi ĉesas havi apartan, individuan, vivon.

Inter la revivigintaj lingvoj estas la irlanda lingvo. La konata angla ekonomiisto, Norman Angell, bedaŭras tiun revivigon. Li opinias, ke ideoj valoras pli ol la vortoj, kiuj esprimas ilin, kaj multobliĝo de lingvoj malfaciligas internacian interkomprenon.

Li estas aferema homo kaj forgesas la emocian flankon de lingvo. Profesoro Meillet, en sia verko, «Les langues dans l'Europe nouvelle», komprenas tiun flankon, dirante, «La langue est le premier, le plus clair, et le plus efficace des caractères, par lesquels se distingue une nation». (La lingvo estas la ĉefa, la plej klara, kaj plej efika el la karakterizaĵoj per kiuj nacio distingiĝas).

Tamen, eĉ se la irlanda lingvo ne sukcesos plene restariĝi, ĝi almenaŭ estas tre alloga al filologoj kaj historiistoj. Darmesteter diris, «Irlando havis la apartan privilegion de historio kiu daŭris seninterrompe de plej frua epoko ĝis nun. En ĝia senfine riĉa literaturo estas konservita, kompleta kaj fidela bildo de antikva kelta civilizacio. Tiu literaturo estas la ŝlosilo, kiu malfermos la keltan mondon».

Do ĝi ne nur lumigas antikvan Irlandon, sed ankaŭ tiujn partojn de Eŭropo, kie keltoj starigis koloniojn. La ĉefaj antikvaj historiistoj estis Grekoj kaj Romanoj, kiuj malestime rigardis la ceterajn naciojn kiel barbarojn. La studento, pere de irlandaj historioj kaj romanoj, ricevos alian normon por juĝi la morojn kaj kapablojn de tiuj grandaj popoloj, kiuj loĝis en la antikva Gaul, Belgujo, norda Italujo, Katalunujo, kaj partoj de Svislando, Germanujo, Aŭstrujo, kaj Britujo, popoloj kiuj batalis sukcese kontraŭ Grekujon kaj Romon, kaj koloniis Malgrandan Azion.

Noto de la R. Pro manko de supersignitaj konsonantoj kelkaj vortoj en irlanda lingvo estas kripligitaj.

La unuaj manuskriptoj estis precipe genealogioj, ĉar sub la kelta sistemo, neniuj povis posedi landon se li ne estis el sama gento kiel la gentestro. Do ĉiu zorge konservis sian genealogion. La «Kroniko de Ulster» enhavas irlandan historion, komencantan en la jaro 444 P. K., kvankam la manuskripto nur datigas de la 15^a jarcento. Tamen, en la «Kronikoj» troviĝas 18 datoj de eklipsoj kaj kometoj inter 496 kaj 884 P. K., kiuj akordiĝas precize kun la rezultoj atingitaj de modernaj astronomoj, do sendube ili estis notitaj de samtempuloj, ĉar la horo kaj tago de la fama suneklipo de 664 estis ĝuste notitaj en tiuj «Kronikoj», kvankam la verkisto, Venerable Bede, kiu naskiĝis nur 11 jarojn post tiu okazintaĵo, donis en sia libro, daton malfruan de du tagoj.

La «Libro de Kells» estas mirinde bela kopio de la «Kvar Evangelioj». Ĝi estis forŝtelita en 1006 P. K., sed poste ĝi estis retrovita sen ĝia ora kovrilo kaj kelkaj paĝoj. Tricent tridek naŭ velenaj folioj ankoraŭ restas, plej artiste ornamitaj per riĉa desegnaĵo unika en la mondo. Ĝi troviĝas en Trinity Kolegio, Dublino.

En la sama urbo, en la biblioteko de la Irlanda Akademio, estas katalogo de ankoraŭ ekzistantaj manuskriptoj, kaj la katalogo mem ampleksas dek-tri volumojn de pli ol trimil paĝoj. Multaj manuskriptoj estas kopioj de pli malnovaj verkoj, kiuj aŭ perdiĝis aŭ estis detruitaj. Laŭ la «Libro de Cashel», Sankta Patriko bruligis 180 volumojn de antikva irlanda teologio, kaj skandinavaĵoj invadintoj detruis multajn manuskriptojn.

Kiam Eŭropo kuŝis sub la mallumo de feŭdalismo, kaj preskaŭ nenie la greka lingvo estis konservita, irlandaj kleruloj parolis kaj instruis ĝin, kaj ankaŭ hebrean lingvon. En la 9^a jarcento, Johano Scotus Eriqena, estis la sola persono kiu povis traduki la grekan verkon de Dionysius. Alia Irlandano, Diceuil, en 825 P. K., mezuris la Piramidojn tiel precize, ke liaj mezuroj tute akordiĝis kun la mezuroj de franca esploristo en la 19^a jarcento. Li vizitis kaj priskribis Islandon, preskaŭ cent jarojn antaŭ ol Skandinavoj ĝin vizitis. En 814-6, li verkis astronomian verkon ankoraŭ ne publikigitan.

Multaj verkoj estas en bibliotekoj de kontinentaj urboj, en Milano, Cambrai, Louvain, kaj aliloke, ĉar la normanda invado en la 12^a jarcento ĉesigis la laboron de la irlandaj verkistoj kaj kopiistoj. La monaĥoj forkuris al la kontinento, portante multvalorajn verkojn kaj rifuĝis en monaĥejoj. Metalaj ornamaĵoj kaj ĉiuspeca arto ĉesis dum 7 jarcentoj.

En la 16^a jarcento kaj poste, granda mallumo restis sur Irlando. Instruistoj kiuj uzis la irlandan lingvon por instrui, estis punitaj kaj malliberigitaj; la posedantoj de manuskriptoj aŭ libroj estis malliberigitaj, kaj kelke da ili estis eĉ mortigitaj. Do ili enterigis siajn trezorojn en la teron, aŭ kaŝis ilin en murtruoj. Infanoj povis lerni nur el la lipoj de siaj patrinoj, aŭ de la tomboj de siaj praaĵoj, ĉar neniuj povis verki tiacirkonstance. Vere estas mirinde, ke la lingvo sukcesis vivi ĝis nun. Tamen, pro manko de interparolado kaj interkomunikiĝo, ĝi disfalis en dialektojn kun multaj malsimilaĵoj, vortoj malaperis, kaj pro manko de presita lingvo, la skribita kaj pa-

rolita lingvo grade diversiĝis. Lastatempe, la Irlanda Ligo faris sian eblon por kuraĝigi lernantojn, por provizi vortarojn, lerno — kaj legolibrojn, gramatikajn verkojn kaj novan literaturon. Ja estus monda perdo se tiu lingvo pereus antaŭ ol ĝiaj antikvaj trezoroj estus konataj de la mondo.

Kelkaj filologoj opinias, ke la irlanda alfabeto estis pruntita de la latina, sed se S.^a Patriko efektive bruligis dokumentojn tio pravas ke la Irlandanoj povis skribi antaŭ la alveno de la Romanoj.

La alfabeto havas nur 18 literojn; kelkfoje ĝi estis nomata la «Bet-lúis-nuin», pro la komencliteroj, kiuj antaŭe estis B, L, kaj N. Alifoje ĝi ricevis la nomon, «Arbo de Scio» ĉar ĉiu litero estis nomo de arbo, alia pruvo ke la irlanda alfabeto estis pli malnova ol la latina, ĉar la literoj de la lasta ne estas latinaj nomoj de arboj. Jen la alfabeto: —

B	—	Beit	(betulo)
L	—	Lúis	(sorparbo)
N	—	Nuin	(frakseno)
S	—	Suil	(saliko)
F	—	Fearn	(alno)
H	—	H-uat	(kratago)
D	—	Daiz	(kverko)
T	—	Teitne	(ulekso)
C	—	Cole	(avelo) ĉiam havas sonon k.
M	—	Muin	(vinberujo)
G	—	Gort	(hedero)
P	—	mola B.	
R	—	Ruis	(sambuko)
A	—	Ailm	(abio)
O	—	Onn	(genisto)
U	—	Ur	(eriko)
E	—	Egad	(tremolo)
I	—	Ioda	(taksuso)

kvankam la alfabeto havas malmultajn literojn, ĝi havas pli da sonoj ol iu eŭropa lingvo krom rusa. Ĉiu konsonanto havas almenaŭ du sonojn, largan kaj mallargan, laŭ la vokalo kontaktanta kun ĝi. Aliaj sonoj produktiĝas per akcentoj, superpunktoj kaj eklipsoj.

La litero h estas uzata por moligi la kunigon de vortoj kiam du vokaloj kontaktas, ekz.: «is ead» sed «ní-head». P. estas trovataj ĉefe en enkondukataj vortoj, ĉar vortoj komenciĝantaj per p aŭ f en aliaj lingvoj ofte komenciĝas per c en irlanda lingvo, ekz.: Cásc, (Pasko; france, Pâques); Cos, (piedo; greke, pous); Céol (muziko; angle, peal, sonorilmuziko); Ceitre (kvar; kimre pedwar: angle four); Cúig, (Kvin; kimre pimp; angle, five); Ceann, (Kapo; kimre, pen); Corcur, (purpura; angle, purple) Clum, (plumo; angle, plume).

La nomoj de la numeraloj similas al esperantaj nomoj, aon, dó, trí, cei-

tre (aŭ ceatair), cúig, sé, seaĉt, oĉt, naoi, deiĉ, sed la sekvantaj numeraloj ne nomiĝas laŭ esperanta kutimo. La unuo venas antaŭ la deko, ekz. aon-déag, (dek-unu); dó-déag, (dek-du) kc. Dukek estas fiĉe, kaj cent, céad.

Specialaj numeraloj estas uzataj por kalkuli personojn, duine, (unu persono), beirt, triur, ceatrar, kc. kaj estas strange ke anstataŭ «sep» oni diras «móir-šeisear», kiu signifas «granda ses».

La gramatiko estas malfacila; la substantivo havas kvin deklinaciojn kaj la adjektivo, kvar; ambaŭ havas kvin kazojn. La voka kazo estas ĉiam uzata por paroli al persono per la nomo. Parolante *pri* persono nomata Johano, oni nomas lin Seán (Ŝon), sed parolante al li, oni uzas la vokan formon, A Šeáv (Hon). En anglaj romanoj pri Irlando, oni trovas Shamus'n kaj Hamish'n, la nominativajn kaj vokajn formojn de Jakobo, respektive Séamus kaj Šeamuis. Substantivoj kaj pronomoj havas nur du seksojn, virseks-son kaj virinseks-son, rilatantajn ne al persona sekso, sed al vortformo. Cailín (knabino) estas virseksa, sed litir (letero) estas virinseksa.

La multnombro ne formiĝas per aldono de s, sed precipe per vokala aldono aŭ interna ŝanĝiĝo, ekz.: cailín, (knabino) cailíni; buacaill (knabo) buacailli; scian (tranĉilo) sceana; lám (mano) láma; sliab (monto) sléibte; bád (boato) báid; fear (viro) fir; duine (persono) daoine; mí (monato) míosa. Post la numeralo dá (du) la substantivo estas dunombra, ekz.: lám (mano); dá láim (du manoj); sé láma (ses manoj). Kutime la adjektivo sekvas la substantivon kaj akordiĝas, bean mór (granda virino); na fir móra (la grandaj viroj). Simile al Esperanto, irlanda lingvo havas nur unu artikolon, «an» (la) sed tiu havas multnombran formon, «na»; «an cuám» (la ostoj), «na cuáma» (la ostoj).

La pronomoj iom similas esperantajn pronomojn; mé, (mi) tú (ci), sé (li), sí (ŝi), sinn (ni), sib (vi), siad (ili). Sendube, multaj personoj konas la nomon «Sinn Fein» donatan al irlandaj respublikanoj. Ĝi signifas «ni mem», kaj esprimas la deziron de la respublikanoj «ellabori nian propran liberigon, ne apogante nin sur aliajn personojn aŭ naciojn».

La demandaj vortoj precipe komenciĝas per la k-sono reprezentita en irlanda lingvo per c; cé (kiu); cad (kio); cé leis, (kies); catáin (kiam); cá (kie); cad na taob (kial). Por simplaj demandoj la vorto «an» (ĉu) estas uzata sen ŝanĝo de vortordo, ekz.: «is fear é» (li estas viro) «an fear e?» (ĉu li estas viro?).

«Jes» kaj «ne» ne troviĝas en irlanda lingvo, demando devas esti jesata aŭ neata per la verbo uzata en la demando, do la respondo estas tre preciza, ekz.: «An dtiguiú tú an ceist?» (Ĉu vi komprenas la demandon?) povas esti respondata: — «Tiguiú» (mi komprenas) aŭ «Ní tiguiú» (mi ne komprenas). Se oni demandas, «An mait leat caife?» (ĉu plaĉas al vi kafe?) la respondo estas «Is mait liom» (Ĝi plaĉas al mi) aŭ «Ní mait liom» (Ĝi ne plaĉas al mi).

«Se plaĉas al vi» estas preskaŭ la sama frazo «má 's é do toil é» (se tiu estas via volo) kaj «dankon» estas esprimata «go raib mait agat» (estu

bone al vi). Nek participojn estantaj nek sendifinan modon havas irlandia lingvo. Verbsubstantivo estas uzata anstataŭ ili. Mankas ankaŭ la verboj «havi», «porti» kaj «bezoni», kaj iliaj sencoj devas esti esprimataj de prepozicioj. «Nora havas katon» tradukiĝas «Tá cat ag Nora» (Estas kato ĉe Nora). «Mi portas veston» estas «Tá cóta orm» (estas vesto sur mi). Sentoj esprimiĝas same; «mi malsatas» estas «Ta ocras orm» (estas malsato sur mi). Tiamaniere povas esti esprimataj, ĝojo, kolero, honto, kaj aliaj abstraktaĵoj. Por esprimi bezonon, la prepozicio «ó» («de» aŭ «for de») estas uzata. «Bí leabar uaim» (estis libro for de mi) signifas «mi bezonis libron».

Kunmetitaj vortoj troviĝas, ofte kun poezia nuanco. «Strigo» estas «ceanncait» (kapo de kato); «sciuro». «catcrainn», (kato de arbo); «vagaron», «cóiste-iarainn»; (veturilo el fero) «fervojo», «botar-iarainn», (vojo de fero); «telegramo», «teačtaireačt-teinntig» (venanto de fulmo); «fulmo», «teinntreač» (fajra laŭco).

Multaj anglaj vortoj venis el kelta lingvo, ekzistantaj flanke kun similsignifaj vortoj el saksa aŭ normanda lingvo. El tiaj paroj la unua venas el kelta fonto, la dua el saksa aŭ normanda. Tongue, language, (teanga, lingvo); dun, brown, (donn, bruna); means, riches, (maoin, riĉeco); shuffle walk. (siubal, promeno); kin, relations, (cinead, tribo) caper, leap, (ceáprairra, ni saltas); espouse, marry, (pósad, edziĝo); quay, pier, (céad, kajo).

Ankaŭ vortoj tre similaj al esperantaj vortoj troviĝas en irlandia lingvo, ekz.: anam (animo); or (oro); airgead, (argento); capall, (ĉevalo); olann, (lano); mil, (mielo); buaf, (bufo); seagal, (sekalo) ionga (ungo); tir, (tero); seačt-main, (semajno); Dia luain (lundo); Dia máirt (Mardo); Eanáir (Januaro); Feabra, (Februaro); Iúl, (Julio),

Do oni konstatas, ke multaj ligiloj ekzistas inter tre malnova irlandia lingvo kaj tiuj de antikva kaj moderna Eŭropo, inter ili ni povas enkalkuli Esperanton, la plej moderna el ĉiuj.

Ĝi estas taŭga lingvo por kantado, ĉar ĝi estas belsona kaj harmonia. Malmolaj konsonantoj estas moligitaj per superpunktoj kaj eklipsoj ekz.: «píopa» (pipo) kun superpunkto moliĝas al «píopa» (fipa); «síoda» (silko) iĝas «síoda» (hida). «Go deo na ndéor» (por ĉiam) per eklipso de malmola «d» iĝas «go do na nor».

La poezia sento de la Irlandanoj montriĝas en la nomoj donitaj de patrinoj al iliaj infanoj, «mo gíle» (mia brilerio); «a leinb mo éroide» (infano de mia koro); «a stóirín mo éroide» (trezoreto de mia koro); «a cuisle mo éroide» (vejno de mia koro); «mo éuid de 'n tsaogal» (mia porcio de la mondo).

Kelkaj personoj erare kredas, ke la irlandia lingvo estas nur dialekto de la angla, do mi citos frazojn el la preĝo de nia Sinjoro, «Patro Nia», en ambaŭ lingvoj por komparo.

Irlande: «Ár n-Atair abá ar neam; go naomúigtear t-ainim; go dtagaid do rígeačt; go ndéantar do toil ar an dtalam mar a déantar ar neam» kc.

Angle: «Our Father which art in Heaven; hallwed be Thy name; Thy Kingdom come; Thy will be done on earth as it is in Heaven», kc.

La Irlandanoj nomas sian landon «Éire», nomo simila al la persa nomo por Persujo, Iran; sian lingvon ili nomas «Gaedilge», aŭ «An teanga na h-Éireann».

Ĝi estas vera orminejo por filologoj, ĉar ĝi estas la plej malnova lingvo de civilizacio, daŭranta de tiuj antikvaj tempoj, kiam Romanoj venantaj al Britujo por venki ĝin, traktis kiel amikojn la Irlandanojn.

La angla lingvo estas miksaĵo el multaj lingvoj, sed la irlandia estas preskaŭ la sama kiel en tiu antikva tempo, la aspekto de la vortoj ne multe ŝanĝiĝis nur la elparolo aliĝis.

Tiu lingvo postvivanta spite teruraj kontraŭstaroj, havanta propran literaturon kaj povon por esprimi la nuancojn de penso kaj necesojn de moderna vivo, ne facile mortos. Sed se tiu barakto por vivo havos sukceson aŭ ne, dependas sur la alprenado de dua lingvo por eksterlandaj aferoj. Tiu dua lingvo devas esti Esperanto, la jam plene disvastigita internacia lingvo.

EMMA L. OSMOND

Premiita en ia XII Internaciaj Floraj Ludoj.



XIV Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio

Sóller: 5, 6, 7 junio 1927

Niaj okuloj ankoraŭ ne rekonsciiĝis de la brilo kaj belo de nia Kongreso en Palma de Mallorca kaj jen denove niaj kunbatalantoj transmaraj, sur la Orita Insulo, invitas nin por ĝui la nesupereblan pejzaĝon de Sóller, la Meko de nia lando.

Senhezite ni povas aserti, ke nia XIV Kongreso ne povus trovi pli belan lokon, pli riĉan lulilon. Sóller, kun la blua maro ĉe siaj piedoj kaj la imponaj altaj montoj gardostarantaj ĉirkaŭ ĝi, altiras ĉiujare grandan nombron da turistoj, kiuj el ĉiuj kontinentoj alvojaĝas al la hejmo de la naturo por ĝui algrade la nektaron de la plej dolĉa floro.

Kiom da pentristoj pentris vin, Sóller! Kiom da poetoj kantis viajn diverskolorajn oranĝarbojn! Kiom da esperantistoj admiras vin dum la XIV Kongreso de K. E. F!

Se ni iam povis konsili niajn amikojn, neniam ni tion faris tiel prave kiel hodiaŭ: ŝparu, komencu kolekton en viaj grupoj, prunteprenu aŭ eĉ trompu monhavantojn, sed neniel preterlasu la okazon viziti Sóller!

Esperantista Grupo «Solleerica», kiu kun entuziasmo komencis la unuajn

paŝojn por sukcesigi la Kongreson, invitas la katalunajn esperantistojn al la granda Festo. Ĝi esperas, ke la ĉarmo de la lando altiros esperantistojn el diversaj nacioj, kiuj donos reliefon al la Kongreso.

Estis elektita la jena Organiza Komitato:

S-ro. Narciso Bofill	Honora prezidanto
» Miquel Arbona	Prezidanto
» Andreu Comellas	Kasisto
» Andreu Arbona	Sekretario
» Bartomeu Coll.	Voĉdonanto
» Francesc Colom	»
» Jaume Coll	»
» Sebastià Terrassa	»

Por la sukceso de nia estonta Kongreso ĉiuj K. E. F-anoj konstante laboru. La diversaj amikoj, kiuj prenis sur sin la taskon de organizo, garantias ja kontentigan rezulton.



Alvoko por la XIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

kies solena festo okazos kun la XIV Kongreso de K. E. F.

Antaŭ du jaroj estis Palma de Mallorca, la ĉefurbo de la Baleara Insularo, la scenejo de nia granda solenaĵo. En 1927 estos ne la plej granda, sed jes la plej bela urbo de tiu belega katalunlingva teritorio, nia poezia kunvenejo: Sóller.

Al vi, Esperantaj verkistoj, inspiruloj el ĉiuj landoj, saluton! kaj inviton partopreni la jenajn konkursojn:

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Proza *Ama* verkaĵo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Esperantigo de la jena kataluna versaĵo:

Record de Sóller

Amic, teixiu aquesta visió de la infantesa...
Ja coneixeu la vila d'ombrívols carrerons,
la rica vall de Sóller, entre serrals estesa,
on totes les vivendes tenen un hort al fons.

Era senyor de casa el somni de la sesta;
la posadera em feia senyal de que emmudís,
posant-se el dit als llavis; una verdor xalesta
pel portaló guaitava com auri paradís.

L'hort m'oferí refugi, dosser la verda branca
del taronger; en l'herba me vaig tombar; l'eixam
d'insectes, com espurnes, brunzia per la tanca,
i em feia pessigolles al front l'espès herbam.

Eren les verdes tiges profunda columnada;
filtrava, ran de terra, l'esguard per allà endins;
dansaven les corol·les de fulla acarminada,
com baiaderes entre pilars esmaragdins.

Llavores un misteri per mi se va descloure,
torbant la fonda calma del cor adolescent:
entrà una joveneta amb els cabells a lloure,
que un raig de sol feria com nimbe resplendent.

Amagatall cercava per treure's una pua
del cos; a totes bandes girà l'ull inquiet;
s'alçà la falda roja, mostrà la cama nua
que mès amunt tenia una blancor de llet.

Mon cor, davant la casta nuesa, va suspendre
son ritme; una calrada bullenta vaig sentir;
l'esglai que sentiria la bergantella tendra
que es creia tota sola, si s'adonés de mi!

I el nin va tornar home... Quin esperit dins una
espina de figuera de moro va saltar
a l'abscondit ivori de l'Eva, tan dejuna
de dar-me el fruit de l'arbre simbòlic a flairar?

Mai més l'he retrobada; i veig com aquell dia,
fa quaranta anys, la nina que no em coneix tampoc,
i el món d'una edat nova, inconscient m'obria,
incendiant la porta sense percebre el foc.

Amic, teixiu aquesta visió de la infantesa,
vós que caceu libèl·lules en la presó del rim,
vós que preniu les ales amb tanta subtileza
que no se perd un àtom del matisat polsim.

JOAN ALCOVER

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

II. — Esperantigo de la jena kataluna prozaĵo:

Ramon de Montjuic

La tràgica mort del meu amic Ramon, ciutadà de la falda nord de la muntanya de Montjuic—la que toca al Poble Sec,—m'ha emplenat de tristesa i m'ha recordat una època de la meua vida. Ramon, el mort, tenia un petit parc d'atraccions format per un carroussel i una barraca de pim-pam-pum. A l'istiu el parc funcionava i a l'hivern, la màgica potència de transformació del propietari, convertia el parc, en saló de ball de tarda. Tot el tinglado ocupava el fons ombrívol d'un hort d'un dels carrers del Poble Sec que s'enfilen a la muntanya.

Ramon era un amic del diumenge. A l'hivern, en aquella època, havent dinat, anava gairebé cada festa al suburbi. El Poble Sec, en aquella hora era ple de clapes de silenci i de grans taques de sol tebi i feia olor de taronges. De vegades se sentia, darrera d'una cantonada, un xivarri de mainada. Les tavernes, semblaven eixams sonors, amb la sonsònia de les guitarres. El tocador, ensenyant el mitjó vermell, el cigarret darrera l'orella, amb un rínol de cabells caragolats com una neula sobre el front, es rodejava de la rodona de les boques mig obertes de les criades.

Recordo, com si fos ara, la veu de xantre d'un cec vell amb barba, molt alt, que anava pel Poble Sec cantant la cançó del naufragi del "Valbanera". Els veïns sortien als balcons per sentir-lo, les dones, en faldilles de sota, els homes, amb la bata groguenca del magatzem. Quan el cec passava per davant de les tavernes trepitjava les closques de cacauets i com que aquella fressa no li devia agradar saltava com un ocell, per passar de pressa. A les portes de les tavernes hi havia sempre algun obrer jove, figura oblíqua, amb el vestit blau planxat, la gorra de gran visera una mica de cantó, un clavell a l'orella, indiferent, amb una mica de crueltat de gall als llavis. També hi havia braçades de noies castellanès, amb la cara de color de poma, amb els cabells negres planxats, mullats i ondulats. Aquestes noies de vegades donaven empentes als soldats petits, xafats i xatos que menjaven peles de taronja i cloves de cacauets.

Es trobaven, molts esguerrats i pobres i en certs llocs feien una mena de barricada amb les crosses, els ossos torçats, els bastons i els altres instruments dels pobres.

Preniem la carretera de Montjuic, donàvem una volta pel corriol que volta els glacis, ens assèiem per veure el cel, que era blanc de núvols i tenia trossos mig blaus, mig verds, mig rosa i després, amb un bri de farigola als llavis, el cor i el cap a qualsevol banda, les mans a les butxaques, passant pel camí del primer parc de Montjuic arribàvem al farbalà de la muntanya. I sovint entràvem a donar un cop d'ull en el ball de tarda del pobre Ramon.

Hi entràvem amb una certa prevenció perquè l'aire interior, molt espès, feia girar la cara i la llum era incerta. Quan els ulls s'hi acostumaven, es

veia al centre de l'envelat, un quiosc quadrat format per quatre pals rodejat d'una tela metàl·lica de galliner. Dintre d'aquella gàbia posada en aquell mar de fum, hi havia tres músics una mica boirosos arrapats als seus instruments com si fossin els seus salvavides. La llum del gas treia del metall daurat d'un fiscorn un reflex somort. En el fons es veia dins d'una atmosfera de teló de fons capvespral, els cavallets enfundats. Entre aquell grandió embalum i la tela de l'envelat del ball hi havia com una gran esquerda que deixava veure les estrelles.

Quan els músics no sonaven hi havia a l'envelat una remor espessa. De vegades entre aquell formigueig gros de color de xocolata a l'espanyola es disparava el xisclet d'alguna noia, com si li hagués fugit una molla. Les criatures jugaven a cuït entre les cames dels balladors i de vegades en rodaven tres o quatre, com una bola, per terra. Sempre hi havia asseguda a les cadires alguna mare que donava el pit al fill. El color desfet, afinat, treballat, ple de filagarses d'aquestes mares, en aquella llum, em feia pensar, no sé per què en la pintura de Sisley.

Ramon portava sempre una canya a la mà amb la qual graduava els becs de gas i els treia el moc. S'escorria com una anguila, era a tot arreu, cridava amb els músics, deslligava dubtes, feia circular la tossa de gent que hi havia a la porta.

La música, més que sonar, de vegades gemegava, de vegades bramava. Era una música biològica que arribava al fons de les vísceres. Quan s'arrencava, es formava a l'entorn de la gàbia una argolla humana, grossa, multicolor, canviant, com si bullís. Els dies de gran festa sorgia per sobre del cap de la gent el plumall d'algun soldat, i semblava la maneta de l'argolla. Els llums de gas, amb la pols, enrogien, el baf era una cosa granulada i l'aire es poblava de petits granets de pus.

Ramon era un home petit, sec, calb, amb unes celles peludes i amples. Portava coll planxat de goma i punys rodons, de cel·luloide. Es veia que l'il·lusió d'aquell home hauria estat la d'ésser un mig artista, perquè es deixava créixer les ungles, deia les coses a la babalà i tenia certes caigudes en el dandisme: per exemple, era partidari de l'armilla de fantasia. Tot aquest corrent de la vida espiritual de Ramon desembocava en la seva passió per l'anar a pescar amb canya a l'escullera, cosa que l'encantava.

Ramon era una pelleringa humana que solia amagar darrera d'una aparença decent la seva enorme ganduleria. En el fons era, el que en diuen els bons escriptors, un incomprens. Allò per exemple de tenir una ocupació la del ball,—el dia que tothom fa festa, trobava que era la demostració de la seva superioritat

Ramon vivia en els cavallets. A la baldufa, hi tenia la cuina. En el ventre d'un dels cavalls de cartó d'aquells que pugen i baixen hi tenia el rebost. Penjava la roba a les trompetes de les nimfes de l'orgue de vent. A la cadira portàtil engarlandada de roses—aquesta cadira que usen en els cavallets (les mares de les criatures,—hi rebia la gent. En aquella mena de sot circu-

lar que hi ha entre l'arbre central i l'armatosta circular que gira, hi tenia quatre caixes petites i miserables, amb quatre sabates velles i unes canyes de pescar.

El més original, era el dormitori, Ramon es colgava dins de la manxa de l'orgue dels cavallets. La manxa estava unida als cavallets per un engranatge i una politja. Quan els cavallets voltaven la manxa s'inflava i desinflava. La manxa tenia la forma de piràmide truncada quan era plena de vent, era una mena de boca de granota amb una ànima de ferro, recoberta de cuiro i corria horitzontalment a la part del darrera del fris de nimfes i ballarines que tenen una daurada trompeta de cartó a la boca i unes galtes inflades.

Recordo que un dia vaig fer veure a Ramon el perill que representava dormir dintre d'aquell cau.

—Un dia els cavallets, sense saber com, es posaran a rodar, la manxa es comprimirà i morireu fet una truita. Sort però, li vaig dir rient, que mentre aneu quedant planxat com uns pantalons, sonaran totes les trompes destrepades de les nimfes i ballarines.

—No deixa d'ésser una mort agradable—digué ell amb la vanitat infantívola que tenen tots els artistes quan se'ls parla de les seves rareses, gratant-se amb la llarga ungla groga del dit petit les arrugues del front i l'espessor bosquetana de les celles.

Quan he sabut la mort de Ramon he anat al parc d'atraccions. He entrat a l'hort. No hi havia ànima vivent. Ja me n'anava quan he vist venir una dona amb un sac de papers a l'esquena, una faronja a la mà.

—Ahir el varen enterrar—digué la dona.—El varen treure mort de la manxa...

—I de què ha mort?

—Ningú ho sap. Abans d'ahir encara va anar a l'escullera i avui ja fa malves.

—Vostè és del barri?—vaig preguntar a la dona.

—Sí, per què?

—No varen sentir els veïns el soroll de les trompetes dels cavallets la nit que va morir?

—Em sembla que he sentit a dir alguna cosa d'això... que és policia vostè?

Petita pausa. Després,

—Tenia enemics el senyor Ramon?

—Jo no sé però, qui sap!

—Potser algú de l'escullera, no us sembla?—he dit jo per dir quelcom.

—Era un fracassat—ha dit la dona amb incoherència:—Figuri's que en els baguls no se li ha trobat ni un tros de paper.

—Vós colliu papers pel carrer, no fa?—he dit sense alçar el cap.

—Sí, senyor, per què?

Una altra petita pausa. Amb el meu prim bastó de nusos remoc un xic de terra i amb la virolla toco una pedra blanca i neta.

—I a l'enterrament, hi havia molta gent?—he fet, distret.

La dona n'ha mirat, se li han deslligat les faccions, no s'ha pogut tenir el riure i després ha començat a pelar la taronja.

He mirat la dona una mica perplex. M'he adonat que he fet una planxa. Pensava en el darrer enterrament que m'han parlat que fou molt concorregut. Li he dit:

—Dispensi.

I ara un pas, ara l'altre, he sortit al carrer. — JOSEP PLA.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de Esperantista Grupo «Sollerica», Sóller,: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II. — Premio de Sro. Narciso Bofill, Palma: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- III. — Premio de la Komitato de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV. — Premio de *Kataluna Esperantisto*: Dumviva abono al la gazeto. Temo: Pri la natura evoluo de Esperanto.
- V. — Premio de la Prezidanto de K. E. F.: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI. — Premio de la Direktoro de K. E.: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VII. — Premio de Sro. Jaume Grau Casas, Barcelona: 50 pesetoj. Temo: Studo pri la lingvo kaj literaturo de iu malgranda popolo.
- VIII. — Premio de Esperantista Klubo Palma: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. Novaj premioj estos anoncataj al la Komitato, kaj ni ilin publikigos en la proksimaj numeroj de «Kataluna Esperantisto».

(Ni petas ĉiujn societojn kaj privatulojn bonvolajn, tuj anonci al ni siajn premiojn kaj temojn por la proksimaj Floraj Ludoj.)
Inspirigu kaj verku por la gloro de nia Literaturo!

JAUME GRAU CASAS, *Prezidanto*. — FRANS SCHOOF. — JOSEP CASANOVAS. — NARCIS BOFILL. — MARIAN SOLÀ — DELFÍ DALMAU, *Sekretario*

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II, ricevos ekzempleron de la verko «Kataluna Antologio». Krom tio estos donacata al ĉiu laŭreato atesta diplomo.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵ premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj aŭ anoncitaj.

IV. — La soleno de la XIIIaj Floraj Ludoj okazos en Sóller dum la XIVa Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio».

V. — La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 28 februaro 1927 ĉe la Sekretario de la Floraj Ludoj, (S-ro. Delfí Dalmau, Carrer València, 245, Barcelona) akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — La manuskriptoj ne estos resendataj eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Ĉiu sendinto bonvolu konservi kopion de la manuskriptoj. La manuskriptoj devas esti skribitaj plej legeble sur unu

flanko (paĝo) de ĉiu paperfolio. Oni menciuj ĉiam ĉu la verko estas originala aŭ la lingvon el kiu oni tradukis.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII. — La Komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La verkoj premiitaj fariĝos propraĵo dum unu jaro, de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

Peto al la gazetoj. — Ni petas niajn kolegojn, ke ili publikigu nian alvokon por ke la konkurson partoprenu esperantistoj el la tuta mondo.

Pro... kaj Por...

XXXIX Datreveno de Esperanto. — Paco kaj Amo organizis por la 8 de aŭgusto tre belan feston por soleni la XXXIX Datrevenon de la apero de la unua lernolibro de Esperanto kaj vere la organizintoj povas fieri, ke ilian meritan taskon kronis granga sukceso.

Ĉirkaŭ 150 esperantistoj kaj simpatiantoj kolektiĝis en la belega arbaro de St. Quirze, apud Sabadell, por ĝui la diversajn interesajn flankojn de la programo. Super ĉio meritas laŭdon la literatura festo, kiu disvolviĝis en libera aero, sub la foliirĉaj arboj. S-roj Gallego, Barba, Planas, k. a. alparolis la publikon, kiu dum la festo fariĝis multe pli nombra, kaj brave altigis la celon de nia movado kaj la ideojn, kiuj promesas feliĉon al la homaro.

Nia amiko Gili Norta. — Post unujara vojaĝado tra Ameriko, nia kara kaj laborema Gili revenis al nia rondo, sed bedaŭrinde lia restado ĉe ni ne daŭris pli ol du monatojn. La 24 de septembro li denove enŝipiĝis kaj por longa tempo ree adiaŭis nin. Bonan vojaĝon kaj baldaŭnan revenon!

El Monistrol. — La 31an aŭgusto okazis en Monistrol de Montserrat la fermo de du Esperantaj kursoj, kiuj daŭris unu monaton kaj duonon. Klarigo estis dum unu horo ĉiutage. En tiuj kursoj partoprenis 25 knaboj inter 10 kaj 13 jaroj. Rimarku, ke per nia sistemo, kiel dum la pasinta jaro, ĉiuj knaboj restis ĝis la fino de la kurso; nur unu forlasis ĝin. Bedaŭrinde, pro tio ke preskaŭ ĉiuj estas malriĉaj kaj tre junaj, oni ne povis organizi seriozan grupon kaj kolekti monon por aboni gazeton kaj aĉeti standardon, k. t. p. Ni atendas ke riĉuloj helpu nin. — Orobite.

Oni dankas. — S-ro. Manuel Rodellar dankas la diversajn samideanojn, kiuj dum lia vojaĝo bonvolis akcepti kaj helpi lin. Li precipe dankas la delegiton de U. E. A. en Toulouse kaj la esperantistojn en Bilbao kaj Baracaldo, S-rojn. Elizondo, Lunate kaj aliajn, kiuj bonvolis lin akompani al «Altos Hornos», kie laboras multaj samideanoj.

Nekrologo

Kun granda ĉagreno ni informiĝis pri la morto de nia samideano Ramon Guitart el Barcelona kaj Pere Llitas Ponsa, filo de nia kunbatalanto, S-ro. Pere Llitas.

Al la familio de la malfeliĉe malaperintaj samideanoj ni devas esprimi nian plej profundan kondolencon.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto»,
València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu
al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por
eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio
estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:
Ĉiusemajna
Aktuala Ilustrita
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a
BARCELONA

“Kataluna Esperantisto”

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonyolos represi nian anon-
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi
tekston publikigotan.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

artícle determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al

femení

heroino, reĝino
katino, leonino

O

*terminació
substantiu*

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

*terminació
adjectiu*

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

*terminació verb
(infinitiu)*

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

*terminació
adverbial*

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

Mi skribas
Jo esric

IS

temps passat

skribis
escrivi

OS

temps futur

skribos
escriurè

US

*mode condi-
cional*

skribus
escriuria

U

*mode impera-
tiu o subjunc-
tiu*

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo esric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

EL XIV CONGRÉS DE K. E. F. A SÓLLER

Els esperantistes mallorquins altra vegada han volgut que el Congrés de la Federació Catalana d'Esperantistes tingui lloc a la bella Illa Daurada, el record de la qual desperta en els esperantistes que assistiren el XII Congrés de Palma la bellesa que tant a dojo la Natura ha escampat en aquella terra envejable. Sòller, la més bella ciutat de Mallorca, serà l'escenari de la nostra festa anyal i dels XIII Jocs Florals Internacionals, els dies 5, 6 i 7 de juny de 1927.

El nostre gran Russinyol diu a «La illa de la calma»: Anant de Deià a Sòller, si quan s'hi va és per la primavera, així que s'és a dalt del coll se sent pujar, d'allà la plana, una gran flaire de tarongina.

S'avença, tot fent giragonces, i en arribar al darrer revol, com si et diguessin «Obre el cor», et donen a respirar una alenada de flors que t'ompla els sentits de fragància.

De dalt fins a baix, d'aprop fins al lluny, del pla fins a la muntanya, extenent al davant teu una panera de tarongers com un present de meravelles.

Tarongers petits, tarongers grans, tarongers verdosc, tarongers cobalt; allà on arriba la vista no veus més que puntets verdosos, de fulla fosca i de flor blanca, i les cases, les tanques, les masies i els camins tot està colgat pels tarongers.

La ciutat de Sòller és això: un estotx, una copa o una capella per a guardar el tresor d'aquests arbres.

Si vols tenir una idea del que és aquella vall, tanca els ulls per un moment i pensa en un país de verdor, mentre flaires tarongina o et menges una taronja.

Sòller té una bona plaça, té les cases nêtes i boniques, com totes les de Mallorca, té patis amb testos i pilastres, té una església gran, carrers ben grans, carrers ben cuidats; però tot ho ofeguen els tarongers. Tot el demés serveix de marc per a fer-ne destacar la fruita.

Per això el nom d'aqueixa fruita, que no se sap si és fruita o és flor, va tan unida al nom de Sòller.

"KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizajo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplerio 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redakcejo: carrer València, 245 - BARCELONA

FEDERACIAJ GRUPOJ

Esperantista Klubo Palma
Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca
Empordana Ebenajo
(Girona) Armentera
Esperanta Nesto
(Joventut Catòlica) Ripollet
Fratego
Placo Pi i Margall, 14. Vendrell
Gerona Espero
(Creu Roja) Girona
Lumon
St. Antoni, 64. Terrassa
Studenta Juneco
(Seminari) Girona
Aplec
Mendizàbal, 3. Sabadell
Bela Espero
Carretera de Vich, 41. Manresa
Esperanta Idealo
Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnès
Esperantista Amikeco
Plaça Bernardí, 10. Manlleu
Esperanta Burgono
(Centre Democràtic) Rubí
Internacia Fratego
(Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet
Paco kaj Amo (Soc.)
Planeta, 16, pral. Barcelona
Barcelona Stelo
Marquès Duero, 101. Barcelona
Barcelona Esperanto-Societo
Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona
Esperantista Grupo «Sollerica» Soller

Artés: Sro. Manuel Monrós
Armentera: Empordana Ebenajo
Banyoles: Sro. Joan Aulina
Figueres: Sro. Carles Varela
Girona: Sro. Josep M-a Dalmau
La Garriga: Sro. Joan Blancafort
Mahó: Sro. S. Ortega Barceló
Manlleu: Sro. Marian Vilardell
Manresa: Sro. Josep Albagés
Mataró: Sro. Francesc Torres
Molins de Rei: Sro. A. Canals
Monistrol de Montserrat: Sro. F. Oro-bitg, Pastro
Palafrugell: Sro. Francesc Sagrera
Patau de Montagut: Fino. Lluís Bargés
Palma de Mallorca: Sro. Narcís Bofill
Reus: Sro. Enric Agnadé
Ripollet: Sro. Josep Planas, Pastro
Rubí: Sro. Joan Ratés
Sabadell: Sro. J. Bracons
St. Adrià del Besòs: Sro. S. Arnella
St. Martí Sapresa: Sro. Joan Rieradevall
Sta. Coloma de Farnès: Sro. Pere Costa
Sta. Coloma de Gramanet: Internacia Fratego
Sallent: Sro. Lluís Solé
Sóller: Sro. M. Arbona
St. Feliu de Pallarols: Sro. J. Collelldevall
Terrassa: Sro. Ramon Marsà
Teyà: Sro. Jacint Barrera
Vendrell: Fino. Maria Julivert
Vich: Sro. Pere Farrés
Vidreres: Sro. Josep Macià
Vilanova i Geltrú: Sro. Jaume Fort
Vilassar de Mar: Sro. Pere Domènech

LOKAJ DELEGITOJ

Ager: Fino. Maria Plans
Almúnia de Castellví: Sro. Pere Esvertit
Ametlla de Merola: Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÉ

Redaktoroj : Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

Respondo al «Sennaciulo»

Se mi ne timus la ruĝan krajonon, mi prezentus al la legantoj de K. E. tre spritan artikolon, kiun la oficiala organo de S. A. T., n.º 42, de la 15 julio, dediĉas al ni, por ke «sinceraj laboristoj foriru el nia naŭza kaj abomena medio, kiu nur celas nebuligi ilian klaskonscion».

Mi nomas la aluditajn artikolon sprita, ne kun la celo ofendi la anoniman verkinton aŭ la redaktoron de la samlingva kolego, sed nur pro tio ke serioze oni ne povas konsideri la subjektivajn asertojn de homo, kiu estas regata de klasa ŝovinismo kaj juĝas pasie kaj erare.

«Tiu federacio estas de multaj jaroj direktata de ekleziuloj. Ĝi distingiĝas nun pro klerikala naciemo. Oni faras religiajn paroladojn; oni benas kongresanojn, kaj tio vere naŭzas, indignas konsciulojn».

Cu oni povas paroli pli maltrafe? Mi sendos la ekzempleron de «Sennaciulo» al certa katolika grupo lastatempe stariĝinta en Barcelona, kiu ne aliĝis al K. E. F. pro tio ke laŭdire ni estas anarhiistoj.

Mi ne bezonas difini niajn ideojn kaj mi ne povas respondi laŭdece al «Sennaciulo», sed mi povas aserti, ke neniu ideo timigas nin kaj ke la neŭtraleco de multaj K. E. F.-anoj superas la ruĝecon de multaj S. A. T.-anoj.

Legante la pritraktatan artikolon, oni ricevas la impreson, ke ĝia verkinto estas *naciulo* kaj ne *sennaciulo*. Alie oni devus konkludi, ke S. A. T.-anoj havas tre malaltan ideon pri sennaciecaj kaj lingvaj aferoj.

«Ili estas tre falsaj. Ili nur pretendas influi nesingardemulojn. Ilia neŭtraleco estas nevidebla, kaj tamen ili ĝin propagandas. Kiaj paradoksoj! Sub tiu masko ili kondukas Esperantismon al preĝejoj, al burĝaro, pere de la kongresoj kaj revuetoj».

Brave! Nenio pli sincera, pli ĝusta, ĵen mi vidas la estrantojn de K. E. F. en pastra robo prediki ĉe la grupoj kaj laŭdi la dekhoran labortagon.

S. ALBERICH JOFRÉ

Vi kaj mi

Mi estas kvazaŭ kruda ter',
senfrukta, malfekunda; —
vi estas varma la somer'
kun superflu' abunda.

Mi estas densa praarbar',
ne homo ĝin profanas; —
vi estas hela lumomar',
en kiu ĝi sin banas.

La erikej' sen lim', sen fin',
mi estas senmezura; —
vi super ĝi etendas vin,
velurtapiŝ' purpura.

Mi estas kvazaŭ ranunkol'
velkanta, senodora; —
floranta estas vi viol'
alloga, multkolora.

Al nuda ĉambro sen ornam',
sen lumo, mi similas; —
vi estas kvazaŭ lampoflam',
blindige tiu brilas.

Mi estas roko el glaci',
neimageble granda; —
la varma suno estas vi
ĝin forfluidiganta.

Vi estas mia falsdiin'; —
se mi en ĉerko kuŝus,
vi certe revivigus min,
se vi min nur ektuŝus.

JAN VAN SCHOOR

Menciita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

Esperanto, Oficialigita lingvo en Kuracista Kongreso. — En la internacia Kongreso por la studado de la tropikaj malsanoj okazonta en Tokio dum la nuna jaro, la kongres-lingvo estos Esperanto, ne la angla, kiel en pasintaj jaroj. Profesoroj Ogata, Mishi kaj aliaj jam anoncis ke ili uzos la internacian lingvon por siaj komunikaĵoj kaj fakaj laboroj. Krome, la Japana Scienca Akademio okazigis balotadon inter siaj anoj pri la demando de internacia helplingvo. Pri la unua demando: Ĉu estas necesa tia lingvo en la sciencaj rondoj? — ĉiuj akademianoj senescepte (43-anoj) jese respondis. Pri la demando: Kiu lingvo decus esti alprenita, 24 anoj balotis favore al Esperanto, 18 anoj gardis sian opinion kaj nur unu balotis favore al alia lingvo. (Elĉerpita el la «Revista de Medicina y Cirugía de la Habana»).

La interna ideo de Esperanto

De la komenco de la Esperanta movado oni parolis inter la anoj de tiu movado kaj dum internaciaj kongresoj pri «Interna ideo».

Sed neniam oni klopodis doni klaran koncepton pri la esenco de tiu ĉi ideo.

Ĝi estas «interna», kaj per tiu vorto mem oni esprimis, ke ĝi ne estas io klara difinita. Ĉar ĝi ne estis klare konscia al ĝiaj adeptoj. La esenco de ĝi kuŝis en la subkonscio. Oni nur sentis ĝin, kiel oni sentas la esencon de muzikaĵo, neesprimebla per vortoj.

Tia stato de aferoj estis komprenebla en la komenco de la movado, kiam la *verdismo* de Esperanto estis afero tute nova. Kvankam ni ĉiuj ĝuis la feliĉon de la «nova sento», ni tamen ne povis klare priskribi, kio en tiu nova sento konsistas, kaj kio precipe estas la noveco de ĝi. Same infano ĝuas la feliĉon de la vivo subkonscie, ne komprenante kaj ne povante kompreni la eternan valoron de la vivo, kiun li nur tempe travivas.

Sed same kiel estas la devo de inteligenta homo doni al si klarigon de la esenco kaj celo de la vivo, estas devo de movado plenaĝa klarigi al si sian esencon, la forton, vivigantan ĝin.

Kaj la movado esperantista jam transpasis la jarojn de unua infaneco, kaj decas al ĝi formuligi la filozofian bazon de ĝia «interna ideo».

Por fariĝi tute klara, ĝi devas esti liberigata de ĉiuj nebulaĵaj frazoj, de esprimoj pure poetikaj, kaj devas esti prezentata en formo logika kaj precipe vera. Vera, — tio estas, fidela al la vivo.

Ni kutimis paroli pri internacieco, pri la detruo de la muroj inter la popoloj, pri la formiĝo de «unu granda rondo familia».

Sed tiu ideo de internacieco ne estis io nova. Longe antaŭ la naskiĝo de Esperanto jam ekzistis movadoj pleje internaciaj, kiel ekzemple la movado socialista. Ni tamen pretendis, ke ni venigis en la mondon «novan senton», kaj «novan vokon».

La celo de la kreinto de nia lingvo kaj movado estis la forigo de la baroj, kiuj dividas unu popolon de alia. Do la nacieco de la diversaj popoloj ne estis neata de la komenco. Ne la fakto, ke la homaro estas dividata en diversaj naciaj grupoj, estis priplorinda, sed la fakto ke tiuj naciaj grupoj ne komprenas unu la alian.

Sekve de tio, tute logike, la celo atingota estis ne la forigo de la naciaj diferencoj, sed la interkomprenigo de tiuj grupoj. Kompreni signifas koni, profunde koni la objekton, kies komprenon ni serĉas.

Kia estas la motivo, kiu igas nin deziri tiun komprenon de aliaj nacioj? Estas evidente, ke ĝuste tiu motivo estos la «interna ideo» de nia celado.

Ni devas daŭrigi nian ĉi-rilatan pristudon, elirante el personaj intereso. Intereso en la plej alta senco de tiu vorto.

Kaj pro tio mi forlasos la vorton «ni», kaj parolos pri «mi», kondiĉe ke

tiu «mi» ne signifas la aŭtoron de tiu ĉi artikolo, sed lin same kiel la leganton.

Tuj kiam mi forlasas senpensan infanecon kaj fariĝas homo pensanta, mi deziras ekkoni min mem, scii, kiu mi estas, kiaj estas la eblecoj en mi vivantaj, kaj ĉu mi estas nur efemera gasto en la Universo min ĉirkaŭanta, aŭ se ne, en kia rilato mi staras kun ĝi.

Post longa profunda studo kaj ripenso, mi venas al jena konkludo.

Ĉio ekzistanta estas certa manifestiĝo de certa tutampleksa Unueco, kiun mi nomas Dio.

Dio estas ne videbla al homaj okuloj, nek ekkonebla en lia vera plenesenco al la homa intelekto.

Sed se eĉ mi ne povas vidi Dion, nek ekkoni Lin, mi tamen povas vidi kaj efektive vidas Dion en la diversaj formoj, en kiuj Li sin manifestas.

Jen, montaroj, maroj, astroj kaj kometoj, kaj fulmoj kaj tondroj, vivo kaj morto, ĉio ajn, ĉio ajn ĉirkaŭ mi estas formoj, en kiuj sin manifestas Dio.

Mi, kiel unu parto de la tutaro, estas ankaŭ unu formo, en kiu sin manifestas Dio.

Ne ekzistas io ajn, krom Dio, en tempo kaj penso antaŭa al Li. Sekve ĉio ekzistanta estas manifestiĝformo de nenio alia krom Dio.

Sciante tion kaj bone komprenante tion, mi konvinkiĝas, ke se mi volas ekkoni min mem, mi nepre devas peni al la ekkono de Dio, kies manifestiĝformo mi estas. Sed mi ne povas ekkoni Lin en lia plej ampleksa perfekteco, ĉar Li estas videbla kaj ekkonebla nur en la diversaj formoj en kiuj Li manifestiĝas.

La unua devo, kiu starigas antaŭ min, estas sendube la devo de la plej eble perfekta studado de mi mem, de miaj ĝojoj kaj doloroj kaj de la kaŭzoj ilin naskintaj. Mi devas studi la specifikan koloron de mia pens — kaj sentmaniero, la en mi vivantaj eblecojn ekkoni kaj travivi ĉion min ĉirkaŭantan.

Atenta ripenso klare diras al mi, ke mia spirito, mia animo ne estas io, kion mi mem ellaboras. Mi povas nur perfektigi ĝin, same kiel mi povas perfektigi la formojn de mia korpo. Sed same kiel mi heredis la formojn de mia korpo de miaj gepatroj kaj pragepatroj, same mi heredis de ili la formigon de mia cerbo, sekve ankaŭ la manieron de mia pensado kaj sentado, unuvorte la manieron de mia travivado.

Do, el mia natura deziro ekkoni min mem sekvas logike la deziro kaj neceso por mi bone koni la evoluon de la nacio, en kiu mi naskiĝis. Ĉar mi estas la rezulto de generacioj vivintaj antaŭ mi, mi nepre devas koni la vojon de la evoluo de tiuj generacioj por bone kompreni ĝian rezulton, kiu en tiu speciala kazo estas mi.

Tiu intima konatiĝo kun la historio kaj spiritalaboro de mia nacio fariĝas por mi plejvalora ilo, per kiu mi ekkonas min mem, sed ĝi fariĝas por mi ankaŭ gravega fonto de konsolo kaj de anima refortiĝo en momentoj, kiam mi sentas min malfeliĉa kaj komencas dubi, ĉu mi estas nature bone ekipita por la batalo en la vivo.

Tiaj horoj estas por ĉiu normala homo la plej gravaj en lia vivo. Tiaj horoj lasas sur lin senkompare pli grandan signon ol iaj horoj de senpensa ĝojado kaj ridado.

En tiaj horoj de persona malfeliĉo, en horoj, kiam mia koro sangas pro iu doloro, en horo, kiam mi ekdubas, ĉu mi povos superi la malfacilaĵojn de la vivo, kiam mi ekmalesperas pri mia propra persona forto de sinteno en la batalo por la vivo, kiu estas batalo ĉiama por la ekkono de Dio, — mi turnas min al la libroj de la geniuloj de mia nacio, aŭ al la pentraĵoj, en kiujn ili enmetis iliajn ideojn pri spaco kaj koloro, pri la mondo vidata, aŭ al iliaj muzikaĵoj, en kiujn ili enblovis iliajn kordolorojn kaj vorte neesprimeblajn esperojn. Mi turnas min alivorte al la spirita heredaĵo, kiun miaj praaĵoj transdonis al mi. Kaj tiam antaŭ miaj okuloj elkreskas grandioza kolono de lumo. Kaj mi rigardas tiun kolonon, kaj ĝiaj radioj iom post iom disfluas tra la vejnoj de mia animo. Kaj pro tia disfluo mi sentas konsolon kaj refreŝigon animan. Kaj tio okazas pro la sekvantaj kaŭzoj.

Mi scias bone, ke mi, kiel filo de mia nacio, laŭ naturaj leĝoj de heredo, nepre ricevis de miaj ge — kaj pragepatroj la saman forton kiu ebligis ilin krei tiun kolonon de lumo. Kaj konsciante en tiu momento, ke tiu forto herede vivas en mi, mi konvinkiĝas ke kaŭze de tiu heredita forto mi nepre devas esti kapabla superi malfacilaĵojn de la vivo kaj kontraŭstari ĉion, kio staras sur la vojo de mia ekkono de Dio.

Kaj la rezulton de la spirita laboro de mia nacio mi konsideras sankta kaj bela, ĉar mi scias ke ilia spirito estas unu el la manifestiĝformoj de Dio, kiu estas la fonto kaj unua kaŭzo de ĉio bela kaj sankta.

Tio estas la kaŭzo, sekve de kiu ĉiuj nacioj de la antikvo kaj de la nuntempo nomas iliajn patrujojn sanktaj kaj iliajn lingvojn sanktaj. «Sankta Rusujo», «Sankta Polujo», «Sankta Germanujo» ktp.

Kaj efektive tia koncepto estas tute ĝusta, tute prava, tute logika sekvo de la plejfilozofa vero, ke ĉio ajn estas manifestiĝformoj de Dio.

Sed la nacioj diverslandaj kaj diverslingvaj, dividitaj per fortaj «muroj de miljaroj» blinde kredis, ke nur ilia lando, nur ilia lingvo estas belaj kaj sanktaj. La aliaj estis «barbaraj», kiel kutimis diri la antikvaj Grekoj, aŭ «mutuloj», kiel sin esprimis la malnovaj Slavoj.

Kaj en tio konsistis la plej grava eraro, kiun la homoj ĉiulandaj faris. La noveco de la mondrigardo, kiun ni alportis en la mondo, konsistas en la konscio, ke ne unu certa nacio estas sankta kaj bela, nacio de Dio, sed ke ĉiu nacio de homaro estas egalsankta kaj egalbela kaj egaldieca. Egale en la rango, en la valoro. Sed ne egala en la maniero kaj formo de tiu sankteco.

Ni ne neas la diferencon de la naciaj karakteroj. Ĉar tia neado estus sama kiel la neado de la naturo mem.

Homoj, trovantaj sin sub influo de certaj klimataj, faŭnaj kaj floraj kondiĉoj evoluas animkarakteron, korespondan al la naturo ilin ĉirkaŭanta. La animo de homoj respegulas la formojn en kiu Dio manifestiĝas en la naturo de certa lando.

Ju pli la homo estas inteligenta, ju pli lia animo estas delikata, des pli forta estas tia respegulo.

La tasko de la psikologio estas eltrovi la leĝojn, laŭ kiuj tiu respegulado fariĝas. Tiu problemo ne povas okupi nin, por kiuj estas grava nur la fiksado de tiu vero.

Ĉar ĝi estas vero, ĉiu penado al la forigo de la naciaj diferencoj estas penado aŭ de frenezuloj aŭ de mensoguloj. Forigu la movadon de la tero, forigu la diferencojn klimatajn, la sunon forigu kaj la astrojn, kaj nur tiam malaperos la nacioj, sed kun ili la tuta homaro, la tuta vivo.

La prijeso de la naciecoj certe faras senenhava la tendencojn de certaj kiuj sin organizas en grupoj «kosmopolitaj» aŭ «sennaciecaj». La sennaciecismo nenie povas efektive kunligi homojn, eĉ se ĝi sendube povas kunligi ilin per frazoj, bele sonantaj al la oreloj, kiuj povas nur aŭdi, sed ne transfluigi la aŭdataĵon en la vejnojn de la animo. Io kunliganta diversajn homojn devas esti pozitiva. Sed nenio negativa povas esti kunligilo. La fakto, ke mi ne estas lilio, ne kunligas min kun la maro, kiu ankaŭ ne estas lilio. Same la fakto, ke mi ne estas Ĥino, ne kunligas min kun Japano, kiu ankaŭ ne estas Ĥino. Sed kio jese kunligas min kun la Japano estas la vero, ke ni ambaŭ estas manifestigformoj de la sama Dieco.

Sed valora estas por mi la Japano nur, kiam li efektive estas Japano. Ju pli la Japaneco en li estas perfekte evoluinta, des pli valora li estas por mi. Ĉar tiam mi povas plej perfekte lerni la japanan formon, en kiu Dio sin manifestas, kaj tiamaniere kompletigi mian koncepton de la multampleksa Esenco de Dio, tial alvenante al pli bona kompreno de Tiu, kies unu formo de manifestiĝo mi estas.

La prijeso de nacioj estas antaŭkondiĉo por ĉiu praktika kaj fruktoplena laboro al la interpacigo de ili. Tiu prijeso estas nova. Oni ĝis nun klare ne esprimis la forton de la nacia spirito kaj precipe la valoron de ĝi.

Sed ĝuste en niaj tempoj la konvinko pri la nepra ekzistado de la nacioj fariĝas pli kaj pli ĝenerale rekonata.

Elirante el tiuj konsideroj ni povas kompreni, kial nuntempe ĉiuj, eĉ la plej malgrandaj naciaj grupoj batalas por la plifortigo kaj eĉ revivigo de iliaj naciaj kulturoj. Pruvoj: la malgrandaj popoloj de la antaŭmilita Rusujo, la Retoromanoj en Svisujo, la Kimroj, Skotoj kaj Iroj en Britujo, la Judoj en Palestino, la Katalunoj en Hispanujo ktp.

Precipe la revivigo de la Kimra kulturo en Britujo estas tre rimarkinda. Dum jarcentoj la plej granda parto de tiu popolo parolis angle. La kulturo angla, ege forta kaj riĉa kaj brila, tamen ne sukcesis estingigi la internan fluon de naciaj sopiroj kaj revoj de la Kimroj. Kaj post centjara dormo tiu nacieto nun reviviĝas kaj faras plej superhomajn penojn por rehavigi al si propran animon kaj lingvon. Ĉar en tiuj jarcentoj ili ne efektive parolis angle, sed estis devigataj paroli ĝin. Ili parolis angle per la buŝoj, sed ilia angla lingvo estis subkonscia traduko de pensoj kaj sentoj Kimraj.

La forta deziro ekkoni sin mem kondukis ilin al la konscio de la nece-

so komenci, por la atingo de tiu celo, vivon veran, sinceran, kaj la vereco estas nacia, ĉar homoj estas en vereco, sekve de feraj leĝoj de la naturo, naciaj.

Do, la deziro ekkoni min, igis min deziri ekkoni la nacion, en kiu mi naskiĝis.

La rimedo por la ekkono de la spirito de mia nacio: diligenta studo de ĝiaj tradicioj, ĝiaj kreadoj en ĉiuj branĉoj de la vivo.

Sed vera kono neniam riceviĝas de la studo de la objekto mem, kiun mi deziras ekkoni.

Perfekta kono estas ĉiam rezulto de komparo, kiel ĉiu scienco estas komparado.

Kun ju pli da aliaj objektoj mi komparas tiun de mi studatan, des pli veran kaj perfektan ideon mi ricevas de ĝi.

Same, por profunde ekkoni mian nacion mi nepre devas studi, kaj profunde studi la aliajn naciojn de la mondo. Studante ilin, kaj komparante ilin kun la mia, mi eltrovas la diferencojn. Kaj plej ofte estas la diferencoj kiuj atentigas min al iu kvalito de mia nacio, kiun mi neniam estus observinta sen tiu komparo.

La deziro de profunda kono de aliaj nacioj fariĝas por mi sankta, ĉar mi klare konscias ke tiu kono, kaj nur ĝi, reale kondukos min al la ekkono de mi mem, kio estas la celo kaj la sento de la tuta mia vivo.

Kaj por tiu celo estis eltrovita la ideo de Internacia Lingvo. Mi nepre devas havi lingvon, kiun mi rigardas sankta en la sama maniero, en kiu mia frato de alia nacio, kiun mi volas ekkoni, ĝin rigardas tia.

Kaj estas pro tio tute ne mirinde, ke ĝuste la esperantistoj de diversaj nacioj faras sian eblon por disvastigi la konon de sia nacio inter alilingvaj Esperantistoj. Pruvo: la Poloj, Bulgaroj, Katalunoj ktp., eble subkonscie, sed plejcerte estas gvidataj de la deziro frate helpi al aliaj esperantistoj ekkoni la nacion por ke ili povu vidi kaj ĝui la de ili prezentatan formon de Dia sankteco.

La konvinko, ke ĉiu nacia memeco estas unu el la manifestigformoj de Dio, igas nin alte respekti, kaj ami ĉiujn el tiuj naciaj grupoj.

Kaj la amo tia, la amo al Dio esprimita en la amo al spiritaĵoj formoj de Lia manifestiĝo, estas la interna ideo de nia Esperanta movado, de la Esperantismo.

Mi bone scias, ke samaj problemoj, kiuj okupas min, okupas ĉiun homon *naskitan de virino*. Kaj tio igas min duoble ami lin, kaj rigardi lin kiel fraton.

Kiam ni unuafoje kunvenis sub la verda standardo en Bulonjo, ni aŭdis nian Majstron preĝi al la «potenca, senkorpa mistero, fortego la mondon reganta». La plej rimarkinda loko en tiu preĝo estas la vortoj: «*Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera, aŭskultu la voĉon de preĝo sincera, redonu la pacon al la infanaro de granda Homaro*».

Aŭdinte, kaj poste leginte, kaj re- kaj releginte tiujn strofojn, ni ĉiuj

sentis, ke la Majstro kvazaŭ eliris ilin el nia propra koro. Ĝi estas preĝo de ĉiu homo pensanta, kies pensado ne estas malvarma, objektiva, sed kies pensobjektoj kaj rezultoj fariĝas, post la profunda studo, vive sentita, varmiganta kaj viviganta la animon. Por tia homo ankaŭ la pure intelektaj operacioj estas ĝuoj estetikaj. La divido de nia anima vivo en arto, scienco kaj filozofio estas akceptebla sole por **profesiaj** profesoroj de universitatoj. Sed por homoj vivaj kaj sincere konantaj sian vivon, ankaŭ scienco kaj filozofio estas arto, kaj ankaŭ tiuj povas emociigi ilin.

Kion do signifas la alvoko de homoj, tiel vivantaj, al Dio, pri kiu ili diras: «Ho, kiu ajn estas Vi?» Ĝi estas sincera konfeso, ke ni ne scias, kiu Li estas, sed ke ni profunde, per ĉiuj nervoj de nia animo, sentas, ke Li ekzistas, kaj ke nia plej arda deziro estas la deziro Lin ekkoni.

Kaj bonege, plej profunde, ni scias, ke nur Li povas redoni la pacon. Redoni la pacon ne kiel objekton, kiun Li, trovigante ekstere de ni, donos al ni, kiel homo donas al alia ian aĵon. Sed doni la pacon, enpenetrante en la animojn de homoj.

La pacon? Kion ĝi signifas? Kia estas paco atingota de ni?

Oni kutime kontraŭstarigas al «paco» la «militon». Sed tia antitezigo estas ege malfilozofa, malvera.

Ne pri tiu paco mi, t. e. mia animo, preĝas al Dio, t. e. al la animo de la mondo. La antitezo al «paco» estas la negativeco de la «malpaco». Malpaco, formanganta kaj turmentanta mian animon, malpaco interne de mi mem.

Konstanta batalo okazas en mi. Opinioj batalas kontraŭ opinioj, virtecoj kontraŭ pasioj, ideoj elpensitaj kontraŭ senkonscie naskitaj per si mem.

Tiu malpaco estas la sekvo de la nekonado de Dio, de la nepovo trovi Lin kaj la kunrilaton, nepre ekzistantan inter mi kaj Li. Nur kiam mi klare vidos, kiamaniere mi troviĝas en nepre al mi destinita loko, kiel membro kompletiganta la harmonion de la Universo, mi ĉesigos la konstantan kuradon de mia penso de loko al loko, kaj mi ekĝuos la kvieton de la rigardo de la «ĉiela rozo», por uzi la simbolon de Dante Alighieri.

Tiu malpaco persona estas la plej grava kaŭzo de la malpaco socia kaj politika. La milito estas nur la fina elrompiĝo de la lafo, kiu sin kolektas en animoj de homoj dum jaroj kaj jardekoj.

La fino de militoj neniam estos sekvo de politikaj kontraktoj, eĉ sigelitaĵoj de centoj da subskriboj de plej fortaj kaj aŭtoritataj potenculoj.

La fino de militoj povos esti kaj estos sekvo de la interna paciĝo de ĉiu individua homo. Tio estas la sekvo de la ekkono plena kaj klara de la «potenca, senkorpa mistero», «kiu ajn estus Li».

Bela estas tiu konfeso, bela pro ĝia senkompara sincereco. Kaj tiu «kiu ajn estas Vi» egale estas aplikebla al homoj de ĉiuj religioj. La diro de iu: «Mia religio estas la sole ĝusta» estas aroganteco nepardonebla.

Kaj jen dum kongresoj Esperantistaj, kiam homoj diverslandaj kunvenas kun komuna al ĉiuj konscio turmentiga, ke ni ne konas Lin, t. e. nin

mem sufiĉe bone kaj klare, kaj kun la komuna deziro, Lin ekkoni, ni sentas la veran Esencon de Li ŝvebanta super ni.

La komunecon formas ne la negativo de la nepovo, sed la pozitivo de la konscio mem, kaj la deziro superi la nepovon.

Kaj tiam ni sentas: Jen, jen la nevidebla, sed sentita. Mi, kiel naciانو tia, vidas certan koloron de la lumo de Dio serĉata, kaj la sama lumo, iranta tra la nacie aliforma lenso de alia naciانو, montriĝas al tiu lasta en koloro alia. Pli bela? Malpli bela? Nek pli nek malpli, sed alie. Kiu havus la malmodestecon diri. «Mia animo estas pli bela ol tiu de mia najbaro?» Ĉiuj estas egalvaloraj, egalsanktaj ĉar ĉiuj estas manifestigformoj de la sama forto mistera.

La komuna lingvo estas ekstera simbolo de la Unueco de Tiu, kies manifestigformoj ni estas, kaj kies ekkonon ni serĉas. Sed kun tempo, kun daŭra edukado, ĝi ĉesas esti simbolo pure ekstera, sed fariĝas simbolo interna, ĉiam sentita de ni.

La frateco de la komuna serĉado de la granda forto mistera, jen la interna ideo, pri kiu ni parolas.

Kiel videblan simbolon de tiu Ideo ni havas la verdan koloron. Ĉar vidu, vere ĝi estas la koloro de la vivo. Kie ajn mi venas, mi unue vidas vivon en la verdeco de la kamparaj herboj kaj de la arbaraj folioj. Ĝi, la esenco de la vivo, apartenas al ĉiuj nacioj de la mondo.

D-RO EMMANUEL OLŠVANGER

Premiita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj



XIII^{aj} Floraj Ludoj *

LISTO DE PREMIOJ

(daŭrigo)

- IX — de Barcelona Esperanto-Societo: ptoj. 50' — por Temo libervola
- X — de du Sennomuloj: ptoj. 50' — por Temo libervola
- XI — de Dro. Ramon Torres Carreras: ptoj. 100' por Temo: Kiu estas la plej bona sistemo por varbi multajn adeptojn?
- XII — de Grupo Lumon el Terrassa: ptoj. 50' — por Temo libervola
- XIII — de Societo Paco kaj Amo: ptoj. 50' — Temo: Kiel ni sukcesigos niajn kursojn.
- XIV — de «Heroldo de Esperanto»: Kvinjara abono. Temo libervola.
- XV — de «Internacia Radio-Revuo: Dumviva abono. Temo: Kion kaj kiel mi aŭdas per Radio.

DELFI DALMAU, sekretario
Carrer València, 245 — Barcelona

* Vidu la antaŭan numeron de *Kataluna Esperantisto*.

Kiel mi fariĝis Esperantisto

Al mia amiko Josep Alberich

La afero, kompreneble, interesos neniun, sed ĵus mi legis sur «Svenska Esperanto-Tidningen» artikoleton de samideano Fredo en kiu li rakontas ke li lernis Esperanton por distri sin de akra dentdoloro, kiun li suferis. Ankaŭ legis mi, antaŭ ne longe, sur «La Suno Hispana» alian artikolon, de D-ro. Cortezo, sciigantan ke li ekkonis nian lingvon dum la resaniĝado de lia rompita brako. Plue, en la letero de S-ro. Paul Fructier, aperinta kiel antaŭparolo en la vortaro de S-roj. Inglada kaj López, la eminenta pioniro bele priskribas siajn unuajn paŝojn en Esperanto, kaj diras ke li eklernis la lingvon dum iuj tagoj de deviga hejmorestado pro malbona vetero en farmodono.

Laŭ la cititaj ekzemploj kaj aliaj elĉerpeblaj, oni rajtus kredi ke Esperanto estas ĉefe afero tre taŭga por forigi la enuon aŭ neniigi la tedon, kiel speco de vasta ŝarado aŭ de amuziga vortkrucigo. Tial, mi deziras klarigi ke almenaŭ estas en la esperantistaro unu samideano, kiu studis la Zamenhof, an verkon havante la korpon ne difektita kaj bonfarta, kaj la spiriton bonhumora kaj senteda.

Do, antaŭ malmultaj jaroj mi nenion sciis pri Esperanto kaj mi akceptis kiel tre bona kaj konvena la konatan difinon: «Esperanto estas universala lingvo parolata de neniuj».

En tiu tempo mi ofte iris ĉe la ĉiutagan kunvenejon de komercistoj kaj financistoj de nia urbo kie ili pritraktas siajn aferojn kaj negocojn. La vasta salonego zumas kiel abelujo pro la bruado de centoj da konversacioj; la komizoj flugetas de rondeto al rondeto montrante siajn specimenojn aŭ transdonante sin reciproke dokumentojn ĉiuspecajn. Unuavide kunfandiĝas amase la tuta ĉeestantaro, kiel kunfandiĝas ĉiu ŝafo en la amaso de la brutaro (pardonu la retorikan figuron), sed pli detale observante ĝin oni distingas per iliaj vestoj kaj sinteno la kamparanajn negocistojn de la enurbaj komercistoj; oni rimarkas la junajn oficistojn vikle irantajn de kliento al kliento; la ĉarkondukistojn, fortajn kaj muskolajn, atentajn al la ordonoj de iliaj dungistoj, kaj la grizharajn kaj dikventrajn ĉefojn kaj direktorojn de la diversaj firmoj, ripoze sidantajn en iliaj postenoj aŭ, kiam nepre, traŭrante la salonon per siaj paŝoj mallertaj kaj anasaj.

Do, iun tagon, la laboro ne estis multa. En angulo fariĝis rondo de junuloj, kiuj babiladis pri diversaj temoj. Ĉeestis, inter aliaj, unu, kiu ornamis sian butontruon per la kvin-pinta verda stelo. Kredante ke ĝi estas la insigno de iu sporta societo mi demandis lin pri ĝi. Tiam li klarigis la signifon de tia stelo kaj elokvente propagandis Esperanton, la facilecon kaj belecon de la lingvo kaj la laŭdindan celon de ĝia interna ideo. Li donacis al mi «Esperantan ŝlosilon» kaj mi promesis tralegi ĝin.

Kaj mi tion faris. Mi kunportis la broŝureton en la kontoron, kaj inter

sumo kaj notajo en la ĉeflibron, mi studis la gramatikon kaj lernis la vortareton. Speciale mirigis min la kunmetado de la devenaj vortoj per la prefiksoj kaj sufiksoj.

Mia konvertinto, la junulo de la verda stelo, poste pretigis al mi pli vastajn lernolibrojn, invitis min al kunvenoj kaj festetoj ĉe la esperantaj rondoĵoj kaj, unuvorte, li tute varbis min al la esperantismo elmontrante al mi idealan mondon antaŭe eĉ ne suspektatan.

Nun, kiam la okazo venas, plezure mi dediĉas al mia unua amiko en Esperantujo la diritajn vortojn, kiel ateston de mia kora dankemo.

JAUME HERP



Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

LA MALGRANDA JOHANO de Frederic van Eeden. — Biblioteko Tutmonda N-roj 2 - 4. El holanda lingvo tradukis H. J. Bulthuis. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto- Fakoj, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S. W. 19. — 1926, 183 pĝ. 17 × 10 1/2. Prezo aŭfrank. de la unua serio (10 numeroj): 4 R. M. aŭ 1 dolaro.

Fabelsimila verko per kiu la aŭtoro prezentas al ni sub diversaj formoj la erarojn kaj punindajn flankojn de la homoj. Laŭ la tre atentindaj klarigoj, kiujn oni trovas ĉe la lastaj paĝoj de la libro, la malgranda Johano estas aŭtobiografio, libro, en kiu la poeto rakontas la disvolviĝon de sia propa animo. Tiu rakontado disvolvigas malfacile kompreneble, kaj iafaje la klarigoj aluditaj ne sufiĉas por trafi la ĝustan ideon de la verkinto. Tamen, kiam oni trovas la belajn paĝojn kun la priskriboj pri la naturo aŭ pri la vivo de insektoj kaj bestoj, oni sentas sin ravata de la belo kaj ĉarmo, kiuj fluas torento el la paĝoj.

Ke la tradukinto majstras esperanton ĝuste kaj bele neniuj duboj post la legado, sed se kelkaj L. K.-anoj uzas sisteme *spite de*, kial ili ne voĉdonigas la demandojn kaj donas al ni definitivajn formojn? Bedaŭrinde enŝovigas kelkaj preseraroj, kiuj iafaje povus kredigi, ke la tradukinto eraris; pĝ. 143, supra linio, *sian* anstataŭ *lian*.

Pri la laŭdinda preso kaj aspekto de la libro ni parolis en n.º 25, tamen ni ripetas, ke la malalta prezo de la serio meritas ĉian laŭdon kaj ĉies helpon. — SALJO.

ЕТИКО de P. Kropotkin. — Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda. Aĉetbla ĉe ĝia Administracio, Colmstrasse 1, Leipzig-O 27. - 1926, 235 pĝ. 18 × 13. Prezo: 2 R. M.

El la rusa lingvo ni akiris vere interesan kaj gravan verkon, kiun ĉiu konscia homo legos kun vera plezuro. Kropotkin, unu el la plej famaj sociologoj, per sia Etiko konstruas firman moralan fundamenton, kiun la faktoj kaj ĝustaj argumentoj reliefigas antaŭ la okuloj de la leganto. Ĝi estas unu el la plej kompletaj verkoj en tiu kampo, kvankam, niaopinie, K. Brandt en sia «Fundamento de la moralo» prezentas pli facilajn argumentojn, el kiuj oni tuj elĉerpas perfektan konon de la bono kaj malbono kaj sekve de la moralo kaj malmoralo.

La tradukintoj de Etiko por elpruvi sian revoluciemon faris lingve revolucian tradukon. Se iajfoje ili trafas ĝustan neologismon, multfoje ili maltrafas. Tute arbitre estas enkondukataj ŝanĝoj en la vortoj, kaj se ni pretendus analizi iom ĉiujn ŝanĝojn, ni devus plenigi multajn paĝojn. Estas rimarkinda la akuzativigo de prepozicio de: «...kiu vidigus sole ekstermadon den malfortaj de la pli fortaj»; «...ke li eĉ allasis kruelan persekutadon den kristanoj». Ni simple dirus «de la malfortaj per la pli fortaj» kaj «al la kristanoj». Tia precizigo ofte superfluas ĉar el la kunteksto oni facile komprenas la sencon.

Ni rekomendas la libron ne nur pro ĝia instrua senco sed ankaŭ pro tio ke ĝi povas instigi laboristojn pli atente rigardi nian movadon kaj post esploro alligi al ĝi. — SALJO.

ANO DE L' RINGLUDO. — DINKO SIMUNOVIĈ. Traduko de S-ro Fran Janjiĉ. Volumo el Internacia Mondliteraturo, kiun eldonas la Firms Hirt & Sohn en Leipzig, paĝoj: 86.

Dankon de la tuta esperantistaro meritas kaj laŭdon la firmo Hirt por la bela kolekto da diverslandaj literaturaĵoj per kiuj ĝi nin regalias. Ne ekzistas pli konvinkiga pruvo de la taŭgeco kaj universaleco de Esperanto ol tiu ĉi ĉiurilate bonega kolekto: ĉar kiel ĝi estus al ni eble ĝui verkaĵojn el tiel multaj diversaj lingvoj, kelkaj tre malvastaj, kaj tiel lerte kaj konsciencie tradukitaj de enlandanoj mem, por kiuj propra lingvo devas havi neniun sekreton? Tiuj pensoj venis al mi kiam mi legis la ĉarman kaj romantikan rakonton de Simunoviĉ, kiu tre agrable, pere de alloganta intrigo, raportas al ni pri tiu malnova turniro de la ringludo, en pacaj tempoj rememoraĵo de la militperiodoj de la kroata gento. Mi legis ĝin kun granda plezuro kaj mi sincere deziras ke miaj kunfederacianoj ankoraŭ tro malmulte legemaj estu inklinaj partopreni mian ĝojon kaj tiucele aĉetu la libron, kiu ja kostas nur 1,60 germanajn markojn, kaj ĝin atente legu.

Pri la lingvo mi povas diri nur laŭdon, ĉar mi tute forgesis ke mi legas en Esperanto, sekve en lingvo kiun oni devas ankoraŭ severe observi. — M. S.

INSULO DE FELIĈULOJ. — AUGUST STRINDBERG. Traduko de S-ro Oskar Frode. Volumo el Internacia Mondliteraturo eldonita de la Firms Hirt & Sohn en Leipzig. Paĝoj 69. Prezo 1,60 germanaj markoj.

Verkon de tiu ĉie konata sveda aŭtoro oni legas ĉiam avide kaj interese. En nia propra kataluna lingvo ni havas tradukon de romano de Strindberg,

kaj en Esperanto ankaŭ kelkajn mallongajn tradukojn de teatraĵoj. La kerno de la romano kiu okupas nin estas la jena: ŝipo plensargita de pasaĝeroj, plejparte krimuloj kiujn oni sendas al amerika kolonio, estas detruita de ventego kaj la fornaĝintaj homoj venas en insulon, kiu pro sia abundeco de fruktoj kaj komforto de klimato, estas paradizo kaj povas esti nomata la insulo de feliĉuloj: la homoj ne devas labori por nutri kaj vesti sin, kaj sekve ili vivas paco; leĝoj, religioj, aŭtoritatoj, familia kunvivado, tio estas, ĉiuj karakterizaĵoj de nia nuna socio, estas malaperintaj pro superfluo: paradiza feliĉo flosas super ĉiuj tiuj homaj estaĵoj. Ŝajnas al mi tamen ke la aŭtoro ne akurate juĝis ĉiujn flankojn de la homa animo, precipe forgesis la nerefenblajn seksajn altirojn, kaj eble iom da naiveco montriĝas en la penso ke la homara paco kaj kvieteco povas esti facile garantiitaj se nur la zorgoj pri nutrado kaj vestado estos facile kaj senpene kontentigitaj: ne sole tio povas pacigi la socion, la problemo estas multe pli vasta ol Strindberg ĝin supozas per tiu ĉi verko. Post kelka tempo de loĝado en la Insulo de Feliĉuloj tertremo devigas al ĝiaj loĝantoj elmigri rapidege kaj ili venas al alia insulo kiu plu ne havas la samajn feliĉigajn kvalitojn. Malbona klimato devigas ilin ĉasi kaj kovri siajn korpojn per bestaj feloj; por manĝi ili ankaŭ estas devigitaj al ĉasado, krom tio la ĉasaĵo ne estas tre abunda: pro tiu ĉi kaj multaj aliaj malfacilaĵoj la homa socio tie formita revenas iom post iom al la antaŭa stato: leĝoj, ĝendarmoj, registoj, religio, familio k. c.

Mi rekomendas la atentan legadon de tiu verko al ĉiu kiu interesiĝas pri la grandaj problemoj de la homara vivado. — M. S.

BARBARAJ PROZAĴOJ. PRUDENCI BERTRANA. Traduko de Sro. Jaume Grau Casas. Volumo el Internacia Mondliteraturo eldonita de la Firms Hirt & Sohn en Leipzig. Paĝoj 59. Prezo 1,60 germanaj markoj.

Jam de longe ni esperis ke la nomo de kataluna verkisto riĉigu la jam longan liston de la Internacia Mondliteraturo; ni danku do hodiaŭ al nia amiko Jaume Grau pri lia ĉiurilate bonega traduko. Bertrana estas aŭtoro kiu havas tre riĉan vorttrezoron kaj sekve kiun oni ne glate kaj facile esperantigas. La libro enhavas la rakontojn: «La forlasita vojo», severa priskribo de la mistero de la sovaĝaj arbaroj; «La kabanoj de la karbfaristoj» kiu konatigas nin kun la loĝejoj de tiuj liberaeraj laboristoj; «La kamenoj de la gastejoj», kiu tre ĝuste pentras la krudajn homojn kiuj apud ili varmigas kaj kiel finon, kelkajn ĉapitrojn el la romano «Josafat», kiu sufiĉas por vidigi la karakteron de la romano. Eble oni trovos tiujn ĉi fragmentojn iom tro krude verkitaj; estas eble ke la legado de la tuta verko povas ŝanĝi la juĝon al kiu la fragmenta legado kondukas. Mi esperas ke la libro sukcese disvendiĝos. — M. S.

UNIVERSALA ESPERANTISTIGILO, eldonita de Benson School of Esperanto, Inc. n.º 3,16 th.Ave., Newark, N.Y. — U.S.A.

En la granda lando kie aperis Berlitz, la unua vera kaj efika progresiginto de la lernigo de lingvoj. En la lando kie Cortina kaj Rosenthal, kaj

aliaj plifaciligis per utiligo de fonografaj diskoj tian studon, en tiu plej okcidenta kaj moderna lando, kie la universala civilizacio atingis supron, ankaŭ aperis por Esperanto kaj por Pedagogio mirinda progresado sub la nomo «Universala Esperantistigilo», kiu faciligos kaj agrabligos la taskon de instruantoj kaj lernantoj de Esperanto.

Tie ĉi estas nek kvante nek cele loko por teknika klarigo de la juvelo pedagogia por nia lingvo, de la Benson School. Sed kiel vera progreso, ĝi estas videbla kaj komprenebla je simpla rigardo.

Ĉiuj, kiuj deziras konstati la veron de nia aserto, sendu amerikan dolaron por Universala Esperantistigilo por Katalunlingvanoj al la supre citita adreso de la Benson School. — Mi nenium komercan rilaton havas kun Benson. — Do.

PROVERBS ESPERANTO—ENGLISH. — Eldonis Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Stret, London, W.C.1. 1926. 159 pĝ. 9×6. Prezo: 1 \$ 6 p. plus afranko 3 p.

Jen tre bela kaj luksa libreto bindita lode, kun ora tranĉrando supre. Se grandformate la «Kataluna Antologio» estas rimarkinda unikaĵo en la esperanta literaturo, malgrandformate, estas vera unikaĵo la «Proverbs Esperanto-English». — Ni diru, ke ĝia enhavo konsistas je 580 proverboj el la Zamenhofa proverbaro kun angla similŝenca ekvivalento kaj oni komprenos, ke tiu libreto estas tre bela donacaĵo, tre utila lernigilo de Esperanto por anglalingvanoj, kaj bona lernigilo de angla lingvo por Esperantistoj. Ĉiuj Zamenhofaj proverboj estas tiel belstilaj kaj bonsencaj kiel «Plej facile promeso rimigiĝas kun forgeso» (pĝ. 116). — Do.

Pro... kaj Por...

Manifesto kontraŭ konskripcio. — Dum la granda milito homoj en ĉiuj landoj decidis liberiĝi por ĉiam el la katenoj de la militarismo, kaj, kiam paco venis, la Ligo de Nacioj estis bonvenata kiel naskito de tiu espero. Estas nia devo certigi ke la terura suferado de milito neniam reokazu. Ni alvokas por definitiva paŝo al tuta senarmigo, kaj forigo de militarismo el la mensoj de civilizitaj nacioj. La plej efika movo al tio estus la tutmonda forigo de konskripcio. Do: ni petas ke la Ligo de Nacioj proponu la forigon de deviga militŝerpo en ĉiuj landoj kiel unua paŝo al reala senarmigo. Per tutmonda forigo de konskripcio milito fariĝus pli malfacila. La registaro de lando kie ekzistas konskripcio ne havas multe da malfacilo pri ekmilito, ĉar ĝi povas silentigi la tutan popolon per elsendo de mobiliza ordono. Kiam registaroj, por sia subteno, devos dependi de la libervola konsento de la popolo ili estos devigataj esti pli zorgemaj rilate al eksterlandaj aferoj. En la unua provaĵo de la Interkonsento de la Ligo de Nacioj, Prezidanto Wilson proponis fari konskripcion nelaŭleĝa en ĉiuj aliĝintaj landoj. Estas nia devo renaskigi la originalan spiriton kiu kreis la Ligon, spirito partoprenita de multaj militintoj, kaj konfesa de multaj Ŝtatistoj de koncer-

nataj landoj. Per tutmonda forigo de konskripcio ni povas fari decidan paŝon al paco kaj libereco. Do: ni alvokas al ĉiuj homoj bonvolaj helpi krei en ĉiuj landoj publikan opinion, kiu kaŭzos ke la registaroj kaj la Ligo de Nacioj faru tiun-ĉi definitivan agon por liberigi la mondon de la spirito de militarismo, kaj malfermi la vojon al nova epoko de libereco interne de la nacioj, kaj frateco inter ili.

Noto: La komitato responda je ĉi-tiu manifesto, danke ricevis pluajn subskribojn adreseblajn al H. Runham Brown, 11, Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo.

Raporto pri la XVIII Kongreso. — La 2-an. de oktobro, en Ateneu Barceloní kunvenis multaj esperantistoj por aŭdi la raporton de D-ro. Marian Solà pri la lasta Universala Kongreso en Edinburgo. La ĉeestantoj ĝuis la facilan parolon de nia reprezentanto en la aludita Kongreso, kies priskribon faris pli interesa granda nombro da belaj kliŝoj, kiuj donis al la aŭskultantoj trafan bildon pri la brilo de nia tutmonda festo.

Niaj gastoj. — Dum la lasta monato ni havis la plezuron akcepti S-ron. Maurice Hyde el Rabaul (Nov-Gineo), kiu pasigis kelkajn tagojn en nia lando vizitante la grupojn en Vich, Barcelona kaj Girona.

S-ro. Hyde, kiu antaŭ dek-du jaroj vizitis unuafoje Katalunujojn, multe laŭdis la kulturon de nia popolo, kiun li admiras kaj amas.

Lian malproksiman landon, kiun ni ekŝatis el liaj priskriboj kaj informoj, ni baldaŭ povos koni profunde pere de lia nuntempe presata verko.

Chesterton kaj Esperanto. — Niaj britaj samideanoj, atentante nian alvokon al la Brita Esperantistaro (vidu n-ron 24), skribis al S-ro. Chesterton informante lin pri nia movado kaj progresoj.

Lastatempe, la 11 sepbro. S-ro. Stevens, sekretario de S-ro. Chesterton, respondis al B. E. A.: S-ro. Chesterton komisiis al mi vin sciigi, ke li ricevis vian leteron. Li min petas vin informi, ke li subtenas ankoraŭ, ke laŭtinon oni povas uzi tre bone kiel internacian lingvon.

Ŝajnas al ni, ke komentario estas superflua. La respondo per si mem evidentiĝas, ke eminentuloj pensas iaforte tiel naive kaj senfundamente kiel senaboculoj.

Ni devas esprimi al B. E. A. nian publikan dankon por la laŭdinda kaj ĉiuflanke imitinda laboremo kaj aktiveco.

D-ro. M. Solà, honora membro de "Aplec". — La 24-an. de oktobro "Aplec" Esperanta Grupo (Sabadell) malfermis siajn kursojn brile kaj sukcese. Sub la prezido de la urbestro diversaj esperantistoj paroladis antaŭ multnombra publiko pri la celo de nia movado.

Ĉe la fino de la festo la prezidanto de «Aplec» donis al D-ro. M. Solà tre riĉan albumon enhavantan la subskribon de multaj esperantistoj kaj grupoj, kiel ateston de danko al nia pioniro por la longjara batalado sur nia kampo kaj precipe por la kunlaboro, kiun la grupo ĉiam trovis ĉe nia malnova kunbatalanto,

Simpattia festo. — En la bela kaj fama urbo Sevilla, oni solenigas entuziasme, 6 Januaro, la feston de la Epifanio, tiu festo de la «Tri Reĝoj»: Melchioro, Gasparo kaj Baltasaro.

Rilate je tiu festo la loka kultura Societo «Ateneo de Sevilla» organizas belan kaj allogan kavalkadon por disdoni inter la malriĉaj kaj malsanaj infanoj, loĝantaj en aziloj kaj hospitaloj, diversajn ludilojn, librojn, pupojn kaj dolĉaĵojn donacitajn de bonfaremaj personoj.

En tiu kavalkado oni distingas la «Tri Reĝojn» riĉe ornamvestitajn kiujn akompanas diversaj muzikistaroj, horo de infanoj, heroldoj, pagioj, soldatoj, ĉiuj kunportantaj diversajn flagojn kaj originalajn standardojn.

Tiu kavalkado trairas la urbon, kaj ĝi estas rigardata de ĉiuj personoj, precipe de la infanoj, kiuj atendas senpacience, la disdonadon de la donacaĵoj pere de la Tri Reĝoj de l' Oriento, dum la noktmezo de la 5 al 6 Januaro, laŭtradicie.

La pasintan jaron, la fraŭlinoj de Sevilla Esperantista Grupo aranĝis dekdu belajn pupojn vestitajn per tipaj vestoj, reprezentantaj diversajn naciojn de la mondo, por donaci ilin al la Reĝoj Melchioro, Gasparo kaj Baltasaro, kiuj poste, dum tiu kavalkado disdonas karese kaj afable, ĉiajn donacaĵojn ricevitajn, inter la malfeliĉaj infanoj de aziloj kaj hospitaloj, ĝojigante tiel dum kelkaj tagoj la koron kaj senton de tiuj kompatindaj infanoj.

Por fari pli ampleksa tiun donacon, la Delegito de U. E. A. en Sevilla, sin turnis ankaŭ la pasintan jaron per la Esperantaj gazetoj «Esperanto» kaj «Heroldo de Esperanto» al la samideaninoj alilandaj, petante donacaĵojn por tiu festo, kaj efektive li atingis de esperantistinoj de kelkaj landoj, ke ili sendu pupojn arte kaj tipe vestitajn.

Sed por la festo de la proksima jaro, 6 Januaro 1927, la laborema Sevilla Esp. Grupo, petas al ĉiuj esperantistoj ke ili diskonigu tiun belan feston inter la sindonemaj, enlandaj samideaninoj pri alsendo de pupoj arte vestitaj kaj prefere, tipe ornamitaj laŭ naciaj kostumoj.

Oni devas konstati, ke per tiu donacaĵo la Sevilla Esp. Grupo faris grandan propagandon favore al nia kara helpa lingvo Esperanto, ĉar la pupoj donacitaj estis la plej bele ornamitaj, kaj samtempe rigarditaj de la tuta loĝantaro.

La pupoj devas esti altaj 30 aŭ 40 centimetrojn kaj ĉiaj donacaĵoj devos alveni en Sevilla antaŭ la 24 de Decembro de 1926.

La donacaĵojn de libroj, ludiloj, pupoj, dolĉaĵoj ktp. oni bonvole sendu al la jena adreso: «Grupo Esperantista Sevillano» Real Sociedad Económica Sevillana de Amigos del País - Ríoja, 25 - SEVILLA (Hispanujo).

Al ĉiu donaconto, krom la plej kora danko de tiu Grupo, oni sendos ankaŭ rememorigaĵon de tiu Kavalkado.

Gesperantistoj! Atentu bone pri tiu festo, kaj ne forgesu la simpatian kaj bonfareman peton de Sevilla Esperantista Grupo. — *Karolo.*

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto». València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al

HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Ĉiusemajna

Aktuala Ilustrita

Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a

BARCELONA

Radio Barcelona

CASP, 12 - BARCELONA

Esperanto Programo

17 de novembro je la 22.^a

Esperanto kaj la Scienco, de Dro. M. Solà.

15 de decembro je la 22.^a

Neceseco de lingvo internacia por la Scienco, de Dro. Jobé.

Esperantistoj, kiuj aŭdas niajn prelegojn bonvolu informi Radio Barcelona. Per tio ili helpos nian radiomovadon.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA
article determinatiu

el, els
la, les

J
(sona y)
i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN
sufix per al
femení

heroino, reĝino
katino, leonino

O
terminació
substantiu

lakto
urbo
komercio
(comerç)

A
terminació
adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I
terminació verb
(infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E
terminació
adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS
temps present

Mi skribas
Jo escriu

IS
temps passat

skribis
escrivi

OS
temps futur

skribos
escriurá

US
mode condicional

skribus
escriuria

U
mode imperatiu o subjunctiu

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.
Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

ACADÈMIA COTS

ARCHS, 10

LICEU DALMAU

VALÈNCIA, 245

La Federació Catalana d'Esperantistes, d'acord amb la direcció dels esmentats centres instructius, té en preparació uns curssets d'Esperanto, la duració dels quals serà de tres mesos.

Properament, per mitjà de la premsa diària, s'anunciarà el dia d'obertura, hores, professors, etc.

D'aquesta manera pensem atendre els precs de molts amics que ens han demanat una pila de vegades facilitats per tal de conèixer l'Esperanto.

Als nostres lectors i abonats pertoca bona part de les tasques de propaganda per tal que els cursos en organització tinguin un èxit ben falaguer.

“KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj.
 Federacia sidejo kaj redakstejo: carrer València, 245 - BARCELONA

FEDERACIAJ GRUPOJ

<i>Esperantista Klubo Palma</i>	
Mesquida, 6 ent.	Palma de Mallorca
<i>Empordanana Ebonaĵo</i>	
(Girona)	Armentera
<i>Esperanta Nesto</i>	
(Jovenut Katòlica)	Ripollet
<i>Frateco</i>	
Placo Pi i Margall, 14.	Vendrell
<i>Ĝerona Espero</i>	
(Creu Roja)	Girona
<i>Lumon</i>	
St. Antoni, 64.	Terrassa
<i>Studenta Juneco</i>	
(Seminari)	Girona
<i>Aplec</i>	
Mendizàbal, 3.	Sabadell
<i>Bela Espero</i>	
Carretera de Vich, 41.	Manresa
<i>Esperanta Idealo</i>	
Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés	
<i>Esperantista Amikeco</i>	
Plaça Bernardí, 10.	Manlleu
<i>Esperanta Burgono</i>	
(Centre Democràtic)	Rubi
<i>Internacia Frateco</i>	
(Coop. La Colmena)	Sta. Coloma Gramanet
<i>Paco kaj Amo (Soc.)</i>	
Planeta, 16, pral.	Barcelona
<i>Barcelona Stelo</i>	
Marquès Duero, 101.	Barcelona
<i>Barcelona Esperanto-Societo</i>	
Bretón Herreros, 18, 1.	Barcelona
<i>Esperantista Grupo «Sollerica»</i>	Soller

LOKAJ DELEGITOJ

Ager: Fino. Maria Plans
Almúnia de Castellví: Sro. Pere Esvertit
Ametlla de Merola: Sro. Miquel Arpa

Artés: Sro. Manuel Monrós
Armentera: Empordanana Ebonaĵo
Banyoles: Sro. Joan Aulina
Figueres: Sro. Carles Varela
Girona: Sro. Josep M-a Dalmau
La Garriga: Sro. Joan Blancafort
Mahó: Sro. S. Ortega Barceló
Manlleu: Sro. Marian Vilardell
Manresa: Sro. Josep Albagés
Mataró: Sro. Francesc Torres
Molins de Rei: Sro. A. Canals
Montsirol de Montserrat: Sro. F. Orobitg, Pastro
Palafrugell: Sro. Francesc Sagrera
Palau de Montagut: Fino. Lluïsa Bargés
Palma de Mallorca: Sro. Narcís Bofill
Reus: Sro. Enric Aguadé
Ripollet: Sro. Josep Planas, Pastro
Rubi: Sro. Joan Ratés
Sabadell: Sro. J. Bracons
St. Adrià del Besòs: Sro. S. Arnella
St. Martí Sapresa: Sro. Joan Rieradevall
Sta. Coloma de Farnés: Sro. Pere Costa
Sta. Coloma de Gramanet: Internacia Frateco
Sallent: Sro. Lluís Solé
Sóller: Sro. M. Arbona
St. Felíu de Pallarols: Sro. J. Collelldevall
Terrassa: Sro. Ramon Marsà
Teyà: Dro. Jacint Barrera
Vendrell: Fino. Maria Julivert
Vich: Sro. Pere Farrés
Vidreres: Sro. Josep Macià
Vilanova i Geltrú: Sro. Jaume Fort
Vilassar de Mar: Sro. Pere Domènech

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRE

Redaktoroj : Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

Lingvoegaleco

Frederik van Eedem estas granda aŭtoro el Nederlando. Lia verko «La malgranda Johano» estas unu el la plej bonaj el la tutmonda literaturo. Mi tion scias dank' al Esperanto. La fama germana eldonisto Rudolf Mosse, el Berlin, komencis Bibliotekon Tutmondan per publikigo de «Mateo Falkone kaj aliaj rakontoj» de la franca Mérimée kaj la nomita poemo de holanda aŭtoro. — Jen germana eldonisto kiu tutmondigas holandan verkon per Esperanto kaj plitricigas la esperantan literaturon per tradukoj el franca lingvo.

Apel-les Mestres kaj aliaj katalunlingvaj aŭtoroj havas tradukojn en rusa kaj aliaj lingvoj dank' al interlingvo Esperanto. La ĉeklingvano Hromada kaj la flandralingvano Frans Schoofs kunsidas lingve samfacile kaj samdigne kiel angla aŭ francilingvanoj. Katalunlingvanoj estas en la Lingva Komitato samrajte kiel paroluloj de itala aŭ germana lingvoj: Frateco, egalo kaj libero estas bela rezultigo de Esperanto inter la malsamnacilingvanoj.

Nia eminenta ĵurnalisto Rovira i Virgili antaŭ kelka tempo publike diris ke li fariĝas esperantisto. Li komprenas pli kaj pli ke estas bezonata lingva formo, kiu, sen kontraŭjuĝo por la naciaj aŭ regionaj varioj, taŭgu por tuthomara interkompreno. Oftege oni aŭdas la diron ke decas esprimi sin per maniero ke plej granda nombro da homoj komprenu. Laŭ tiu principo oni logike alvenas al la konkludo, kiun prezentas internacia lingvo.

Neniu el la hodiaŭaj lingvoj, grandaj aŭ malgrandaj, gloraj aŭ humilaj, antikvaj aŭ novaj, belaj aŭ malbelaj posedas la kondiĉon de plena universalso. Kelkaj havas pli vastan areon ol aliaj. Kelkaj estas katenitaj en la propraj limoj. Aliaj forsaltas tiujn limojn kaj estas konataj de homoj malsamnas-

kolingvaj. Sed ĉiam estos miloj kaj milionoj da homoj, kiuj, antaŭ teksto skribita en privata lingvo, kaj eĉ en tri aŭ kvar lingvoj, restos malkapablaj kompreni.

Se vere estas dezirinde kaj eĉ necese ke difinita teksto estu komprenata de ĉiu homo, ne estas logike ke oni haltu ĉe la eklektika solvo uzi lingvojn de pli vasta teritoria areo. Pli dece estas alpaŝi la solvon kompletan, perfektan, definitivan, kiu konsistas en la alpreno de helpa lingvo sama por ĉiuj popoloj apud la respektiva gepatra lingvo.

Tiu devus esti la tezo de ĉiuj kiuj prezentigas kiel universalistoj pri lingvo. Tiuj kiuj celas, por solvo de la problemo, la alprenon de iu el la tri aŭ kvar lingvoj kiuj hodiaŭ havas pli grandan disvastigon, devus akordigi por alveno al la unika solvo, kiu ne povas esti en lingvo nacia. La defendo de ne plena solvo povus ŝajni defendo de lingva privilegio. Oni povus kredi ke ties defendantoj volas ne nur faciligi lingvajn rilatojn inter popoloj, sed favori kelkajn lingvojn malprofite de aliaj.

Decas ke la lingva universalismo estu malavara, tio estas, ke ĝi ne speciale profitu iun nacian lingvon. Se oni falas laŭ tiu faligilo nepre venos konkurado aŭ rivalado inter tiuj lingvoj kiuj okupas la unuajn vicojn en la lingvaraj statistikoj. Kontraŭe, lingvo vere universala kiu utilu ne por privataj aferoj de la popoloj, sed simple por komunikado inter ĉiuj malsamlingvaj, prezentas neniun el tiuj danĝeroj.

La asertoj de nia klarvida amiko tute harmonias kun la oficiala «Deklaracio pri Esperantismo»: «La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu *ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn*, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas».

Ni neniam forgesu tiun majstran gvidon, kiu montras la rektan kaj difinitan vojon.

Esperanto estas lingva progreso kaj lingva regeneracio, lingva egaligo de la homaro. Ĉefe pro kaŭzoj, cirkonstancoj kaj akcidentoj politikaj, en la mondo estas lingvoj disvastigitaj kaj privilegiaj; kaj lingvoj persekutitaj kaj sklavaj. La progreso de la Juro estigis egalecon, justecon laŭ leĝoj inter ĉiuj homoj en la civilizita mondo. La progreso de la Lingvaĵo celas egalecon, justecon super la lingvaro de la popoloj. La lingvara justeco estas la unua efektiva paŝo en vojo al homaranismo. Ni ne forgesu ke nia majstro juĝis ĉefe grava la internan ideon de Esperanto. Li konsciis ke estus malgranda progreso la materiala eblo interkompreniĝi sen morala progreso. Nia himno ja ne diras en la *mondon venis nova lingvo*, sed, en la *mondon venis nova sento*.

Delfi DALMAU

Adiaŭo de Patrino

de J. Wittlin

— Ordigu al mi, fileto, la kusenon kaj donu vian manon varman —
 Kiel bone estas nun — kiel silente — kiel silente estas nun en la dormejo —
 Neniu muŝo zumas super mia kapo — ekstere estas bele —
 Malantaŭ la muro oni ludas Mozarton — la najbaroj evidente estas muzi-
 [kema]j! —

Eĉ la febro ne martel-frapas nun en la kranion —

— Ĉu ne vere, filo: — mi ĵuna? ! — Vere, ke mi estas ĵuna? ! —

Antaŭ jaroj — en tiu ĉi lito, en kiu mi agonias tiel june,
 mi naskis vin. — Ho! kia vi estis belega infano! —
 — Kiel terure estas al patrino morti, kiam ŝi tian okazintaĵon ekmemoras,
 Kiel terure! —

Kaj estas nun printempo! — Ĉu vi manĝis jam, filo, ĉerizojn?
 — Atentu: ne manĝu verdajn! Kaj ne trinku akvon, kiam vi tre varmiĝis;
 vi estas ja saĝa infano kaj la pulmojn volas havi sanajn?

Malbona patrino, malbona! — Tiel frue forlasas la filon;
 kaj havas lin nur unu, kaj dorlotis lin tiel zorgeme!
 — Kaj ne forgesu dum vintro — porti lanajn ŝtrumpojn! ...
 — Ha! ! — ili ĉiuj estas disŝiritaj! — Kiu al vi poste ilin flikos? ! —
 La onklino! — Kaj eble — kaj eble — vi havos bonan duonpatrinon? !
 — Donu al mi akvon — jam estas pli bone —
 — La koro nur — (jam estas pli bone) — iomete ekstremis pro maltrankvilo —
 — Pri ĉio! — Ĉu vi aŭdas? — pri ĉio kaj ĉiam obeu paĉjon!

Mi tiel forte vin amis ke mi tremas pro la severa sorto,
 ke eble en la alia mondo — mi jam pri vi ne scios?
 Kiu scias! ! — Eble la animo ne vivas? Kaj kune kun la korpo finiĝas ĝi en
 [la tombo?]

Kiu scias ĉu mortinta homo — ankoraŭ tiun teron memoras? !
 Kaj se li forgesos? — kaj eble li forgesos? !

Tial mi malĝojas,
 eĉ se mi T I E estus feliĉa — kaj per nenia zorgo tuŝita! —
 Ĉu mi povus vin forgesi, vin, kiu estis mia enhavo?
 Ĉu mi povus iam ne scii kion deziras via rigardo,
 ne esti apud vi — almenaŭ en spirito — kiam timego dum dormo
 kuŝiĝos sur vian bruston kaj vi ekkrios ŝirita de doloro! !
 Ĉu mi povus vin forlasi kaj ne karesi per mano virina? ! —
 Kaj poste kiam vi pli aĝiĝos kaj irados al lernejo, —

La okuloj jam estingiĝas — Donu la buŝon! — restu ĝia dolĉeco en mia me-
[moro!]

La manoj senfortiĝas — kaj mi vidas: paŝon post paŝo al mi proksimiĝas —

— Levu min nun! — mi sidiĝos je unu minuto, nur unu:

Mi ankoraŭ vin vidas kaj sentas, tuŝas kaj enspiras, mia filo! —

— Kaj jen mi iras en landon, kie — la suno — eble — ankau — lumas,

kaj mi eble havos tie multe — tre multe da infanoj...

Multe — multe kaj multe — kaj ĉiuj al mi alŝoviĝas —

.

Kiu al vi la ŝtrumpojn flikos — morgaŭ, kiam mi estos — en la ĉerko?! —

El la pola trad.

EDWARD WIESENFELD

Premiita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj



Ŝatata demono

*Kiam mi virinon trovas
nomi ŝin demon' mi povas;
ŝi, kun masko de anĝelo,
en inferon min enŝovas...
tra la pordo de l'ĉielo.*

Ĉiam batas mia koro,
kaj mi sentas min en gloro,
kaj la sang' en mi sin movas,
kaj ekkaptas min fervoro,
kiam mi virinon trovas.

Kaj mi ĉiam, sen alarmo
elforgesas, pro l'amvarmo
al virin' kiun mi trovas,
ke ja, malgraŭ ŝia ĉarmo,
nomi ŝin demon' mi povas

Mian koron ŝi venenas;
sed pro la plezur' mi svenas
kiam, kvazaŭ de l'ĉielo
falintaĵo, al mi venas
ŝi kun masko de anĝelo.

Amrigardojn, ampromesojn,
amdelogojn, amkaresojn,
ŝi rimedojn ĉiajn provas;
ŝi, ĵurante amajn jesojn
en inferon min enŝovas

Sed... ne grave! ŝin mi trovu
kaj per amplezuroj povu
plenumiĝi ŝia celo;
en inferon ŝi min ŝovu,
sed... tra l'pordo de l'ĉielo!

ARTUR DOMÉNECH MAS

XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller 5-6-7 junio 1927

Se vi iam partoprenis niajn kongresojn kaj ĝuis la belecon de la loko, kiu kolektis la membrojn de K. E. F. okaze de nia ĉiujara festo, se vi povis konstati kiom da fervoro vekis la verko de nia majstro en ĉiu vilaĝo kaj urbo, vi ne povas forlasi la bonegan okazon, kiun prezentas nia proksima kongreso en Sóller, ne nur pro la merita tasko de la transmaraj organizantoj sed ankaŭ, kaj tio estas aparte grava, pro la belega marveturo kaj ĉarma restado en Mallorca, la vera perlo Mediteranea.

Kiom da esperantistoj ni trovus en niaj vicoj, kiuj neniam decidigis partopreni niajn Kongresojn. Al ili ni devas propagandi plej energie por la sukceso de nia XIV, por ke ĝi altiru al si grandan nombron da esperantistoj.

La Organiza Komitato, sub la lerta gvido de nia batalema samideano Arbona, komencis tre sukcese la propagandon de la kongreso kaj la organizon de loĝado kaj vojaĝo, pri kiuj ni detale informos en postaj numeroj.

Kiel honora vicprezidanto estis elektita S-ro. Johano Barceló Andreu, nia estimata kunbatalanto, kiu reprenis nian standardon post longa restado en Afriko.

XIII Internaciaj Floraj Ludoj 1926-7

LISTO DE PREMIOJ (1) (daŭrigo)

XVI. — De «Ĝerona Espero» el Girona: ptoj. 50 por temo libervola.

XVII. — De «Esperantista Nesto» el Barbarà del Vallès: ptoj. 50 por temo libervola.

XVIII. — De «Espero Katolika» el Paris: Dumviva abono por temo «Dia Amo».

XIX. — De «Urbeŝtraro de Sóller»: ptoj. 100 por temo «Plej bona traduko de unu el la versaĵoj de la Soller-a poeto Guillem Colom».

Nia konata samideano Teo Jung, atinginta la Naturan Floron de la antaŭaj F. L. oferis por nia kaso ptojn. 50, kiuj estas proponotaj al la samranga laŭreato de la proksimaj F. L. por helpi lian ĉeeston al la Solena Festo en Sóller dum la okazonta Kongreso de K. E. F. Li ankaŭ donacis luksan ekzempleron de sia premiita verko «La Alta Kanto de la Amo» kiel aldono al ĉiu premio por la Ordinaraĵ Temoj (1).

N O T O J

Ĉiuj konkursontoj bone legu kaj plenumu la kondiĉojn por akcepto de verkoj (1).

VERKOJ RICEVITAJ (ĝis la 25 nov. 1926)

1. Pax. — 2. Kiu el vi estas senpeka. — 3. Mezepokulo. — 4. Fidelitas. — 5. Semper Idem. — 6. Pasero sperta ne bezonas averton. — 7. Gedanken sind zollfrei. — 8. Poezio estas amo, amo estas poezi'. — 9. Fil' erarinta. — 10. Panem et Circensis. — 11. Ĉu la bestoj ankaŭ havas animon?

DELFI DALMAU, SEKR. Carrer València, 245 — Barcelona

(1) Vidu K. E. n.º 26-27, sept.-oktobro.

Alvoko al la tutmonda esperantistaro,

al ĉiuj asocioj, grupoj, izolaj esperantistoj,
havigi al nia movado por la «jubilea jaro
1927» nombradon de nia popolo en kom-
pleta statistiko.

Samlingvanoj, bonvolu *legi* mian artikolon *ne nur unufoje sed kelkfoje* atente kaj *kun la nepra volo helpi* laboron, kiu kontentige povas esti efektivigata nur, se ĉiuj helpos, se neniuj forgesos sian devon.

Ankoraŭ hodiaŭ post 4 jardekoj de nia movado neniuj povas diri, kiom da esperantistoj ekzistas en la mondo. Nombrante nian popolon oni ĝis nun kutime nur «*taksis*», oni *ne fiksis* la nombron de niaj popolanoj esperantistaj sur la bazo de fidinda statistiko. Sed nur faktoj pruvas, konvinkas — ne vortoj aŭ nura takso. Pro tio fidinda statistiko estas nepre necesa por ĉiuj, tute egale, kion ili speciale celas per Esperanto. Ni ja ĉiuj senescepte celas la propagandon de la mondlingva ideo. *Ni lasu principe al ĉiuj asocioj kaj organizaĵoj plenan liberecon. Ni marŝu disigite, tamen ni batalu kunigite dum la taŭga momento.* Nun estas tia momento. La jaro 1927 estos jubilea jaro, ĉar 1887 aperis la unua broŝuro de «D-ro Esperanto». Montru, por festi la jubilean jaron antaŭ la tutmonda publiko kaj por honori la memoron de nia majstro, ke ĉi tiu malgranda broŝuro de 1887 estigis grandan, respektindan movadon.

Post kiam mi ofte estas parolinta pri la graveco kaj urĝeco de tutmonda statistiko, nun, per interkonsento de la plej gravaj Esperanto-institucioj mi estas komisiita, preni sur min la taskon, liveri ĝin. Mi estas certa, ke, se la nuna eksperimento sukcesos, nia propagando estos treege plifaciligata kaj efika, kaj ke ni poste regule povos labori sur la statistika kampo kun unuigitaj fortoj, tiamaniere havigante al ni la intereson de l' registaroj kaj seriozaj institucioj, kiuj ĉiam unue postulas fidindajn «*nombrojn*» pri la koncerna enlanda aŭ la internacia movado.

Ni iru la plej simplan kaj plej malmultekostan vojon! *Estos nur necese, ke ĉiuj Esperanto-grupoj kaj rondoj* (tute egale, ĉu ili estas organizitaj en iu ajn asocio aŭ ne!) *ofere kelkajn minutojn da laboro, krom tio du paperfoliojn kaj unu poŝtmarkon;* la samon faru la diversspecaj asocioj kaj ankaŭ la esperantistoj vivantaj izole. Pripensu mian planon kaj konsentante ĝin, agu *tuj* laŭ la plano proponita. Ĝi baziĝas sur la konvinko, ke nia Esperanto-gazetaro, kiu ĉiam estis oferema kaj helpema, helpos la efektivigon de la plano, represigante ĉi tiun mian alvokon. Ni ne bezonos la multekostan forsendon de presitaj demandoj el iu ajn centro, ni ne bezonos fincan subtenon.

Mi proponas al vi, respondi al tri demandoj, unu por la ĉiuspecaj grupoj, unu por la asocioj inter-kaj sennaciaj, naciaj, fakaj, unu por la izole vivantaj esperantistoj:

I

Demandaro por grupoj
(societoj, kluboj, rondoj k. s.)

1. *lando kaj landparto?*
2. *loko? (urbo aŭ vilaĝo?)*
3. *nomo de la grupo aŭ rondo?*
4. *al kiu organizaĵo la grupo apartenas? nomu la organizaĵon!*
5. *kiom da membroj via grupo havas je la fino de l' jaro 1926?*
6. *kiom da kursoj la grupo organizis*
 - a) *dum la jaro 1926 (enkalkuli la ĝis nun nefinitajn)*
 - b) *depost la starigo de la grupo entute?*
7. *ĉu en via loko ekzistas aliaj Esperanto-grupoj? kaj kiuj? (demando nepre respondenda pro la kontrolo, ĉu la statistikestro ricevis ĉiujn sciigojn el via loko)*
8. *kiom da esperantistoj en via loko ekzistas ekstergrupaj entute! (kalkulu singardeme! nepre ne taksu tro alte! Preferu noti ciferon pli malaltan, sed tute fidindan!)*
9. *ĉu via grupo*
 - a) *havas bibliotekon?*
 - b) *kun kiom da libroj?*
10. *tre preciza adreso de via grupo?*

Subskribo de l' raportinto.

Raportante atentu jenajn punktojn:

a) Skribu tre *legeble* (ankaŭ la nomon de l' raportinto), se eble skribmaŝine. Skribu la nomojn de via urbo ktp. per *latinaj literoj* en via nacia lingvo (ne esperantigu la nomojn!).

b) *Ne ripetu la demandojn* sed nur notu la ciferojn 1—10 kaj simple donu laŭ tiuj ciferoj la koncernajn respondojn aŭ sub 5, 6, 8, 9b *nur ciferojn*. Rezignu al ĉiuj aliaj notoj kaj specialaj komunikaĵoj.

c) Uzu ĉiuj — por ke la materialo povu esti bone ordigata — *la saman formaton* de l' papero (la kutiman formaton de negocaj leteroj:) laŭlonge 28,5 cm (aŭ 11 in.), laŭlarĝe 22,5 cm (aŭ 9 in.).

d) Donu la respondojn *en du ekzempleroj* sur du paperoj, por ke la koncerna materialo post la fino de l' statistika laboro povu esti sendata al la koncerna asocio, al kiu apartenas la grupo.

e). Sendu vian raporton en *fermita* letero, sufiĉe *afrankite*, al la adreso:

D-ro Ditterle

Fakestro por Statistiko de I. C. K.

Leipzig W 31

Seumestrasse 10

Do, taŭge kaj ĝuste farita raporto aspektos jenmaniere:

1. *Deutschland (Germanujo) — Sachsen (Saksujo)*
2. *Neustadt (urbo)*
3. *Verda Stelo*
4. *Germana Esperanto-Asocio*
4. 54
6. a) 3
- b) 27
7. *jes: Laborista Grupo kaj grupo de Esperantistaj Instruistoj*
8. 48
9. a) *jes*
- b) 118
10. *Esperanta-Grupo «Verda Stelo» en Neustadt, p. a. Prez. S-ro A. Müller, Langestrasse 17, III.*

Kiel sekretario de la grupo:

H. Schulze, Arnsdof apud Neustadt

Hauptstrasse 9.

Oni ja povus proponi, ke la diversaj asocioj kolektu la respondojn de siaj grupoj kaj sendu ilin samtempe. Sed tiam *ne estus eble* por mi, *prilabori la materialon*, ĉar mi ricevus tro multajn raportojn dum unu tago kaj verŝajne nur en la lasta minuto. Mi ne havas helpantojn ekster la Instituto, cetere mi havas mian regulan ĉiutagan laboron, neprokrasteblan. Se mi ricevos ĉiutage kelkajn respondojn de unuopaj grupoj kaj se mi ricevos la materialon baldaŭ, tiam mi havos la okazon, tute trankvile laŭ bona plano ordigi ĉion helpe de listoj kaj kartotekoj.

II.

Krom la raportoj de la unuopaj grupoj ni bezonas specialajn respondojn de la diversaj asocioj inter-kaj sennaciaj, naciaj, fakaj laŭ jena skemo:

Demandaro por asocioj (federacioj k. s.)

1. *nomo de la asocio?*
2. *celo de la asocio?*
3. *nombro de la grupoj, kiuj apartenas al la asocio?*
4. *Kiom da personoj ampleksas ĉiuj asociaj grupoj entute? (inkluzive la izole aliĝintaj)*
5. *ĉu via asocio eldonas oficialan gazeton? kiun?*

6. ĉu via asocio eldonas oficialan lernolibron? kiun?
7. preciza adreso de via asocio?

Nur por naciaj asocioj:

8. kiom da lernolibroj aperis en via nacia lingvo?
9. kiom da lernolibroj (laŭ kalkulo de l' eldonistoj) estas venditaj ĝis hodiaŭ?
10. kiuj Esperanto-gazetoj aperas en via lando?

La ciferoj de la asocioj estos aliaj ol la sumigitaj ciferoj de la asociaj grupoj, ĉar la asocio nur povas respondi laŭ la stato de 1925; la grupoj raportos laŭ la stato de 1926. Tamen tiu vojo estas rekomendinda, ĉar oni povas kontroli la kreskon aŭ malkreskon de la asocio. Cetere la respondojn pri 4, 5, 6, 8, 9, 10 plej bone donos la asocioj.

III.

Demandaro por izole vivantaj esperantistoj kaj lokoj, en kiuj ne ekzistas grupoj:

1. lando?
2. loko?
3. nombro de la esperantistoj? (ankaŭ se ekzistas nur unu, li nepre respondu!)
4. ĉu en via lando en aliaj lokoj ekzistas esperantistoj? kaj kie?

Subskribo kun adreso.

Kial ni kalkulu la izole vivantajn esperantistojn? Ne nur, ĉar ili estas tre gravaj personoj por la disvastigo de nia movado, sed ankaŭ, ĉar estas tre grava afero, konstati, en kiom da lokoj en la mondo ekzistas anoj de nia movado.

* * *

Samlingvanoj! Bonvolu ne kritiki la proponitajn demandojn. Oni povas proponi demandojn laŭ cent diversaj aliaj manieroj. Mi longtempe pripensis la aferon kaj serĉis la plej simplan vojon. Poste, se ni estos sukcesintaj per la «*unua eksperimento*», ni espereble povos daŭrigi niajn enketojn, ankaŭ por specialaj aferoj (lernejoj, komerco, scienco ktp.). *Sed unue ni faru la unuan paŝon.*

La demandoj de la proponitaj demandaroj estas malmultaj, sed laŭ mia sperto nur ili estas iomete fidinde respondeblaj de ĉiuj. Per la unua eksperimento mi celas: simpligi la tutan aferon, por atingi minimume ion; pro la simpleco de la laboro allogi al respondo kiel eble plej multajn — aŭ pli bone ĉiujn; malmultekostigi la tutan entreprenon, ĉar elspezoj por niaj gazetoj ne estos. Cetere — mi ripetu tion! — ĉiu respondanto devos elspezi nur la kostojn por du paperfolioj kaj unu poŝtmarko.

Malgraŭ tio ni atingos iomete kontentigan rezulton; ĉar laŭ la materialo — espereble! — ricevota oni povas konstati:

en kiom da landoj ekzistas esperantistoj kaj en kiuj?
 en kiom da lokoj ekzistas esperantistoj kaj en kiuj?
 kiom da grupoj ekzistas entute? kaj kie en la mondo?
 kiom da grupoj ekzistas en la diversaj landoj?
 kiom da esperantistoj ekzistas entute?
 kiom en la diversaj landoj?
 kiom da esperantistaj organizaĵoj ekzistas?
 kiom da esperantistoj apartenas al organizaĵoj?
 kiom da Esperanto-kursoj okazis dum la jaro 1926?
 kaj kiom dum la pasinta tempo entute?
 kiom da grupoj havas bibliotekojn?
 kiom da libroj estas en tiuj bibliotekoj?
 kiom da gazetoj ekzistas? kaj kiuj?
 kiom da diversnaciaj lernolibroj ekzistas?
 kiom estas venditaj? k. a. k. a.

Ĉiuj grupoj, asocioj, izolaj esperantistoj **tuj, post kiam ili sciigis per ĉi tiu artikolo pri la tutmonda statistiko, klopodu forsendi la respondojn** kiel eble plej baldaŭ. Ju pli baldaŭ la ordiga laboro povas esti komencata, des pli granda estas la garantio, ke la resuma statistika raporto povas aperi ĝustatempe. El malproksimaj, transoceanaj landoj la respondoj ja venos nur post kelkaj monatoj. La esperantistoj en Eŭropo ne rigardu tiun fakton kiel pretekston por prokrasti sian respondon. Alie ni ne atingos nian celon por 1927.

Rememoru ankaŭ tion, ke ekzistas samlingvanoj kaj tutaj grupoj, kiuj bedaŭrinde ne legas Esperanto-gazetojn. Konante tiajn, *atentigu ilin* pri la statistiko kaj ilia devo. Kie grupestro ne estas sufiĉe laborema, la grupanoj *mem* kontrolu, ĉu li forsendis sian raporton kaj insiste postulu tion.

* * *

Ĉi tiun mian artikolon ne sekvos aliaj; ĝi estas la unua kaj lasta alvoko. Mi persone ne povas garantii kontentigan rezulton, tion povas fari nur vi ĉiuj, helpante senescepte. Mi promesas al la esperantistaro precizan kaj akuratan laboron, sed promesante tion, *mi samtempe rezervas al mi la rajton, rezigni al la statistika laboro, se la esperantistaro ne sufiĉe subtenos la laboron. Do, subtenu ĝin!* Malpravigu la «pesimistojn», kiuj asertas, ke la tutmonda esperantistaro ne kapablos doni kompletan statistikon! Helpu tuj, senprokraste! Helpu laŭ preciza maniero, fidinde! Helpu, por doni al nia movado impresigan propagandilon, kaj por honori la memoron de D-ro Zamenhof! Per nenio alia li estos honorata tiel, kiel per la pruvo antaŭ la mondo, ke lia afero dum kvardek jaroj marŝis senhalte.

Prof. D-ro *Dietterle*

Fakestro por statistiko
 de Internacia Centra Komitato
 Direktoro de la Esperanto-Instituto
 por la Germana Respubliko

Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

Karl Marx. Lia Vivo kaj lia Verko. — Kompil-esperantigis V. Elsudo. Biblioteko de Sennaciulo. Serio soci-politika. Havebla ĉe S. A. T., Colms-trasse 1, Leipzig-O 27. 1926. 96 pĝ. 11 × 14. Prezo: 0. 60 gm.

Enhavo: La Vivo de Karl Marx laŭ N. Lenin kaj Fr. Engels; Deveno kaj Esenco de Marksismo laŭ R. Luxembourg; Marksismo kaj Scienco laŭ Prof. S. Semkovski.

Karl Marx estas nomo tiel disvastigita tra la tuta mondo, ke la nova volumo nenion novan povos prezenti al tiuj, kiuj de iom proksime studis la laboristan movadon, sed oni renkontas tiel malofte vere instruitajn laboristojn, vere konsciajn proletariojn, ke la malmultaj paĝoj povos multon fari por la celo, kiu gvidas la eldonintojn.

Bona preso kaj ĝenerale bona lingvo. — SALJO.

Ŝtato kaj Revolucio de N. Lenin. — El la rusa lingvo tradukis G. Demidjuk. Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, Colmstr. 1, Leipzig O-27. 1926, 150 pĝ. 18×12. Prezo: 1 gm.

Subtitolo «Marksisma instruo pri la ŝtato kaj taskoj de l' proletaro en revolucio» donas ideon pri la verko de Lenin, la homo kiu en la lasta tempo altiris la atenton de la tuta homaro kaj la timigitan rigardon de multaj ŝtatistoj, kiuj vidis en danĝero sian profitdonan negocon.

El la diversaj rusaj revoluciuloj, Lenin reliefigis kiel pli bona idealisto ol la ceteraj. Pro tio lia verko vekos intereson ĉe ĉiu rondo de laboristoj, laborantaj por sia libero.

La paragrafojn de la verko oni legas kun intereso. La doktrino de Marx ludas ĉefan rolon, kaj la aŭtoro trafe disvolvas la ideojn por instrui la laboristojn por la definitiva batalo.

Superflue estas diri ke la libro, korekte tradukita kaj presita, meritas akcepton plej koran ĉe ĉiu rondo de progresemuloj. — SALJO.

La Prepozicioj kaj la Akuzativo en Esperanto. — Verkis Alberto Mair. Havebla ĉe la aŭtoro, Hasnerstrasse 103, Wien XVI. 72 pĝ. 16×11. Prezo: 1 sv. fr.

Ofte ni rimarkas, ke esperantistoj, sufiĉe progresintaj en la lernado de Esperanto renkontigas kun malfacilaĵoj por trafi ĝustan prepozicion. Ĉe bonaj esperantistoj ni vidas kelkafoje eraran uzon de prepozicio. Al la helpo de tiuj samideanoj venas ja bonega verko de Mair, kiu kun granda zorgo ellaboris libron tre utilan.

Ĉiu prepozicio haŭas kompletan klarigon kun multaj ekzemploj kaj necesaj komparoj, plej ofte trafaj kaj ĝustaj. Ifoje, eble, ni ne dividus la opinion de la verkinto sed tio ne forprenas nian laŭdon al la verko, kiu estas taŭga amiko de ĉiu progresinta esperantisto. — SALJO.

Kio estas Oomoto. — Esperantigis T. Juri. Eldonis Oomoto Propaganda Oficejo, Tenseiŝa, Kameoka Kioto-fu, Japanujo. 1926. 55 pĝ. 18 $\frac{1}{2}$ ×13. Prezo: 0. 60 sv. fr.

La nova spirita movado estas tiel fervore disvastigata de ĝiaj partianoj, ke ĉiu esperantisto havas pri ĝi pli-malpli ĝustan ideon, sed se oni volas profunde konatiĝi kun tiu movado nepre oni devas legi tiun ĉi zorge tradukitan broŝureton. — SALJO.

Skotlanda Pejzaĝo. — Eldonis Higgie kaj K-io, Rothesay, Skotlando. Prezo: 1 ŝilingo.

Kun aldono «Belega Skotlando», la albumo prezentas multajn ilustraĵojn de skotaj pejzaĝoj kun diversaj informoj pri la lando. Bedaŭrinde la teksto ne estas sufiĉe korekta, kio estas makulo apud la belaj bildoj, traferespegulantaj la belecon de Skotlando. — SALJO.

Unuiĝo de Ligilo U. S. S. R. — El la rusa tradukis Viktor Ĵavoronkov. Eldonis Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo de U. S. S. R. 54 rue Cus-tine, Paris-18. 1926. 39 pĝ. 23×15. Prezo: $\frac{1}{6}$ de dolaro.

La eldoninto sin turnas al la leganto jene: Inter laborantoj de Ligilo (Poŝto, Telegrafo, Telefono kaj Radio) de tuta mondo, internacia lingvo Esperanto, ĉiam pli kaj pli, komencas varbi siajn adeptojn, praktikulojn kaj aprobantojn aplikantaj por la servo de interligilo, tiun ĉi mirinde simplan kaj facilan helplingvon en internaciaj interrilatoj. Vere oni konstatas aktivkreskadon de esperantistoj inter P. T. T. R. — istoj de ĉiuj landoj, kaj dezirante helpi al tiu ĉi kreskado, Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo U. S. S. R. decidis eldoni, en la esperanta traduko prezentata al la legantaro, ĉi sube skizon, por tiamaniere liveri al samideanaj-kolegoj, la materialon por la retradukoj en naciajn lingvojn kaj per tio kanatigi kun la kondiĉoj de laboro en Unuiĝo de Ligilo en U. S. S. R.

La broŝuro estas tre interesa, precipe por fakuloj. Pri la traduko ni povas diri nur laŭdon. — SALJO.

Baha' u' Ilah kaj Lia Misio. — De Dro. John Esslemont. El la angla originalo tradukita. Publikajoj de la Esperanto-komitato de la Bahaa-movado Hamburg. 1926. 26 $\frac{1}{2}$ ×16. Prezo: ne montrita.

«La Bahaa-movado estas ŝargita per misio de Sciigoj Ĝojigaj por la homoj — la misio, ke ree granda profeto aperis, kiu parolas en la nomo de la Sinjoro kiel la profetoj de pasintaj tempoj kaj alportas la nepageblan benon de Dia Gvidado al la konfuzita kaj erarigita homaro.»

La celo de la broŝuro estas doni mallongan resumon pri la vivo de profeto, kiu nomiĝis Baha' u' Ilah, kiel ankaŭ pri lia antaŭirinto El Bab. Ĝi donas ankaŭ skizon pri la ĉefaj trajtoj de liaj instruoj kaj malgrandan studon pri la rilatoj al Kristanismo kaj la ceteraj religiaj sistemoj de la mondo. — SALJO.

Common Commercial Terms in English & Esperato, faka vortaro angla-

esperanta pri komerco, lerte preparita kaj eldonita de «The Esperanto Institute Limited», Welwyn Garden City, Herts (Anglujo). Prezo: 6 pencoj.

Estas tre bone, ke la angloj, kies lingvo estas unu el la plej disvastigitaj en la tutmonda komerco, pretigis tiun fakan vortaron, kiu efektive venas riĉigi la provizon de esperantaj terminoj. Ĉu la samideanoj el aliaj nacioj ne povus siavice prepari similajn vortaretojn pri filozofio, naturscienco, arto, k. t. p.?—J. G. C.

La Alta Kanto de la Amo, de Teo Jung, «Heroldo de Esperanto», Horrem bei Köln (Germanujo). Prezo: 0'75 Rm.

Belega broŝuro 40-paĝa, enhavanta la poemon de la konata Redaktoro de «Heroldo de Esperanto», S-ro Teo Jung, kiu nunjare meritis la Naturan Floron ĉe niaj Floraj Ludoj.

Ĉar «La Alta Kanto de la Amo» jam estas presita sur la paĝoj de «Kataluna Esperantisto», nenecese estas raporti al niaj legantaj pri la belaj de tiu poemo, originala rekantaĵo de malnova legendo. Certe, pro la temo de ĝi pritraktata, ĝi estis speciale taŭga por ricevi tiun plej altan premion en nia literatura festo.—J. G. C.

Palaco de Danĝero, verkita en angla lingvo de Mabel Wagnalls, kaj tradukita de Edward S. Payson, Honora Prezidanto de la Esperanto Asocio de Nordameriko. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig (1926). 19 × 13. Prezo: 6 Rm.

Libro 208-paĝa, unu el la plej arte kaj lukse prezentitaj en Esperanto, gracia rakonto pri scenoj de la franca kortego, en la XVIII^a. jarcento, kies heroino estas Madame Pompadour, amantino de la reĝo Ludoviko XV^a. Ĝia legado estas interesa kaj alloga, kaj la stilo sufiĉe korekta. En tiu novelo, verkita de angla aŭtoro pri la franca vivo, estas multaj francaj nomoj, kiujn la tradukinto konservis en franca lingvo. En kelkaj okazoj, ni komprenas la ĉarmon de tio, sed ĝenerale ni estus preferintaj la esperantigon de propraj nomoj. Kvankam, kiel estas dirite, la stilo estas kontentiga kaj ofte tute flua, ni trovis kelkajn makuletojn. Ekzemple: «Foje en seĝo» anstataŭ «jam en seĝo»; «Vizaĝesprimoj», super kiu eble estas preferinda «mienoj»; «eĉ nek» anstataŭ simple «eĉ ne» aŭ «nek», kaj aliaj.

Entute la libro estas bona kaj meritas la plej bonan akcepton, ĉe la esperantistaro, kiu devas danki la laboremecon de S-ro Payson, lerta tradukinto de «La Akrobato de Nia Sinjorino» kaj «Blanche, la Virgulino de Lille». Ŝajne la Honora Prezidanto de la Nordamerika Asocio aparte ŝatas verkojn pri francaj temoj, kiuj speciale estas interesaj kaj «proksimaj» por katalunaj legantoj.

La Esperanto-eldonejo «Ferdinand Hirt & Sohn», de Leipzig, meritas per «Palaco de Danĝero» novan aplaŭdon kaj efektivan kunhelpon.—J. G. C.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Pro... kaj Por...

La Interligilo de l' P.T.T. — Jam de kvin jaroj la nomita Interligilo baltas por disvolviĝi sian fakan movadon, kiu bezonas vastan diskonigon. Ja estas poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj, radio-profesiuloj en la tuta mondo, sufiĉe multaj el ili estas ĉu esperantistoj, ĉu esperantemaj, sed ĉar faka propagando disvolviĝas malfacile, eble ili ne informiĝis ankoraŭ pri la starigo de Interligilo kaj ili ne aliĝis al ĝi por puŝi antaŭen la subtenindan movadon.

La redakcio de Interligilo de l' P.T.T. alvokas ĉiujn fakulojn al komuna agado. Turnu vin al 54, rue Custine, Paris-18.

Nia movado en Palma. — En la laborista societo C.R. del T. de nia najbara insulo Mallorca oni malfermis kurson de Esperanto sub la gvido de nia amiko kaj samideano Joan Matas. La kurso estas tre sukcesa.

XIX Universala Kongreso de Esperanto, Danzig. — Oficiala informilo. — Dato: La XIX. Universala Kongreso de Esperanto en Danzig okazos 28 Julio ĝis 4 Aŭgusto 1927. — Patrono de la kongreso: S-ro D-ro Heinrich Sahm, Prezidanto de l' Senato de la libera urbo Danzig. — Loka Kongresa Komitato: Honora prezidantino: S-ino Anna Tuschinski. Prezidanto: S-ro Bernhard Aeltermann, Del. de UEA. Vicprezidanto: S-ro Kazimierz Majorkiewicz. Financoj: S-ro Kurt Sachaze. Sekretarioj: F-ino Käthe Marquardt kaj F-ino Schulz. Gazetaro: S-ro Edmund Fethke kaj S-ro Ernst Grabowski. — Alvojaĝo: Por la envojaĝo, al Danzig trans Stettin—Stolp aŭ Schneidemühl—Dirschau (Tczew), aŭ Königsberg—Marienburg—Dirschau (Tczew) estas necesa eksterlanda pasporto kun pola transitvizo. — Pola vizo ne estas bezonata, se la envojaĝo okazos jenmaniere: 1. per ŝipo de Swinemünde, Pillau, Stockholm, Riga ktp, al Zoppot, de tie per fervojo al Danzig, 2. per fermita koridor-vagonaro de Berlino al Marienburg, de tie per malgrandfervoj, aŭto aŭ aeroplano al Danzig, 3. per aeroplano de Stockholm. Stettin, Berlin, Königsberg. — *Danziga vizo ne estas necesa.* — Uzu la aranĝotajn karavanojn de UEA pri kiuj detaloj sekvas en Januaro. — Kotizo: Por ĉiuj kongresanoj sen diferenco laŭ landoj. 25 danzigaj guldenoj aŭ 20 germanaj markoj aŭ 1 angla funto aŭ 25 svisaj frankoj. Por blinduloj senpage.

«Esperanto press» en Warszawa. — Ĵus fondiĝis en Warszawa presa esp. agentejo, nomita «Esperanto Press», kies direktoro estas Stanislaw Essigman, delegito de U.E.A. kaj prof. Leopold Kronenberg. Celo de la agentejo estas provizi ĉiujn redakciojn esperantajn kaj naciajn per artikoloj, spegulan taj vivon politikan, socian kaj kulturan en Polujo. Tiucele dissendas esperanto-press siajn artikolojn laŭ ĉiuj konataj adresoj de delegitoj de U. E.A., esperantaj kaj naciaj gazetoj kaj al esperantaj ĵurnalistoj. Ĵus oni dissendis unuan «leteron el Polujo» kaj artikolon pri fama muzikisto Frideriko Chopin, verkitan de S-ino. Tekla Essigman. Ĉiu samideano, kiu ricevis ar-

tikolojn de Esperanto Press, estas petata traduki ilin nacilingven kaj presigi en sia nacia gazeto, pruvante tiamaniere gravan rolon, kiun povas ludi Esperanto en internacia ĵurnalista vivo. «*Esperanto-Press*», kies financa bazo estas plencertigita, dissendas siajn artikolojn senpage, ĝi postulas nur, ke oni sendu al ĝi 2 numerojn de ĉiu gazeto, kiu presigis ĝiajn artikolojn.

Krom tio povas Esperanto-Press liveri al ĉiuj ĵurnalistoj fotojn el Polujo (personoj, urboj, montaro, vidindaĵoj) por presigi en gazetaro.

Kunlaborantoj pagataj eventuale per la redakcioj naciaj, uzantaj artikolojn de Esperanto-Press, ĉie serĉataj. Adreso: «*Esperanto-Press*» Warszawa, Strato Piekna 11a prof. Kronenberg, Polujo.

Por bono de nia ideo helpu »*Esperanto-Press*«-on.

Malfermo de kursoj. — Kun la alveno de aŭtuno nia movado ricevas ĉiujare plivigliĝon ĉe niaj grupoj, kiuj duobligas sian entuziasmon kaj agadon por altiri novajn adeptojn al nia movado.

Ĝis nun ni ricevis informojn pri malfermo de kursoj en Sabadell, Terrassa kaj Barcelona, kies lokaj grupoj organizis diversajn propagandajn kunvenojn kaj prelegojn. Ni esperas, ke la nova semado liveros al nia afero kontentigan rikolton.

Kataluna Antologio. — La Eldona Komitato de «*Kataluna Antologio*» ĵus publikigis en 20-paĝa kajero la recenzojn de la ĉefaj esperantaj revuoj kaj la opiniojn de eminentaj esperantistoj pri la grava verko «*Kataluna Antologio*».

Tiuj recenzoj kaj opinioj dece ordigitaj, donas ĝustan bildon pri la intereso kaj valoro de la literaturaj trezoroj enhavataj en tiu dika volumo.

Tiu kajero estas senpage sendata al ĉiu interesato; oni petu ĝin de S-ro. Eduard Capdevila, Carders 29, Barcelona.

Radio Barcelona. — Provizore ne plu okazos la esperanto-programo. Ĝustatempe ni informos niajn legantojn pri la reorganizo de niaj radio-paŝroladoj.

Oni laŭdas. — Pro la verkoj «*La literaturo kaj lingvo de Irlando*» kaj «*La interna ideo de Esperanto*» aperintaj en niaj lastaj numeroj, ni ricevis tre korajn laŭdojn de kelkaj amikoj kaj legantoj. Ni transdonas la laŭdojn al la verkintoj S-ino Osmond kaj D-ro Olšvanger, kiuj havigis al nia gazeto tiel interesajn artikolojn, danke al la ĉiam pli gravaj Internaciaj Floraj Ludoj.

En la verko de S-ino Osmond enŝoviĝis la jenaj eraroj:

paĝo 415, linio 25. legu Erigena anst. Erignena.

- » 416, » 19. » D - Daír » Daiz
- » 416, » 21. » C - Coll » Cole
- » 417, » 11. » A Šeán » Šeáv
- » 417, » 24. » an cnám » cuám
- » 417, » 38. » An dtuigeann tú anst. dtiguim
- » 417, » 39. » Tuigim. Ni tuigim anst. tiguim. Ni tiguim.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto», València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:
Ĉiusemajna
Aktuala Ilustrita
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a
BARCELONA

“Kataluna Esperantisto”

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anon-
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi
tekston publikigotan.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per 'al

femeni

heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komer-ci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi skribas
Jo esric

skribis
escrivi

skribos
escriuré

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo esric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.